

Jozefo Ŝlejŝtejno

Enkonduko en la studado de Markso, Engelso kaj Lenino

Jozefo Ŝlejŝtejno

**Enkonduko en la studadon
de Markso, Engelso kaj
Lenino**

elgermanigita de Vilhelmo Lutermano

**Monda Asembleo Socia
(MAS)**

Jozefo Ŝlejŝtejno [Josef Schleifstein]

Enkonduko en la studadon

de Markso, Engelso kaj Lenino

elgermanigita de Vilhelmo Lutermano

el

Josef Schleifstein: Einführung in das Studium von Marx,

Engels und Lenin, Neue Impulse Verlag, Essen, 2008, ISBN

978-3-910080-04-1

Jozefo Ŝlejŝtejno: Enkonduko en la studadon de Markso,

Engelso kaj Lenino,

elgermanigita de Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS)

2010

ISBN 978-2-918300-27-4

Enhavo

Antaŭparolo de la eldonejo	
Neue Impulse Verlag.....	7
1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo.....	9
1.1. Historiaj-sociaj antaŭkondiĉoj kaj teoriaj fontoj	
.....	9
1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj	
konceptoj de Markso kaj Engelso.....	13
2. La dialektika materiismo.....	65
2.1 Temo kaj diferencoj de la antaŭa materiismo..	65
2.2 La filozofia materiismo.....	72
2.3 La dialektiko.....	80
3. La materiisma koncepto de historio.....	100
3.1 Bazaj ideoj.....	100
3.2 Naturo kaj homo, laboro kaj antropogenezo.	103
3.3 Produktadfortoj kaj produktadkondiĉoj, la	
sinsekvo de la sociaj formacioj.....	109
3.4 Historia leĝeco kaj konscia agado de la homoj –	
Neceso kaj libereco.....	115
3.5 Socia esto kaj socia konscio; bazo kaj	
superstrukturo.....	120
3.6 Klasoj kaj klasbatalo.....	128
3.7 La ŝtato.....	137
4. La politika ekonomio.....	144
4.1 Estiĝo kaj disvolvado de la kapitalisma	
produktadmaniero.....	148
4.2 Varo, valoro kaj mono.....	156
4.3 Salajro, kapitalo, plusvaloro.....	163
4.4 Reproduktado kaj akumulado de la kapitalo.	170
4.5 La tendenco falo de la profitkvoto.....	178
4.6 La lenina teorio de imperiismo.....	181
5. Scienca socialismo kaj laborista movado.....	189
5.1 De la utopia al la scienca socialismo.....	190

5.2 Celo, enhavo kaj formoj de la laborista klaso.....	196
5.3 Sponteco kaj konscio. La marksisma laborista partio.....	213
5.4 La socialisma revolucio.....	221
5.5 Bazaj trajtoj de la socialisma kaj komunisma socio.....	229
Literaturindikoj.....	239
Literaturo pri Sekcio 1: Pri la estiĝhistorio de la marksismo.....	239
Literaturo pri Sekcio 2: La dialektika materiismo	240
Aktualaj verkoj en E-o pri La dialektika materiismo.....	241
Literaturo pri Sekcio 3: La materiisma histori-koncepto.....	242
Literaturo pri Sekcio 4: La politika ekonomio....	243
Aktualaj verkoj en E-o pri Politika ekonomio...	244
Literaturo pri Sekcio 5: Scienca socialismo kaj laborista movado.....	245
Aktualaj verkoj en E-o pri Scienca socialismo kaj laborista movado.....	247
Rimarkoj de la tradukinto.....	248
Nomindekso.....	250

Antaŭparolo de la eldonejo Neue Impulse Verlag

La libro ĉi tie prezentita estas la senŝanĝa represo de „*Einführung in das Studium von Marx, Engels und Lenin* [Enkonduko en la studadon de Markso, Engelso kaj Lenino]”, kiun la bedaŭrinde tro frue mortinta elstara teoriisto, historiisto kaj instruisto de la laborista movado kaj kunfondinto de nia revuo *Marxistische Blätter*, prof. d-ro Josef Schleifstein, verkis por la serio de la elementaj libroj de Beck. Ĝi estis verkita komence de la 1970-aj jaroj, tempo de sufiĉe vigla intereso de precipe junaj homoj de nia lando pri la marksismo. Tiam fame konata eldonejo povis apenaŭ permesi al si rezigni eldonadon de libroj pri la marksismo kaj ties fondintoj. La merito de la eldonlibrejo *H.C. Beck* en Munkeno estis ke ĝi donis al profilhava kaj organizita marksisto okazon aperigi altkvalitan, sisteman enkondukon en ilian verkaron. La kvaliton kaj la intereson povas atesti ke la eldonlibrejo Beck en Munkeno aperigis la libron de Schleifstein ĝis en la 1980-aj jaroj en pluraj eldonoj.

Sed la tempoj ŝanĝiĝis: Tio videblas ankaŭ ĉe la eldonejoj. Escepte de la nazia epoko, oni povas diri: Verŝajne neniam en la lastaj cent ĝis cent okdek jaroj en Germanio, la lando de la fondintoj de la marksismo, la verkoj de la klasikuloj de la marksismo troviĝis en tiom malbona situacio kiel nun. Ili apenaŭ ekzistas ankoraŭ originale, entombigistoj kaj prirabistoj de mortintoj regas la scenejon – ankoraŭ.

Sed en la juna generacio, kies politika ensociiĝo komenciĝis post la disfalo de la socialismo en Eŭropo kaj kiu – pli ol de tiu mondhistoria evento mem – estas stampita de la sekvoj de tiu cezuro, kreskas nova, malkaŝa intereso pri la laŭdire mortintoj kaj ties verko. Do, ni – iamaj disĉiploj de Schleifstein – kaptas volonte la okazon represi la libron. Kaj pli precize sen ŝanĝi eĉ solan komon en la teksto. Jam tio pledas por la verko. Ni konsideras tiun ĉi libron la plej bona enkonduko en la studadon de la marksismaj klasikuloj. Ĝi

estas krome sen tiaj iluzioj kaj misjuĝoj, kiuj estis tre disvastiĝintaj inter marksistoj dum la epoko de la apero de tiu ĉi libro. Ni estis mem surprizitaj, kiam ni – preparante la represadon – devis konstati dum la legado, kiom Schleifstein kapablis plej grandparte eviti tiajn iluziojn kaj misjuĝojn. 'Plej grandparte' signifas, ke ekzistas iu aŭ alia – el nuntempa vido – tro optimisma tekstero en la parto pri la socialismo. Sed ni lasu al la gelegantoj fari ankaŭ pri tiuj demandoj sian juĝon mem.

Do ni preferis rezigni pri ĉia ajn komento pri la libro mem. Ĝi iru sian pluan vojon kaj donu valoran helpon al ĉiuj, kiuj ĝuste en la nuntempo serĉas orientiĝon kaj alternativojn kaj pretas studi Markson, Engelson kaj Leninon, tiujn laŭdire mortintojn, kiuj tamen transvivis ĉiujn kiuj deklaris ilian morton.

Eseno, en julio 1995 / decembro 2008

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

1.1. Historiaj-sociaj antaŭkondiĉoj kaj teoriaj fontoj

Se oni volas klarigi la originon de la ideoj aŭ de la sistemo, kiu konsistigas la marksismon kaj kiu spirite kiel praktike atingis en nia epoko senkomparan efikecon, laŭ la kriterioj de ĝiaj fondintoj, oni povas fari tion nur el la konkretaj historiaj kondiĉoj de ilia epoko. Ne la genio aŭ la pli aŭ malpli favoraj individuaj vivcirkonstancoj de iliaj kreintoj povas komprenigi la devenon kaj efikon de iliaj ideoj kaj teorioj, sed nur la historiaj bataloj de ilia tempo, la profundo, forto kaj pasio, per kiuj la kreantoj de ideoj sukcesas esprimi la por tiu historia periodo aparte premajn, lastinstance ekonomie kondiĉitajn interesojn de certaj klasoj aŭ tavoloj.

Ekzistis multaj socialistaj pensantoj antaŭ Markso kaj Engelson, kiuj – se ni pensas ekz-e pri Saint-Simon¹, Fourier²

1 Saint-Simon: Claude Henri, Duko de 1760-1825). Franca utopia socialisto (en E-o: Sensimono, en la sekvo tia). *„Unu el la tre grandaj utopiistoj, kiuj agis en la servo de la interesoj de la proletaro ... Lia akra vido kaŭzas ke en liaj verkoj troviĝas ĝermoj jam kvazaŭ ĉiuj ideoj ne strikte ekonomiaj de la posta socialismo.”* (Engelson) -vl

2 Fourier: François Charles Fourier (1772-1837), franca utopia socialisto (en E-o: Furiero (en la sekvo tia). *„En Furiero ni renkontas akran kritikon, aŭtente francan, sed ne malpli trafan, de la ekzistantaj sociaj institucioj. Li senindulge nudigis la materian kaj moralan mizeron de la burĝa mondo.”* (Engelson) -vl

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

aŭ Owen³ – estis siamaniere geniuloj, sed kies historia efiko en ilia tempo aŭ eĉ por la posteularo tute ne kompareblas kun tiu de Markso kaj Engelso. La klarigon por tio donis Markso kaj Engelso mem, kiam ili montris, ke la nematureco de la utopiaj-socialistaj ideoj de iliaj antaŭuloj estis kaŭzita de la *nematureco de la kondiĉoj*, en la ankoraŭ neevoluinta stadio de la kapitalismo.

Estas almenaŭ tri historiaj-ekonomiaj kondiĉoj, sen kiuj la penssistemo de Markso kaj Engelso, la scienca socialismo, pli precize: la scienca komunismo – estus malebla: unue la industria revolucio kiu kaŭzis la transiron de la manufaktura al la industria kapitalismo kaj – unue en Anglio, poste en la aliaj okcidenteŭropaj landoj kaj en Nordameriko – kondukis al antaŭe nekonata kresko de la kapitalismo; due la por la samtempuloj videbla elpaŝado de la laboristoj ne nur kiel suferanta, sed ankaŭ jam kiel batalanta socia klaso en la dua duono de la tridekaj jaroj kaj en la unuaj kvardekaj jaroj de la 19-a jarcento (la ribelo de la silktekstistoj de Liono, la sileziaj teksistribeloj, la unua politika laboristmovado – la britaj ĉartistoj); trie la specifa politika situacio en la germanaj ŝtatoj mem: la feŭda subpremado kaj dissplitiĝo, la multnombraj baroj kiuj kontraŭstaris ĉian iom liberan burĝan evoluon, la vekiĝo de memstaraj moviĝoj en la germana burĝaro, incititaj de la franca juli-revolucio de 1830, movado kies ribeleco anonciĝis unue

3 Owen: Robert (1771-1868), angla utopia socialisto, en E-o: Oveno (en la sekvo tia). Fabrikisto. Liaj praktikaj spertoj el siaj fabrikoj kondukis lin al la tereno de komunisma teorio. Li rifuzis ĉian perforton. Liaj provoj fondi en Nordameriko komunistajn koloniojn fiaskis. Vidante tion, „li dediĉis sin rekte al la laborista klaso, ene de kiu li daŭre laboris dum tridek jaroj. Ĉiuj sociaj movadoj kaj ĉiuj realaj procezoj kiuj en Anglio progresis en la intereso de la laboristoj estis asociitaj kun la nomo de Oveno”. (Engelso) -vl

1.1. Historiaj-sociaj antaŭkondiĉoj kaj teoriaj fontoj

en la literaturo ekz-e de Börne, Hejno⁴ kaj Gucko⁵.

Nur la koincido de tiuj historiaj kondiĉoj kun la specifa spirita kaj politika biografio de genie talentaj kapoj kaj la revolucia karaktero de la tiama germana intelektularo, ekz-e de la junaj Markso kaj Engelso, povis fari ilin la fondintoj de la scienca komunismo.

Markso kaj Engelso mem plurfoje ripetis, ke la ekonomiaj sociaj kondiĉoj rigardendas ja kiel *lastaj* movfortoj de novaj sociaj ideoj kaj penssistemoj, sed ke ĉia nova teorio ligiĝas nature al antaŭa pensmaterialo, ke ĝi posedas do ankaŭ *spiritajn fontojn*. Tiurilate la malfavoraj cirkonstancoj, la prema malvasteco de la situacio en la germanaj ŝtatoj, kiuj en la jaro 1843 pelis Markson al Francio kaj Engelson jam iom antaŭe al Anglio, montriĝis kiel avantaĝo por ilia persona evoluo. Kaj tio ne nur pro la pli modernaj ekonomiaj kaj politikaj kondiĉoj kun kiuj ili rekte ekrilatis, sed ankaŭ, ĉar ili tie konatiĝis – krom la hegelan dialektikon kaj ĝian materiisman koncepton de Fojerbaĥo⁶ kiu tiam ĵus konatiĝis kun sensacia sukceso kaj kun kiuj ili jam en Germanio familiariĝis – kun tiuj aliaj gravaj spiritaĵoj tendencoj de la epoko, kiujn ili prilaboris kaj sen kiuj ilia propra teorio ne fariĝintus ebla: la *francaj* socialistaj kaj komunistaj utopiistoj kaj la socialismaj ideoj kaj provoj de Roberto Oveno⁷ kiel ankaŭ la klasika *angla* politika ekonomio, speciale de Petty, Smith kaj Ricardo.

Sed eble ankoraŭ pli gravis, ke ili tie ekrilatis unuafoje kun la *praktika* laborista movado; Engelso kun la ĉartistoj en Manĉestro, Markso kun la laboristaj socialistoj kaj kom-

4 Originale: (Heinrich) Heine. -vl

5 Originale: Gutzkow. -vl.

6 Originale: Feuerbach. Vd Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, ISBN 978-2-918300-17-5

7 Originale: Robert Owen. -vl

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

unistoj en Parizo. La teoriaj penssistemoj kiujn ili daŭrigis, kiujn ili kritike prilaboris kaj superis, eniris en ilian propran pensaron kiel kontraŭdira unuo de kontinueco kaj malkontinueco. Sed en tiu procezo estiĝis filozofie, ekonomie kaj surkampe de la socialisma teorio io fundamente nova – unueca, senescepte scienca, materiisma kaj proleta-revolucia mond-, histori- kaj soci-koncepto. En tiu senco la marksismo estas en si fermita sistemo. Sed ĝuste nur en la senco de la interna unueco de siaj sciencaj kaj sociaj fundamentoj, kaj tute ne en la senco kvazaŭ Markso, Engelso kaj Lenino iam ajn konsiderintus sian teorion kiel ion finitan, pretan. Kiel severaj dialektikistoj, ĝuste ankaŭ rilate sin mem kaj siajn eldirojn, ili sciis, kiel Lenino esprimis tion, ke ilia teorio ne estas io „*finita, netuŝebla*”, sed ke la socialistoj „*devas disvolvi ĝin al ĉiuj direktoj, se ili ne volas postresti malantaŭ la vivo*”.⁸

Estas tri grandaj kampoj, kiuj eniris en la sistemon de la marksismo, do en la teorion de Markso, Engelso kaj de la plej grava daŭringinto de ilia verko, Lenino, kiel memstare ellaboritaj sciencaj fakoj. Engelso en sia „*Anti-Dühring*” kiel ankaŭ Lenino en la eseo „Tri fontoj kaj konsistigaj partoj de la marksismo” difinas ilin kiel partojn de la marksisma scienco: la filozofion, la politikan ekonomion kaj la sciencan socialismon. Tiun lastan tamen en nocie larĝa senco, nome kiel teorion, programadon, strategion kaj taktikon de la klasbatalo de la moderna laborista klaso.

Markso, Engelso kaj Lenino estis dumtempe de sia vivo ne nur scienculoj, sed ĉiam ankaŭ *praktikantoj* kaj gvidantoj de la revolucia laborista movado. La fama tezo pri Fojerbaĥo de la juna Markso, ke la filozofoj nur diverse interpretis la mondon, sed ke necesas ŝanĝi ĝin, estis por la fondintoj de la marksismo kiel por Lenino memdevontiga maksimumo de sia agado. Teorio kaj praktiko estas en ilia vivo

8 Lenin: Unser Programm [Lenino: Nia programo], LW vol. 4, p. 206.

1.1. Historiaj-sociaj antaŭkondiĉoj kaj teoriaj fontoj

nedisigeble interligitaj.

La verkaro de Markso, Engelso kaj Lenino ne redukteblas al la tri nomitaj esencaj partoj de la marksismo. Ekzemple ili verkis ne nur pri la materiisma histori-kompreno, do pri histori-teorio, sed ĉiuj tri elstaris ankaŭ kiel historiografoj, speciale kiel historiistoj de la samtempo. Iliaj eldiroj pri estetiko, literaturo kaj arto, la laboraĵoj de Engelso kiel milit-teoriisto kaj -historiisto, la marksaj matematikaj manuskriptoj kaj la engelsaj natursciencaj-teoriaj kaj lingvosciencaj studaĵoj estas – kiel fakuloj konfirmis – ankaŭ por ili eĉ nuntempe tre interesaj. Sed ne povas esti la celo de enkonduko en la studadon prezenti la tutan teorion kaj praktikan agadon de Markso, Engelso kaj Lenino, sed iliajn konceptojn kiel teorion sistemon, kio rekomendas limigon al la filozofio, la politika ekonomio kaj la scienca socialismo.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

Se oni sekvas la individuan vojon de Karlo Markso kaj de Frederiko Engelso ĝis la ellaborado de ilia filozofia kaj politika baza koncepto – la dialektika-historia materiismo kaj de la scienca socialismo, kiun oni devas konsideri ilia komuna verko – tiam oni trafas sur multo samspeca kaj parenca kiel ankaŭ sur konsiderindaj malsamecoj. Al ambaŭ komuna estas la emo praktiki filozofion, ideajn batalojn ne por tiuj mem, sed por povi per tio interveni en la *praktikajn* sociajn batalojn de sia tempo. Ĉi tie troviĝas verŝajne la plej profunda radiko de ilia komuna laboro unika en la historio de la scienco kaj de la politiko. Komuna al ili ambaŭ estas ankaŭ la partopreno en la movado de la junhegelanoj fine de la 1830-aj kaj kvardekaj jaroj kaj la entuziasmo pri

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

Hegelo kaj Fojerbaĥo. Sed alie iliaj spiritaj kaj politikaj-praktikaj evoluvojoj malsamas ĝis ilia dua renkontiĝo fine de aŭgusto 1844 en Parizo, dato kiam ekis ilia komuna laboro.

Markso en 1838 kaj en la sekvaj jaroj intense studis la hegelan filozofion en Berlino kaj tie baldaŭ konatiĝis kun la junhegelanoj – la maldekstra alo inter la du tendencoj kiuj formiĝis post la morto de ilia instruinto. Ili akcentas la kritikan dialektikan pensmanieron kaj ne la konservativan sistemon. La spiritaj elstaruloj de tiu tendenco – Bruno Bauer kiel centro de la tiel nomata Doktorklubo en Berlino, dum jaroj amiko de Markso, kaj la eldonisto de la „*Hallische Jahrbücher*“, Arnold Ruge – vidas en la plurlandoj pli junan Karlo Markso baldaŭ samrangan partneron kaj batalkamaradon. La grandega malfacilo esprimiĝi rekte politike, kaŭzita de la feŭda postresteco de la tiamaj germanaj ŝtatoj, instigas la batalantojn okupiĝi unue pri la *kritiko de la religio*. Grandan instigon al tio donis 1835 David Friedrich Strauß kun sia tre efika libro „*Das Leben Jesu* [La vivo de Jesuo]“, en kiu li provis analizi *historie* la enhavon de la Nova Testamento, kaj kie li ankaŭ refutis la ekzistadon de Jesuo kiel homo kaj kondamnis la nenaturan provon pacigi la kristanan religion kun sia filozofio. Ĉe tio Strauß anoncis, referencante la veran spiriton de Hegelo, panteisman koncepton.

Bruno Bauer poste prezentis tiun atakon, unue preskaŭ samdirekte, en sia „*Kritik der Geschichte der Offenbarung* [Kritiko de la historio de la revelacio]“, sed poste 1840 kaj 1841-1841 en la „*Kritik der Evangelien* [Kritiko de la evangelioj]“ multe pli akre. Bruno Bauer kontestis ĉian ajn dian enhavon de la kristanaj dogmoj kaj deklaris ke estas devo de la filozofoj liberigi la homojn, per kritiko de la kristanismo, el la premo de la kristana religio ankaŭ sur la politikan vivon.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

Apud tiu religikritika tendenco elformiĝis ankaŭ pli politika pensofluo inter la junhegelanoj, kies plej elstaraj laboraĵoj estis verkitaj de August von Cieszkowski, Arnold Ruge kaj Moses Hess. Cieszkowski kritikis Hegelon ĉefe en tio, ke li ne okupiĝis pri la estonteco. Li postulis filozofion de la ago, la difinadon de la homa sorto ne – kiel ĉe Hegelo – kiel nekonscian instrumenton de la mondspirito, sed per la propra memkonscia agado, per tio ke oni kontraŭmetu al tio kio estas tion kio devas esti. Ĉion ĉi li faris en maniero komplete idealisma, laŭ la instruo de Fiĥto⁹, sed tamen jam kun indiko, tre rimarkinda por la tiamaj germanaj kondiĉoj, al la utopiaj socialismaj konceptoj de Charles Fourier. Ankaŭ Arnold Ruge esprimis liberalan tendencon, kiu servis rekte politikajn celojn, en la „*Hallische Jahrbücher*“, kie li fine de 1839 deklaris ke Prusio sub influo de la romantiko fariĝis reakcia, ke ĝi nun trabatu al si la vojon al progreso laŭ la modelo de la reformacio.

Sed plej decida por la plua evoluo de la filozofie kaj politike plej radikalaj junhegelanoj estis la sinteno de Ludoviko Fojerbaĥo¹⁰, kiu en aŭgusto kaj septembro 1839 aperigis la eseon „*Zur Kritik der Hegelschen Philosophie* [Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela filozofio]“, en kiu li jam pridubigis la *idealismajn* bazojn de la hegela sistemo. Li poste, en novembro 1841, elpaŝis kun vere transformega verko, la „*Wesen des Christentums* [Esenco de la kristanismo]“.

Fojerbaĥo postulis en la lando, en kiu la klasika filozofio kun Kantio¹¹, Fiĥto kaj Hegelo atingis sian plej grandan

9 Originale: J. G. Fichte (1762-1814), antaŭulo de Hegelo en la historio de dialektiko. -vl

10 Originale: Ludwig Feuerbach. -vl

11 Originale: Immanuel Kant (1724-1804), germana idealisma filozofo, universitata profesoro en Kenigsbergo [orig. Königsberg, hodiaŭ Kaliningrado]. En lia filozofio reflektiĝas, laŭ Markso, la tuta „senpoveco, la humiliĝo kaj la mizero de la

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

floradon, *principan* ŝanĝon. Li proponis absolute novan vojon, la vojon al *antropologia materiismo*. Li levis la demandon pri la origino, fundamentoj kaj esenco de la religio entute kaj malkaŝe deklaris, ke ne dio kreis la homon, sed inverse la homo kreis al si dion kaj la diojn laŭ sia propra bildo. La sekreto de la teologio, diris li, estas la antropologio. Pli profundan, pli potencon lingvaĵon kontraŭ la religio kaj kontraŭ ĉio supernatura, spiritualisma pensado estis neniam antaŭe aŭdita en Germanio. „*Dio estas la nocio kiu anstataŭas la mankon de la teorio*“, diris Fojerbaĥo.

„Ĝi estas la klarigo de la neklarigebla, kiu klarigas nenion, ĉar ĝi devas klarigi ĉion sendistinge, ... la nescio, kiu solvas ĉiajn dubojn, ĉar ĝi disbatas ĉiujn, kiu scias ĉion, ĉar ĝi scias nenion difinitan, ĉar ĉiuj aferoj kiuj imponas la racion malaperas antaŭ la religio, perdas sian individuecon, en la okulo de la dia potenco ili estas nenio. La punkto estas la patrino de la religio.“¹²

Fojerbaĥo deklaris kiel bazan mankon de ĉia religio, ke ĝi asertas ke la *fremdiĝo* de la individua homo rilate sian specion estas ne forigebla, kaj li postulis, ke la amo de la homo al la homo estu ne derivita, sed ke ĝi fariĝu origina.¹³

Frederiko Engelso multe pli poste – 1886 en sia verko „*Ludwig Feuerbach und der Ausgang der klassischen deutschen Philosophie* [Ludoviko Fojerbaĥo kaj la fino de la klasika germana filozofio]” – raportis pri la unika efiko de la fojerbaĥa libro al la samtempa intelekta junularo:

„Jen venis la fojerbaĥa 'Esenco de la kristanismo'. Unufrape ĝi dispolvigis la kontraŭdiron, per tio ke ĝi senpere resurtronigis la materiismon. La naturo ekzistas sendepende de ĉia filozofio;

germanaj burĝoj”. Per sia teorio de la „aĵo en si” ne ekkonebla, li neas – kiel Hume – „la eblecon koni la mondon, aŭ almenaŭ koni ĝin komplete” (Engelso).

12 Ludwig Feuerbach: *Wesen des Christentums*, vol. 2, Berlino, 1956, p. 302.

13 Saml., p. 409.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

ĝi estas la bazo sur kiu ni homoj, mem naturproduktoj, elkreskis; ekster la naturo kaj la homo ekzistas nenio ... kaj la pli altaj estaĵoj, kiujn nia religia fantazio kreis, estas nur la fantasta respegulado de nia propra esto. La glacio estis rompita; la 'sistemo' rompita kaj forĵetita, la kontraŭdiro estis, ĉar ekzistanta nur en la imago, dissolvita. Oni devas esti spertinta la liberigan efikon de tiu libro por havi ideon pri tio. La entuziasmo estis ĝenerala: Ni ĉiuj estis tuj fojerbahanoj.”¹⁴

Tio estis skribita el memoro pri longe pasinta tempo, sed ni posedas ankaŭ la *freŝan* ateston de la ankoraŭ ne dudekvarjara Karlo Markso post la apero de la verko de Fojerbaĥo fine de januaro 1841, publikigitan en la „*Anekdotas zur neuesten deutschen Philosophie und Publizistik* [Anekdotoj pri la plej nova germana filozofio kaj ĵurnalismo]”. Markso diras tie:

„Ho hontu vi kristanoj, vi nobelaj kaj ordinaraj, kleraj kaj nekleraj kristanoj, hontu ke *antikristo* devis montri al vi la esencon de la kristanismo en ĝia vera senvuala formo! Kaj al vi, spekulaj ideologoj kaj filozofoj, mi konsilas: liberiĝu el la nocioj kaj antaŭjuĝoj de la ĝisnuna spekulativa filozofio, se vi entute volas veni al la aferoj tiaj kiaj ili estas, t.e. al la *vero*. Kaj por vi ne ekzistas alia vojo al la vero kaj al la libereco, ol tra la Fojerbaĥo”¹⁵. La Fojerbaĥo estas la purgatorio de la nuntempo.”¹⁶

Ankoraŭ pli senteble efikis sur la plua disvolviĝo de la mond- kaj histori-koncepto de Markso kaj Engelso la sekvaj laboraĵoj de Fojerbaĥo, en kiuj li plukonstruis kaj profundigis sian antropologian-materiisman koncepton, nome la „*Vorläufige Thesen zur Reform der Philosophie* [Provizoraj tezoj pri la reformado de la filozofio]” (1841) kaj la „*Grund-*

14 Friedrich Engels: Ludwig Feuerbach und der Ausgang der klassischen deutschen Philosophie, MEW vol. 21, p. 272.

15 Vortludo: Fojerbaĥo (*Feuerbach*) signifas laŭvorte „rivero el fajro”, tra kiu do kondukas la vojo al la vero por la kristanoj. -vl

16 Karl Marx: Luther als Schiedsrichter zwischen Strauß und Feuerbach [Lutero kiel arbitracianto inter Strauß kaj Fojerbaĥo], MEW, vol. I, p. 27.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

sätze der Philosophie der Zukunft [Principoj de la filozofio de la estonteco]" (1843).

En sia doktoriĝa disertacio, verkita en 1840 ĝis 1941 kaj deponita en aprilo 1841 pri la temo „Diferenco de la demokrata kaj epikura naturfilozofio”¹⁷, la filozofia starpunkto de Markso estas ankoraŭ *idealisma*, kvankam li jam en tre signifaj demandoj paŝas trans Hegelo kaj ankaŭ trans siaj junhegelanaj amikoj. Sed Markso ankoraŭ ne direktas sin, malgraŭ sia klara ateismo, kiel Fojerbaho kontraŭ la *idealisma* baza koncepto de Hegelo. Li kritikas ties provon pacigi religion kaj racion, kaj tio ne nur kiel „*adaptiĝon*” kaŭzitan de la tiamaj cirkonstancoj, sed fonditan en la hegelaj principoj mem.¹⁸ Markso ankaŭ superas la abstraktan kontraŭmeton de realeco kaj memkonscio, karakterizan por la junhegelana tendenco, la filozofion de la memkonscio. Jam en la disertacio li serĉas dialektikan *peradon* de pensado kaj esto en la senco de ilia reciproka interagado.¹⁹

De majo 1841 ĝis januaro 1843 ni trovas Markson ĉe la liberala *Rheinische Zeitung* [Rejna Gazeto], unue kiel kunlaboranton, poste kiel ĉefredaktiston. En siaj artikoloj por la gazeto videblas, ke li, kvankam en politikaj kaj juraj demandoj daŭre sur la starpunkto de Hegelo, strebas ligi sian filozofion pli forte kun la socia realeco kaj kun la praktika agado. Okazas kreskanta fremdiĝo inter li kaj la junhegelanoj ĉirkaŭ Bruno Bauer, kiuj faras la filozofian kritikon pli kaj pli memcelo, dediĉas sin al ekstrema individuismo kaj faras tiun centro de sia filozofio. Markso venis, kiel li poste raportis, en sia agado por la *Rejna Gazeto* unuafoje „en la embarason devi kunparoli pri tiel nomataj

17 Originale: „*Differenz der demokratischen und epikureischen Naturphilosophie*”. -vI

18 Karl Marx: *Differenz der demokratischen und epikureische Naturphilosophie*, MEW Ergänzungsband I. Teil, p. 326-328; 370-372.

19 Saml., p. 328; 330.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

materiaj interesoj”.²⁰ Li skribas pri la debatoj de la Rejna Provinca Parlamento pri la leĝo koncerne lignoŝtelon kaj pri la situacio de la mozelaj kampkulturistoj. Tiuj praktikaj necesoj montras al li, ke ne, kiel li laŭ Hegelo ankoraŭ plurfoje provis argumente subteni en la *Rejna Gazeto*, la ŝtato agas kiel „*reguliganta principo*” de la socia evoluo, sed ke la materiaj *ekonomiaj* interesoj havas ankaŭ grandan gravecon por la politiko kaj por la ŝtato.

Dum la jaro ĉe la *Rejna Gazeto* Markso ricevas ankaŭ teoriajn impulsojn en tiu senco, speciale de Arnold Ruge, kiu intertempe eldonas la *Deutsche Jahrbücher* [Germanaj jarlibroj] kaj kun kiu li konstante korespondas letere. Ruge postulas en 1842 teorian revolucion, kaj li proklamas kiel ties celon ateismon kaj popolsuverenecon, humanismon kaj respublikan demokration. Samtempe Moses Hess, kiu konatiĝis kun la francaj socialistaj ideoj, diskutigas tiujn ankaŭ en kolonja rondo de progresema intelektuloj kaj en kelkaj eseoj de la *Rejna Gazeto*.²¹

Markso ne ŝatis facilaniman koketadon kun tiuj ideoj. Li transprenis nenion sen la plej skrupula ekzamenado kaj plej profunda memakordiĝo. En la jam menciita mallonga skizo pri sia evoluo, kiun li donas en la antaŭparolo de la libro „*Zur Kritik der politischen Ökonomie* [Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio]”, Markso skribas pri tio:

„Aliflanke en tiu tempo, kiam la bona volo 'iri pli antaŭen' ofte samvaloris kiel kono de la faktoj, en la 'Rejna Gazeto' aŭdiĝis iomete filozofie nuancita eĥo de la francaj socialismo kaj komunismo. Mi deklaris min kontraŭ tiu fuŝado, sed samtempe en disputo kun la *Allgemeine Augsburger Zeitung* [Ĝenerala

20 Karl Marx: Vorwort „*Zur Kritik der politischen Ökonomie*” [Karlo Markso: Antaŭparolo „Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio”], MEW, vol. 13, p. 8.

21 Kp Auguste Cornu: Karl Marx und Friedrich Engels, Leben und Werk, vol. I, Berlino, 1954, p. 318-319, 322-323.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

Aŭgsburga Gazeto] senhezite konfesis ke miaj ĝisnunaj studoj ne permesas al mi la kuraĝon fari ian ajn juĝon pri la francaj tendencoj mem. Male, mi avide kaptis la okazon kiun donis al mi la iluzio de la mastrumantoj de la *Rejna Gazeto*, kiuj kredis povi per pli milda sinteno de la gazeto nuligi la mortkondamnon deciditan por ĝi, por retiriĝi el la publika scenejo en la studĉambron.”²²

Frederiko Engelso intertempe per alia vojo distanciĝis de la junhegelanoj. Jam en la komerca lernservado en Bremino la deknaŭ- kaj dudekjar-ulo elpaŝas literature. Dum mallonga periodo li entuziasmiĝas pri la tiama literatura tendenco de la *Junges Deutschland* [Juna Germanio]. Sed baldaŭ, post kiam li konatiĝis kun la hegela sistemo, sintezo de Hegelo kaj Börne, de filozofio kaj aktiva politika agado, ŝajnas al li la sole aktuala ebleco. En la aŭtuno 1841 – Markso estis forlasinta Berlinon en la printempo de la sama jaro – Engelso venas al Berlino por fari sian unujaran militservon, kaj tie li tre rapide trovas kontakton kun la junhegelana grupo de la „liberuloj”, speciale kun Edgar Bauer, la frato de Bruno Bauer. Engelso defendas la hegelan filozofion en la disputo kun Ŝelingo²³ -- la tiam maljuna filozofo alvokita al Berlino kvazaŭ kiel radikala kuracilo kontraŭ la hegela pensado suspekta al la prusaj regantoj – en la broŝuro „*Schelling und die Offenbarung* [Ŝelingo kaj la revelacio]”. Li estas tie ankoraŭ tute sur junhegelanaj pozicioj, influata precipe de Bruno Bauer, sed montriĝas jam unuaj influoj de Fojerbaĥo. Engelso defendas Hegelon, „*kiu malfermis novan eraon de la konscio*”, ne nur kontraŭ Ŝelingo, sed ankaŭ kontraŭ Fojerbaĥo, pri kiu li diras:

„Se tiu riproĉas al Hegelo, ke li troviĝas ankoraŭ profunde en la malnoveco, tiam li konsideru, ke la konscio pri la malnovo estas ĝuste jam la novo ... Kaj tiel la fojerbaĥa kritikisto de la kristanismo estas necesa kompletigo de la spekulativa religio-

22 Karl Marx: Vorwort „Zur Kritik der politischen Ökonomie”, MEW, vol. 13, p. 8.

23 Originale: Schelling. -vl

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

struo fondita de Hegelo.”²⁴

Pli rekta rilato al la *socia realeco* fariĝas por Engelso, kiel por Markso, instigo al pli konkretaj filozofiaj konceptoj. En la malfrua somero de 1842 li iras al Manĉestro por tie kolekti komercajn spertojn en la patra firmao *Firmen und Engels*, kotonŝpinejo. Tie, en la tutmonda centro de la teksaĵindustrio tiam nomata *Cottonopolis* Engelso ekkonas ne nur la plej evoluintan industrilandon, sed ankaŭ la teruran situacion de la laborista klaso en la frukapitalisma socio. Lia fianĉino kaj posta edzino Mary Burns – irlanda teksaĵlaboristino en la fabriko de lia patro, kun labortempo de pli ol 60 semajnhoroj – gvidas lin tra la laboristaj kvar-taloj de la urbo. Kun ŝi li vizitas la kunvenojn de la unua politika laborista movado, la ĉartistoj, aŭskultas la prelegojn de la disĉiploj kaj anoj de la granda utopia socialisto Robert Owen, legas gazetojn kaj skribaĵojn de ambaŭ tendencoj.

Estas tiuj *praktikaj* spertoj kiuj kaŭzas profundan ŝanĝon de liaj sociaj kaj politikaj, kaj poste ankaŭ de liaj filozofiaj konceptoj. Jam mallonge antaŭ sia vojaĝo al Anglio, fine de julio 1842, Engelso skribas al Arnold Ruge:

„Mia ĝisnuna literatura agado, konsiderate subjektive, konsistis el nuraj provoj, kies sukceso devis instrui min ĉu miaj naturaj talentoj ebligas al mi fruktodonan agadon por la progreso, viglan partoprenon en la movado de tiu ĉi jarcento. Mi povas esti kontenta pri la sukceso kaj konsideras nun mia devo, per studado kiun mi daŭrigas kun duobla plezuro, alproprigi al mi ankaŭ tion kion oni ne trovas ennaskita.”²⁵

La vivo en Manĉestro ne nur donis al li la materialon, ĝi montris al li ankaŭ la direkton de tiu studado. Jam la unuaj laboraĵoj, kiujn Engelso sendis en decembro de 1841 al

24 Friedrich Engels: Schelling und die Offenbarung, MEW Ergänzungsband 2-a parto, p. 219.

25 Auguste Cornu: Karl Marx und Friedrich Engels, p. 312.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

Kolonjo al la *Rejna Gazeto*²⁶, montras ke en siaj sociaj kiel politikaj konceptoj li estis tre maldekstriĝinta. Ankoraŭ travideblas ĉi tie la junhegelana idealismo, ekzemple kiam li diras ke oni ne povas komprenigi al

„la obstinaj britoj, ke la tiel nomataj materiaj interesoj povas neniam en la historio aperi kiel memstaraj, gvidaj celoj, sed ke ili ĉiam, ĉu nekonscie aŭ konscie, servas al principo kiu gvidas la fadenojn de la historia progreso”.²⁷

Sed jam lia kritiko direktiĝas same kontraŭ la nobelaro kiel kontraŭ la burĝaro, kontraŭ *tories* kaj *whigs*, kaj lia simpatio apartenas jam klare al la laboristoj kaj al ties politika avangardo, la ĉartistoj. Samteme videblas en tiuj artikoloj pli serioza okupiĝo pri *ekonomiaj* problemoj. La socia situacio de la laboristoj, ilia senespera sorto kiam senlaboreco minacas en la venonta komerca krizo, dominas lian pensadon. Jam malmultajn monatojn poste, en siaj korespondaĵoj kiujn li en majo kaj junio 1843 skribas por la *Svisa Respublikano*²⁸ en Zuriko, li poziciigis tute por la laboristoj kaj konstatas

„la strangan fakton ke, ju pli malalte klaso troviĝas en la socio, ju pli 'malklera' ĝi estas en la ordinara senco de la vorto, des pli ĝi proksimas al la progreso, des pli da estonteco ĝi havas”. Tio, jen la konkludo de la juna Engelso, estas evidente la „karaktero de ĉia revolucia epoko”.²⁹

Post plia duonjaro, Engelson raportas jam kiel komunisto en la semajngazeto de la britaj ovenanoj *The New Moral World and Gazette of the Rational Society* pri la progresoj de la socialistaj kaj komunistaj tendencoj sur la kontinento. Tiuj raportoj montras jam rimarkindan studadon de la

26 MEW, vol. 1, p. 454-467.

27 Friedrich Engels: Die inneren Krisen [La internaj krizoj], saml., p. 456-457.

28 Originale: *Der Schweizerische Republikaner*. -v1

29 Friedrich Engels: Briefe aus London [Leteroj el Londono], saml., p. 468.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

francaj socialistaj utopiistoj kaj de la laborista komunismo kaj ankaŭ la konon de la verkoj de Vilhelmo Vajtlingo³⁰. Pri la germanoj Engelso mencias krom tiun laboristan tendencon „*partion*”, kies komunismo eliris „*el la filozofio, pri kiu Germanio tiom fieras en la lastaj kvindek jaroj*”.³¹

„Nia partio”, skribas Engelso, „devas pruvi, ke aŭ ĉiuj filozofiaj klopodoj de la germana nacio de Kantio ĝis Hegelo estis senutilaj – pli malbonaj ol senutilaj – aŭ ke ili devas finiĝi en la komunismo; ke la germanoj devas aŭ malaprobi siajn grandajn filozofojn, kies nomojn ili konsideras gloro de la nacio, aŭ ke ili devas akcepti la komunismon.”³²

Inter la germanaj anoj de komunismo Engelso nomas en tiu eseo de la *New Moral World* de la 18-a de novembro 1843 nun apud Hess, Ruge, Herwegh ankaŭ Markson. 1843 kaj 1844 en Anglio Engelso studas ne nur grandegan parton de ekonomia kaj socialisma literaturo. Li estas ankaŭ en konstanta praktika kontakto kun gvidaj personoj de la ĉartistoj kaj de la tendenco de Roberto Oveno. Dum vojaĝo al Londono Engelso unuafoje kontaktiĝas kun la gvidantoj de la sekreta germana laborist-organizaĵo *Bund der Gerechten* [Ligo de la justuloj] – Karl Schapper, Josef Moll kaj Heinrich Bauer. Sed nelaste li kolektas materialon por sia libro *La situacio de la laboranta klaso en Anglio*³³, kiun li, en la somero 1844, revene en Germanio, verkas en Barmeno.

Kiel por Engelso la restado en Anglio, tiel por Markso la restado en Parizo, kien li iris kun Arnold Ruge por eldoni la *Germanajn-francajn Jarlibrojn*, fariĝis la decida turnopunkto en lia evoluo al la scienca komunisto kaj al la dialektika-

30 Originale: Wilhelm Weitling. -vl

31 Friedrich Engels: Fortschritte der Sozialreform auf dem Kontinent [Progresoj de la socia reformo sur la kontinento], saml., p. 492.

32 Saml., p. 231.

33 Originale: Die Lage der arbeitenden Klasse in England. -vl

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

historia materiisto. La alispeca, pli borema naturo de Markso kaŭzas ke li bezonas ĉe ĉiu grava punkto de sia evoluo tempon por memakordiĝo, por „*bilancado de la propra teoria konscienco*”. Antaŭ ol transloĝiĝi en oktobro 1843 al Parizo, Markso (post edziĝi al Jenny von Westphalen en somero 1843 en *Kreuznach*), nun multe pli ĝisfunde kaj profunde okupiĝas pri la hegela jurfilozofio, pri kies bazoj li unue ekdubis kiam li, kiel menciite, en la *Rejna Gazeto* kontaktiĝis kun ekonomiaj demandoj.

Temas pri „*Kritik des Hegelschen Staatsrechts* §§ 261 bis 313 [Kritiko de la hegela ŝtatjuro §§ 261 ĝis 313]”, manuskripto unue eldonita en 1927 de la Instituto Markso-Engelso-Lenino de Moskvo, en kiu Markso etendas la metodon de la Hegel-kritiko uzita de Fojerbaĥo nun ankaŭ al la ŝtato kaj la politiko. Ĝus antaŭe aperis de Fojerbaĥo la „*Vorläufige Thesen zur Reform der Philosophie* [Provizoraj tezoj pri la reformado de la filozofio]” kaj liaj „*Grundsätze der Philosophie der Zukunft* [Principoj de la filozofio de la estonteco]”, Markso akceptis ilin entuziasme. Sed en la direkto, en kiu li mem estis plej progresinta, ili jam ne sufiĉis al li. Tiel li skribas en marto de 1843 al Arnold Ruge:

„La fojerbaĥaj aforismoj nur en tiu sola punkto ne plaĉas al mi, ke li indikas tro la naturon kaj maltro la politikon. Sed tio estas la sola alianco per kiu la nuna filozofio povas fariĝi vero. Sed verŝajne okazos kiel en la 16-a jarcento, kiam al la natur-entuziasmoj respondis alia serio de ŝtat-entuziasmoj.”³⁴

La evidenta progreso trans Fojerbaĥo estas ĉi tie *politika* kaj ĝerme ankaŭ jam *ekonomia*. Metode Markso emfazas – kun Fojerbaĥo, kontraŭ Hegelo – ke tiu faras ĉie la ideon subjekto, sed la veran subjekton predikato. Ne la logiko de la afero, sed la afero de la logiko estas ĉe li la filozofia punkto; ke la logiko servas ne kiel pruvo de la ŝtato, sed la ŝtato kiel pruvo de la logiko.

34 Marx an A. Ruge [Markso al Ruge], MEW, vol. 27, p. 417-

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelson

„Tio estas la duismo, ke Hegelo ne konsideras la ĝeneralon la reala esenco de la realo-finito, t.e. de la ekzistanto, de la determinito, aŭ la realan eston ne la *vera subjekto* de la nefinito.”³⁵

La aplikado de la materiisma perceptmaniero al sociaj fenomenoj estas ĉi tie jam evidenta, sed Markso iras ankoraŭ pli antaŭen en la *politikaj* eldiroj, per tio ke li faras revoluciajn konkludojn celantajn al la popola suvereneco kaj al *reala demokratio*.

„Hegelo deiras el la ŝtato”, skribas Markso, „kaj faras la homon subjektigita ŝtato; la demokratio deiras el la homoj kaj faras la ŝtaton objektigita homo ... La homo ekzistas ne pro la leĝo, sed la leĝo ekzistas pro la homo, ĝi estas *homo esto*, dum en la aliaj la homo estas la *leĝa esto*. Jen la baza diferenco de la demokratio. Ĉiuj ceteraj *ŝtatformiĝoj* estas certa, difinita, *aparta ŝtatformo*. En la demokratio la *formala* principo estas samtempe la *materia* principo.”³⁶

Estas evidenta, ke Markso ĉi tie ankoraŭ ne konceptas la anatomion de la burĝa klasstrukturo en ties konkreta, soci-ekonomie kondiĉita klasstrukturo kaj en ĝiaj klasaj kontraŭecoj. Sed li jam esprimas ke oni devas serĉi en la burĝa socio, ĉar ĝi estas la sfero de la *materiaj* interesoj, la veran sekreton de la socia vivo. Kaj li do skribas 1859 retrorigarde en la antaŭparolo al la „Kritiko de la politika ekonomio” pri tiu fazo de sia spirita evoluo:

„Mia esplorado kondukis al la rezulto ke la juraj rilatoj kiel ŝtatformoj kompreneblas nek el si mem nek el la tiel nomata evoluo de la homa spirito, sed ke ili radikas pli ĝuste en la materiaj vivkondiĉoj, kies tutaĵon Hegelo, laŭ la modelo de la angloj kaj francoj de la 18-a jarcento, kunigas sub la nomon 'burĝa socio', sed ke la anatomio de la burĝa socio serĉendas en la politika ekonomio.”³⁷

35 Karl Marx: Kritik des Hegel'schen Staatsrechts [Karlo Markso: Kritiko de la hegela ŝtatjuro], MEW, vol. 1, p. 224-225.

36 Saml., p. 231.

37 Karl Marx: Vorwort 'Zur Kritik der politischen Ökonomie' [Kar-

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

En la laboraĵoj verkitaj jam en Parizo inter la aŭtuno 1843 kaj januaro 1844, kiuj aperis 1844 en la sola kajero de la kune kun Ruge eldonitaj '*Germanaj-francaj jarlibroj*', Markso troviĝas ankoraŭ *antaŭ* tiuj ekonomiaj esploradoj. Sed sub la influo de la pariza politika kaj socia vivo, de la renkontiĝo kun francaj socialistoj kaj laborist-komunistoj, la profunda ŝanĝiĝo de Markso al *materiisto* kaj *komunisto* fariĝas videbla en tiuj pense kiel arte geniaj junec-laboraĵoj („Pri la juda demando [*Zur Judenfrage*]” kaj „*Zur Kritik der Hegelschen Rechtsphilosophie, Einleitung* [Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio, enkonduko]”).

Markso profundigas sian propran kritikon de la hegela jurfilozofio kaj ankaŭ – en la disputo kun la junhegelaneco de Bruon Bauer – la religikritikon de Fojerbaĥo. Sed krome liaj praktikaj politikaj konkludoj fariĝas multe pli realecaj. Ili ricevas por la unua fojo rektan rilaton kun la moderna industri-proletaro kiel tiu socia forto kun kiu la revolucia filozofio devas ligiĝi, se ĝi volas realigi siajn ideojn.

En la eseo *Pri la juda demando* Markso jam konceptas la radikalan demokration ne abstrakte. Li fondas sian kritikan starpunkton al ĉia burĝa demokratio kaj al ties formala, ŝajna karaktero, per tio ke li reiras al la *ekonomiaj* rilatoj sur kiuj ĝi baziĝas. Per tio li montras, ke gardado kaj protekto de la burĝa privata proprieto estas ankaŭ la vera celo de la hom- kaj civitan-raĵoj anoncitaj de la franca revolucio kaj la sekreto de la burĝa libereco.

Markso skribas:

„La praktika aplikado de la *homraĵo je libereco* estas la *homraĵo je privata proprieto*. En kio konsistas la homraĵo je privata proprieto? ... La homraĵo je privata proprieto estas do la raĵo, arbitre (à son gré), sen rilato al aliaj homoj, sendepende de la socio, ĝui sian havaĵon kaj disponi pri ĝi, la raĵo je egois-

lo Markso: Antaŭparolo 'Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio'], MEW, vol. 1, p. 224-225.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelson

mo³⁸ Tiu individua libereco, kiel ties praktika aplikado, konsistigas la bazon de la burĝa socio ... Neniu el la tiel nomataj homrajtoj iras do trans la tiel nomatan egoisman homon, trans tiun homon, kiu estas membro de la burĝa socio, nome retirita al si, al sia privata intereso kaj al sia privata arbitreco kaj apartigita de la komunumo.”³⁹

La burĝa revolucio, la politika, diras Markso por distingi ĝin de la socia, dissolvas la civitanan vivon en ĝiajn erojn, sen revoluciigi ilin, ĝi ne kondukas al la emancipiĝo de la homo:

„La homo estis pro tio ne liberigita el la religio, li ricevis la liberecon je religio. Li ne estis liberigita el la proprieto. Li ricevis la liberecon je proprieto. Li ne estis liberigita el la egoismo de la metio, li ricevis la liberecon praktiki metion aŭ industrion.”⁴⁰ Markso konkludas: „Ĉia emancipiĝo estas rekonduko de la homa mondo, de la rilatoj al la homo mem ... nur kiam la homo ekkonis kaj organizis siajn proprajn fortojn kiel sociajn fortojn kaj pro tio jam ne disigas de si la socian forton en la formo de politika forto, nur tiam la homa emancipiĝo okazis.”⁴¹

En la *„Enkonduko al 'Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio'”*, verkita mallonge poste, Markso kondukas tiujn pensojn ankoraŭ esencan pecon pli antaŭen. Tie la rekta influo de la politika vivo en Parizo kaj lia unua rilato kun la praktika laborista movado fariĝas ankoraŭ pli palp-ebla. Tio veras pri la religikritiko kaj ankaŭ pri la kritiko de la germanaj sociaj-politikaj kondiĉoj, sed speciale pri la prijuĝado de la pozicio de la proletaro en la burĝa socio kaj pri lia propra rilato al la proletaro, pri la reciprokaj rilatoj de ekonomio kaj politiko (bazo kaj superstrukturo, kiel

38 Originale : *Recht auf Eigennutz* („rajto je egoismo / profito” -vl

39 Karlo Markso: Pri la juda demando, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, 49p, ISBN 978-2-918300-33-5, p. 37.

40 Saml., p. 369.

41 Saml.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

Markso poste diris) kaj pri la rekte komunistaj – kvankam ankoraŭ tre abstrakte konceptitaj – konkludoj, kiujn li faras el ĉio ĉi.

Markso deiras ĉi tie ankoraŭ el la ideo, ke la *kondiĉo* de ĉia kritiko – sed tion oni komprenu jam pli historie ol laŭ la fakto – estas la *kritiko de la religio*. Li konsentas kun Fojerbaĥo: „La homo faras la religion, la religio ne faras la homon.”⁴² Sed al li jam ne sufiĉas la fojerbaĥa abstraktaĵo „*la homo*”. Li demandas plu, kio estas la homo, kaj respondas: „*Sed la homo, tio ne estas abstrakta estaĵo ekster la mondo. La homo, tio estas la mondo de la homo, ŝtato, socio.*”⁴³ Malsame ol Fojerbaĥo Markso esploras por la unua fojo pri la konkreta socia origino de la religio kaj daŭrigas.

„Tiu ŝtato, tiu socio produktas la religion, *inversan mondkonscion*, ĉar ili estas *inversa mondo*” ... La religio „estas la *fantasta realigo* de la homa estaĵo, ĉar la homa estaĵo ne havas veran realecon. La batalo kontraŭ la religio estas do rekte la batalo kontraŭ tiu mondo, kies spirita *aromo* estas la religio.”⁴⁴

Eble nur asociiĝe aludanta teksteron en la „*Esenco de la kristanismo*” de Fojerbaĥo (tiu tekstero: „*Dio estas larmo de amo, verŝita en profunda kaŝiteco pri la homa mizero. Dio estas neelparolebla suspiro, kuŝanta sur la fundo de la animoj – tiu eldiro estas la plej notinda, plej profunda, plej vera eldiro de la kristanaj mistikuloj*”⁴⁵), sed donante al tiu tekstero siavice pli profundan esprimon kiu rekte rilatas la socion kaj la soci-politikan praktikon, Markso poste daŭrigas:

„La *religia* mizero estas samtempe la esprimo de la reala mize-

42 Karl Marx: *Zur Kritik der Hegel'schen Rechtsphilosophie, Einleitung* [Karlo Markso: Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio, Enkonduko], MEW, vol. 1, p. 378.

43 Saml.

44 Saml.

45 Ludwig Feuerbach: *Wesen des Christentums* [Ludoviko Fojerbaĥo: *Esenco de la kristanismo*], p. 201.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

ro kaj la protesto kontraŭ la reala mizero. La religio estas la suspiro de la premata kreitaĵo, la animo de senkora mondo, kiel ĝi estas la spirito de senspiritaj kondiĉoj. Ĝi estas la *opio* de la popolo.

La nuligo de la religio kiel la *iluzia* feliĉo de la popolo estas la postulo de ĝia *reala* feliĉo. La postulo rezigni la iluziojn pri sia situacio estas la *postulo rezigni situacion kiu bezonas iluziojn*. La kritiko de la religio estas do *ĝerme la kritiko de la mizerejo*, kies *glorkrono* estas la religio. ... La kritiko de la mizerejo transformiĝas per tio en la kritikon de la Tero, la *kritiko de la religio* en la *kritikon de la juro*, la *kritiko de la teologio* en la *kritikon de la politiko*.⁴⁶

Markso transiris poste al la kritiko de tiu „*tera mizerejo*” en ĝia tiama germana formo kaj diris ke la germanoj „*dividis la restaŭraciojn de la modernaj popoloj sen dividi iliajn revoluciojn*”, kaj ke ili troviĝis ĉiam nur unufoje „*en la socio de libereco*”, „*dum la tago de ties enterigo*”. Oni devas, diris Markso, „igi la realan premon ankoraŭ pli prema, per tio ke oni aldonu al ĝi la konscion de la premo”, oni devas „*dancigi la ŝtoniĝintajn kondiĉojn per tio ke oni antaŭkantu al ili ilian propran melodion*”.⁴⁷

Post kiam Markso ankoraŭ en septembro 1843 skribis al Arnold Ruge, ke jam ne estas duboj pri la „*de kie*”, sed des pli da konfuzo pri la „*kien*”, kaj ke ĉiu el la 'reformistoj' devas konfesi al si ke li ne havas precizan ideon pri tio kio devas estiĝi⁴⁸, Markso trovis por si *klar*an celon. La demando estas, diras li, ĉu Germanio povas veni al revolucio kiu levas ĝin ne nur al la *oficiala nivelo* de la modernaj popoloj, sed al la *homa alteco*, kiu estos la venonta estonteco de tiuj

46 Karl Marx: *Zur Kritik der Hegel'schen Rechtsphilosophie, Einleitung* [Karlo Markso: Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio, Enkonduko], MEW, vol. 1, p. 378-379.

47 Saml., p. 379-381.

48 Citita en Auguste Cornu: Karl Marx und Friedrich Engels, vol. 1, p. 365.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

popoloj. La armilo de la kritiko tamen ne povas anstataŭi la kritikon de la armiloj, materia forto faligendas per materia forto, sed ankaŭ la teorio fariĝas „*materia forto ekde kiam ĝi kaptas la amasojn*”. Esti radikala signifas kapti la aferon ĉe la radiko. Sed la radiko por la homo estas la homo mem.

„La kritiko de la religio”, daŭrigas Markso, „finiĝas kun la instruo ke la homo estas la plej alta estaĵo por la homo, do kun la kategoria imperativo renversi ĉiujn kondiĉojn en kiuj la homo estas humiligita, servutigita, forlasita, malestimata estaĵo ...”⁴⁹

Al germana revolucio ŝajnas kontraŭstari ĉefa malfacilaĵo, diras li, ĉar revolucioj bezonas *masivan* elementon, materian bazon. Ne sufiĉas ke la penso premas al realiĝo, la realeco devas premiĝi al la penso. Tiun „materian bazon”, tiun realecon Markso vidas nun unuafoje en la *proletaro*, en tio ke la moderna socio formis klason kiu

„per siaj universalaj suferoj posedas universalan karakteron, al kiu oni faras ne *apartan* maljustaĵon, sed la maljustaĵon ĝenerale”.

Ĉar ties situacio estas „*la kompleta perdo de la homo*”, ĝia emancipiĝo estas „*la kompleta reakiro de la homo*”. Markso konkludas:

„La *emancipiĝo de la germano* estas la *emancipiĝo de la homo*. La kapo de tiu emancipiĝo estas la filozofio, ĝia koro la proletaro. La filozofio ne povas realiĝi sen la nuligo de la proletaro, la proletaro ne povas nuliĝi sen la realiĝo de la filozofio.”⁵⁰

La ĝermoj de historia-materiisma mondperecepto aperas en tiuj laboraĵoj ankoraŭ grandparte sen konkreta soci-ekonomia fondado, kaj la koncepto de la revolucia historia rolo de la proletaro ankoraŭ ne estas derivita el la ĉioma evoluo

49 Karl Marx: Zur Kritik der Hegel'schen Rechtsphilosophie [Karlo Markso: Kontribuado al la kritiko de la hegela jurfilozofio], MEW, vol. 1, p. 385.

50 Saml., p. 390-391.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

de la kapitalisma produktadmaniero. Sed la progreso en tiu direkto evidentas. Tamen la plej grava spirita impulso por Markso venas nun, cetere en la sama kajero de la Germanaj-francaj Jarlibroj, de Frederiko Engelso, nome la emo pli profunde studi la *ekonomiajn* kondiĉojn.

Engelso estis publikiginta en la revuo, apud recenzo de „*Past and Present*” de Thomas Carlyle, kiel rezulton de siaj studoj kiujn li estis farinta en Manĉestro, la eseon „*Umriss zu einer Kritik der Nationalökonomie* [Konturoj de kritiko de la politika ekonomio]”, „*genian skizon*”, kiel Markso nomis ĝin ankoraŭ multe pli poste. La principe tute prava kritiko, kiun la juna Engelso faras pri la burĝa ekonomiko – ekzemple ke ĝi tute ne pensas demandi pri la praveco de la *privata proprieto* – havas ĉi tie ankoraŭ fortan nuancon de etika indigno. Engelso riproĉas ekzemple al unu el la bazaj verkoj de la klasika angla ekonomiko, Adam Smith „*An Inquiry into the Nature and Causes of the Wealth of Nations*” (1789), ke ĝia sistemo baziĝas sur „hipokriteco, nekonsekvenco kaj malmoraleco”. Liaj posteuloj estas eĉ pli severe juĝataj. Ricardo estas, laŭ li, pli kulpaj ol Smith, kaj MacCulloch kaj Mill siavice pli kulpaj ol Ricardo.⁵¹

Sed apud tio troviĝas profundaj kaj originalaj pensoj. Unue Engelso opinias ke jam la esprimoj nacia riĉeco aŭ nacia ekonomio aŭ politika ekonomio tute ne havas sencon sub la kondiĉoj de la privata proprieto. La nacia riĉeco de la angloj estas tre granda, kaj tamen ili estas la plej malriĉa popolo sub la suno, kaj tiu scienco devus envere nomiĝi „privata ekonomio”, ĉar ĝiaj publikaj rilatoj ekzistas nur „pro la privata proprieto”.⁵² Aparte impresaj en la prezentado estas liaj akuzoj kontraŭ la malhumaneco de la kapitalisma sistemo kaj kontraŭ ties pravigo kiun faras la ekono-

51 Friedrich Engels: *Umriss zu einer Kritik der Nationalökonomie*, saml., p. 500-501.

52 Saml., p. 502-503.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

mikistoj. Oni sentas ĉie, kiom ili nutras sin el la *praktika* sperto, kiun Engelso estis akirinta en la manĉestra koton-industrio kaj kiujn li ankaŭ rekte enfluigis en sian eseon.

Eble plej rimarkindas ĉe tiu laboraĵo la eldiroj pri la rilato de konkurenco kaj monopoloj, kiuj genie anticipas multe pli postan historian evoluon.

„Ĉar la privata proprieto“, diras Engelso, „izolas ĉiun al ties kruda unuopeco kaj ĉar ĉiu havas tamen la saman intereson kiel lia najbaro, tial unu terposedanto staras malamike kontraŭ la alia, unu kapitalisto al la alia, unu laboristo al la alia. En tiu malamikiĝo de la samaj interesoj ĝuste pro ilia sameco la mal-moraleco de la ĝisnuna stato de la homaro estas kompletiĝinta; kaj tiu kompletiĝo estas la konkurenco ... Ĉiu konkurencanto devas deziri havi la monopolon por si kontraŭ ĉiuj aliaj. La konkurenco baziĝas sur la intereso, kaj la intereso siavice produktas la monopolon; mallonge, la konkurenco transiras en monopolon ... La konkurenco eĉ jam premisas la monopolon, nome la monopolon de la proprieto – kaj ĉi tie ree aperas la hipokriteco de la liberaluloj – kaj tiom longe kiom ekzistas la monopoloj je la proprieto, tiom longe la proprieto de la monopoloj estas egalrajta; ĉar ankaŭ la atingita monopoloj estas proprieto.“⁵³

La juna Engelso riproĉas al la burĝa ekonomiko, ke ĝi prezentas siajn belajn teoriojn de postulo kaj propono, ke ĝi pruvas ke neniam eblas produkti tro, kaj jen la praktiko respondas per la komercaj krizoj, kiuj revenas tiom regule kiom la kometoj kaj kiuj kaŭzas pli da mizero ol antaŭe la grandaj epidemioj. El la konkurenco kaj la krizoj, el pasia akuzo kontraŭ la malhumaneco de la maltusa loĝantarteorio, el malproksimen antaŭvidanta pritakso de la rolo de la natursciencoj por la estonta evoluo de la produktadforto de la homa laboro, Engelso deduktas ke la abismo inter la posedantaj kaj la laborantaj klasoj devas same fondiĝi kiel la ekonomiaj krizoj. Esprimante sian propran komunistan konvinkon li postulas:

53 Saml., p. 513-514.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

„Produktu kun konscio, kiel homoj, ne kiel diserigitaj atomoj sen konscio pri sia specio, kaj vi troviĝos trans ĉiuj ĉi artefaritaj kaj neteneblaj kontraŭecoj. Sed tiom longe kiom vi daŭrigos produkti laŭ la nuna nekonscia, senpripensa maniero lasita al la regado de la hazardo, tiom longe la komercaj krizoj restos; kaj ĉiu sekvanta devas fariĝi pli universala, do pli malbona ol la antaŭa, devas malriĉigi pli grandan nombron da malgrandaj kapitalistoj kaj pliigi en kreskanta proporcio la nombron de la klaso kiu vivas nur per laboro – do videble grandigi la amason de la laboro dungenda, la ĉefan problemon de niaj ekonomikistoj, kaj fine alkonduki socian revolucion, tian kian la teoria scio de la ekonomikistoj eĉ ne estus kredinta.”⁵⁴

Engelso ĉi tie deduktas la historian neceson de socia revolucio jam el la pli akriĝanta kontraŭeco de la klasoj kaj el la kapitalismaj krizoj. Ne necesas emfazi, kiom Engelso sur ekonomia kampo estis unue la donanto, Markso la prenanto, kaj ne nur per la esenca avantaĝo kiun li posedis pro la propra vivanta sperto, sed ankaŭ en la ekonomia teorio.

Karlo Markso atestas tion mem en la antaŭparolo al la parizaj „*Ökonomisch-philosophische Manuskripte* [Ekonomiaj-filozofiaj manuskriptoj]”, pri kiuj li laboris mallonge poste – inter aprilo kaj aŭgusto 1844 –, post ampleksaj ekonomiaj studoj:

„Estas memkompreneble, ke mi uzis krom la francajn kaj anglajn socialistojn ankaŭ germanajn socialistajn laboraĵojn. La enhavriĉaj kaj *originalaj* germanaj laboraĵoj pri tiu scienco reduktiĝas tamen – krom la verkoj de Vajtlingo – al la eseoj liveritaj en la '21 presfolioj'” (antologio eldonita de Georg Herwegh 1843 en Svislando, en kiu aperis interalie la artikoloj de Moses Hess '*Sozialismus und Kommunismus* [Socialismo kaj komunismo] kaj '*Philosophie der Tat* [Filozofio de ago] -jsch) „de Hess kaj al la '*Umrisse zur Kritik der Nationalökonomie* [Skizoj pri la kritiko de la politika ekonomio] de Engelso en la *Deutsch-Französische Jahrbücher* [Germanaj-francaj jarlibr-

54 Saml., p. 515.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

oj] ...⁵⁵

La ekonomiaj, historiaj kaj socialismaj studoj, al kiuj Markso dediĉas sin nun, entenas interalie la legadon de Smith, Ricardo, Mill, Jean-Baptiste Say, Frederic Skarbek, Sismondi, Fourier, Prudono, Wilhelm Schulz. Samtempe Markso, por konkretigi siajn politikajn konceptojn, enprofundiĝas en intensan studadon de la Franca Revolucio. Li legas Saint Just kaj Robspjeron, Babeuf, la oficialajn protokolojn de la konventaj debatoj, la memoraĵojn de la konventano Levasseur de la Sarthe kaj karesas la ideon verki historion de la Konvento. Krome li legas pri la evoluo de la franca burĝaro kaj pri ties bataloj la historiistojn de la restaŭrada periodo, ĉefe Thierry kaj Guizot. Per tio li ekkonas por li en tiu formo novan koncepton de la moderna historia procezo, kiu emfazas la interesbatalojn de la sociaj klasoj kiel aparte gravan elementon.

Tiuj studoj literature konkretiĝas en la menciitaj „ekonomiaj-filozofiaj manuskriptoj“, kiuj estas envere fragmentoj de intencita duvoluma verko pri la kritiko de la politiko kaj de la politika ekonomio, projekto kiu restis ne realigita. Pro tio ili servis precipe por la plua disvolvado de la propraj konceptoj, por memakordiĝo. Markso interesiĝas en tiuj manuskriptoj ĉefe pri du grandaj problemkampoj. Unue pri la ekonomia fondado de sia nove akiritaj komunistaj konceptoj, kaj pli precize per kritika diskuto kun la ekonomia literaturo. Due pri pli profunda analizo de la hegela dialektika metodo kaj de ties ekkonteoriaj bazoj, ĉar jam ne sufiĉas al li tio, kion ĝis tiam diris pri tio la junhegelanoj, sed ankaŭ Fojerbaĥo kaj eĉ li mem.

Al ambaŭ taskoj Markso dediĉas sin kun la intenseco,

55 Karl Marx: *Vorrede zu den Pariser 'Ökonomisch-philosophischen Manuskripten'* [Karlo Markso: Antaŭparolo al la parizaj 'Ekonomiaj-filozofiaj manuskriptoj'], MEW-supl.-vol. 1-a parto, p. 468.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

ĝisfundeco kaj akreco de pensado, kiujn ĉiuj kiuj konis lin, ĉu amikoj aŭ malamikoj, admiris. Jam la 2-an de septembro 1841 Moses Hess skribas en letero al la verkisto Berthold Auerbach pri la ankoraŭ ne dudekkvar-jara Markso:

„Tiu estas fenomeno kiu faris al mi, kvankam mi moviĝas ĝuste en la sama kampo, imponan impreson; mallonge, vi povas prepari vin konatiĝi kun la plej granda, eble la sola nun vivanta vera filozofo ... li iras laŭ sia tendenco kaj laŭ sia klereco ne nur trans Strauß, sed ankaŭ trans Fojerbaho, kaj tio lasta signifas multon ... li ligas kun la plej profunda filozofia seriozo la plej tranĉan spritecon; pensu al vi Rusoon, Volteron, Holbahon, Lesingon, Hejnon kaj Hegelon unueciĝintaj en unu persono; mi diras unueciĝintaj, ne kunĝetitaj – jen vi havas d-ron Markso.”⁵⁶

Ĉe tio konsiderendas ke – same kiel ĉe Engelso – estas lastinstance ĉiam ree la *praktikaj* impulsoj de la vivo, kiuj instigas al tio, kion Markso nomas, per unu siaj ŝatataj esprimoj, memakordiĝo⁵⁷. En tiu periodo tio estas ĉefe la viglaj interrilatoj kaj pensinterŝanĝo kiujn Markso flegas en Parizo kun francaj socialistoj kaj laboristaj komunistoj, kaj gvidaj membroj de la germana socialista sekreta societo „*Bund der Gerechten* [Ligo de la justuloj]”. Krome la densaj amikaj rilatoj tie kun *Henriko Hejno*. Kaj nelaste estas la efiko de germana samtempa okazaĵo kiu emocias la tutan Eŭropon – la silezia teksistribelo de junio 1844. Ĉiuj ĉi praktikaj influoj fortigas ne nur la deziron je pli granda teoria klareco, sed same tiun je aktiva partopreno en la politika kaj socia batalo. En tio la vigla interrilatiĝo kun la *laborista movado* fariĝas aparte grava elemento, kiel ni vidas el la parizaj manuskriptoj kaj ankaŭ el la unua, baldaŭ poste, komune kun Engelso eldonita verko „*Die heilige Familie* [La sankta familio]”. Markso redonas la impresojn kiujn li ricevis el siaj renkontiĝoj kun francaj kaj germanaj

56 MEGA, vol. 1, 2-a duonvol., p. 260-261.

57 En la originalo: *Selbstverständigung*, laŭvorte meminterkonsento, meminterkompreniĝo, memakordiĝo. -vl

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

laboristoj, en la 'Sankta familio';

„Oni devas konatiĝi kun la studado, la sciemo, la morala energio, la senlaca evoluemo de la francaj kaj anglaj laboristoj por povi fari al si propran ideon pri la *homa* nobeleco de tiu movado.”⁵⁸

En la ekonomia parto de la Parizaj Manuskriptoj Markso pritraktas serion da gravaj kategorioj, interalie la salajron, la profiton, la grundrenton, la fremdigitan laboron, la rilaton de privata proprieto kaj laboro, de privata proprieto kaj komunismo, la rilaton de bezono, produktado kaj salajro, la mondon – do multajn el la ekonomiaj kategorioj kiujn li poste analizis post jardekojn longa laboro en sia vivoverko „La kapitalo”⁵⁹ surbaze de plej ampleksaj empiriaj esploradoj, de unika kono de la ekonomika literaturo kaj de plene maturiĝinta dialektika-materiisma teorio kaj metodo. Sed la pariza verko de lia juneco, en kiu lia materiisma baza koncepto kaj liaj komunistaj konkludoj estas jam pli klare kaj determinite esprimitaj ol en la eseoj de la „Germanaj-franc-

58 Karl Marx: *Die heilige Familie* [Karlo Markso: La sankta familio], MEW, vol. 2, p. 89.

59 En Esperanto aperis ĝis nun (junio 2010) jenaj partoj:

Karlo Markso: La kapitalo, volumo I, Kritiko de la politika ekonomio, Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, **Ĉapitroj unua ĝis naŭa**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, 378 p., ISBN 978-2-918300-13-7 kaj

Karlo Markso: La kapitalo, Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio, Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, **Ĉapitroj deka ĝis dektria**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, ISBN 978-2-918300-14-4. Fine de la jaro 2010 aperos la tria kaj lasta parto de la „unua volumo”:

Karlo Markso: La kapitalo, Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio, Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, **Ĉapitroj dekkvara ĝis dudekkvina**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS) 2010, ISBN 978-2-918300-30-4.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

aj jarlibroj”, atestas ankaŭ detale pri notindaj novaj ekkonoj. Ĝi signifas ĉefe gravan cezuron en lia tuta evoluo, ĉar ĉi tie li komencas unuafoje esplori pri kampo kiu fariĝis en la sekvo la ĉefa kampo de lia scienca laboro – la politika ekonomio.

Tamen tiuj manuskriptoj troviĝas ĝuste sur ekonomia kampo ankoraŭ sur la nivelo de frua antaŭstupo de liaj esploradoj kaj staras parte en rekta kontraŭdiro al la poste ellaboritaj rezultoj. Same kiel la juĝoj de Engelso en la eseo de la „Germanaj-francaj jarlibroj” ankaŭ la ekonomiaj juĝoj de Markso estas ĉi tie ankoraŭ forte nuancitaj de filozofio kaj de etiko. Ekzemple li rifuzas en la „manuskriptoj” tion, kio poste apartenas al la centraj elirpozicioj de lia politika ekonomio – la *teorion de laborvaloro* ellaboritan de Ricardo. Li riproĉas tie al Smith, Ricardo kaj ties skolo „cinikecon”⁶⁰, kie li poste, en la grandaj antaŭlaboraĵoj al la „Kapitalo”, admiras la profundan historian realismon, la „sciencon sincerecon” de Ricardo.⁶¹

En la *Parizaj Manuskriptoj* ankoraŭ ne trovas eĉ spuro de la decidaj malkovroj de Markso sur ekonomia kampo – de la analizo de la duobla karaktero de la laboro kaj de la per tio ebliginta profundigo kaj precizigo de la teorio de la laborvaloro, sed ĉefe de la analizo de la propradira karaktero de la plusvaloro. Ankaŭ la salajro, la privata proprieto ktp ankoraŭ ne estas konceptitaj kiel historie estiĝintaj kategorioj, la kapitalo ankoraŭ ne kiel socia rilato. La prezentado de la ekonomiaj kategorioj servas al Markso ĉi tie ankoraŭ pli por ĝenerala malkaŝo de la kontraŭdiroj de la kapitalisma socio kaj por argumentado de lia akuzo kon-

60 Karl Marx: Ökonomisch-philosophische Manuskripte [Karlo Markso: Ekonomiaj-filozofiaj manuskriptoj], (1844), MEW, supl.vol., 1-a parto, p. 537.

61 Karl Marx: *Theorien über den Mehrwert* [Teorioj pri la plusvaloro], 2-a parto, MEW vol. 26/2, p. 107.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

traŭ la malhumaneco de tiu socio.

Grava scienca progreso en la ekonomia parto de la *Parizaj Manuskriptoj* de 1844 troviĝas en tio, ke Markso ĉi tie atingas multe pli proksimen al la historia-materiisma koncepto de la tuta historia procezo kaj ke li, kvankam la problemo de fremdigo estas ankoraŭ prezentata en abstrakta filozofia terminologio, ene de tiuj limoj, senmaskigas la kapitalisman ekspluatadon de la laboristo jam kiel la esenco de la fremdigo. Samtempe troviĝas en tiuj sekcioj ekstreme rimarkindaj kaj spritaj argumentadoj por homa socio sen privata proprieto je produktadrimedoj, por la socialismo kaj la komunismo kiel reala humanismo.

En la sekcio pri la fremdigita laboro Markso unue resumas tion kio rezultas el la premisoj de la politika ekonomio mem, nome

„ke la laboristo malleviĝas al varo kaj pli precize al la plej mizera varo, ke la mizero de la laboristo estas en inversa proporcio al la potenco kaj grandeco de lia produktado, ke la nepra rezulto de la konkurenco estas la akumulado de la kapitalo en malmultaj manoj, do la pli terura restarigo de la monopolo ...”⁶²

Li montras poste, kiel la fremdiga procezo en la kapitalisma produktado okazas.

„Kun la *plivalorigo* de la aĵa mondo”, skribas Markso, „la *malplivalorigo* de la homa mondo kreskas en rekta proporcio”.⁶³

La aĵo, kiun la laboro produktas, stariĝas fronte al ĝi kiel „*fremda estaĵo*”, kiel „*potenco sendependa*” de la produktinto. La realiĝo de la laboro estas ĝia konkretiĝo⁶⁴, sed ĝi aperas kiel *senrealiĝo* de la laboristo, kiel perdo de la aĵo,

62 Karl Marx: *Ökonomisch-philosophische Manuskripte* (1844) [Karlo Markso: *Ekonomiaj-filozofiaj manuskriptoj* (1844)], MEW, supl.-vol. 1-a parto, p. 510.

63 Saml., p. 511.

64 En la originalo: *Vergegenständlichung*, t.e. objektiv-igo (-iĝo), aĵ-igo (-iĝo), konkret-igo (-iĝo). -vl

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelson

„*kiel fremdiĝo, kiel eksterigo*”.⁶⁵ Ĉi tie Markso daŭrigas terminologie Hegelon, sed Hegelon de Fojerbaĥo jam materiisme interpretitan. Li diras, ke la laboro produktas mirindaĵojn, palacojn, belecon por la riĉuloj, sed nudiĝon, kavernojn, kripligon por la laboristo.⁶⁶

Sed la fremdiĝo de la laboristo montriĝas ne nur en lia rilato al la laborrezulto, al la produktoj, sed ankaŭ en la ago de *produktado*, en lia *agado* mem. Tiu aspekto de la fremdiĝo montriĝas en tio ke al la laboristo la laboro estas ekstera, ke li ne jesas sin, sed neas sin en ĝi, ne sentas sin bone, sed malfeliĉa; ke li ne libere evoluigas siajn korpan kaj spiritan energiojn, sed premaĉas sian korpon kaj ruinigas sian spiriton; ke li sentas sin „*ekster la laboro ĉe si kaj en la laboro ekster si*”.⁶⁷

La fremdiĝo de la laboristo havas trian flankon, nome la fremdiĝo el sia esto kiel specia estulo, ĉar la universaleco de la homo aperas praktike en la universaleco „*kiu faras la tutan naturon lia neorganika korpo*”. Nur en la prilaborado de la objekta mondo la homo sukcesas kiel specia estulo, la produktado estas lia labora specia vivo, sed tiu specia estulo – la naturo same kiel lia specia kapablo – „*estas estaĵo fremda al la laboristo*”, nura „*rimedo de lia individua ekzistado*”. Do, al la laboristo estas lia propra korpo, „*kiel la naturo ekster li, kiel lia spirita estaĵo, lia homa estaĵo*” fremdigita.⁶⁸

Kiel kvaran elementon fine, kaj tio estas aparte grava por liaj estontaj progresoj, Markso emfazas ke kiel konsekvenco el la dirito rezultas „*la fremdiĝo de la homo disde la*

65 Saml., p. 512. – En la originalo: *Entäußerung*, t.e. for-igo (-iĝo), fordon-o (-iĝo), rezigno pri ..., liber-igo (-iĝo) je ..., eksterigo .-vl

66 Saml., p. 513.

67 Saml., p. 514.

68 Saml., p. 515-517.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

homo". Ĉar la fremda estaĵo, al kiu apartenas la laboro kaj la produkto de la laboro, en kies servo kaj je kies ĝuo ili troviĝas, povas esti nur la homo mem. Do, se la laboristo rilatas al sia produkto kiel al objekto fremda kaj malamika al li, „*tiam li rilatas al ĝi tiel, ke alia, al li fremda, malamika, potenca, de li sendependa homo estas la mastro de tiu objekto*".⁶⁹

En la praktika, reala mondo la memfremdiĝo povas aperi nur „per la praktika, reala rilato al aliaj homoj”. Per la fremdigita laboro la homo produktas sekve ne nur sian rilaton al la objekto kaj al la produkta ago, sed ankaŭ la rilaton de aliaj homoj al lia agado kaj al la produktoj de lia agado kaj la rilaton al tiuj aliaj homoj. Tiel la efiko de lia laboro estas

„la regado de tiu, kiu ne produktas, super la produktado kaj super la produkto. Kiel li fremdigas sian propran agadon, tiel li alproprigas al la fremdulo la agadon kiu ne estas ties propra”.⁷⁰

La rilato de la laboristo al la laboro produktas „*la rilaton de la kapitalisto al tiu laboro*”; la *privata proprieto* estas do „*la produkto, la rezulto, la nepra konsekvenco de la eksterigita laboro, de la ekstera rilato de la laboristo al la naturo kaj al si mem*”.⁷¹

Tiuj multe atentataj tekstoj pri la fremdigo-problemo en la *Parizaj Manuskriptoj* estis misuzitaj por konstrui ian rompon inter la juna kaj la matura Markso. Oni riproĉis „malriĉiĝon” al la Markso de la „Komunista Manifesto”⁷² kaj de la „Kapitalo”. Sed ni posedas la ateston de Markso mem pri sia posta starpunkto pri tiu problemo. Krome ni trovas

69 Saml., p. 517-519.

70 Saml., p. 519.

71 Saml., p. 520.

72 Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto de la Komunista Partio, Esperanta traduko kaj postparolo de Detlev Blanke, Progreso, Moskvo, 1990, ISBN 5-01-002341-5.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelson

en la Markso maturiĝinta en siaj historiaj-materiismaj kaj ekonomiaj esploradoj la kontinuecon de la problemoj, sed ja ankaŭ ilian multe pli profundan kaj precizan, ĉar jam ne abstrakte-filozofie, sed konkrete-historie formulitan version de la problemoj. Sed krome la menciitaj interpretoj eĉ ne komplete notas tion kio estas jam entenataj en la *Parizaj Manuskriptoj* mem.

Ĉe la elirpunkto de sia analizo de la fremdiĝo Markso unue ne forlasis la grundon preparitan de Fojerbaĥo kaj ke kelkaj el la utopiaj-socialistaj verkistoj, speciale de Moses Hess. Ankaŭ la uzado de tiel nehistoriaj kategorioj kiel „homa estaĵo“, „specia estaĵo“, „specia vivo“ ktp estas esprimo de la ankoraŭ tre fortaj influoj de Fojerbaĥo al lia pensado. Markso deiras ĉe sia analizo tute evidente el idealo de nefremdigita laboro kaj ne inverse el la *realaj* kondiĉoj de la kapitalisma produktadmaniero, el ĝia estiĝ-procezo, tiel kiel li faris tion poste. La abstrakta konstruaĵo kondukas al tio, ke en la prezentado aperas kiel *rezulto* tio, kio envere estas *origino* kaj *kaŭzo* de la fremdiĝo de la laboro, nome la rilato de la kapitalisto al la laboristo, la kapitalo kiel socia rilato, la kapitalisma ekspluatado. La demando pri la *origino* de tiu rilato restas ĉi tie ekonomie kaj historie ne solvita.

Sed la analizo de la fremdigo kondukas en la *Parizaj Manuskriptoj* de 1844, kiel kaŭzo, al la kapitalisma ekspluatrilato, kio tute ne pretervideblas. Markso pravas, ke la fremdigita rilato de la laboristo al la laboro havas sian kontraŭan poluson en „la rilato de la kapitalisto al ĝi“.⁷³ Samtempe li vidas sole la „pozitivan forigon“⁷⁴ de la privata proprieto kiel *alproprigon de la homa vivo, pro tio kiel „la pozitivan forigon de ĉia fremdigo ...“*⁷⁵ Tiu forigo de la

73 Saml.

74 En la originalo: „Aufhebung“, „aŭfhebo“. -vl

75 Saml., p. 537.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

privata proprieto estas la komunismo.

„Tiu komunismo”, diras Markso, „estas kiel perfekta naturalismo egala al humanismo, kiel perfekta humanismo egala al naturalismo, ĝi estas la *vera* solvo de la kontraŭdiro inter la homo kun la naturo kaj kun la homo ...”⁷⁶

La evoluo de Markso ne ĉesas en la jaro 1844, ĝi envere eĉ plene komenciĝas en la „*Ökonomisch-philosophische Manuskripte* [Ekonomiaj-filozofiaj manuskriptoj]”. Por lia starpunkto ŝajnas lia propra atesto al ni klariga. Unu ĝis du jarojn poste, 1845-1846, Markso kaj Engelso laboras kune ĉe sia, se tiel diri, definitiva pozicio koncerne la posthegelan germanan filozofion kaj verkas la „*Deutsche Ideologie* [Germana ideologio]”.

„La manuskripto”, diras Markso 1859, „du dikaj volumoj en okonfolia formato, jam delonge atingis la eldonejon en Vestfalia, kiam ni ricevis la informon ke ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj ne permesas la presadon. Ni lasis la manuskripton des pli volonte al la kritiko de la ronĝantaj musoj, ĉar ni estis atingintaj nian ĉefan celon – memakordiĝon”^{77, 78}.

En la „Germana ideologio” legeblas, kiel Markso en la plua progreso de sia teoria evoluo konceptas la problemon de fremdigo. Tiuj klarigoj estas ne nur polemiko kontraŭ la junhegelana kaj speciale ankaŭ de la fojerbaŭa koncepto, en ili troviĝas nelaste ankaŭ esenca memkritiko al la propraj antaŭaj konceptoj, ekzemple:

„La individuojn, kiuj jam ne subiĝas al la labordivido, la filozofoj imagis kiel idealon sub la nomo *la homo*, kaj komprenis la tutan de ni disvolvitan procezon kiel la evoluprocezon *de la homo*, tiel ke al la ĝisnunaj individuoj sur ĉiu historia ŝtupo oni

76 Saml., p. 536.

77 En la originalo: „Selbstverständigung” – „meminterkompreniĝo, memakordiĝo. -vl

78 Karl Marx: *Vorwort 'Zur Kritik der politischen Ökonomie'* [Karlo Markso: Antaŭparolo 'Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio'], MEW, vol. 13, p. 10.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

subŝovis *la homon* kaj prezentis tiun kiel la movforton de la historio. La tuta procezo estis tiel komprenata kiel procezo de memfremdiĝo *de la homo*, kaj tio okazis esence pro tio ke la mezuma individuo de la pli posta ŝtupo estis ĉiam subŝovita al la antaŭa, kaj la posta konscio al la pli fruaj individuoj.”⁷⁹

Markso kaj Engelso difinas en la *Germana ideologio* la noción fremdigo, kaj ili aldonas – jam ironie – „*por resti komprenebla por la filozofoj*”:

„La socia povo, t.e. la multobligita produktadforto, kiu estiĝas per la kunagado de la diversaj individuoj pro la labordivido, aperas al tiuj individuoj, ĉar la kunagado mem ne estas libervola, sed natureca, ne kiel ilia propra, kunigita povo, sed kiel fremda povo ekster ili, pri kiu ili ne scias de kie kaj kien, kiun ili do ne povas regi, kiu male trairas apartan serion de fazoj kaj evoluŝtupoj, sendependan de la volo kaj faro de la homoj, kiu eĉ direktas tiun volon kaj faron.”⁸⁰

Markso kaj Engelso nomas la du *praktikajn* premisojn, por ke la fremdiĝo forigeblas, unue potencon neelteneblan, kontraŭ kiu oni revoluciigas, ĉar ĝi faris la amason de la homoj „*senproprietaj*”; kaj krome evoluŝtupon de la produktadfortoj kiuj jam produktis riĉaĵon kaj klerecon, kiuj ebligas ne nur ĝeneraligi la mankon kaj la mizeron, sed fakte enkonduki *universalan* evoluon de la homoj.⁸¹

El tio ja senambigue klariĝas kiel Markso konceptis la problemon de fremdigo en epoko kiam lia materiisma kompreno de la historio (kun la escepto de kelkaj terminoj ankoraŭ precizigitaj) estas mature elformulita. Poste, en la *Komunista Manifesto*, en *Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio*, en *La kapitalo*, en la '*Anti-Dühring*', Markso kaj Engelso komprenas sub fremdigo unue la de la

79 Karl Marx, Friedrich Engels: *Die deutsche Ideologie* [Karlo Markso, Frederiko Engelso: La germana ideologio], MEW, vol. 3, p. 69.

80 Saml., p. 34.

81 Saml., p. 34-35.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

kapitalisma proprieto je la produktadrimedoj kaŭzatan ekonomian fremdigon de la laboristo disde lia produkto kaj en lia labora agado, do la kapitalisman ekspluatadon de la varo laborforto, la regadon de la morta laboro en formo de kapitalo super la vivanta, la produktanto. Due ili komprenas sub ĝi la el tiu ekonomia baza fakto estiĝantajn politikajn formojn de fremdigo, kiuj aperas en la profunda abismo inter la praktiko de la burĝa ŝtato unuflanke kaj la realaj bezonoj kaj interesoj de la laborantaj popolamasoj aliflanke. Trie ili celas la spiritan kaj moralan fremdigon, kiu malbligas al la laboranta homo disvolvadon de liaj spiritaj kapabloj kaj konoj laŭ liaj bezonoj kaj submetas tiujn al la profitinteresoj de la reganta klaso, kiu per sia ekonomia kaj politika potenco disponas ankaŭ pri la ideoj, pri la spiritaj rimedoj por subpremado, malemancipado kaj humiligado de la laborantaj homoj.

La enhava kerno de la fremdig-problemo estas ĉe la maturaj Markso kaj Engelso do senigita je ĝia abstrakta-filozofia ŝelo. Ĝi estas nun plenigita per historia kaj ekonomia enhavo. El entuziasmo por ĝenerale homa emancipiĝo, influata ankoraŭ de Fojerbaĥo kaj la utopia socialismo, Markso progresas al la *reale* okazanta klasbatalo inter burĝaro kaj proletaro, al la historia rolo de la proletaro. La forigo de la fremdigo koincidas por li nun kun la emancipiĝo de la laborista klaso, emancipiĝo estiĝinta el la socia revolucio, kun la forigo de la klasa antagonismo kaj de la klasoj entute.

Plej grandan valoron por profundigi sian materiisman koncepton de la historio kaj sian kritikon de la hegela dialektiko estas serio de ekkonoj, kiujn Markso unuafoje eldiras en la *Parizaj Manuskriptoj* de la jaro 1844. Ĉi tie li uzas antaŭe malmulte atentatan libron de Wilhelm Schulz – '*Die Bewegung der Produktion* [La moviĝo de la produktado]' – aperinta 1843 en Svislando. Markso nomas tiun libron poste, en noto de *La kapitalo*, „multrilate laŭdindan

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelson

libron".⁸²

Ĉi tie li jam konceptas la laboron kiel metabolon kun la naturo kaj kiel bazon de ĉia homa vivo:

„La naturo estas la *neorganika* korpo de la homo, pli precize tiu parto de la naturo kiu ne estas mem homa korpo. La homo vivas de la naturo, tio signifas: la naturo estas lia korpo kun kiu li devas resti en konstanta procezo por ne morti.”⁸³

Markso distingas la specife homan metabolon, lian vivagadon, kiu estas „*objekto de lia volo kaj de lia konscio*”, disde tiu de la besto. Li insistas ĉefe pri la *socia* karaktero de la homo, ĉe kio necesas eviti fiksi la socion kiel abstraktaĵon kontraŭ la individuo. La individuo estas la *socia* estaĵo.

Kiam Goeto diras ke eĉ la plej granda genio estas „*kolektiva estaĵo*”, tiam la juna Markso konkludas ke

„ankaŭ en la ŝajne tute individua scienca agado mi agas *socie*, ĉar kiel homo. Ne nur la materialo de mia agado – kiel eĉ la lingvo, en kiu la pensanto agas – estas donita al mi kiel *socia* produkto, mia propra estado estas *socia* agado.”⁸⁴

Eĉ la elformado de la kvin sensororganoj estas „*laboro de la tuta ĝisnuna mondhistorio*”; ne frue ol per la konkrete disvolvita riĉaĵo de la homa estaĵo estiĝas „*la riĉaĵo de la subjektiva homa senseco, muzikema orelo, okulo por la beleco de la formo ...*”

La historio de la industrio kaj ĝia estiĝinta konkreta ekzisto estas „*la malfermita libro de la fortoj de la homa*

82 Karlo Markso: La kapitalo, Kritiko de la politika ekonomio, volumo unua, *ĉapitroj unua ĝis naŭa*, tradukita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, p. 79.

Ni dankas al Auguste Cornus la atentigon pri tio.

83 Karl Marx: Ökonomisch-philosophische Manuskripte (1844) [Karlo Markso: Ekonomiaj-filozofiaj manuskriptoj (1844)], MEW suppl. vol., 1-a parto, p. 516.

84 Saml., p. 530.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

estulo", la „sense ekzistanta homa psikologio". La industrio estas „la reala historia rilato de la naturo kaj do de la naturscienco al la homo". La historio mem estas reala parto de la naturhistorio, de la evoluo de la naturo al la homo. La naturscienco kiel la scienco pri la homo fariĝas „unu scienc-on". La riĉa homo estas „samtempe la homo bezonanta la totalecon de la homa vivesprimiĝo".⁸⁵ La praktika, jam revolucia konkludo de Markso tekstas nun:

„Por forigi la penson pri la privata proprieto, por tio la pensata komunismo tute sufiĉas. Por forigi la realan privatan proprieton, por tio necesas reala komunista ago.”⁸⁶

Tiujn pensojn rekte daŭrigas la *filozofia* fragmento de la *Parizaj Manuskriptoj* – ‘*Kritiko de la hegela dialektiko kaj filozofio entute*’⁸⁷ Ĉi tie kiel en la antaŭparolo al la tuta manuskripto Markso gloras ankoraŭfoje Fojerbaĥon kiel la veran fondinton de la pozitiva humanisma kaj materiisma kritiko, kiel la solan kies verkoj „*entenas veran teorion revolucion*". Markso aldonas, ke samtempe Fojerbaĥo estis la sola, kiu „*havas seriozan, kritikan rilaton al la hegela dialektiko, la vera superinto de la malnova filozofio*". Markso laŭdas kiel unu el la plej grandaj faroj de Fojerbaĥo ke li „*plenumis la fondon de la vera materiismo kaj de la reala scienco*" per tio ke li faris la rilaton de la homo al la homo la baza principo de la teorio.⁸⁸

Sed nun Markso transiras Fojerbaĥon en sia kritiko kontraŭ Hegelo. Jam ne sufiĉas al li la simpla rifuzo de la hegela dialektiko, ĉar intertempe li relegis Hegelon per aliaj okuloj, per okuloj kutimiĝintaj al *historia* kaj *ekonomia* materialo kaj li provas nun per multe pli profunda kritiko ol Fojerbaĥo samtempe elŝeligi la racian kernon de la hegela

85 Saml., p. 541.

86 Saml., p. 553.

87 Originale: Kritik der Hegelschen Dialektik und Philosophie überhaupt. -vl

88 Saml., p. 569-570.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

dialektiko.

Markso montras unue la tute *idealismajn* bazojn de la hegela teorio pri eksterigo kaj fremdigo kaj pravas ke ĉe Hegelo temas nur „*pri la prduktadhistorio de la abstrakta, do absoluta pensado*”. Sed li ne restas ĉe tio kaj diras pri la hegela '*Phänomenologie des Geistes* [Fenomenologio de la spirito]' ke ĝi estas

„la kaŝita kritiko al si mem ankoraŭ malklara kaj mistifikanta; sed en tio ke ĝi insistas pri la fremdiĝo de la homo – kvankam la homo aperas nur en la formo de la spirito –, en ĝi kuŝas kaŝite jam *ĉiuj* elementoj de la kritiko kaj ofte jam *preparitaj* kaj *ellaboritaj* en maniero kiu multe transiras la hegelan starpunkton.”⁸⁹

La grandeco de la hegela fenomenologio estas ke Hegelo konceptas la memproduktiĝon de la homo kiel procezon, ke li

„kaptas ankaŭ la esencon de la *laboro* kaj komprenas la konkretan homon, la veran, ĉar realan homon, kiel rezulton de lia propra *laboro*”.⁹⁰

Hegelo konas kaj agnoskas nur „la abstrakte spiritan” laboron; li staras sur la starpunkto de la politika ekonomio, per tio ke li vidas nur la pozitivan, ne la negativan flankon de la laboro. La homa estaĵo validas por li nur kiel mem-konscio, ĉia fremdiĝo estas do nur fremdiĝo de la mem-konscio, ne esprimo de la *real*a fremdiĝo. Sed ene de tiu abstraktado Hegelo konsideras „*la laboron kiel la agon de memproduktiĝo de la homo*”.⁹¹

Markso pluigas en la *Manuskriptoj* la kritikon komencitan de Fojerbaĥo pri la „falsa pozitivismo” kaj nur „ŝajna kritikismo” de Hegelo, per tio ke li montras ke la hegela

89 Saml., p. 573.

90 Saml., p. 574.

91 Saml., p. 584.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

negacio de la negacio ne estas la konfirmo de la vera homa estaĵo, sed de la ŝajna estaĵo. La reala homo kaj la reala naturo fariĝas tie nur predikatoj, ilia rilato estas tiu de absoluta inversigo, „*mistika subjekto-objekto aŭ subjektiveco iranta trans la objekton, la absoluta subjekto kiel procezo*”. Portanto de la tuta procezo estas Dio, absoluta spirito, la ideo scianta kaj konfirmanta sin mem.⁹²

Markso respondas al la hegela konstruaĵo per tio ke li – irante gravan paŝon trans la *kontemplan* materiismon de Fojerbaĥo – argumentas la *subjektivecon* de la homo *materiisme*, kaj per tio klarigas lian agon de memproduktiĝo reale, per la *konkreta* laboro de la homo.

„Se la reala, korpa homo, staranta sur la firma kaj bone rondigita Tero, ĉiujn naturfortojn el- kaj en-spiranta, *starigas* siajn realajn, konkretajn estaĵajn fortojn per sia eksteriĝo kiel fremdaĵojn, tiam ne la starigo estas subjekto; estas la subjektiveco de *konkretaj* estaĵaj fortoj, kies ago devas do ankaŭ esti *konkreta*.”⁹³

Sekve, klarigas Markso, nur la naturalismo (ĉi tie ankoraŭ sinonimo de nemehanika kaj ne nur kontempla materiismo) kapablas „*kompreni la agon de la mondhistorio*”.⁹⁴

Sed de tie Markso faras ankoraŭ paŝon antaŭen ekstreme gravan por la plena elformado de lia koncepto. Li historiigas sian starpunkton. Post koncepti la homon kiel naturestaĵon, lian subjektivecon kiel konkretan eksterigon de naturfortoj, li determinas nun la novon kiu okazis ĝuste per tiu specife homa agado, la laboro, al la naturo kaj al la homo mem. Li skribas:

„Sed la homo estas ne nur naturestaĵo, sed li estas homa naturestaĵo; ... Do nek la homaj objektoj estas la naturobjektoj, tiaj kiaj ili senpere proponas sin, nek la homa senso, tia kia ĝi

92 Saml.

93 Saml., p. 577.

94 Saml.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

ekzistas senpere, konkrete, estas *homa* senseco, homa konkret-eco. Nek la naturo – objektiva – nek la naturo subjektiva ekzistas senpere adekvata al la *homa* estaĵo ... La historio estas la vera naturhistorio de la homo.”⁹⁵

Per tio Markso gajnis por siaj konceptoj novan elirponton, kiu pleje gravis por la nun kune kun Frederiko Engelso daŭrigata ellaborado de ilia teoriaj kaj praktikaj konceptoj. Ĉar dum la tempo, en kiu Markso evidente ĉesigis sian laboradon pri la *Parizaj Manuskriptoj*, fine de aŭgusto 1844, li renkontiĝas por la dua fojo kun Engelso, kaj tio estas la komenco de tiu senkompara ligo de amikeco kiu unuigis ilin – ĝis la morto de Markso en 1883, do preskaŭ dum kvardek jaroj – sur scienca kiel sur politika kampo, en plej fruktodona kunlaborado. Pri tio Engelso skribas en 1885:

„Kiam mi vizitis Markson en la somero de 1844 en Parizo, evidentiĝis nia kompleta samopinio sur ĉiuj teoriaj kampoj, kaj ekde tiu momento datiĝas nia komuna laboro.”⁹⁶

Tiu kunlaborado komenciĝas tuj. Ĝia unua frukto estas la kritiko de la junhegelana filozofio de memkonscio de la fratoj Bruno kaj Edgar Bauer, kiu estis planita unue sub la titolo „Kritiko de la kritika kritiko”, sed aperis en februaro de 1845 kiel „*Die heilige Familie* [La sankta familio]” en Frankfurto ĉe Majno. Krome Markso sukcesas gajni la kunlaboradon de Engelso ĉe la germana migrula gazeto „*Vorwärts* [Antaŭen]”, en kies redaktado li mem partoprenas. Engelso verkas ankoraŭ dum sia dektaga restado en Parizo sian – multe pli mallongan – parton de la *Sankta familio*. Markso kompletigas la libron en Parizo inter septembro kaj novembro 1844, dum Engelso, reveninte al

95 Saml., p. 579.

96 Friedrich Engels: *Zur Geschichte des Bundes der Kommunisten* [Frederiko Engelso: Kontribuaĵo al la historio de la Ligo de la Komunistoj], MEW, vol. 21, p. 212.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

Bremeno, laboras ekde la aŭtuno 1844 ĝis marto 1845 pri libro, kiu tuj konigis lin en Eŭropo, nome pri la „*Lage der arbeitenden Klasse in England* [Situacio de la laboranta klaso en Anglio]”, kiu aperis 1845 en Lepsiko.

La unua teoria rezulto de la komuna laboro estas ĉefe esprimo de la *politika evoluo* kiun Markso kaj Engelso spertis en tiuj monatoj. Ĝi estas karakteriza por la argumentado de la ideo, kiu estas la *kerno* de la scienca socialismo malsame ol ĉiuj aliaj socialismaj movadoj, nome la difino de la historia rolo de la laborista klaso, de la neceso – elkreskanta el ties situacio en la kapitalismo mem – de ĝia revolucia klasbatalo kaj de la realaj premisoj de ĝia socia emancipiĝo.

En la *Sankta familio* Markso kaj Engelso ligas sian kritikon de la hegela idealismo kaj de la subjektivaj-idealismaj konceptoj de la fratoj Bauer jam pli forte kun la propraj nove akiritaj historiaj kaj politikaj ekkonoj; ili pli disvolvas la ĝermojn de la materiisma koncepto pri la historio. Krome, Markso skizas en brilaj teksteroj unuafoje la spiritajn ligojn de la socialismaj kaj komunismaj konceptoj, tiel kiel ili tiam disvastiĝis inter la laboristoj de Francio kaj Anglio, kun la franca filozofia materiismo de la 18-a jarcento.

La polemiko kontraŭ la fratoj Bauer havas kiel elirbazon, ke la „reala humanismo” en Germanio havas nenian pli danĝeran malamikon ol la spiritualismon, la *spekulan* idealismon. Koncerne la filozofiajn kaj ekkonteoriajn bazajn konceptojn de la junhegelanoj, Markso kaj Engelso emfazas en la *Sankta familio* ke la junhegelanismo neniam eliris „*el la kaŝo de la hegela vidmaniero*”.⁹⁷

La batalo inter Strauß kaj Bauer pri la substanco kaj la memkonscio estas, laŭ ili, batalo ene de la hegelaĵoj spekuladoj. En Hegelo troviĝas tri elementoj – la spinoza substan-

97 Karl Marx - Friedrich Engels: Die heilige Familie [La sankta familio], MEW, vol. 2, p. 7; 97.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

co, la fiĥta memkonscio kaj la hegela (nepre kontraŭdira) unueco de ambaŭ, la *absoluta* spirito. Strauß prezentis nun Hegelon laŭ la spinozisma vidpunkto, Bauer laŭ la fiĥta. Nur Fojerbaĥo kritikis Hegelon laŭ la hegela vidpunkto, perfektigis la kritikon de la religio kaj konceptis „*la grandajn bazojn*” de la kritiko de la hegela spekulado kaj do de ĉia metafiziko.⁹⁸

En la *Sankta familio* Markso sukcesas ankaŭ, en unu el la paragrafoj verkitaj de li, ĝis tiam plej profundan interpreton de la hegela filozofio, speciale de la '*Phänomenologie des Geistes* [Fenomenologio de la spirito]'. La tuta kritika, detrua verko de Hegelo, tiel Markso, rezultigas la „*plej konservativan filozofion*”, ĉar ĝi kredas esti superinta la konkretan mondon, ekde kiam ĝi transformas ĝin „*en pensadon*”, en „*nuran determinadon de la memkonscio*”. Hegelo faras „*la homon homo de la memkonscio, anstataŭ fari la memkonscion memkonscio de la homo*”.

„Li inversigas la mondon”, diras Markso, „kaj povas do ankaŭ *en la kapo* dissolvi ĉiajn barojn, per kio ili tamen restas ekzistantaj por la simpla *senseco*, por la *real*a homo.”⁹⁹

Sed ĉi tie Markso jam defendas la riĉan verkon de Hegelo plenigitan je konkreta materialo kontraŭ la subjektiva idealismo de la junhegelanoj kaj diras ke, kie la hegela fenomenologio, spite al sia spekula prapeko, donas en multaj punktoj la elementojn de reala karakterizado de la homaj kondiĉoj, Bruno Bauer kaj kompanoj, male, liveras nur la senenhavan karikaturon.¹⁰⁰

Daŭrigante tiun kritikon de tiu idealisma kaj subjektivisma bazkoncepto, Markso kaj Engelso montras la absurdecion de la naivaj kaj reakciaj ideoj de la junhegelanoj pri

98 Saml., p. 47.

99 Saml., p. 203-204.

100 Saml., p. 205.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

historio kaj politiko, pri la burĝa socio kaj pri la individuo, pri la rilato de intereso kaj ideoj, kaj en tiu disputo pliklarigas kaj pliakrigas siajn proprajn konceptojn. Ĉe tio Markso abunde uzas siajn ĵus faritajn studojn pri la historio de la Franca Revolucio. Samtempe jam klare elformuliĝas la *baza ideo* de la historia materiismo, ke la materia produktado de la vivnecesaj havaĵoj estas la bazo de ĉia historio kaj de la tuta socia vivo. Markso kaj Engelso demandas ironie, ĉu la „Kritika kritiko” kredas „*esti atinginta eĉ nur la komencon de la ekkono de la historia realeco, dum ĝi ekskludas la teorion kaj praktikan konduton de la homoj al la naturo, la natursciencan kaj la industrion, el la historia moviĝo*”; ĉu ĝi opinias esti jam ekkoninta periodon sen esti ekkoninta la rektan produktadmanieron de la vivo mem. Kiel ĝi disigas la pensadon disde la sensoj, la animon disde la korpo, sin mem disde la mondo, tiel ĝi disigas la historion disde la naturscienco kaj industrio. Ĝi vidas „*la naskiĝejon de la historio ne en la krude materia produktado sur la Tero, sed en la nebula nubformiĝo en la ĉielo*.”¹⁰¹

Kontraŭ la idealisma koncepto de historio kaj de ŝtato de la junhegelanoj Markso kaj Engelso diras, ke ne la historio bezonas la homon kiel rimedon por atingi siajn celojn; la historio estas „*nenio alia ol la agado de la homo sekvanta siajn celojn*”.¹⁰² Por forigi malnovajn kondiĉojn, ne sufiĉas ideoj, sed por tio necesas agantaj homoj:

„Ideoj povas neniam konduki trans malnovan mondstaton, sed ĉiam nur trans la ideojn de la malnova mondstatato. Ideoj povas entute nenion *plenumi*. Por plenumado de la ideoj necesas la homoj kiuj disponigas praktikan potencon.”¹⁰³

La „absoluta kritiko” rifuzas la ĝisnunan historion entute, ĉar ties agoj kaj ideoj estis la agadoj de amasoj. Markso kaj Engelso montras nun, ke sociaj-politikaj ideoj ne estas

101 Saml., p. 158-159.

102 Saml., p. 98.

103 Saml., p. 124.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

io origina, memstara, sed radikas en materiaj intereso, kaj ju amasa la intereso, des pli amasa estas ankaŭ la historia ago.

„La ideo ĉiam malgloriĝis, kiam ĝi distingiĝis disde la 'intereso'. Aliflanke facile kompreneblas, ke ĉia amasa 'intereso', kiu historie trudiĝas, kiam ĝi unue suriras la mondan scenejon, en la 'ideo' aŭ 'imago' iras multe trans siajn realajn limojn kaj konfuzas sin kun la ĝenerale homa intereso.”

Sed – ĉi tie Markso kaj Engelso emfazas jam la diferencon inter proleta kaj burĝa revolucio – kun la *„ĝisfundeco de la historia ago kreskos ankaŭ la amplekso de la amaso, kies ago ĝi estas”*.¹⁰⁴

Markso kaj Engelso primokas la individuismon de la junhegelanaj filozofoj pri ilia memkonscio kaj ilia aroga malestimo de la amasoj. Ili montras, ke la tute memstara individuo estas pura fikcio:

„La egoisma individuo de la burĝa socio povu en sia sensensa imago kaj senbrida abstraktado pufiĝi al atomo, t.e. al senrilata, memsufiĉa, senbezona, *absolute plena*, beata estaĵo. La malbeata sensa realo tute indiferentas pri lia imago, ĉiu el ĝiaj sensoj devigas lin kredi je la senco [devas verŝajne esti: esto] de la mondo kaj de la individuoj ekster li, kaj eĉ lia profana stomako memorigas lin ĉiutage pri tio, ke la mondo ekster li ne estas malplena, sed la envere pleniga¹⁰⁵. Ĉiu el liaj estaĵaj agoj kaj ecoj, ĉiu el liaj vivinstinktoj fariĝas la bezono, la urĝo, kiu faras lian egoismon („avidon pri si mem”) avido je aliaj aferoj kaj homoj ekster li.”¹⁰⁶

En la 'Sankta familio' Markso kaj Engelso donas mallongan resumon de la materiisma filozofio de la 18-a jarcento

104 Saml., p. 85-86.

105 Vortludo en la germana. Originale: *das ... Erfüllende* – !la plenumanto, tio kio plenumas”, kaj samtempe „la pleniga, tio kio plenigas”. -vl

106 Saml., p. 127.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

kaj pruvas ties rektan kuntekston kun la socialismaj kaj komunismaj tendencoj de sia tempo. La kunteksto inter la instruoj de la materiismo – ekz-e la instruo pri la ĉiopoveco de la sperto, kutimo, edukado, de la influo de la eksteraj cirkonstancoj sur la homon, de la alta graveco de la industrio, de la rajto je ĝuo ktp – kun la socialismo kaj komunismo evidentas. Se la homo formas al si el la sensa mondo kaj el la sperto de la sensa mondo ĉiajn konon kaj senton, tiam necesas organizi la empirian mondon tiel ke li spertu la veran homecon en ĝi, ke li spertu sin kiel homon. Se la homo estas formata de la cirkonstancoj, tiam oni devas „formi la cirkonstancojn homecaj”. Se la homo estas denature socia, tiam li disvolvas sian veran naturon nur en la socio, kaj oni devas mezuri la povon de lia naturo ne laŭ la povo de la unuopa individuo, sed laŭ la povo de la socio.¹⁰⁷

Markso montras, ke la utopiaj socialistoj, Fourier kaj la bahuviŝtoj en la Franca Revolucio, deiras rekte el la materiisma filozofio de la 18-a jarcento, sed ke malrekte ankaŭ Oveno – tra Helvetio kaj Bentham – estas influata de la materiismo. Cabet, ekzilita al Anglio, estas instigita de la komunismaj ideoj kaj revenas al Francio por fariĝi la plej populara, kvankam ankaŭ plej supraĵa reprezentanto de la franca komunismo; la sciencaj francaj komunistoj – Dezamy, Gay ktp – disvolvis kiel Oveno la instruon de la materiismo kiel instruon de la reala humanismo kaj kiel logikan bazon de la komunismo.¹⁰⁸

Markso kaj Engelso argumentas en la 'Sankta familio' pli klare sian koncepton pri la laborista klaso kiel superanto de la kapitalisma socio bazita sur la privata proprieto kaj la historian neceson de tiu procezo, kvankam ĉi tie ankoraŭ ne en detala ekonomia kaj historia analizo, sed ankoraŭ en la filozofia terminologio de Fojerbaĥo kaj de la marksaj Parizaj Manuskriptoj, kiu ĉi tie estas tamen apenaŭ pli ol ekstera

107 Saml., p. 130.

108 Saml., p. 139.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

ŝelo.

La posedanta klaso kaj la proletaro, diras ili, prezentas la saman memfremdiĝon sur kontraŭaj polusoj. Sed la unua klaso sentas sin en tiu memfremdiĝo bonfarta kaj konfirmata, scias la fremdiĝon kiel propran potencon kaj posedas en ĝi la ŝajnon de homa ekzistado; la dua sentas sin en la fremdiĝo neniigita, vidas en ĝi sian senpovecon kaj la realecon de malhumana ekzistado. Ene de tiu kontraŭdiro, el la privata proprietulo eliras la ago de konservado, el la proleto la ago de neniigo de tiu kontraŭdiro.

La proletaro plenumas la verdikton, kiun la privata proprieto, per la kreado de la proletaro, faras al si mem. Se la socialistoj atribuas al la proletaro tiun rolon, ili faras tion ne ĉar ili konsideras la laboristojn dioj, sed inverse, ĉar *„en la vivkondiĉoj de la proletaro estas ĉiuj vivkondiĉoj de la nuntempa socio en ilia plej malhumana pinto kunigitaj”*, ĉar ĝi estas devigata al ribelo kontraŭ tiu malhumaneco kaj al memliberigo. La proletaro trairas ne vane la malfacilan, sed hardantan lernejon de la *laboro*.

„Ne temas pri tio, kion tiu aŭ alia proleto aŭ eĉ la tuta proletaro provizore *imagas* kiel celon. Temas pri tio, *kio ĝi estas* kaj kion fari ĝi estas laŭ tiu *esto* historie devigata.”

La proletaro ne povas liberiĝi sen nuligi siajn proprajn vivkondiĉojn, kaj ĝi ne povas nuligi tiujn vivkondiĉojn sen nuligi ĉiujn malhumanajn vivkondiĉojn de la nuntempa socio.¹⁰⁹

Frederiko Engelso poste karakterizis la evolustaton de la 'Sankta familio' en la procezo de la teoria evoluprocezo al la dialektika-historia materiismo kaj al la scienca socialismo jene:

„Sed la paŝo, kiun Fojerbaĥo ne faris, estis tamen far-

109 Saml., p. 37-38.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

enda; la kultado de la abstrakta homo, kiu konsistigis la kernon de la fojerbaĥa nova religio, estis anstataŭigenda per la scienco pri la reala homo kaj pri ties historia evoluo.”

Tiu pluevoluo de la fojerbaĥa starpunkto trans Fojerbaĥon estis komencita 1845 de Markso en la 'Sankta familio'.¹¹⁰

Fakte, Markso kaj Engelso en la 'Sankta familio' transiras en historia-ekonomia rilato kiel en la kritiko kaj formado de la racia kerno de la hegela dialektiko multe trans Fojerbaĥon, kvankam la entuziasmo pri la baza koncepto de Fojerbaĥo kaj pri lia faro ankoraŭ klare aperas; kaj Markso 1867 skribas al Engelso, ke li trovis en Hanovro ekzempleron de la 'Sankta familio' kaj estis agrable surprizita ke ili ne devas honti pri sia laboro, „*kvankam oni sentas nun ĉe la Fojerbaĥ-kulto tre humuran efikon*”.¹¹¹ La superado de tiu kulto okazis en la laboraĵoj verkitaj de Markso kaj Engelso post la 'Sankta familio'.

Fojerbaĥo ne estis vere superinta tion, kion Markso nomis la revolucia flanko de la hegela filozofio, la dialektikon, sed li estis ĝin nur flanken metinta. Ĝi estis nun, kiel Engelso esprimiĝas, en sia propra senco „*nuligenda kaj samtempe konservenda*”¹¹², nome per tio ke oni neniigu la formon, sed savu la de ĝi akiritan novan enhavon.¹¹³ Tion Markso kaj Engelso estis komencintaj en la „ekonomiaj-

110 Saml.

111 Marx an Engels, 24.4.1867 [Markso al Engelso, 1867-04-24], MEW, vol. 31, p. 290.

112 En la originalo: „*aufgehoben*” – esprimo de la hegela dialektiko; la vorto havas (infinitivo: *aufheben*) en la germana duoblan signifon: unue *nuligi*, *malvalidigi*, kaj due *konservi*. Por redoni tiun duoblan sencon (do. samtempe *nuligi kaj konservi* en Esperanto, iuj proponis la verbon *aŭfhebi*. -vl

113 Friedrich Engels: *Ludwig Feuerbach und der Ausgang der klassischen deutschen Philosophie* [Frederiko Engelso: Ludoviko Fojerbaĥo kaj la fino de la klasika germana filozofio], MEW vol. 21, p. 273.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

filozofiaj manuskriptoj” kaj en la 'Sankta familio', sed tiu laboro estis ankoraŭ tute ne finita. Markso kaj Engelso poste ripete klarigis kial la instruo de Fojerbaĥo, kvankam multe pli malriĉa je historia-socia materialo ol la hegela filozofio, povis tiom forte efiki.

„Kompare kun Hegelo”, skribis Markso, „Fojerbaĥo estas ja malriĉa. Tamen li estis epokfara *post* Hegelo, ĉar li metis la *akcenton* sur certaj punktoj malagrablaj al la kristana konscio, gravaj por la progreso, kiujn Hegelo lasis en mistika duonlumo.”¹¹⁴

La sekvan paŝon de ekonomia analizo kaj de ellaborado de la politikaj konceptoj faris Frederiko Engelso en la libro kiu ĉe sia apero en la printempo de 1845 efikis preskaŭ sensacie: '*Die Lage der arbeitenden Klasse in England* [La situacio de la laboranta klaso en Anglio]'. En tiu libro, verkita kun la pasia simpatio de amiko kaj kunbatalanto de la britaj laboristoj, la dudekkvarjara Engelso faris animskuan faktecان raporton pri la socia situacio de la britaj laboristoj. En la verko, skribita surbaze de propraj spertoj kaj de ampleksa fontmaterialo, Engelso volis, kiel li skribis en alvoko al la laboranta klaso de Britio,

„vidi vin en viaj loĝkondiĉoj, observi vin en via ĉiutaga vivo, babili kun vi pri viaj vivkondiĉoj kaj doloroj, esti atestanto de viaj bataloj kontraŭ la socia kaj politika potenco de viaj subpremantoj”.¹¹⁵

Engelso akuzas la britajn regantajn klasojn ke ili – spite al ĉiaj enketkomisionoj kaj blulibrooj – lasis al „*eksterlandano* raportoj al la civilizita mondo pri la humiliga situacio en

114 Karl Marx an J. B. von Schweitzer, 24.1.1865 [Karlo Markso al J. B. von Schweitzer, 1865-01-24], MEW, vol. 16, p. 25.

115 Friedrich Engels: *Die Lage der arbeitenden Klasse in England* [Frederiko Engelso: La situacio de la laboranta klaso en Anglio], MEW, vol. 2, p. 229.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

kiu vivi vi estas devigataj."¹¹⁶

En sia verko Engelso pritraktas la evoluon de la plej gravaj industribranĉoj, la industriaran revolucion, la industriaran laboristaron kaj ties situacion en la grandaj urboj, la konkurencon, la enmigradon de irlandanoj, la efikon de la fabriklaboro al la korpa, spirita kaj morala stato de la laboristoj, la efiko de la maŝinaro sur la diversaj industribranĉoj, la virin- kaj infan-laboron, la minejan kaj kampkulturan proletaron kaj fine la ekonomian kaj politikan laboristan movadon kaj la pozicio de la burĝaro fronte al la proletaro.

Engelso nomas la kondiĉojn, sub kiuj la laboristoj en la frukapitalisma brita socio estas devigataj vivi, murdo, kiu ŝajnas ne esti tia, ĉar oni ne vidas la murdiston, ĉar ĉiuj kaj tamen neniu estas tiu murdisto. Sed la angla socio jesas al tiu socia murdo ĉiutage kaj ĉiuhore.¹¹⁷ Eĉ pli terura ol la akra malriĉeco estas la socia malsekureco, la fakto ke ĉiu krizo, ĉia kaprico de lia majstro povas senpanigi la laboristaron kaj ke ĝi pro tio efikas pli demoralize ol la mizero.¹¹⁸

Li citas la verksiton Thomas Carlyle pri la indigno kaj la malamo, kiuj kreskas inter la laboristoj, sed taksas tiujn sentojn alie, kiel provojn de tio, ke la laboristoj komencas senti la malhumanecon de sia situacio kaj ke ili iam liberigos sin el tiu servuteco de la burĝaro. La laboristoj komencas „*senti sin kiel klaso en sia tutaĵo*“, „*ke ili, kvankam unuope malfortaj, tamen kune estas potenco*“; la grandaj urboj estas „*la fokuso de la laborista movado*“, ĉi tie unue aperis la „*antagonismo inter proletaro kaj burĝaro*“ kaj de ĉi tie eliris „*laboristaj ligoj, ĉartismo kaj socialismo*“.¹¹⁹

La juna Engelso priskribas la naskiĝlandon de la kapitalismo kiel landon, en kiu la socia milito komplete eksplodis;

116 Saml., p. 230.

117 Saml., p. 325.

118 Saml., p. 344.

119 Saml., p. 346.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

ĉiu staras por si mem kaj batalas por si mem kontraŭ ĉiuj aliaj, ĉiu vidas en la alia malamikon, sed iom post iom estiĝas du grandaj tendaroj – la burĝaro kaj la proletaro. Tiu milito de ĉiuj kontraŭ ĉiuj kaj de la proletaro kontraŭ la burĝaro ne mirigu, ĉar ĝi estas nur la plej konsekvenca plenumado de la principo entenata jam en la libera konkurenco.¹²⁰

Aparte klarigaj pri la evoluo de liaj konceptoj estas la sekcioj en kiuj Engelso parolas pri la sindikata kaj politika laborista movado, ĉar li tie jam klare disvolvas la teorion de la klasbatalo. La laboristoj, diras Engelso, ne povas akiri pli humanan situacion sen batali kontraŭ la intereso de la burĝaro, kiu konsistas ĝuste en la ekspluatado de la laboristoj. Sed la burĝaro defendas sian intereson per ĉiaj siaj fortoj kiujn ĝi povas uzi per sia posedo kaj per la ŝtatpotenco kiun ĝi disponas. Al la laboristo ne restas kampo por homa agado ol la kontraŭstaro al sia tuta vivkondiĉo, kaj ĝuste en tiu kontraŭstaro li ŝajnas „*plej aminda, plej nobla, plej homeca*”.¹²¹

Engelso poste klarigas, ke sindikata organiziĝo kaj strikbataloj ne povas nuligi la ekonomiajn leĝojn kaj la regadon de la burĝaro, sed la protesto povas atingi ion kontraŭ unuopaj kaŭzoj, tenas vivanta la kontraŭstaron al la socia kaj politika ĉiopoveco de la posedanta klaso, kaj tiuj bataloj estas la unua provo nuligi la konkurencon inter ili mem; ke la strikoj estas la unuaj antaŭbataletoj, kelkfoje eĉ iom gravaj bataloj, ili decidas nenion, sed ili estas la pruvo ke la decida batalo inter proletaro kaj burĝaro proksimiĝas. Ili estas la militlernejo de la laboristoj kaj kiel tia ili havas grandan efikon, en ili evoluas la aparta braveco de la angla laboristo.¹²²

120 Saml., p. 359.

121 Saml., p. 430-431.

122 Saml., p. 434; 436; 441.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

La unua politika laborista movado, la ĉartismo, efikis al li – tio sentebblas en ĉio kion Engelso diras pri ĝi – tre alloge, sed ne blindigis lin kontraŭ ĝiaj specifaj malfortaĵoj. La samo validas ankaŭ pri la pozicio de Engelso al la socialistoj de la ovena tendenco. Li nomas la ĉartismon „*la kompakta formo de opozicio kontraŭ la burĝaro*”. En ĝi – kontraste al la sindikatoj kaj al la strikoj – estas „*la tuta laborista klaso kiu leviĝas kontraŭ la burĝaro, kaj kiu atakas ĉefe ties politikan potencon, la leĝan muron per kiu ĝi ĉirkaŭigis sin*”. La ĉartismo komence ja iris man-en-mane kun la burĝa radikala movado, sed kio distingas ĝin disde ĉia „*ĝisnuna burĝa demokratio*”, estas esence la socia naturo. Ĝia devizo estas: politika potenco nia rimedo, socia feliĉo nia celo. La proksimiĝo al la socialismo ne povas ne okazi. La vere proleta socialismo, irinta tra la ĉartismo, purigita je siaj burĝaj elementoj, ludos gravan rolon: „*La kunfandiĝo de la socialismo kun la ĉartismo ... estos la venonta okazaĵo kaj parte jam komenciĝis.*”¹²³

Se la burĝaro ne pripensos [la situacion] ĝis la venonta krizo, kaj tion ĝi evidente ne faras, tiam – opiniis Engelso – sekvos revolucio, kiu kun neniuj antaŭa kompareblas. Li kredis ke la revolucio devas veni, ĉar por paca solvo estas jam tro malfrue. En la 'Situacio de la laboranta klaso' la komunismaj konceptoj de Engelso estas ankoraŭ traplektitaj de restoj de la antropologie nuancita humanismo influita de Ludoviko Fojerbaĥo kaj de Moses Hess. Engelso diras, ke la komunismo staras laŭ sia principo „*super la diseco inter burĝaro kaj proletaro*”, sed ke li rekonas la historian pravigon de tiu diseco por la estanteco. Se eblus fari la proletaron komunista, antaŭ ol la batalo eksplodas, tiam tiu okazus pace, sed por tio estas jam tro malfrue.¹²⁴

Pri tiuj profetaĵoj Engelso esprimis sin poste en la antaŭparolo al la angla eldono de sia libro en 1892. Tie li diras:

123 Saml., p. 444-453.

124 Saml., p. 504-506.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

„Mi ne kapricis forstreki el la teksto la multajn profetaĵojn, antaŭ ĉio ne tiun de baldaŭ okazonta socia revolucio en Anglio, kiujn mia juneca ardo tiam inspiris al mi. Mi ne havas kialon prezenti mian laboraĵon kaj min mem pli bona ol ni ambaŭ estis tiam. Mirindas, ne ke multaj el tiuj profetaĵoj ne realiĝis, sed ke multaj ja realiĝis ...”¹²⁵

Intertempe Karlo Markso, inter la fino de 1844 kaj januaro 1845, daŭrigis siajn studojn de la anglaj kaj francaj ekonomikistoj de la 18-a kaj 19-a jarcentoj. Sekve al interveno de la prusa ĉe la franca registaro, Markso estas elpelita el Francio kaj transloĝiĝas komence de februaro 1845 al Bruselo, kie li daŭrigas la ekonomian studadon, des pli ke li faris kontrakton kun la eldonisto Leske en Darmŝtato pri duvoluma verko. Komence de aprilo 1845 venas al Bruselo ankaŭ Engelso, al kiu la ĉefurbestro de Elberfeldo malpermesis ĉian kunvenadon pri socialismaj kaj komunismaj temoj.

„Kiam ni en la printempo de 1845”, skribas Engelso, „denove renkontiĝis en Bruselo, Markso estis disvolvinta el la supre menciitaj fundamentoj [la laboraĵoj ĝis la 'Sankta familio'] sian materiisman historiteorion en la ĉefaj trajtoj jam preta, kaj ni komencis nun detale ellabori la nove akiritan konceptmanieron laŭ la diversaj direktoj.

La en la historia scienco revolucia malkovro, kiu estas esence la faro de Markso, kiel ni vidas, kaj pri kiu mi povas atribui al mi nur tre malgrandan parton, estis tamen rekte grava por la samtempa laborista movado. Komunismo ĉe la francoj kaj germanoj, ĉartismo ĉe la angloj ŝajnis nun jam ne io hazarda, kiu same bone ankaŭ povintus ne ekzisti. Tiuj movadoj prezentiĝis nun kiel movado de la moderna subpremata klaso, de la proletaro, kiel pli aŭ malpli evoluinta formo de ĝia historie necesa batalo kontraŭ la reganta klaso, la burĝaro; kiel formoj de la klasbatalo, sed malsama ol ĉiuj antaŭaj klasbataloj per nur la jeno: ke la hodiaŭa subpremata klaso, la proletaro, ne povas fari sian emancipiĝon sen samtempe emancipi la tutan socion

125 Saml., p. 642.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

el la disiĝo laŭ klasoj kaj per tio el la klasbataloj. Kaj komunismo signifis nun jam ne: Elkovado, pere de fantazio, de kiom eble plej perfekta socia idealo, sed: Kompreno de la naturo, de la kondiĉoj kaj de la el tio rezultantaj ĝeneralaj celoj de la batalo farata de la proletaro.

Ni nun tute ne intencis alflustri ekskluzive al la 'klera' mondo tiujn novajn sciencajn rezultojn en dikaj libroj. Male. Ni sidis ambaŭ jam profunde en la politika movado, havis en la klera mondo, precipe en okcidenta Germanio, certan nombron da simpatiantoj kaj abundan kontakton kun la organizita proletaro. Ni estis devigataj science argumenti nian opinion; sed same gravis ankaŭ por ni gajni por nia konvinko la eŭropan kaj unue la germanan proletaron. Ekde kiam ni havis mem klarecon, ni eklaboris.”¹²⁶

Markso kaj Engelso dediĉis sin al tiu teoria kaj praktika tasko en la du sekvaj jaroj kun ĉiu sia energio. Kiam Engelso diras, ke dum ilia renkontiĝo Markso estis jam prete disvilvinta la materiisman histori-teorion en ĝiaj ĉefaj trajtoj, tiam Engelso sendube malgrandigas sian propran kontribuojn al la komuna verko. Sed efektive, Markso estis en la printempo de 1845, en la Fojerbah-tezoj, prezentinta la „genian ĝermon” de la nova mondrigardo, laŭ la esprimo de Engelso. Oni povas diri, ke ekde nun – en la komuna laboro pri la resuma kritiko de la germana filozofio ekde Hegelo, pri la en 1845-1846 estiĝanta 'Germana ideologio' kiel ankaŭ en la dise verkitaj verkoj kaj eseoj, speciale en la polemika verko de Markso kontraŭ Prudono 'La mizero de la filozofio' – komenciĝas en la strikta senco de la nocio la *marksisma krea periodo* de ambaŭ. La prezentado de la pensoj disvolvitaj en tiuj laboraĵoj devas lokiĝi en la sistema parto. Kio restas ankoraŭ farenda en tiu ĉi sekcio, estas konciza superrigardo tra la rapide vastiĝanta praktika-politika agado de Markso kaj Engelso en la du sekvaj jaroj –

126 Friedrich Engels: Zur Geschichte des Bundes der Kommunisten [Frederiko Engelso: Kontribuaĵo al la historio de la Ligo de la Komunistoj], MEW, vol. 21, p. 212.

1.2 La elformiĝo de la filozofiaj kaj politikaj konceptoj de Markso kaj Engelso

Ĝis tiu historia punkto, en kiu ili estas komune taskitaj ellabori la programon de la 'Ligo de la komunistoj', la Manifeston de la Komunista Partio.

La praktika agado de Karlo Markso en la pariza laborista movado, komencita per sia kontakto kun la francaj socialistoj kaj komunistoj kiel kun gvidaj membroj de la 'Ligo de la Justuloj' konsistanta plejparte el germanaj metiistoj, disbranĉiĝas nun en Bruselo en plurajn direktojn. Per vigla korespondado Markso restas ankaŭ ĉi tie ligita kun la amikoj kun kiuj li konatiĝis en Parizo, kun la francaj kiel la germanaj. Engelso siavice tenas densan kontakton kun la anglaj ĉartistoj kaj verkas por la *New Moral World* kaj poste por la *Northern Star*.

Komune ili starigas en Bruselo germanan laboristan asocion kaj kreas kontaktojn kun belgaj socialistoj kaj demokratoj kaj kun polaj revoluciaj elmigrintoj. En julio kaj aŭgusto 1845 Markso kaj Engelso estas kune en Londono kaj Manĉestro, kie Engelso konatigas sian amikon kun la vivo de la tiam plej alte evoluinta kapitalisma lando kaj kun la tiea laborista movado. Tie Markso renkontas unuafoje unu el la gvidantoj de la ĉartistoj, Georges Harney, kaj la gvidantojn de la londona komunumo de la 'Ligo de la Justuloj' – Karl Schapper, Josef Moll kaj aliajn. Ili partoprenas en la iniciato por starigo de internacia societo de la demokratoj en Londono.

Komence de 1846 Markso kaj Engelso fondas en Bruselo komunistan korespondkomitaton kaj faras paŝojn por starigi similajn komitatojn ankaŭ en Londono, Parizo kaj kelkaj germanaj urboj. Dum tiu tempo ili diskutas pri utopiaj kaj etburĝaj socialismaj konceptoj, ekzemple pri la anoj de la 'vera socialismo', pri la religiaj-socialismaj savideoj de Vajtlingo, pri la radikala etburĝa demokratio, por alkonduki teoriaran klarigon de la starpunktoj en la vicoj de la anoj de komunismaj kaj socialismaj ideoj.

1. Pri la estiĝhistorio de la marksismo

En januaro 1847 la londona komitato de la 'Ligo de la Justuloj' petas Markson kaj Engelson aliĝi al la Ligo. Oni certigis al ili ke la ligo reorganiziĝos kaj akceptos programon surbaze de la scienca komunismo. En junio de la sama jaro Engelso partoprenas en la kongreso de la Ligo en Londono, en kiu oni decidis alinomi la ligon en 'Ligo de la Komunistoj' kaj anstataŭigi la ĝisnunan devizon „Ĉiuj homoj estas fratoj” per „Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!” En aŭgusto la Ligo fondiĝas ankaŭ en Bruselo, kaj Markso estas elektita prezidanto de la komunumo. En la dua kongreso de la Ligo, de la 19-a de novembro ĝis la 8-a de decembro 1847 en Londono, Markso kaj Engelso jam aktive partoprenas. Iliaj opinioj estas konsentataj, kaj ili estas taskitaj redakti „por la publiko destinitan, detalan teorion kaj praktikan partiprogramon”, kiu aperas en Londono fine de februaro 1848 sub la titolo „Manifesto de la Komunista Partio” kaj kiu atingis ĝis en nia tempo la plej grandan disvastiĝon kaj efikon, kiun politika batalprogramo iam ajn atingis.

2. La dialektika materiismo

2.1 Temo kaj diferencoj de la antaŭa materiismo

La dialektia materiismo estas la filozofia, teoria-metoda fundamento de la tuta marksismo – de ĝia materiisma histori-koncepto same kiel de la politika ekonomio kaj de la scienca socialismo. Ni trovas detalan prezentadon de la marksismaj filozofiaj konceptoj ĉefe ĉe Engelso kaj Lenino. Ĉe la laboraĵoj de Engelso temas precipe pri la verkoj '*Herrn Eugen Dührings Umwälzung der Wissenschaften* [La revolucio de la sciencoj de s-ro Eugen Dühring]' (kiu unue aperis 1877-1878 kiel ese-serio en la tiam socialdemokrata centra organo '*Vorwärts*'), krome pri '*Ludwig Feuerbach und der Ausgang der klassischen deutschen Philosophie* [Ludoviko Fojerbaĥo kaj la fino de la klasika germana filozofio]' (aperinta unuafoje 1886 en la teoria revuo de la germana socialdemokratio '*Die Neue Zeit*') kaj pri liaj postlasitaj manuskriptoj kaj skizoj pri la '*Dialektik der Natur* [Dialektiko de la naturo]' (unuafoje publikigita 1925 de la Instituto Markso-Engelso-Lenino en Moskvo). La laboraĵoj de Lenino estas unuavice la 1909 publikigita verko '*Materialismus und Empiriokritizismus* [Materiismo kaj empiriokriticismo]' kaj la '*Philosophische Hefte* [Filozofiaj kajeroj]' eldonitaj nur post lia morto, kies kerno estas skizoj kaj notoj pri la hegela dialektiko.

De Markso ni ne posedas kompletan apartan laboraĵon pri filozofiaj problemoj en pli strikta senco de la nocio, krom en la menciitaj fruaj skribaĵoj. Sed la tezoj pri Fojerbaĥo el la jaro 1845, gravaj klarigoj pri sia materiisma-dialektika metodo, kiuj troviĝas dise en diversaj verkoj, krome la fakto ke Markso precize konis la '*Anti-Dühring*' de Engelso kaj senrezerve konsentis pri ĝi (kion li konfirmis per tio ke li kontribuis la ĉapitron pri la historio de la politika ekonomio al tiu libro) pravas, ke la filozofiaj konceptoj

2. La dialektika materiismo

de Engelso estis ankaŭ detale tiuj de Markso. El letero de Markso al Engelso de januaro 1858 ni scias, ke li pensis prezenti sian dialektikan-materiisman koncepton en konfrontado kun Hegelo. „*Se iam revenos tempo por tiaj laboroj*”, skribas Markso, „*mi tre ŝatus, en du aŭ tri presfolioj, igi la racian parton ĉe la metodo, kiun Hegelo malkovris sed samtempe mistifikis, alirebla por la ĝenerala homa saĝo.*”¹ Sed Markso fakte ne trovis la tempon por tio.

Por kompreni la filozofiajn konceptojn de Markso, Engelso kaj Lenino, gravas konsciiĝi pri kelkaj premisoj, sen kiuj oni ne povas akiri aliron al la dialektika kaj historia materiismo. Unue, por la marksisma filozofio validas tio, kion la marksismo konstatis pri ĉiuj ideoj kiuj rilatas al la sferoj de la socia vivo: Ili radikas en la socia-ekonomia bazo de epoko, ili estas do iel aŭ alie – pli aŭ malpli rekte, pli aŭ malpli esence – esprimo de la bezonoj kaj interesoj de certaj klasoj de socio. Tiusence Lenino opiniis, ke atendi en la kapitalismo senpartian socisciencon estus same malsaĝa naiveco kiel ekzemple „*atendi de fabrikisto senpartiecon en la demando ĉu altigi la salajron al la laboristoj per malaltigo de la profito de la kapitalo*”.² Markso kaj Engelso ĉiam emfazis, ke en socio dividita en klasojn la regantaj ideoj estas la ideoj de la reganta klaso.

Tiel la marksisma filozofio, kiel la tuta marksismo-leninismo, estas *konscia esprimo de la interesoj kaj bezonoj de la moderna laborista klaso*. La fakto ke ĝi daŭrigas pli fruajn pensojn, speciale la francan materiismon, Ludovikon Fojerbahon kaj Hegelon, neniel ŝanĝas tion. Nek laŭ ilia historio de estiĝo nek laŭ ilia enhavo la filozofiaj konceptoj de Markso, Engelso kaj Lenino disigeblas de ties sociaj-politikaj instruoj kaj de ilia revolucia politika praktiko, kies

1 Markso al Engelso, 1858-01-16, MEW, vol. 29, p. 260.

2 Lenin: Drei Quellen und drei Bestandteile des Marxismus [Lenino: Tri fontoj kaj tri konsistaj partoj de la marksismo], LW, vol. 19, p. 3.

2.1 Temo kaj diferencoj de la antaŭa materiismo

teoria kaj metoda fundamento ili estas.

Kun tio plej dense ligiĝas dua aspekto kiu estas karakteriza por la dialektika kaj historia materiismo: la al ĝi iminenta *unueco de teorio kaj praktiko*. Filozofio, teorio ne estas en la marksismo memsufiĉaj celoj, ili estas ne nur instrumentoj de ekkono de la realo, sed samtempe instrumentoj de ĝia ŝanĝo. Tio estas nemalhavebla elemento de la marksisma teorio. Ĝi staras ĉe la komenco de marksisma filozofiado kaj estas la senco de la fama dekunua fojerbaĥtezo de la juna Markso:

„La filozofoj nur diverse interpretis la mondon. Necesas ŝanĝi ĝin.”³

Trie, la dialektika materiismo ne estas filozofio en la senco de la malnovaj filozofiaj sistemoj. Ĝi ne pretendas esti ĉion entenanta, finfarita filozofia sistemo staranta super ĉiuj sciencoj. Estante laŭ sia tuta esenco *scienca*, nespekula filozofio, ĝi vidas, male, la taskon en tio, filozofie ĝeneraligi la evoluon kaj la rezultojn de la natur- kaj sociaj sciencoj kaj sur tiu bazo mem konstante plu evolui kaj riĉiĝi. Por reliefigi la diferencon al la antaŭa filozofio, Engelso diris pri la dialektika kaj historia materiismo:

„Ĝi jam tute ne estas filozofio, sed simpla mondkoncepto, kiu devas pruviĝi taŭga kaj agi ne en aparta sciencoscienco, sed en la realaj sciencoj. La filozofio estas ĉi tie do samtempe nuligita kaj konservata, superita en sia formo, konservata en sia reala enhavo.”⁴

3 Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 58 p., 2010, ISBN 978-2-918300-17-5

4 Friedrich Engels: *Herrn Eugen Dührings Umwälzung der Wissenschaft (Anti-Dühring)* [Frederiko Engelso: La revolucio de la scienco fare de s-ro Eugen Dühring (Kontraŭ-Duringo), MEW, vol. 20, p. 129.

2. La dialektika materiismo

La scienca karaktero de la marksisma filozofio baziĝas unuavice sur tio ke tiu troviĝas ne en kontraŭdiro, sed en akordo kun la ekkonoj de la unuopaj sciencoj, kaj ke ĝi ankaŭ sur sia propra tereno toleras neniam mistikajn, malraciajn, nesciencajn teoremojn, hipotezojn kaj metodojn.

Fine konsiderendas kvara aspekto, kiu estas esenca trajto de la dialektika materiismo kaj de la tuta marksisma pensado: la unuiĝo de la senescepte materiisma interpretado de ĉiuj fenomenoj en la naturo kaj en la socio kun la dialektiko disvolvita al ĝenerala evolu-teorio kaj kritika metodo. En la ellaborado de sia dialektika metodo Markso kaj Engelso povis ja daŭrigi speciale la klasikan idealisman germanan filozofion, precipe Hegelon, sed ili ne povis simple transpreni la hegelan metodon, pro ties idealisma bazo kaj pro la kun ĝi ligitaj artefaritaj konstruoj, sed ili devis radikale „inversigi” ĝin. La organika sintezo de materiismo kaj dialektiko kaj ĝia konsekvenca aplikado al la esplorado de la homa socio estas ankaŭ filozofihistorie io fundamente nova.

Jam en sia naturkoncepto la dialektika materiismo distingiĝas fundamente de la antaŭa materiisma filozofio. Engelso atentigis pri tio, ke la limoj de la antaŭmarksisma materiismo – ties meĥanikismaj, nehistoriaj nedialektikaj trajtoj – , kaŭzitaj de la stato de la natursciencoj, supereblis precipe pro tri gravaj natursciencaj malkovroj: tiuj de la ĉelo, de la leĝo pri konserviĝo de la energio kaj per la darvina teorio de la evoluo.⁵ Per tio, la penso de dialektika evoluo, kiu ĝis tiam estis esence limigita al la idealisma filozofio, trovis eniron en la natursciencojn. Nun estis pruvite ke la tuta naturo kaj ankaŭ la homo havas historion.

5 Friedrich Engels: Ludwig Feuerbach und der Ausgang der klassischen deutschen Philosophie [Frederiko Engelso: Ludoviko Fojerbaĥo kaj la fino de la klasika germana filozofio], MEW, vol. 21, p. 278 sj.

2.1 Temo kaj diferencoj de la antaŭa materiismo

Sed la franca materiismo de la 18-a jarcento kaj Ludoviko Fojerbaĥo preskaŭ tute ne kapablis apliki siajn materiisman bazan koncepton al la socio, al la homo kaj lia historio. Tiukampe Markso kaj Engelso faris la plej grandan paŝon antaŭen. Temas pri tio, diras Engelso,

„meti la sciencon pri la socio, t.e. la esencon mem de la tiel nomataj historiaj kaj filozofiaj sciencoj, en harmonion kun la materiisma bazo kaj rekonstrui ĝin sur ĝi”.⁶

En la dek-unu fojerbaĥtezoj de la juna Markso (1845) ni trovas la kritikajn argumentojn kontraŭ la malnova materiismo, inkluzive de Fojerbaĥo, tre precize formulitaj. En ili, Markso nomas kiel la ĉefan mankon de ĉia ĝisnuna materiismo tion, ke la objekto, la realeco, senseco, estas konceptataj „nur en la formo de la objekto aŭ de rigardo”, sed ne kiel

„sensa homa agado, praktiko; ne subjektive”.

Pro tio oni disvolvis la *agantan* flankon de la idealismo, sed nur abstrakte, ne kiel realan sensan agadon. Ankaŭ Fojerbaĥo ne konceptis la homan agadon kiel *konkretan* kaj pro tio ne komprenis la signifon de la revolucia, de la praktike-kritika agado. Fojerbaĥo, ne kontenta per la abstrakta pensado, alvokis la sensan rigardon, sed ne komprenis la sensecon kiel praktikan homan sensan agadon.

En la saman direkton iras la argumentoj de Markso, kontraŭ la religikritiko de Fojerbaĥo kaj kontraŭ ties nehistoria koncepto de la homa individuo. Fojerbaĥo dissolvis la religion mondon en ĝian mondan bazon, sed pretervidis ke la ĉefa tasko restas tiam ankoraŭ farenda, nome kompreni la memdisŝiritecon, la mem-sin-kontraŭdiradon de tiu monda bazo kaj praktike revoluciigi ĝin per forigo de la kontraŭdiro.

6 Saml., p. 280-281.

2. La dialektika materiismo

Markso direktas sin en la tezoj ne nur kontraŭ la nur kontemple rigardantan, la socian praktikon de la homo neantan fojerbahān materiismon. Li kritikas ankaŭ la *abstrakte nehistorian* prezentadon de la homo kiel de senhistoria speciulo. La abstrakta individuo, kiun Fojerbaĥo esploris, apartenas en la realo al certa socia formacio, diras Markso. La *homa* estaĵo „*ne estas abstraktaĵo ene de la unuopa individuo. En sia realeco ĝi estas la tutaĵo de la sociaj kondiĉoj*”.⁷

Krome ni trovas en la fojerbaĥtezoj plian fundamentan penson de la dialektika kaj historia materiismo eldiritan en kontrasto al ĝiaj antaŭuloj, nome ke la praktika socia vivo entenas en si la solvon de ĉiuj ideaj misteroj kaj ke la socia praktiko de la homo estas la kriterio de la vereco de la homa pensado. Markso diras ke ĉia socia vivo estas esence *praktika*; ĉiuj misteroj trovas sian racion solvon en la homa praktiko kaj en la kompreno de tiu praktiko. Kaj ankaŭ la demando, ĉu al la homa pensado atribueblas konkreta vero, ne estas demando de la teorio, sed *praktika* demando.

„En la praktiko la homo devas pruvi la veron, t.e. la realon kaj potencon, la ĉimondecon de sia pensado. La disputo pri la realeco aŭ nerealeco de pensado, kiu izoliĝas de la praktiko, estas pure *skolastika* demando.”⁸

Do, la fojerbaĥtezoj entenas kelkajn el la plej gravaj ĝermoj de marksisma filozofiado, kiuj, elformitaj kaj aplikataj al la historia kaj ekonomia materialo, poste trapenetros la tutan verkaron de Markso, Engelso kaj Lenino. Temas unuavice pri la aplikado de la materiismo al la homa socio kaj ties historio; pri la konkrete historia aliro al ĉiuj fenomenoj de la materia kaj spirita vivo; pri la socia praktiko de la homo kiel bazo de lia tuta spirita agado, kiel kriterio de la potenco de la homa pensado; kaj fine pri la neceso superi

7 Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj, l.c., p. 7 kaj 8.

8 Saml., p. 6.

2.1 Temo kaj diferencoj de la antaŭa materiismo

la kontemplan karakteron de la malnova materiismo kaj fari la filozofion armilo de la praktika agado de la homo, instrumento de mondŝanĝo, revolucia praktiko.

2.2 La filozofia materiismo

En sia filozofia baza koncepto Markso kaj Engelso daŭrigis la francan materiismon de la 18-a jarcento (Diderot, Helvetius, Holbach, La Mettrie) kaj Ludovikon Fojebrakon. La *bazan demandon* de ĉia filozofio – la demandon pri la rilato de naturo kaj spirito, materio kaj konscio, estado kaj pensado, – ili respondis *materiisme*. Kiel la antaŭaj materiismaj filozofoj, tiel ankaŭ Markso, Engelso kaj Lenino uzis la nociojn materiismo kaj idealismo nur en la strikte filozofia-ekkonteoria senco, sen la plej eta kromsignifo de etikaj-moralaj valorjuĝoj. La materiisma mondpcepto estis por Markso kaj Engelso, post kiam la verkoj de Fojebrako faris sian efikon, tiom memkomprenebla, kaj ĝi estis en la samtempa socialisma laborista movado tiom ĝenerale akceptita, ke ambaŭ konsideris superflua esprimi sin pli detale pri ĝi. Lenino poste emfazis, ke Markso kaj Engelso pro tiuj kialoj

„direktis sian tutan atenton al serioza teoria *pludisvolvado* de la materiismo, al ĝia aplikado al la historio, t.e. al la perfektigo de la konstruaĵo de la materiisma filozofio ĝis supren”.⁹

Engelso nomis la demandon pri la rilato de la spirito al la naturo, de la konscio al la materio „*la plej alta demando de la tuta filozofio*”. La demando, kio estas la origino, ĉu la spirito aŭ la naturo, akriĝis kontraŭ la eklezio al la demando, ĉu dio kreis la mondon aŭ ĉu la mondo ekzistas deeterne.

„Tiuj”, klarigas Engelso, „kiuj asertis la originecon de la spirito kontraŭ la naturo, do lastinstance supozis ian ajn mondkreadon – kaj tiu kreado estas ofte ĉe la filozofoj, ekz-e ĉe Hegelo, ankorau multe pli komplikita kaj pli malebla ol en la kristanismo –, konsistigis do la tendaron de la idealismo. La aliaj, kiuj konsideris la naturon kiel la originon, apartenas al la diversaj skoloj

9 Lenino: *Materialismus und Empiriokritizismus*, LW, vol. 14, p. 141.

2.2 La filozofia materiismo

de materiismo.”¹⁰

La materiisma baza koncepto, kiu disigas la marksisman filozofion principe de ĉia religio kaj de ĉiaj idealismaj filozofiaj tendencoj, estis por Markso, Engelso kaj Lenino la racie ne refutebla rezulto, la nerefutebla konkludo el la tuta evoluo de la moderna naturscienco, kiu jam ne lasis la plej etan spacon por supernaturaj, religiaj, spekulaj-idealismaj klarigoj de la mondo. Filozofio en si fermita, kiu volas forigi ĉian formon de kredo kaj ankaŭ superi la duismon de spirito kaj naturo, kiu volas bazi ĉian esploradon de la naturo, de la socio kaj de la pensado sur strikte sciencajn principojn kaj metodojn, estis do laŭ la konvinko de Markso kaj Engelso ebla nur sur materiisma bazo. Oni decidis, skribas Engelso,

„senkompate oferi ĉian idealisman kapricon kiu ne estis harmoniigebla kun la faktoj komprenataj en ĝian propran kuntekston, kaj ne fantastan. Kaj krome materiismo signifas nenion. Nur ke ĉi tie por la unua fojo la materiisma mondpercepto estis traktata vere serioze kaj ke ĝi estis en ĉiuj koncernataj kampoj de la scio – almenaŭ en la bazaj trajtoj – realigata konsekvence.”¹¹

La dialektika materiismo eliras do el la konvinko, ke la nin ĉirkaŭanta mondo kaj la homo kiel parto de tiu ĉi mondo estas en sia esenco *materiaj*; ke la materio (la naturo) laŭ sia tempa estiĝo kiel ankaŭ laŭ la kaŭzeco estas la origino, klarigebla nur el si mem, dum la konscio (la spirito) estas la produkto kaj la eco de aparta, alte organizita formo de la materio. La konscio estiĝis kaj ekzistas nur kiel eco de la materia homa organismo. Ĉiu psiĥa procezo, ĉia pensado estas ligita kun neŭrofiziologiaj okazaĵoj en la homa cerbo. En konciza difino de la materiisma mondbildo Lenino diras:

„1. La fizika mondo ekzistas sendepende de la konscio de la homoj kaj ekzistis longe antaŭ la homo, antaŭ ĉia sperto de la homo; 2. La psiĥo, la konscio ktp estas la plej alta produkto de

10 Friedrich Engels: Ludwig Feuerbach ktp, MEW, vol. 21, p. 275.

11 Saml., p. 292.

2. La dialektika materiismo

la materio (t.e. de la psiĥo), ĝi estas funkcio de tiu aparte komplika peco da materio, kiu estas nomata la cerbo de la homo.”¹²

Tiun koncepton la marksismo dividas kun la antaŭa materiismo. Same ĝi dividas kun ĝi la agnoskon de la alia premiso, nome ke ankaŭ la *enhavoj* de la konscio estas lastinstance dependaj de la efikoj de la ekstera materia mondo, ke ili donas al ni pli aŭ malpli fidelan reflektan de la eksteraj objektoj.

Sed ĉi tie disiĝas la vojoj de la malnova – meĥanika kaj nehistoria – materiismo kaj de la marksisma filozofio. Por la marksismo la materia esto de la homo ne reduktiĝas al lia *biologia* organiziteco. Ĝi estas antaŭ ĉio *socia* esto, *socia praktiko*. Produktado kaj reproduktado de tio kio necesas por la vivo, *aktiva* efikado sur la eksteran naturon, socie farata kaj organizita laboro. Nur en tiu *socia* vivprocezo disvolviĝas la specife *homa* konscio de la individuoj – kun la socie estiĝinta kaj nur en la socio aplikata lingvo kiel ĝia materia instrumento. Konscio estas do ĉiam *socie* kondiĉita. La konatan teoremon de Fojerbaĥo, ke la pensado estiĝas el la estado, la estado ne el la pensado, Markso transformas al la pli profunda, pli konkreta tezo:

„Ne estas la konscio de la homoj kiu determinas ilian estadon, sed inverse, ilia socia estado kiu determinas ilian konscion.”¹³

La marksisma filozofio estas *unuisma*¹⁴ materiismo. Laŭ tio la tuta nin ĉirkaŭanta mondo, inkluzive de la homa socio, konsistigas *unuon*, universalan kuntekston de diversaj materiaj fenomenoj kaj procezoj, kiuj moviĝas laŭ imanentaj

12 Lenin: Materialismus und Empiriokritizismus, LW, vol. 14, p. 226.

13 Karl Marx: Vorwort 'Zur Kritik der politischen Ökonomie', MEW, vol. 13, p. 9.

14 Mi uzas la vorton *unuisma* anstataŭ la disvastiĝinta fuŝaĵo *monisma*. La senco de *unuismo* estas „Filozofia sistemo, kiu reduktas ĉion ekzistantan al unu sola principo”, do kontraste al duismo. -vl

2.2 La filozofia materiismo

leĝoj kaj kies unueco estas fondita ĝuste en ilia materieco.¹⁵ Markso kaj Engelso deduktis tiun ekkonon el la rezultoj de la naturscienca esplorado kaj el siaj propraj socisciencaj esploradoj. La scienco estis montrinta, ke la pli altaj moviĝformoj de la materio evoluas el la pli malaltaj; ke ĉiu el tiuj evoluŝtupoj kunteniĝas kun la antaŭaj; ke la kvalite diversaj materiformoj transformiĝas unu el la alian laŭ fiksj kvantaj proporcioj (fizikaj en ĥemiajn, neorganikaj en organikajn). La certeco, ke krom la materia mondo ne ekzistas ankoraŭ alia *dise*, estas laŭ Engelso la rezulto „*de longa kaj peniga esplorado de la reala mondo*“, inkluzive de la produktoj de la homa cerbo.¹⁶

La nocio de materio, tia kian uzas la marksisma filozofio kaj kian Lenino konkretigis, estas filozofia nocio. Ĝi ne identas kun natursciencaj difinoj kaj interpretoj de la materio, kian ajn formon tiuj alprenas. Engelso jam atentigis pri tio ke la nocio de materio estas abstraktaĵo, kiun ni atingas per tio ke ni ekskludas la kvalitajn diferencojn de la aĵoj kaj resumas ilin kiel korpe ekzistantajn. Materio kiel tia – kontraste al la difinitaj, ekzistantaj materioj – estas do neniam sensa ekzistanto, same kiel ankaŭ ne fruktoj kontraste al pomoj, piroj ktp¹⁷

Komence de la 20-a jarcento, en disputo kun subjektive idealisma filozofia tendenco, la empiriokriticismo, Lenino donis difinon de la marksisma nocio de materio, kiam li skribis:

„La nocio de la materio esprimas nenion alian ol la objektivan realecon kiu estas al ni donita en la percepto.“¹⁸

15 Friedrich Engels: Anti-Dühring, MEW, vol. 20, p. 41.

16 Friedrich Engels: Vorarbeiten zum Anti-Dühring [F. E.: Antaŭlaboraĵoj por la Kontraŭ-Duringo], saml., p. 575.

17 Friedrich Engels: Dialektik der Natur [F. E.: Dialektiko de la naturo], saml., p. 519.

18 Lenin: Materialismus und Empiriokritizismus, LW, vol. 14, p. 267.

2. La dialektika materiismo

Tiu estas, laŭ li, „*la sola eco de la materio*“, al kies agnosko la filozofia materiismo estas ligita, „*la eco esti objektiva realeco, ekzisti ekster nia konscio*“.¹⁹ En tiu kunteksto Lenino emfazis, ke ĉiaj ekkonoj de la unuopaj natursciencoj pri strukturo kaj ecoj de la diversaj moviĝformoj de la materio, same kiel ĉiaj esplorrezultoj kiuj estontece precizigos kaj pli profundigos tiujn ekkonojn, ne povas tuŝi la *filozofian* nocion de materio.

La marksisma filozofio ligas sian materio-nocion, kiel parte jam antaŭaj materiistoj, ĉiam kun la nocio de *moviĝo*. Por la dialektika materiismo la objektiva mondo estas *moviĝanta materio*. Sed kontraste al la antaŭa materiismo, la marksisma filozofio ne reduktas la moviĝon de la materio al la leĝoj de la klasika meĥaniko, sed komprenas ĝin en ĝia specifeco kaj diverseco. Lenino postulis pro tio ke en la marksisma filozofio oni devas unuigi, kunigi

„la ĝeneralan principon de evoluo kun la ĝenerala principo de *unueco de la mondo*, de la naturo, de la moviĝo de la materio.“²⁰

Engelso nomas la moviĝon simple

„*la estmanieron de la materio*“. „Neniam kaj nenie“, diras li, „ekzistis aŭ povas ekzisti materio sen moviĝo. Moviĝo en la universo, meĥanika moviĝo de malgrandaj masoj sur la unuopaj astroj, molekulaj osciladoj kiel varmo aŭ kiel elektra aŭ magneta kurento, ĥemia malkombiniĝo kaj kombiniĝo, organika vivo – en unu aŭ alia el tiuj moviĝformoj aŭ en pluraj samtempe troviĝas ĉiu unuopa materia atomo en ĉiu donita momento ... Materio sen moviĝo estas same nepensebla kiel moviĝo sen materio. La moviĝo estas do same nekreebla kaj nedetruebla kiel la materio mem; ... Moviĝo do ne kreeblas, ĝi nur transigeblas.“²¹

Por la marksisma filozofio, moviĝo estas sekve imanenta

19 Saml., p. 260.

20 Lenin: Philosophische Hefte, LW, vol. 38, p. 242.

21 Friedrich Engels: Anti-Dühring, MEW, vol. 20, p. 55.

2.2 La filozofia materiismo

eco de la maniero, kiu inkludas ĉiujn en la universo okazantajn ŝanĝiĝojn kaj procezojn „*de la simpla lokŝanĝiĝo ĝis la pensado*”.²² El ekkonteoria vidpunkto Lenino atentigas pri tio ke la moviĝo de niaj imagoj, perceptoj ktp respondas al la moviĝo de la materio ekster nia konscio. Pro tio, konkludas li, la disigo de la moviĝo disde la materio signifas la samon kiel disigo de la pensado disde la objektiva realeco, kiel la disigo de la percepto disde la ekstera mondo, ĝi signifas do la transiron al la flanko de idealismo.²³

En la tekstoj kiujn Engelso dediĉis al tiu problemoj li ligas la noción de moviĝo kun tiu de energio kaj la penson de nedetrueblo de la moviĝo kun la energikonserviĝa leĝo malkovrita de Mayer kaj Helmholtz.²⁴ Tio, kion Engelso eldiris filozofie, estas en formo fizika-matematika niatempе konfirmita per la formulo de energio-maso de Ejnŝtejno, laŭ kiu ĉiu maso estas ligita kun energio kaj ĉia energio ligita al maso.

Precipe en siaj postlasitaj manuskriptoj kaj notoj pri la 'Dialektiko de la naturo' Engelso, surbaze de la tiutempaj rezultoj de la natursciencoj, esploris la kunteniĝon, la transiron de unu en alian kaj la kvalitajn apartecojn de la diversaj moviĝformoj de la materio kaj samtempe prezentis ilin kiel bazon de klasigo de la sciencoj. Engelso distingis kvin fundamentajn moviĝformojn de la materio: la meĥanikan (lokŝanĝon); la fizikan (moviĝon de la molekuloj); la ĥemian (moviĝo de la atomoj); la biologian (vivon); la socian (homan socion).²⁵ Ju pli altas la moviĝformo de la materio pri kiu temas, des malpli ĝi gravas la nur meĥanika ŝanĝiĝo, des pli grandas la rolo de la kvalitaj ŝanĝiĝoj. Engelso

22 Friedrich Engels: Dialektik der Natur, saml., p. 354.

23 Lenin: Materialismus und Empirio-kritizismus, LW,, vol. 14, p. 267.

24 a) Engels: Dialektik der Natur, MEW, vol. 20, p. 380.

b) Originale: Helmholtz. -v1

25 Saml., p. 354.

2. La dialektika materiismo

atentigas ke ĉia ripozo, ĉia ekvilibro en la objektiva realo estas nur relativa, ke ĝi havas sencon nur „*en rilato al tiu aŭ alia moviĝformo*” de la materio.²⁶

En spaco kaj tempo la dialektika materiismo vidas la bazajn ekzistformojn de la materio. Ĉia materio moviĝas en la spaco kaj en la tempo. La bazaj formoj de ĉia esto estas spaco kaj tempo, diras Engelso, kaj esto ekster la tempo estas same granda sensencaĵo kiel esto ekster la spaco.²⁷ Spaco kaj tempo estas do por la marksisma filozofio nenio sendependa de la materio, ne nur subjektivaj konstruoj de nia pensado, sed objektivaj kiel la moviĝanta materio kaj nedisigeblaj disde ĝi. Pro tio Engelso emfazas ke la konceptoj de ia spaco kaj ia tempo sen materio estas „*malplenaj imagoj, abstraktaĵoj*”.²⁸ Lenino same kiel Engelso atentigis pri la relativeco, la ŝanĝiĝo de niaj respektivaj konceptoj pri spaco kaj tempo en fizika senco. Sed tio ne refutas la objektivan realecon de spaco kaj tempo, same kiel la relativeco de niaj konoj pri la strukturo kaj pri la diversaj moviĝformoj de la materio ne refutas la objektivan realecon de la ekstera mondo.²⁹

La fakto, ke Markso, Engelso kaj Lenino konsekvence dislimigis sian materiisman filozofion disde la idealismo de ĉiaj tendencoj kaj nuancoj, kompreneble ne signifas ke ili per tio volis nei la atingon de grandaj idealismaj filozofoj aŭ konsideris ilin malgravaj. Ĝi signifas nur ke ili toleris neni-an dismiksiĝon de la fundamentaj filozofiaj-ekkonteoriaj starpunktoj. Kiel al ĉiuj fenomenoj, tiel ili aliris ankaŭ al la idealisma filozofio konkrete-historie, per esplorado de ĝiaj sociaj kaj ekkonteoriaj radikoj, per analizado de ĝia enhavo kaj de ĝia metodo. Tiel ili ja ĉiam emfazis la reakcian bazon

26 Engels: Anti-Dühring, l.c., p. 55.

27 Saml., p. 48.

28 Engels: Dialektik der Natur, l.c., p. 503.

29 Lenin: Materialismus und Empiriokritizismus, LW, vol. 14, p. 171 s.

2.2 La filozofia materiismo

de la idealismo, sed samtempe Markso kaj Engelso ĉiam denove atentigis ke la scienca socialismo ekzemple sen la dialektika evoluteorio kaj pensmetodo kreitaj de la idealisma filozofio, speciale de Hegelo, tute ne fariĝintus ebla.

Engelso kaj Lenino montras ripete la ekkonteoriajn radikojn de la idealismo. Ĉio kio movas homon devas trairi lian kapon, eĉ korpaj bezonoj konsciiĝas al li sekve al nervaj okazaĵoj. La homa agado estas stirata, direktata al celo, pense anticipata fare de la konscio. El *unuflanka* interpreto de tiuj fenomenoj povis estiĝi la imago de io ideala kiel la origino, la senpera. Tiusence ni legas ĉe Lenino:

„La filozofia idealismo estas, el la vidpunkto de la kruda, simpla, metafizika materiismo nur sensencaĵo. Sed la filozofia idealismo estas el la vidpunkto de la dialektika materiismo unuflanka, troigita, ekzaltita (Dietzgen) evoluo, (pufigo, ŝveligo) de unu el la flankoj, de la limoj de la ekkono al disde la naturo disigita, diigita absoluto.”³⁰

30 Lenin: Zur Frage der Dialektik, LW, vol. 38, p. 344.

2.3 La dialektiko

En la marksisma filozofio, materiismo kaj dialektiko faras nedisigeblan unuon. Nur por pli simpla prezentado ni pritraktas tiujn du bazajn elementojn de la marksisma filozofio ĉi tie en apartaj sekcioj. La dialektiko kiel pensmetodo estis en la klasika germana filozofio disvolvita precipe de Georgo Vilhelmo Frederiko Hegelo. Hegelo amplekse elkonstruis la dialektikon, sur idealisma bazo, kiel la instruon pri la *„sin mem scianta nocio kiu havas kiel temon sin mem kiel la absoluton, same la subjektivon kiel la objektivon.“* Sed ene de tiu mistika, spekula konstruaĵo Hegelo konceptis la historion kaj la socion, ĉiujn sferojn de la homa vivo kaj de homa agado kiel unuecan, universalan dialektikan evoluprocezon. Tiu senescepte *historia* rigardmaniero kaj tio, kion la juna Markso malhavis en la ĝistiamamateriismo, nome la evoluo de la aktiva, aganta, subjektiva flanko en la rilato de la homo al la mondo, estis la plej gravaj punktoj de kontakto de la dialektika materiismo kun la dialektika idealismo.

Markso kaj Engelso vidis la grandan historian meriton de Hegelo en tio, ke ĉe li la tuta natura, historia kaj spirita mondo estas komprenata kiel *procezo*, do kiel en konstanta moviĝo, ŝanĝiĝo, transformiĝo kaj disvolviĝo, kaj ke li provis pruvi la internan kunteniĝon en tiu moviĝo kaj disvolviĝo. El tiu vidpunkto la historio de la homaro jam ne ŝajnis esti

*„ĥaosa pelmelo de sensencaj perfortaĵoj, kiuj antaŭ la juĝo de la nun maturiĝinta filozofia racio estas ĉiuj same kondamnindaj kaj kiujn oni kiom eble plej rapide forgesu, sed la evoluprocezo de la homaro mem, kies iom-post-ioman traŝtupan iradon tra ĉiaj erarvojoj laŭspuri, kaj pruvi ĝian internan laŭleĝecon tra ĉiaj ŝajnaj hazardoj, fariĝis nun la tasko de la pensado.“*³¹

Markso kaj Engelso lasis neniam ian dubon pri tio ke la hegela dialektiko pro sia idealisma bazo estas en la prezentita formo neuzebla por ili. En la postparolo al la dua eldono

31 Engels: Anti-Dühring, MEW, vol. 20, p. 22-23.

2.3 La dialektiko

de la 'Kapitalo', kie Markso esprimiĝas pli detale pri sia scienca metodo, li skribas:

„Mia dialektika metodo estas fundamente ne nur malsama ol la hegela, sed ĝia rekta malo. Por Hegelo la pensado, kiun li sub la nomo de ideo eĉ transformas al memstara subjekto, estas la mondkreanto³² de la realaĵo kiu siavice estas nur ĝia ekstera aperformo. Ĉe mi, inverse, la ideeco estas nenio alia ol la materieco transformita kaj tradukita en la homkapo. ... La mistifikado, kiun la dialektiko suferas en la manoj de Hegelo, tute ne malebligas ke li la unua prezentis ĝiajn ĝeneralajn moviĝformojn en kompleta kaj konscia maniero. Ĝi staras ĉe li sur la kapo. Oni devas renversi ĝin por malkovri la racian kernon en la mistika ŝelo.”³³

Dum la hegela filozofio elektas kiel elirpunkton la dialektikon de la nocioj kaj en tiu inversigita speguliĝo ofte genie divenas la dialektikon de la aferoj, la marksismo deiras el la faktoj, el la *objektiva realo* en ĝia estiĝo kaj malestiĝo. La dialektikan evoluprocezon de la aferoj Markso kaj Engelso renkontis en ĉiuj siaj studoj, en la naturo kiel en la socio, en la historio kiel en la ekonomio kaj politiko. Speciale la studado de la historio ekde la Franca Revolucio de la fino de la 18-a jarcento kaj de la ekonomiaj kondiĉoj en la kapitalismo – kun siaj kompare kun la pasinteco multe pli klare kaj akre aperantaj klasaj antagonismoj – pruvis al ili, ke la dialektikaj evoluleĝoj ne inventeblas el la kapo, sed troveblas en la realo mem kaj dedukteblas el ĝi. Pri tiu principe alia elirpunkto de la dialektika materiismo Engelso skribas koncerne la marksan 'Kapitalon' kaj la hegelan 'Logikon':

„Jen komparu la evoluon ĉe Markso de la varo al la kapitalo kun tiu ĉe Hegelo de la esto al la esenco, kaj vi havas tute bonan paralelon, ĉi tie la konkretan evoluon, tian kia ĝi rezultas el

32 Originale: der Demiurg [la demiurgo, t.e. mondkreanto]. -vl

33 Karlo Markso: La kapitalo ..., ĉapitroj unua ĝis naŭa, v.c., p. 27.

2. La dialektika materiismo

la faktoj, tie la abstraktan konstruaĵon ...”³⁴

Markso, Engelso kaj Lenino kontraŭmetas sian dialektikan koncepton de la naturo, de la socio kaj de la pensado al la *metafizika* pensmaniero. Ili uzas tiun lastan noción ne en la plej ofte kutima, sed en la hegela senco, kiel sinonimon por koncepto kiu laboras per nehistoriaj, rigidaj kaj senŝanĝaj kategorioj. Sed tiu estis en la natursciencoj ĝis en la frua 19-a jarcento, pro sia koncentriĝo al la kolektanta, klasiganta, priskriba esplorado en la unuopaj sciencaj fakoj, la antaŭrega pensmaniero. Historie tio estis eĉ neevitebla transa stadio de la scienca esplorado de la naturfenomenoj. Sed tiu pens- kaj esplor-metodo, kiu speciale en la 17-a kaj 18-a jarcentoj influis ankaŭ la filozofion (Bacon, Locke, la francajn materiistojn), vidis la naturon kiel ion eterne senŝanĝan, ĝi perdis tra la esplorado de la unuopaj objektoj la tutan kuntekston el la vido.

„Por la metafizikisto”, skribas Engelso, „la aĵoj kaj iliaj pensaj reflektaj, la nocioj, estas unuopaj esplorobjektoj rigardendaj unu post la alia kaj sen rigardi la alian, fiksaj, rigidaj, donitaj unufoje por ĉiam. Li pensas en nuraj neperataj kontraŭdiroj: lia parolo estas jes, jes, ne, ne, ĉio kroma estas malbona. Por li, aĵo aŭ ekzistas aŭ ĝi ne ekzistas: aĵo ankaŭ ne povas esti samtempe ĝi mem kaj io alia. Pozitiva kaj negativa absolute ekskludas sin reciproke; kaŭzo kaj efiko staras same en reciproka rigida kontraŭeco. Tiu pensmaniero ŝajnas al ni unuavide plej logika ĉar ĝi estas tiu de la tiel nomata homa saĝo. Sed la homa saĝo, eĉ se ĝi estas respektinda ulo en la naiva tereno de siaj kvar vandoj, spertas tute mirigajn aventurojn, ekde kiam ĝi kuraĝas eliri en la vastan mondon de la esplorado; kaj la metafizika rigardmaniero, eĉ se ĝi estas prava kaj eĉ necesa sur vastaj, laŭ la naturo de la objekto etenditaj kampoj, tamen ĉiufoje pli aŭ malpli frue renkontas baron, trans kiu ĝi fariĝas unuflanka, limigita, abstrakta kaj perdiĝas en nesolveblaj kontraŭdiroj, ĉar ĝi tra la unuopaĵoj forgesas ties kunteniĝon, tra ilia esto ilian estiĝon kaj malestiĝon, tra ilia trankvilo ilian moviĝon, ĉar pro

34 Engels an C. Schmidt [Engelso al C. Schmidt], 1891-11-01, MEW, vol. 38, p. 204.

2.3 La dialektiko

la multaj arboj ĝi ne vidas la arbaron.”³⁵

Sed tiu pensmaniero estis tempe de Markso kaj Engelso pridubigita ne nur de la dialektika idealisma filozofio, sed ankaŭ de gravaj malkovroj en la natursciencoj mem. Ĉie eniris la *evolukoncepto*, en la teorio de la estiĝo de la universo same kiel en la geologio, la fiziko, la ĥemio kaj biologio. Teoria spirito, direktita al esplorado de ĉiomaj kunteniĝoj kaj evoluprocezoj, estis trudiĝinta ankaŭ al la unuopaj natursciencoj kaj estis liverinta abundan materialon por tio ke en la naturo la aferoj okazas dialektike. Pri tiu nova naturkoncepto Engelso skribis:

„Ĉio rigida estis dissolvita, ĉio fiksita vaporiĝinta, ĉio aparta konsiderita eterna fariĝis nedaŭra, la tuta naturo estis pruvita kiel moviĝanta en eterna fluo kaj cirkulado.”³⁶

Al la prezentado de la dialektika evoluo en la naturo kaj por la aplikado de la dialektika-materiisma metodo al la naturscienco unuavice Engelso faris gravan kontribuon. Oni provis kontraŭmeti tiun koncepton de Engelso kaj de Lenino al tiu de Markso. Laŭdire Markso konsideris la dialektikon ebla nur tie, kie ekzistas rilato inter subjekto kaj objekto, nome en la socio.

Sed tiu aserto havas eĉ ne la plej etan bazon en la faktoj, nek en la biografiaj nek en tiuj kiuj tuŝas la *problemon* mem. Unue ne kontestebblas ke Markso kaj Engelso interŝanĝis inter si ĉiujn pli grandajn laboraĵojn, kaj ke Markso konis ne nur ĉiun linion en la 'Kontraŭ-Duringo', sed eĉ kontribuis sekcion al tiu libro (la historian parton en la ĉapitro 'Politika ekonomio'). El multnombraj leteroj Markso krome konis la planojn de Engelso verki naturdialektikon, kaj ne ekzistas eĉ unu averta aŭ eĉ nur al prudento admonanta vorto de lia flanko. Tute male, Markso montras la leteron de Engelso, kiu entenas nur kelkajn unuajn pensojn

35 Engels: Anti-Dühring, MEW, vol. 20, p. 20-21.

36 Engels: Dialektik der Natur, l.c., p. 320.

2. La dialektika materiismo

por lia plano, al la konata ĥemiisto Carl Schorlemmer el Manĉestro, ilia komuna amiko, kiu provizas ĝin per konsentaj marĝennotoj.

Sed ni posedas ankaŭ la rektan ateston el la plumo de Markso, kiu refutas ĉiujn kiuj, konsidere la dialektikon en la naturo konstruis kaj ankoraŭ konstruas kontraŭdiron inter Markso unuflanke kaj Engelso kaj Lenino aliflanke. Jarojn antaŭ la 'Kontraŭ-Duringo' kaj antaŭ la ideo de Engelso labori pri naturdialektiko, ni trovas en la unua volumo de la 'Kapitalo' la eksplicitan indikon de Markso pri la *valideco de dialektikaj evoluleĝoj* en la naturo. Post la konstato, ke la mon- aŭ var-posedanto transformiĝas en kapitaliston nur tie, kie la minimuma sumo, antaŭpagata por la produktado, atingis jam certan gradon, Markso skribas:

„ Ĉi tie, kiel en la naturscienco, montriĝas la ĝusteco de la leĝo malkovrita de Hegelo en lia „Logiko”, ke nur kvantaj ŝanĝiĝoj je certa punkto transformiĝas en kvalitajn diferencojn.”³⁷

En piednoto Markso referencas samloke la molekulteorion en la ĥemio kaj en letero al Engelso de junio 1867 li aparte atentigas lin pri tiu tekstero en la 'Kapitalo'. Samsenca estas rimarko de Markso post legado de la darvina „Origino de la specioj”. En letero al Lasalo li skribas ke la verko de Darvino taŭgas por li „*kiel naturscienca fundamento de la historia klasbatalo*”.³⁸

Sed ankaŭ sen tiuj rektaj pruvoj la afero estus facile komprenebla por ĉiu, kiu eĉ nur iomete enprofundiĝis en la bazan koncepton de Markso. Ĉar la marksismo ne konas netransireblan abismon inter naturo kaj socio, ĉar por ĝi la homo estas socia estaĵo, sed ĝuste elirinta el la socia evoluo de la naturo, la *plej ĝeneralaj* moviĝ- kaj evolu-leĝoj, la

37 Karlo Markso: La kapitalo, ... ĉapitroj unua ĝis naŭa, l.c., p. 360.

38 Marx an Lasalle [Markso al Lasalo], 1861-01-16, MEW, vol. 30, p. 578.

2.3 La dialektiko

bazaj leĝoj de la dialektiko, devas validi en la socio kiel en la naturo. Tio rezultas el la tuta unuisma-materiisma filozofio de la marksismo.

Markso, Engelso kaj Lenino ĉiam emfazis la kritikan kaj revolucionan karakteron de sia dialektika rigardmaniero kaj metodo kaj konsideris ilin kiel tiaj bazo de siaj ekonomiaj, historiaj, politikaj kaj aliaj laboraĵoj. Kiam en 1913 aperis unuafoje la korespondaĵoj inter Markso kaj Lenino, Lenino opiniis, ke se nomi la centran punkton de la tuta korespondado, en kiu ĉiuj fadenoj de la reto de esprimitaj kaj diskutitaj ideoj kuniĝas, tio estas la *dialektiko*:

„La aplikado de la materiisma dialektiko ĉe la radikala reverkado de la tuta politika ekonomio, ĝia aplikado al la historio, al la naturscienco, la filozofio, la politiko kaj al la taktiko de la laborista klaso – tio estas kion Markso kaj Engelso interesas unuavice, al tio ili kontribuis la plej esencan kaj la plej novan, jen la genia paŝo, kiun ili faris antaŭen en la historio de la revolucia pensado.”³⁹

Markso kaj Engelso tiris la kritikajn-revoluciajn konkludojn el la hegela dialektiko, precipe per tio ke ili aplikis la dialektikon al la esplorado de la kapitalisma socio. Laŭ la dialektika koncepto ekzistas nenio definitiva, absoluta, sankta, diris Engelso, ĝi montras de ĉio kaj ĉe ĉio la pereemon, laŭ ĝi ekzistas nenio ol la senĉesa procezo de estiĝo kaj malestiĝo, de senfina supreniro de la malalta al la pli alta, ne povas ekzisti definitiveco de la kono nek ideala perfekteco en la homaj kondiĉoj.⁴⁰

Tute simile Markso esprimiĝis en la postparolo al la dua eldono de la 'Kapitalo', kie li konstatas:

„En sia mistifika formo la dialektiko fariĝis germana modo, ĉar

39 Lenin: *Der Briefwechsel zwischen Marx und Engels* [Lenino: La korespondado inter Markso kaj Engelso], LW, vol. 19, p. 550.

40 Engels: Ludwig Feuerbach, MEW, vol. 23, p. 267.

2. La dialektika materiismo

ĝi ŝajnis glorkroni la ekzistantajon. En sia racia formo ĝi agacas kaj abomenigas la burĝaron kaj ties doktrinajn porparolantojn, ĉar ĝi entenas en la pozitiva kompreno de la ekzistanta samtempe ankaŭ la komprenon de ties negado, de ties nepra pereco, komprenas ĉian estiĝintan formon en la fluo de la movado, do ankaŭ laŭ ĝia mortonta flanko, neniel impreseblas, kaj ĉar ĝi estas esence kritika kaj revolucia.”⁴¹

La dialektiko estas en la marksisma filozofio unue evolutorio de la objektiva mondo, do *objektiva* dialektiko, scienco pri la ĝeneralaj moviĝleĝoj en naturo kaj socio. Kiel reflektado de la dialektiko de la ekstera mondo en la homa pensado ĝi estas *subjektiva* dialektiko kaj kiel teorio de la subjektiva dialektiko, do de la homa ekkonstruado, ĝi estas samtempe *ekkonstruado*. Kiel konscia scienca aplikado de la principoj de la dialektiko ĝi estas fine metodo de la teoria-empiria esplorado de la mondo, tio, kion Markso kaj Engelson nomis sia „*plej bona laborilo kaj plej akra armilo*”.⁴²

La materiisma dialektiko kiel ĉiuflanka *evolutorio* havas kun kutimaj evoluismaj teorioj, kiuj hodiaŭ estas ĝenerale akceptataj, nur la nomon komuna. Lenino reduktis la diversajn konceptojn pri evoluo al du bazaj konceptoj kaj donis la sekvan karakterizon de ili:

„La du bazaj (aŭ ĉu la du eblaj? aŭ la du en la historio observ-eblaj?) konceptoj de la evoluo (evolucio) estas: evoluo kiel kresko kaj malkresko, kiel ripetiĝo, kaj evoluo kiel unueco de la kontraŭecoj (fendiĝo de la unueca en sin reciproke ekskludantaj kontraŭecoj kaj ilia interrilato).

Ĉe la unua koncepto de la moviĝo la *memmoviĝo*, ĝia *mova* forto, ĝia fonto, ĝia motivo restas en la mallumo (aŭ tiu fonto estas delokita *eksteren* – dio, subjekto ktp). Ĉe la dua koncepto la precipa atento direktiĝas ĝuste al la ekkono de la fonto de la '*mem*'-moviĝo.

La unua koncepto estas morta, senkolora, seka. La dua vivanta.

41 Karlo Markso: La kapitalo, ..., l.c., p. 28.

42 Engels: Ludwig Feuerbach, MEW, vol. 21, p. 293.

2.3 La dialektiko

Nur la dua liveras la ŝlosilon al la 'memmoviĝo' de ĉio estanta; nur ĝi liveras la ŝlosilon al la 'saltoj', al la 'ĉesigoj de la 'iom-post-iomeco', al la 'ŝanĝiĝo en la malon', al la malestiĝo de la malnovo kaj estiĝo de la novo."⁴³

En enciklopedia eseo pri Karlo Markso, Lenino emfazis ke Markso kaj Engelso, elirantaj de Hegelo, donis al la dialektika evoluteorio pli ampleksan kaj pli riĉan enhavon ol tiujn kiujn la kutima evoluteorio posedas:

„Evoluo, kiu kvazaŭ refoje trairas la jam trairintajn ŝtupojn, sed alie, sur pli alta ŝtupo ('negacio de la negacio'), evoluo salteca, revolucia evoluo ligita kun katastrofoj; ĉeso de la iom-post-iomeco, ŝanĝiĝo de la kvanto en kvaliton; internaj evolufortoj, lanĉitaj de la kontraŭdiro, de la kunpuŝiĝo de la diversaj fortoj kaj tendencoj kiuj efikas sur donita fenomeno aŭ ene de donita socio; la reciproka dependeco kaj plej densa, nedisigebla kunteniĝo de ĉiuj flankoj de ĉiu fenomeno (ĉe kio la historio inkludas ĉiam novajn flankojn), kunteniĝo, kiu rezultigas unuecan, laŭleĝan mondprocezon de la moviĝo – tio estas kelkaj trajtoj de la dialektiko kiel la (kompare kun la kutima) pli enhavriĉa evoluteorio."⁴⁴

La leĝoj de la dialektiko estas rezultoj de jarmilojn longa evoluo de la homa pensado, ili estas deduktitaj el la historio de la naturo kaj de la homa socio. Engelso nomas en siaj postlasitaj manuskriptoj pri la 'Dialektiko de la naturo' tri bazajn leĝojn de la dialektiko: la leĝon de ŝanĝiĝo de kvantaj ŝanĝoj en kvalitojn kaj inverse; la leĝon de la trapenetriĝo de la kontraŭecoj, de la en ĉiuj fenomenoj kaj procezoj imanentaj kontraŭdiroj kiel movforto de la moviĝo kaj evoluo; la leĝon de la negacio de la negacio, laŭ kiu ni ofte observas en la naturo kiel en la socio ke la evoluo de la pli malalta al la pli alta progresas cikle, ĉe kio la pli alta stadio de la ciklo revenas al esencaj trajtoj de la elira stadio, sed sur pli vasta skalo.

43 Lenin: Zur Frage der Dialektik, LW, vol. 38, p. 339.

44 Lenin: Karl Marx – Kurzer biographischer Abriß [Karlo Markso – Mallonga biografia skizo], LW, vol. 21, p. 42-43.

2. La dialektika materiismo

Lenino donas detalan prezenton de la bazaj elementoj de la dialektika-materiisma konceptmaniero kaj metodo en sia konspekto pri Hegelo: 'Scienco de la logiko'. Tie li mencias la sekvajn aspektojn:

„1. la *objektiveco* de la rigardo (ne ekzemploj, ne deflankiĝoj, sed la aĵo en si mem);

2. la tuta totaleco de la diversspecaj *rilatoj* de tiu aĵo al la aliaj;

3. la *evoluo* de tiu aĵo (resp. de la fenomeno), ĝia propra moviĝo, ĝia propra vivo;

4. la interne kontraŭdiraj *tendencoj* (kaj flankoj) en tiu aĵo;

5. la aĵo (la fenomeno ktp) *kiel sumo kaj unueco de la kontraŭecoj*;

6. *batalo* resp. disvolviĝo de tiuj kontraŭecoj, de la kontraŭdiraj streboj ktp;

7. unuiĝo de analizo kaj sintezo – la dismeto en unuopajn erojn kaj la tuteco, la sumiĝo de tiuj eroj;

8. la rilatoj de ĉiu aĵo (de ĉiu fenomeno ktp) estas ne nur multspecaj, sed ĝeneralaj, universalaj. Ĉiu aĵo (fenomeno, procezo ktp) estas ligita kun *ĉiu*;

9. ne nur unueco de la kontraŭecoj, sed transiroj de ĉiu difino, kvalito, propreco, flanko, eco en *ĉiun* alian (ĉu en sian kontraŭecon?)

10. senfina procezo de malfermiĝo de *novaj* flankoj , rilatoj ktp;

11. senfina procezo de profundiĝo de la kono de la aĵo, de la fenomenoj, procezoj ktp fare de la homo, de la aperaĵoj al la esenco kaj de la malpli profunda al la pli profunda esenco;

12. de la apudeco al la kaŭzeco kaj de unu formo de kunteniĝo kaj de reciproka dependeco al alia, pli profunda, pli ĝenerala;

13. la ripetiĝo de certaj trajtoj, ecoj ktp de malalta stadio en pli alta kaj

14. la ŝajna reveno al la malnovo (negacio de la negacio);

2.3 La dialektiko

15. batalo de la enhavo kun la formo kaj inverse. Deĵeto de la formo, aliformiĝo de la enhavo;

16. transiro de la kvanto en kvaliton kaj inverse (15 kaj 16 estas *ekzemploj* de 9).⁴⁵

Kiel jam komence en tiu ĉi sekcio dirite, ni posedas de Markso, Engelso kaj Lenino nenian ampleksan prezentadon de la materiisma dialektiko. Ili aplikis sian filozofian teorion kaj metodon precipe al la kampoj de ekonomio, de historio kaj politiko. Ĉiuj verkoj kaj skriboj de Markso, Engelso kaj Lenino estas do ekzemploj de la *aplikado* de la dialektiko. En aforismo Lenino opiniis ke, se Markso ne postlasis „Logikon”, li tamen postlasis la logikon de la „Kapitalo”; tie li aplikas al unu fako logikon, dialektikon kaj ekkonteorion de la materiismo.⁴⁶

Tamen ni trovas precipe en la verkoj de Engelso kaj Lenino ankaŭ multnombrajn *rektajn* eldirojn pri la bazaj leĝoj de la materiisma dialektiko kaj ekzemplojn por ilia valideco en naturo kaj socio. Ili troviĝas ĉefe en la 'Kontraŭ-Duringo' kaj en la 'Dialektiko de la naturo' de Engelso kaj en la 'Filozofiaj kajeroj' de Lenino. En la 'Kontraŭ-Duringo' Engelso pritraktas i.a. la leĝon de la ŝanĝiĝo de kvantaj ŝanĝiĝoj en kvalitajn kaj la negacion de la negacio per diversaj ekzemploj el naturo kaj historio. En la 'Dialektiko de la naturo' Engelso ilustras la dialektikajn leĝojn per riĉa materialo de la siatempaj natursciencoj.

Por la valideco de la leĝo de ŝanĝiĝo de kvantaj en kvalitajn ŝanĝiĝojn en la naturo Engelso donas la sekvan notindan ĝeneraligon:

„Tion ni povas por nia celo esprimi tiel ke en la naturo, en maniero precize difinita por ĉiu unuopa kazo, kvalitaj ŝanĝiĝoj povas okazi nur per kvanta aldono aŭ per kvanta malpliigo de materio aŭ de moviĝo (t.n. energio). Ĉiuj kvalitaj diferencoj en

45 Lenin: *Philosophische Hefte*, LW, vol. 38, p. 212-214.

46 Saml., p. 316.

2. La dialektika materiismo

la naturo baziĝas aŭ sur diversa ĥemia konsisto aŭ sur diversaj kvantoj resp. formoj de moviĝo (energio) aŭ, kio okazas preskaŭ ĉiam, sur ambaŭ. Do maleblas, sen aldono resp. depreno de materio aŭ de moviĝo, t.e. sen kvanta ŝanĝo de la koncerna korpo ŝanĝi ĝian kvaliton. En tiu formo la mistera hegela frazo aperas do ne nur tute racia, sed eĉ sufiĉe logika.”⁴⁷

Bonaj klarigoj de la bazaj leĝoj de la materiisma dialektiko troviĝas en la komentoj kaj notoj de Lenino pri „*Wissenschaft der Logik* [Scienco de la logiko]”. En la fragmento „Pri la demando de la dialektiko” Lenino diras pri la kerno de la dialektiko:

„Fendo de la unueca kaj ekkono de ĝiaj kontraŭdiraj partoj ... estas esenco (unu el la esencaj trajtoj, unu el la bazaj, se ne la baza, aparteco aŭ flanko) de la dialektiko ... Identeco de la kontraŭecoj (ĉu eble pli ĝuste: ilia 'unueco'?) Kvankam la diferenco de la terminoj identeco kaj unueco ĉi tie ne estas aparte grava. Certasence ambaŭ estas ĝustaj) signifas agnosko (malkovro) de kontraŭdiraj, *sin reciproke ekskludantaj*, kontraŭaj tendencoj en ĉiuj fenomenoj kaj okazaĵoj de la naturo (*inter ili* ankaŭ de la spirito kaj de la socio). Kondiĉo de ekkono de ĉiuj okazaĵoj en la mondo en ilia „memmoviĝo”, en ilia sponta evoluo, en ilia vivanta vivo estas ilia ekkono kiel unueco de kontraŭecoj. Evoluo estas „batalo” de la kontraŭecoj ... La unueco (kongruenco, identeco, efiksameco de la kontraŭecoj estas kondiĉita, portempa, pereema, relativa. La batalo de sin reciproke ekskludantaj kontraŭecoj estas absoluta, kiel la evoluo, la moviĝo estas absoluta.”⁴⁸

En la laboraĵoj de Markso, Engelso kaj Lenino troviĝas ankaŭ multaj klarigoj por la dialektiko de tiaj filozofiaj bazaj kategorioj kiaj neceso kaj hazardo; ebleco kaj realeco; enhavo kaj formo; unuopa, aparta kaj ĝenerala; konkreta kaj abstrakta; aperformo kaj esenco – kaj klarigoj pri sciencaj nocioj en dialektika senco kiel leĝo, kaŭzeco,

47 Engels: *Dialektik der Natur*, MEW, vol. 20, p. 349.

48 Lenin: *Fragment 'Zur Frage der Dialektik'*, LW, vol. 38, p. 338-339.

2.3 La dialektiko

reciproka efiko, determinismo ktp. La aplikado de la materiisma dialektiko studeblas nur en la tuta verkaro de Markso, Engelso kaj Lenino.

Precipe en la ĉefverko de Markso 'La kapitalo', en la esplorado de la ekonomio de la kapitalisma sociformacio li ellaboris la dialektikajn procezojn kaj evoluojn de tiu socio kaj de la unuopaj ekonomiaj kategorioj: ekzemple la kategorion de la leĝo kaj de ĝia aparta efikmaniero en la kapitalisma socio; la ŝanĝiĝon de kvantaj ŝanĝiĝoj en kvalitajn; la evoluon de la kapitalismo kiel procezon de kontraŭdiraj flankoj kaj tendencoj, kiuj fine premas al ĝia historia superado; la dialektikon de esenco kaj aperformo, de abstrakta kaj konkreta, de historia kaj logika, de analizo kaj sintezo kaj mulnombrajn aliajn kategoriojn kaj nociojn.

En postlasita manuskripto Markso prezentis sian dialektikan metodon de esplorado kaj prezentado surkampe de la politika ekonomio, kun la titolo '*Einleitung zur Kritik der politischen Ökonomie*' [Enkonduko al la Kritiko de la politika ekonomio]. Ni legas tie interalie:

„Se ni rigardas donitan landon politike-ekonomie, ni komencas per ĝia loĝantaro, ĝia dispartiĝo en klasoj, urbo kaj kamparo, lago, la diversaj produktadbranĉoj, en- kaj eks-porto, jara produktado kaj konsumado, varprezoj ktp. Ŝajnas esti la ĝusta maniero komenci per la realo kaj la konkreto, la reala kondiĉo, do ekz-e en la ekonomio per la loĝantaro, kiu estas la bazo kaj la subjekto de la tuta socia produktad-ago.

Tamen tio montriĝas ĉe pli detala rigardo malĝusta. La loĝantaro estas abstraktaĵo, se mi ekz-e preterlasas la klasojn, el kiuj ĝi konsistas. Tiuj klasoj estas siavice malplena vorto, se mi ne konas la elementojn sur kiuj ili baziĝas, ekz-e dunglaboron, kapitalon ktp. Tiuj subkomprenigas interŝanĝon, labordividon, prezojn ktp. Kapitalo ekz-e sen dunglaboro estas nenio, sen valoro, mono, prezo ktp. Se mi komencus do per la loĝantaro, tio estus ĥaosa prezentado de la tutaĵo, kaj per pli detala determinado mi venus analize ĉiam pli al pli simplaj nocioj; de la prezentita konkreto al ĉiam pli maldikaj abstraktoj, ĝis kiam mi

2. La dialektika materiismo

atingus la plej simplajn determinadojn. De tie mi devus nun revojaĝi, ĝis kiam mi fine reatingus la loĝantaron, sed ĉi-foje ne kiel haosan prezentadon de la tutaĵo, sed kiel riĉan totalecon de multaj determinaĵoj kaj rilatoj. La unua vojo estas tiu, kiun la estiĝanta ekonomiko iris historie. La ekonomikistoj de la 17-a jarcento ekz-e komencas ĉiam per la vivanta tutaĵo, la loĝantaro, la nacio, la ŝtato, pluraj ŝtatoj ktp; sed ili finas ĉiam per tio ke ili per analizo eltrovas kelkajn determinantajn abstraktajn, ĝeneralajn rilatojn kiel labordividon, monon, valoron ktp. Ekde kiam tiuj unuopaj elementoj estis pli aŭ malpli fiksitaj kaj abstraktitaj, komenciĝis la ekonomiaj sistemoj, kiuj supreniras de la simpla, kiel laboro, labordivido, bezono, interŝanĝvaloro, ĝis la ŝtato, interŝanĝo de la nacioj kaj mondkomercato. Tio lasta estas evidente la science ĝusta metodo. La konkreto estas konkreta, ĉar ĝi estas la kunigo de multaj determinaĵoj, do la unueco de la diverso. En la pensado ĝi aperas do kiel procezo de kunigo, kiel rezulto, ne kiel elirpunkto, kvankam ĝi estas reala elirpunkto de la rigardo kaj de la prezentado. En la unua vojo la plena prezentado vaporiĝis al abstrakta determinado; en la dua, la abstraktaj determinaĵoj kondukas al reproduktado de la konkreto en la vojo de la pensado. Pro tio, Hegelo venis al la iluzio koncepti la realon kiel la rezulton de la en si sin resumanta, en si profundiga kaj el si mem moviga pensado, dum la metodo supreniri de la abstrakto al la konkreto estas nur la maniero por la pensado alproprigi al si la konkretan, reprodukti ĝin kiel spiritan konkretan. Sed tute ne la estiĝprocezo de la konkreto mem.”⁴⁹

En recenzo de la marksa 'Kritik der politischen Ökonomie [Kritiko de la politika ekonomio]' Engelso prezentis tute simile la marksan dialektikan metodon, pri kiu li diris, ke ĝia ellaborado estas „*rezulto, kies graveco apenaŭ postrestas la materiisman bazan koncepton*”⁵⁰ kaj respondis la demandon, kial Markso en tiom eminente historia scienco kiel la politika ekonomio ne aplikis la historian, sed la logikan

49 Marx: *Einleitung zur Kritik der politischen Ökonomie*, MEW, vol. 13, p. 631-632.

50 Engels: *Rezension von Karl Marx 'Zur Kritik der politischen Ökonomie'*, l.c., p. 474.

2.3 La dialektiko

esplormetodon. Tiu ĉi logika maniero pritrakti la politikan ekonomion ĉe Markso, diras Engelso, estas nenio alia ol la historio, nur „*demetinta la historian formon kaj la ĝenajn hazardojn*”. Tio, per kio la historio komencas, devas ankaŭ esti la komenco de la pensado, kaj ties pluiĝo estos nenia alia „*ol la spegulbildo, en abstrakta kaj teorie konsekvenca formo, de la historia evoluo; spegulbildo korektita, sed korektita laŭ leĝoj, kiujn la reala historia evoluo disponigas mem, en kiu ĉiu elemento rigardeblas sur la evolupunkto de sia plej plena matureco, de sia klasikeco.*”⁵¹

En tiu metodo, diras Engelso, oni eliras de la „*unua kaj plej simpla rilato*”, kiu estas al ni donita de la historio, de la faktoj, do en la ekonomio, el la unua ekonomia rilato. Oni analizas tiun rilaton; en tio, ke ĝi esta *rilato*, estas jam inkludite ke ĝi havas du flankojn, kiuj rilatas inter si. Oni rigardas ĉiun el tiuj flankoj aparte, per kio montriĝas la maniero de la reciproka rilato, ilia reciproka efiko. Montriĝas kontraŭdiroj, kiuj postulas solvojn.

„Sed ĉar ni rigardas ĉi tie ne abstraktan pens-procezon, kiu okazas nur en niaj kapoj, sed realan okazaĵon, kiu en iu tempo reale okazis aŭ daŭre okazas, tial tiuj kontraŭdiroj certe evoluis en la praktiko kaj verŝajne trovis sian solvon. Ni laŭspuras la manieron de tiu solvo kaj trovas, ke ĝi estis kaŭzita de starigo de nova rilato, kies du kontraŭajn flankojn ni devas nun disvolvi ktp.”⁵²

Lenino postulas por la dialektika esplorado de objekto antaŭ ĉio la aplikadon de kvar metodaj principoj. Unue la ĉiuflankecon de la esplorado: „*Por vere koni objekton, oni devas kapti kaj esplori ĉiujn ĝiajn flankojn, ĉiujn kunteniĝojn kaj 'peraĵojn'*”⁵³. „*Ni atingos tion neniam komplete, sed la postulo de ĉiuflankeco ŝirmos nin kontraŭ eraroj kaj rigidiĝo.*” Due Lenino postulas „*ke oni rigardu la objekton*

51 saml., p. 475.

52 saml.

53 En la germana: 'Vermittlungen'. -vl

2. La dialektika materiismo

en ĝia evoluo, en ĝia 'memmoviĝo', en ĝia ŝanĝiĝo." Trie devas eniri en la ĝisfundan komprenon de objekto *„la tuta homa praktiko, kiel kriterio de la vero same kiel praktika determinanto de la kunteniĝo de la objekto kun tio, kion la homo bezonas.”* Kvare, la dialektika logiko postulas maksimuman konkretecon, ĉar abstrakta vero ne ekzistas kaj la vero estas ĉiam konkreta.⁵⁴

Ni jam atentigis pri tio, ke en la filozofia koncepto de la marksismo – kiel ĉe Hegelo – logiko, dialektiko kaj ekkonteorio kuniĝas kaj faras nedisigeblan unuon. Tio estas nur esprimo por tio ke en la dialektika marksismo la leĝoj de la pensado enhave kongruas kun la leĝoj de la estado. Kiel diras Engelso, tiel *„la noci-dialektiko mem fariĝas nur la konscia reflektado de la dialektika moviĝo de la reala mondo”*.⁵⁵

Pri la specife ekkonteoriaj aspektoj de la materiisma dialektiko ni trovas abundan materialon precipe en la Fojerbah-tezoj de Markso, en la 'Germana Ideologio' verkita de li kune kun Engelso, en la 'Kontraŭ-Duringo' de Engelso kaj ties 'Dialektiko de la naturo' kaj en 'Materiismo kaj empiriokriticismo' de Lenino, kaj en ties 'Filozofiaj kajeroj'. Engelso ligis bazan ekkonteorian aspekton de la materiisma dialektiko kun la baza demando de la filozofio entute, kiam li diris ke la demando pri la rilato inter pensado kaj estado havas ankoraŭ alian flankon:

*„Kiel niaj pensoj pri la nin ĉirkaŭanta mondo rilatas al tiu mondo mem? Ĉu nia pensado kapablas ekkoni la realan mondon, ĉu ni kapablas produkti en niaj imagoj kaj nocioj pri la reala mondo ĝustan spegulbildon de la realo?”*⁵⁶

La dialektika materiismo eliras principe de la ekkoneblo

54 Lenin: Noch einmal über die Gewerkschaften, LW, vol. 32, p. 85.

55 Engels: Ludwig Feuerbach ..., MEW, vol. 21, p. 293.

56 saml., p. 275.

2.3 La dialektiko

de la mondo per la homaj sensoj kaj per la homa pensado, kiu evoluis surbaze de la socia laboro, kaj de la lingva komunikado, kiu estiĝis el ĝi. Jam la juna Markso ligas 1845 en la Fojerbah-tezoj la ekkonteorion kun la tuta *socia praktiko* de la homo kaj konsideras ĉian demandon disigitan de la praktika vivo de la homoj pri la ebleco aŭ malebleco ekkoni la mondon skolastika demando, filozofia kaprico, kiel poste ankaŭ Engelso kaj Lenino. La demando, ĉu al la homa pensado atribueblas objektiva⁵⁷ vero, estas demando ne de la teorio, sed demando *praktika*, diras Markso. La homo devas pruvi en la praktiko la veron, la realon kaj povon, la ĉi-flankecon de sia pensado.⁵⁸

Pro tio la marksismo – kiel Hegelo, sed pro kromaj kialoj – rifuzas la nekoneblan ‘aĵon per si mem’ de la kantia filozofio. Tiel plej trafa refuto, diris Engelso, estas la praktiko, la eksperimento kaj la industrio.

„Se ni povas pruvi la ĝustecon de natura procedo per tio ke ni faras ĝin mem, kreas ĝin el ĝiaj kondiĉoj, krome igas ĝin servi al niaj celoj, tio estas la fino de la ‘aĵo por si mem’. La substancoj produktataj en la planta kaj animala korpo restis tiaj ‘aĵoj por si mem’, ĝis kiam la organika hemio komencis produkti ilin unu post la alian; per tio la ‘aĵo por si mem’ fariĝis aĵo por ni ...”⁵⁹

La socia praktiko de la homo estas la bazo de la homa ekkono. Estas praktikaj bezonoj, el kiuj ĝi finfine elkreskas kaj kiuj konsistigas ĝian plej gravan movforton. La homo estas en praktika alproprigprocezo kun la naturo, speciale en la produktado de la havaĵoj necesaj por la vivo, devigata alproprigi al si la mondon ankaŭ spirite, teorie. Markso detale priskribis tiun procezon en diskuto kun la burĝa ekonomikisto A. Wagner:

57 Originale: gegenständliche Wahrheit: objektiva, konkreta vero.
-vl

58 Karlo Markso: Tezoj pri Fojerbaĥo, l.c., p. 6.

59 Engels: Ludwig Feuerbach, MEW, vol. 21, p. 276.

2. La dialektika materiismo

„... ĉe burĝa profesora instruisto la rilatoj de la homoj al la naturo estas apriore ne *praktikaj*, do rilatoj fonditaj de la ago, sed *teoriaj*. ... Sed la homoj tute ne komencas per tio ‘stari en tiuj teoriaj rilatoj al *aĵoj de la ekstera mondo*’. Ili komencas kiel ĉiu animalo per tio, manĝi, trinki ktp. Do ne ‘stari’ en rilato, sed kondukti aktive, alproprigi al si certajn aĵojn de la ekstera mondo per la ago, kaj tiel kontentigi sian bezonon. (Ili komencas do per la produktado.) Per la ripetado de tiu procezo la eco de tiuj aĵoj ‘kontentigi bezonojn’ fiksiĝas en ilia cerbo, la homoj kiel la bestoj lernas ankaŭ ‘teorie’ distingi la eksterajn aĵojn kiuj servas al kontentigo de iliaj bezonoj *antaŭ* ĉiuj aliaj. Sur certa grado de ilia progreso, post kiam intertempe ankaŭ iliaj bezonoj kaj la agoj, per kiuj ili estas kontentigataj, estas pliiĝintaj kaj plu evoluintaj, ili ankaŭ lingve nomas tiujn aĵojn laŭ ilia tuta klaso kiujn ili sperte distingis disde la cetera ekstera mondo. Tio okazas nepre, ĉar ili en la produktadprocezo – t.e. en la alproprigprocezo de tiuj aĵoj – troviĝas konstante en produktada interrilato inter si kaj kun tiuj aĵoj kaj baldaŭ devas ankaŭ en batalo kun aliaj klopodi pri tiuj aĵoj . Sed tiu lingva nomado esprimas tute nur kiel imago tion, kion ripeta agado faris sperto, nome ke al homoj vivantaj jam en certa socia kunteksto ... certaj aĵoj servas por kontentigi siajn bezonojn. La homoj donas al tiuj aĵoj apartan (generic) nomon nur ĉar ili jam scias, ke tiuj servas al ili por kontentigo de iliaj bezonoj. ...”⁶⁰

Lenino esprimis la saman bazan ideon jene:

„La praktika agado de la homo devis miliardajn fojojn konduki la konscion de la homo al ripetado de la diversaj logikaj funkcioj, por ke tiuj figuroj povis ricevi la signifon de *aksiomoj*.”⁶¹

En sia socia praktiko la homoj ekzamenas sian ekkonon, korektas, modifas, ampleksigas, perfektigas ĝin. La homa praktiko, kun sia hodiaŭ ankaŭ eksterordinare alta grado de regado ankaŭ de la plej komplikaj natur-okazaĵoj, estus malebla sen larĝa kaj sekura fundamento de funditaj ekkonoj. Markso, Engelso kaj Lenino opiniis, ke ĉia ekkonteoria

60 Marx: Randglossen zu A. Wagners ‘Lehrbuch der politischen Ökonomie’, MEW, vol. 19, p. 362-363.

61 Lenin: Philosophische Hefte, LW, vol. 38, p. 181.

2.3 La dialektiko

skeptikismo kaj agnostikismo estas per tio plej bone refutita. La kongruo de la konscio spegulanta la naturon kaj de la naturo spegulata en la konscio estis por ili nenio enigma, surpriza. Envere kompreniĝas per si mem, diras Engelso, *„ke la produktoj de la homa cerbo, kiuj estas lastinstance ja ankaŭ naturproduktoj, ne kontraŭdiras la ceteran naturkuntekston, sed konformas al ĝi”*.⁶²

Lenino emfazis ke por la marksismo la vidpunkto de la vivo kaj de la praktiko *„devas esti la unua kaj baza vidpunkto de la ekkonteorio”*, sed ke – sekve al ĝiaj historie donitaj limoj – la kriterio de la praktiko neniam povas *komplete* konfirmi aŭ refuti homan imagon. Ankaŭ tiu kriterio estas sufiĉe „nedeterminita” por malebligi la transformiĝon de la homaj konoj en „ion absolutan”, sed samtempe sufiĉe determinitaj por alfronti ĉiajn variaĵojn de idealismo kaj agnostikismo.⁶³

La marksisma ekkonteorio vidas en la ekkonprocezo de la homo speguladon de la objektiva realaĵo peratan kaj elprovidan de la homa praktiko kaj ekzistantan sendepende de la homa konscio. La nocio de la speguliĝ- aŭ reflekt-teorio ne estu komprenata en etimologia senco, kiel kutime faras la praktiko de kontraŭuloj de la marksismo. La nocioj speguliĝo aŭ reflektio estas filozofihistorie estiĝintaj nocioj uzataj de ĉiuj materiismaj filozofoj kaj kiuj signifas nur ke la homa konscio laŭ la ebleco kapablas adekvate ekkoni la objektivan realaĵon kiu ĉirkaŭas la homon. Sed kontraste kun la antaŭmarksisma materiismo Markso, Engelso kaj Lenino komprenis la speguliĝon de la objektiva realaĵo en la konscio de la homoj ne kiel ion pasivan, kontemplan, sed unuavice kiel rezulton de ilia praktika vivprocezo. Ĉe tio ili konsideris la spiritan alproprigon de la mondo mem ĉiam kiel aktivan, krean procezon. *„La konscio”*, diras Markso,

62 Engels: Anti-Dühring, MEW, vol. 20, p. 33.

63 Lenin: Materialismus und Empiriokritizismus, LW,, vol. 14, p. 137.

2. La dialektika materiismo

*„povas neniam esti io alia ol la konscia esto, kaj la esto de la homoj estas ilia reala vivprocezo”.*⁶⁴

La dialektika materiismo vidas la homan ekkonprocezon kiel unuecon de sensa spertado (sensado, perceptado, imagado) kaj de racie abstraktanta pensagado. Kvankam en la historia-genetika senco ĉia homa ekkono radikas en la sensa spertado – sed skemeca disigo de sensaj kaj raciaj elementoj de la homa ekkono ne eblas, ili trapenetas kaj kondiĉas sin reciproke –, la marksisma speguladteorio vidas do en la homa ekkono komplikitan dialektikan procezon estiĝintan kun la socio kaj socie kondiĉitan, kiu inkluzivas unuecon de objektivo kaj subjektivo, de sensaĵo kaj raciaĵo, de unuopo, aparto kaj ĝeneralo, de konkreto kaj abstrakto.

La marksisma filozofio jesas la eblecon ekkoni la objektivan realon, do fari eldirojn kiuj kongruas kun la objekte realaj faktoj, kun la realo ekzistanta sendepende kaj ekstere de nia konscio.

„La fakto”, diras Engelso, „ke nia subjektiva pensado kaj la objektiva mondo estas submetitaj al la samaj leĝoj kaj pro tio la du ankaŭ fine ne povas kontraŭdiri sin en siaj rezultoj, sed devas kongrui, regas absolute nian tutan teoriantan pensadon.”⁶⁵

Sed leviĝas la demando, ĉu la homo kapablas ekkoni komplete, ĝisdetale la ĝin ĉirkaŭantajn mondon, naturon kaj socion, aŭ eĉ nur unuopajn objektojn kaj procezojn. Kiel rilatas *relativa* kaj *absoluta* vero unu al la alia? Markso, Engelso kaj Lenino komprenis la homan ekkonprocezon historie kaj dialektike. La eblecoj kiel la limoj de homa ekkono dependas de la respektiva socia evoluŝtupo, de la jam atingita nivelo de teĥnikaj kaj empiriaj helpiloj, de la sciencaj teorioj kaj hipotezoj ktp. La homa pensado estas same suverena kiel ne suverena, ĝia ekkonkapablo same ne limigita kiel limigita, diras Engelso.

64 Marx-Engels: Die deutsche Ideologie, MEW, vol. 3, p. 26.

65 Engels: Dialektik der Natur, MEW, vol. 20, p. 529.

2.3 La dialektiko

„Suverena kaj nelimigita laŭ la dispozicio, la alvokiteco, la ebleco, la historia fina celo, ne suverena kaj limigita laŭ la unuopa elformiĝo kaj la respektiva realeco.”⁶⁶

La marksismo komprenas la ekkonprocezon do kiel senfinan alproksimiĝon al la objekto de la ekkono kiel la

„senfinan procezon de la profundigo de la ekkono de la aĵoj, de la fenomenoj, procezoj ktp fare de la homo, de la aperformoj al la esenco kaj de malpli profunda al pli profunda esenco.”⁶⁷

Absoluta kaj relativa vero do en la ekkonteorio de Markso, Engelso kaj Lenino ne estas io neakordigebla, sed dialektika unueco. En ĉiu *relativa* vero troviĝas peco da *absoluta* vero: la absoluta vero konsistas el sennombraj relativaj veroj. Lenino emfazas, ke la homa pensado laŭ sia naturo kapablas peri al ni la absolutan veron, ke ĉiu ŝtupo en la evoluo de la scienco aldonas al la absoluta vero novajn eretojn. Kvankam la materiisma dialektiko inkludas la relativismon, ĝi agnoskas la relativecon de ĉiuj niaj konoj,

„sed ne en la senco de neado de la objektiva vero, sed en la senco ke la limoj de la alproksimiĝo de niaj konoj al tiu vero estas historie kondiĉitaj”.⁶⁸

66 Engels: Anti-Dühring, MEW, vol. 20, p. 80-81.

67 Lenin: Philosophische Hefte, LW, vol. 38, p. 213.

68 Lenin: Materialismus und Empiriekritizismus, LW, vo. 14, p. 132.

3. La materiisma koncepto de historio

3.1 Bazaj ideoj

La historia materiismo temas pri la homa socio, ties ĝeneralaj evoluleĝoj, la leĝoj de estiĝo, de la funkciomaniĝo kaj de la malestiĝo de la sociaj formacioj, la ĉefaj movfortoj de la historia evoluo. En sia funebra parolado por Karlo Markso Engelso emfazis kiel mondhistoriajn atingojn de la pensisto Markso la malkovron de la evoluleĝo de la kapitalisma produktadmaniero.

„Kiel Darvino malkovris la leĝon de la evoluo de la organika naturo”, diris Engelso, „tiel Markso malkovris la evoluleĝon de la homa historio: La simpla fakto, ĝis tiam kovrita sub ideologiaj superkreskaĵoj, ke la homoj devas antaŭ ĉio alia unue manĝi, trinki, loĝi kaj vesti sin, antaŭ ol povi okupiĝi pri politiko, scienco, arto, religio ktp; ke do la produktado de la rektaj materiaj vivrimedoj kaj per tio la respektiva ekonomia evoluŝtupo de popolo aŭ de epoko konsistigas la bazon, el kiu la ŝtataj institucioj, la juraj konceptoj, la arto kaj eĉ la religiaj imagoj de la koncernaj homoj evoluis, kaj el kiu ili do ankaŭ estas klarigendaj – ne inverse, kiel oni faris ĝis tiam.”¹

Efektive, neniu el la eldiroj de la marksismo kompreneblas, neniu el ĝiaj rezultoj estus ebla sen la materiisma koncepto de la historio. La konsekvenca ellaborado kaj aplikado de la dialektika materiisma bazkoncepto al la socio kaj al la historio de la socio estas la bazo de la tuta scienca laboro de Markso, Engelso kaj Lenino, eĉ se ni ne posedas de ili verkitan detalan prezentadon de la materiisma koncepto de la historio kiel teorio kaj metodo. Sed ili montris al ni en siaj verkoj surkampe de la politika ekonomio, de la historio, de la strategio kaj taktiko de la laborista movado, do en la aplikado al la historia materialo, kiel ili volis vidi la uzadon de la materiisma koncepto de la historio.

1 Engels: Grabrede für Karl Marx, MEW, vol. 19, p. 335-336.

3.1 Bazaj ideoj

Ni trovas pli detale prezentitaj la plej gravajn teoriajn-metodajn bazajn trajtojn de la historia materiismo en la verko „*Deutsche Ideologie* [Germana ideologio]”, kiujn Markso kaj Engelso verkis komune en la jaro 1845 kaj kiu estis publikigita nur post la morto de la aŭtoroj; krome en la *Manifesto de la Komunista Partio* de 1848 kaj en la antaŭparolo de Markso al la libro „*Zur Kritik der Politischen Ökonomie* [Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio]” de 1859; en la verko de Engelso „*Kontribuo de la laboro al la homiĝo de la simio*”² de 1876, kiu estis en 1896 unuafoje publikigita; en kelkaj leteroj de Engelso en siaj lastaj vivojaroj kaj en la verko de Lenino „*Kio estas la ‘popolamikoj’ kaj kiel ili batalas kontraŭ la socialdemokratoj?*” el la jaro 1894. La fondintoj de la scienca socialismo ĉiam emfazis ke la materiisma koncepto de la socio ne estas „levilo de konstruado” laŭ la hegelismo, sed antaŭ ĉio „gvidado ĉe studado” de la historio, de la diversaj sociaj formacioj kaj de iliaj ekzistkondiĉoj, de la interrilatoj de ekonomio kaj politiko, de ekonomia bazo kaj politika-ideologia superstrukturo.³

Lenino atentigis pri la fundamenta diferenco kaj kontraŭeco de la materiisma historikoncepto al la aliaj historiaj teorioj kaj metodoj de la histori-interpretado kaj emfazis ke la historia materiismo superis du ĉefmankojn de la antaŭa historia teorio: unue ke ĝi jam ne konsideras nur la ideajn motivojn de la historia agado de la homoj, sen esplori pri la radikoj de tiuj motivoj; due ke ĝi jam ne preteratentas la agadon kaj la vivkondiĉojn de la *amasoj* de la loĝantaro kiel la antaŭaj konceptoj.⁴

2 Frederiko Engelso: Kontribuo de la laboro al la homiĝo de la simio, en: Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, p. 20-34.

3 Engels an C. Schmidt, 1890-08-05, MEW, vol. 37, p. 436 s.

4 Lenin: Karl Marx – Kurzer biographischer Abriß, LW, vol. 21, p.

3. La materiisma koncepto de historio

La historia materiismo eliras en sia kerna penso el tio ke la produktado de la rimedoj rekte necesaj por la vivbezonoj de la homo estas „*baza kondiĉo de ĉia historio, kiu ankoraŭ hodiaŭ kiel antaŭ jarmiloj devas esti plenumata ĉiutage kaj ĉiuhore, por nur vivteni la homojn*”.⁵ La manieron en kiu la diversaj homgeneracioj produktas tiujn materiajn kondiĉojn por sia vivo, ili ne povas libere elekti. Ili estas fortoj, cirkonstancoj, kondiĉoj kreitaj de antaŭaj generacioj.

„Danke al la simpla fakto”, skribas Markso 1845 en letero, „ke ĉiu nova generacio trovas la produktadfortojn akiritajn de la malnova generacio, kiuj servas al ĝi kiel krudmaterialo por nova produktado, estiĝas kunteksto en la historio de la homoj, estiĝas la historio de la homaro ...”⁶

En fama tekstero de la antaŭparolo al sia verko „*Zur Kritik der Politischen Ökonomie* [Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio]”, Karlo Markso skizis la ĉefajn trajtojn de la materiisma historikoncepto jene:

„En la socia produktado de sia vivo la homoj eniras certajn, necesajn, de ilia volo sendependajn rilatojn, produktadrilatojn, kiuj kongruas kun certa evoluŝtupo de siaj produktadfortoj. La tutaĵo de tiuj produktadrilatoj konsistigas la ekonomian strukturon de la socio, la realan bazon, sur kiu leviĝas jura kaj politika superstrukturo kaj al kiu kongruas certaj sociaj formoj de konscio. La produktadmaniero de la materia vivo kondiĉas la socian, politikan kaj spiritan vivprocezon entute. Ne estas la konscio de la homoj kiu determinas ilian eston, sed inverse ilia socia esto kiu determinas ilian konscion. Sur certa ŝtupo de sia evoluo la materiaj produktadfortoj de la socio eniras en kontraŭdiron kun la ekzistantaj produktadrilatoj aŭ, kio estas nur jura esprimo por tio, kun la proprietrilatoj, ene de tiuj ili ĝise moviĝis. El evoluformoj de la produktadfortoj tiuj rilatoj fariĝas iliaj malhelpoj. Tiam komenciĝas epoko de socia revolucio. Kun la revolucio de la ekonomia bazo la tuta superstrukturo pli aŭ

45 s.

5 Marx-Engels: Die deutsche Ideologie, MEW, vol. 3, p. 28.

6 Marx an Annenkow, MEW, vol. 27, p. 452-453.

3.1 Bazaj ideoj

malpli rapide revoluciigŝas. En la rigardo al tiaj ŝanĝegoj oni devas ĉiam distingi inter la materiaj, naturscience fidele konstatebla revolucio en la ekonomiaj produktadkondiĉoj kaj la juraj, politikaj, religiaj, artaj aŭ filozofiaj, mallonge, ideologiaj formoj, en kiuj la homoj konsciiĝas pri tiu konflikto kaj elbatalas ĝin. Kiel oni ne prijuĝas tion, kio estas individuo, laŭ tio, kion ĝi mem opinias esti, same oni ne povas prijuĝi tian revolucion epokon laŭ laŭ ĝia konscio, sed devas klarigi tiun konscion el la kontraŭdiroj de la materia vivo, el la ekzistanta konflikto inter la sociaj produktadfortoj kaj produktadkondiĉoj. Socia formacio neniam pereas antaŭ ol ĉiuj produktadfortoj estas disvolvitaĵoj por kiuj ĝi estas sufiĉe vasta, kaj novaj pli altaj produktadkondiĉoj neniam anstataŭas ĝin antaŭ ol ĝiaj materiaj ekzistadkondiĉoj estas elkovitaĵoj en la sino de la malnova socio mem. Pro tio la homaro donas al si ĉiam nur taskojn kiujn ĝi povas solvi, ĉar ĉe pli detala rigardo oni ĉiam trovas ke la tasko mem estiĝas nur kie la materiaj kondiĉoj de ĝia plenumado jam ekzistas aŭ almenaŭ estas estiĝantaj. En vastaj konturoj la azia, antikva, feŭda kaj moderne burĝa produktadmanieroj nomeblas progresemaĵoj epokoj de la ekonomia sociformacio. La burĝaj produktadkondiĉoj estas la lasta antagonisma formo de la socia produktadprocezo, antagonisma ne en la senco de individua antagonismo, sed en la senco de antagonismo elkreskanta el la sociaj vivkondiĉoj de la individuoj, sed la produktadfortoj evoluintaj en la sino de la burĝa socio kreas samtempe la materiajn kondiĉojn por solvi tiun antagonismon. Pro tio, kun tiu socia formacio la antaŭhistorio de la homa socio finiĝas.”⁷

3.2 Naturo kaj homo, laboro kaj antropogenezo

Por Markso, Engelso kaj Lenino, ĉar ili estas materiistoj, la aprioro de la naturo estas same memkomprenebla kiel la fakto ke la homo mem estas naturestaĵo, kiu evoluis en longa historia procezo el la animala regno. Jam jaron antaŭ

⁷ Marx: Vorwort ‘Zur Kritik der politischen Ökonomie’, MEW, vol. 13, p. 8-9.

3. La materiisma koncepto de historio

la apero de la darvina ĉefverko – 1858 – Engelso skribas al Markso:

„Tiom estas klare, ĉe la kompara fiziologio oni akiras hontan malestimon kontraŭ la idealisma aroganteco de la homoj super la aliaj animaloj. Ĉiupaŝe palpeblas la plej kompleta kongruo de la strukturo kun la ceteraj mamuloj, en la ĉefaj trajtoj la kongrueco koncernas ĉiujn vertebrulojn ...”⁸

Kaj jam jardekon antaŭ la elfoso de la neandertala homo Markso kaj Engelso donis 1845 en la *‘Germana ideologio’* sian respondon al la demando, kiel la homoj definitive leviĝis el la animala regno kaj kio estis decida por tiu evolu-procezo:

„Oni povas distingi la homon disde la bestoj per la konscio, per la religio, per kio ajn alia. Ili mem komencas distingiĝi disde la bestoj ekde kiam ili komencas produkti siajn vivrimedojn, paŝo kiu estas kondiĉita de sia korpa organizo. Per tio ke la homoj produktas siajn vivrimedojn, ili produktas malrekte sian materialan vivon mem.”⁹

La homo disiĝas de la besta regno per sia metabolo, aktiva, kun la lin ĉirkaŭanta naturo, per sia nur socie, en grupoj kaj asocioj ebla *laboro*, per uzado kaj speciale per pretigado de laboriloj. Kiel aliaj organikaj vivuloj li restas ligita al biologiaj, fiziologiaj leĝoj, sed por lia evoluo *decida* fariĝas en kreskanta grado la per lia propra laboro kreita socia medio. Li fariĝas, kiel Markso diras kun Benjamin Franklin, *„a tool making animal”*, ilojn produktanta animalo. La homo restas dependa de la lin ĉirkaŭanta naturo kaj de la substancoj kiujn ĝi prezentas al li. Sed tiu jam ne estas la naturo de liaj bestaj antaŭuloj, ĝi estas esence jam naturo transformita, ŝanĝita de lia propra laboro. Kontraŭ la abstrakta, nehistoria naturkoncepto de Fojerbaĥo, kiu ne konsideras la socian praktikon de la homo, Markso kaj Engelso objetas ke Fojerbaĥo komprenas la sensan mond-

8 MEW, vol. 29, p. 338.

9 MEW, vol. 3, p. 21.

3.2 Naturo kaj homo, laboro kaj antropogenezo

on, kiu ĉirkaŭas la homon, kiel ion donitan deeterne, ion kio estas ĉiam sama, kaj ke li ne vidas ke ĝi estas *historia* produkto, la rezulto de la agado de multaj homgeneracioj kaj produkto de la industrio.¹⁰

La homo ŝanĝanta la naturon laŭ siaj bezonoj ŝanĝas per tio ankaŭ sin mem. Li estas sia propra kreanto. La laboro kiel aktiva metabolprocezo kun la naturo estas la kondiĉo de la homa socio en ĉiuj ĝiaj formoj. Laboro eblas nur socie, kaj la respektiva socio estas la produkto de la reciproka agado de la homoj. Pro tio la marksismo vidas kiel elirpunkton de ĉia homa historio „*en la socio produktantajn individuojn*“, socie determinatan produktadon. La unuopoj kaj okazaj ĉasistoj kaj fiŝkaptistoj, per kiu la klasika burĝa ekonomio (Smith kaj Ricardo) komencas, Markso nomas apartenanta „*al la senfantaziaj iluzioj de la 18-a jarcento*“.¹¹ La socio ne estas simpla ariĝo de individuoj, klarigas Markso, sed esprimas la sumon de la rilatoj, kondiĉoj, en kiuj tiuj individuoj staras inter si.¹²

En sia eseo '*Kontribujo de la laboro en la homiĝo de la simio*' Frederiko Engelso do ligis la antropogenezon, la estiĝhistorion de la homo, kun la laboro. Li nomas ĝin „*la unua baza kondiĉo de ĉia homa vivo*“, kaj en tioma grado ke ni povas en certa senco diri ke „*ĝi kreis la homon mem*“.¹³ La dominado super la naturo, kiu komenciĝis per la elformiĝo de la mano kaj de la laboro, ĉe ĉiu nova progreso plilarĝigis la horizonton de la homoj; ju pli la laboro evoluis,

10 Saml., p. 42.

11 Marx: Einleitung zur Kritik der prolitischen Ökonomie, MEW, vol. 13, p. 615.

12 Marx: Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie, Rohentwurf [Skizoj de la kritiko de la politika ekonomio, malnetaĵo], p. 176.

13 Engelso: Kontribuo de la laboro al la homiĝo de la simio, en: Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo ktp., verko cit., p. 20.

3. La materiisma koncepto de historio

des pli la homoj dependis inter si, de la kunlaborado, kaj el tio elkreskis la konscio pri la utilo de tiu kunlaborado:

„Mallonge, la fariĝantaj homoj alvenis al tio, ke ili *havis ion por diri* unu al la alia. La bezono kreis sian organon: La neevoluinta laringo de la simio aliformiĝis malrapide sed certe, per modulado por ĉiam pli alta modulado, kaj la buŝorganoj lernis iom post iom elparoli unu artikulaciitan literon post la alia.”¹⁴

Laboro kaj poste kun ĝi la lingvo, tiuj estis laŭ Engelso la esencaj movfortoj, sub kies influo estiĝis la kompare kun liaj simisimilaj antaŭuloj multe pli granda kaj multe pli perfekta homa cerbo. Per la kunagado de mano, parolorganoj kaj cerbo ne nur ĉe la unuopaj homoj, sed ankaŭ en la socio, la homo estis tiam kapabligita plenumi ĉiam pli komplikajn agojn kaj meti al si ĉiam pli altajn celojn. La tuta merito ĉe ĉio ĉi estis poste atribuita al la kapo, la homo kutimiĝis klarigi sian agon el sia pensado, anstataŭ el siaj bezonoj, kiuj siavice ja speguliĝas en la kapo.

Ankaŭ en la besta regno ni trovas laŭplanajn agmanierojn, tiu ĉeestas kerne ĉie kie protoplasmo ekzistas kaj reagis kaj plenumas tute simplajn movojn kiel sekvo de certaj incitoj el la ekstero. Sed la besto uzas nur la eksteran naturon, ĝi faras ŝanĝojn neintence, kiel ion por ĝi mem hazardan, la homo servopretigas la naturon, per siaj ŝanĝoj, al siaj celoj, *dominas* ĝin. Sed tio eblas nur danke al la laboro, per aplikado de laboriloj.¹⁵

En tre konata tekstero de la ‘Kapitalo’ Markso difinas la laboron kiel procezon inter homo kaj naturo,

„en kiu la homo peras, kontrolas kaj regulas sian metabolon kun la naturo per sia propra agado. Li alpaŝas la naturon mem kiel naturpotenco. Li movas la naturfortojn apartenantajn al lia korpeco, brakojn, krurojn, kapon kaj manon, por alproprigi al si la naturmaterialon en formo uzebla por sia propra vivo. Per tio

14 Saml., p. 23.

15 Saml., p. 450-452.

3.2 Naturo kaj homo, laboro kaj antropogenezo

ke li efikas sur la naturo ekster si kaj ŝanĝas ĝin, per tiu sia movo, li samtempe ŝanĝas sian propran naturon. Li disvolvas la eblecojn kiuj kuŝas en li kaj submetas la ludon de iliaj fortoj al sia propra regado. Ĉi tie ne temas pri la unuaj animalece instinktaj formoj de laboro. Nemezurebla tempo disigas la staton, en kiu la laboristo kiel vendisto de sia propra laborforto aperas sur la varmerkato, de tiu pratempa stato, en kiu la homa laboro ankoraŭ ne demetis sian unuan instinktecan formon. Ni parolas pri la laboro en tiu formo en kiu ĝi apartenas ekskluzive al la homo. Araneo faras operaciojn similajn al tiuj de teksisto, kaj abelo hontigas per la konstruado de siaj vaksaj ĉeloj multajn homajn konstruistojn. Sed kio principe distingas la plej malbonan konstruiston de la plej bona abelo estas, ke li konstruis la ĉelon en sia kapo antaŭ ol konstrui ĝin per vakso. Fine de la konstruado aperas rezulto, kiu ĉe sia komenco estis jam *en la ideo de la laboristo*, do ekzistis jam ideo. Li ne realigas nur formŝanĝon de io natura; li *realigas* en tio natura samtempe sian celon, kiun li scias, kiu determinas la manieron de lia ago kiel leĝon kaj al kiu li devas submeti sian volon.”¹⁶

Markso atentigas pri tio ke tiu celfara agado estas rezulto de longa historia evoluo, ke ĝi estas ege malproksima de la unuaj animalecinstinktecaj formoj de laboro. Lenino emfazas en tiu kunteksto ke la leĝoj de la mondo ĉirkaŭanta la homon konsistigas la bazon por lia laŭcela agado, ke la celoj estas do estigitaj nur de la objektiva mondo kaj de la procezo de lia efikado al ĝi.¹⁷

La laboro, la produktado de la havaĵoj necesaj por la vivo, kiel baza kondiĉo de ĉia homa vivo, estis registrita antaŭ Markso kaj Engelso, se entute, tiam maksimume kiel fenomeno malgrava por la evoluo de la historio. Nun ili faris la *praktikan* bazon de la socia vivo ankaŭ la fundamento de la historia *teorio*. En la '*Germana ideologio*' Markso kaj Engelson diras, ke la tuta ĝisnuna koncepto pri historio aŭ komplete preterlasis tiun realan bazon de la historio aŭ

16 Karlo Markso: La kapitalo, ... ĉapitroj unua ĝis naŭa, v.c., p. 213-214.

17 Lenin: Philosophische Hefte, LW, vol. 38, p. 117 s.

3. La materiisma koncepto de historio

konsideris ĝin nur kiel flankan aferon, kiu havas nenian rilaton kun la paso de la historio. Pro tio oni verkis la historion ĉiam laŭ kriterio ekster ĝi. Tiel oni komprenas la veran vivproduktadon kiel prahistorian, dum la historiaĵo aperas kiel „*la disigito de la ordinara vivo, ekster-transmondaĵo*”; kaj tiamaniere oni ekskludis la rilaton de la homo al la naturo el la historio kaj kreis la kontraŭecon de naturo kaj historio.¹⁸

18 Marx-Engels: Die deutsche Ideologie, MEW, vo. 3, p. 39.

3.3 Produktadfortoj kaj produktadkondiĉoj, la sinsekvo de la sociaj formacioj

La produktado kiel kondiĉo de ĉia homa socio estas ĝeneraligo. En la respektiva socia realeco ĝi aperas ĉiam en konkreta, historie determinita formo, koncerne la laboron kiel rektan metabolprocezon kun la ĉirkaŭa mondo kiel ankaŭ la rilatojn, kiujn la homoj komencas en tiu produktadprocezo. La produktado de la materialaj vivkondiĉoj entenas do ĉiam du flankojn kunligitajn kaj reciproke efikantajn: la produktadfortojn, unuflanke la konojn, laborspertojn, lertecojn de la produktantoj kaj la rimedojn, la aĵajn faktorojn, kiujn ili uzas en la produktado; aliflanke la *produktadkondiĉojn*, do la socian formon, en kiu la homoj respektive plenumas la produktadprocezon.

La plej grava produktadforto de ĉia socio estas la laborantaj homoj, la produktantoj, kiuj reguligas la laborprocezon, donas al ĝi celon, per la laborrimedoj (iloj, instrumentoj, maŝinoj, aŭtomatoj) efikas sur la laborobjektoj (en la naturo trovitaj substancoj aŭ jam prilaboritaj krudmaterialoj) kaj estigas la deziratan produkton. La laborrimedoj posedas, kiel Markso montris, decidan gravecon por la ŝanĝiĝoj kiuj okazas en la produktado kaj en la socio entute. En la '*Kapitalo*' Markso klarigas, ke la laboristo uzas kun la laborrimedo „*la meĥanikajn, fizikajn, ĥemiajn ecojn de la aĵoj*” por igi ilin efiki sur aliaj aĵoj. La uzado kaj la kreado de laborrimedoj, kvankam kerne jam propra al certaj bestaj specioj, karakterizas *la specife homan laborprocezon*.

„Restaĵoj de laboriloj havas la saman gravecon por esplorado de pereintaj ekonomiaj sociordoj kiel la strukturo de ostaj restaĵoj havas por la esplorado de pereintaj animalspecioj. Ne *kio estas farata* distingas la ekonomiajn epokojn, sed *kiel, per kiaj laboriloj* oni faras ion. Laboriloj estas ne nur mezuriloj por la evoluo de la homa laborforto, sed ankaŭ indikiloj de la sociaj kondiĉoj en kiuj oni laboras.”¹⁹

19 Karlo Markso: La kapitalo, ... ĉapitroj unua ĝis naŭa, v.c., p.

3. La materiisma koncepto de historio

Markso substrekas el la vidpunkto de ilia graveco por tuta produktadepoko la rolon de la meĥanikaj laborrimedoj, kiujn li nomas la „*ost- kaj muskol-sistemo*” de la produktado.²⁰

La produktadkondiĉoj konsistigas la sistemon de sociaj rilatoj, kiujn la homoj eniras en la procezo de la materia produktado. En la produktado la homoj efikas, kiel Markso priskribas, ne nur sur la naturon, sed ankaŭ inter si: ili produktas nur „*per tio ke ili kunagas en certa maniero kaj interŝanĝas siajn agojn inter si*”. La efikado al la naturo okazas nur ene de tiuj sociaj rilatoj kaj kondiĉoj.

„*La produktadkondiĉoj en sia tutaĵo*”, skribas Markso, *konsistigas tion kion oni nomas la sociaj kondiĉoj, la socio, kaj pli precize socio sur certa, historia evolusistupo, socio kun siaspeca, distingita karaktero.*”²¹

La produktadkondiĉoj signas tutan sistemon de sociaj ekonomiaj rilatoj, speciale la pozicion de la diversaj sociaj klasoj en la produktadprocezo, kiu rezultas el la determinanta produktadprocezo – ilia pozicio rilate al la produktadrimedoj, do al la *proprietkondiĉoj*. En tiu senco Markso nomas la proprietkondiĉojn la „*jurano esprimon*” de la produktadkondiĉoj. Ĉar tiu, kiu disponas pri la produktadrimedoj, pri la kondiĉoj de la socia produktado, tiu akiras per tio la regadon super la ceteraj klasoj kaj tavoloj de la socio. La rilato de la proprietuloj de la produktadkondiĉoj al la rektaj produktantoj estas laŭ Markso „*la plej interna sekreto, la kaŝita bazo de la tuta socia konstruo ...*”²² El la proprietkondiĉoj rezultas tuta skalo de aliaj produktadkondiĉoj, ekz-e la rilatoj de interŝanĝo de la agadoj, de la labordivido kaj de la kunlaborado, la maniero en kiu la socia produkto estas distribuata inter la diversaj klasoj kaj

210.

20 Saml.

21 Karlo Markso: *Dunlaboro kaj kapitalo*, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, p. 19.

22 Karl Marx: *Das Kapital*, 3-a volumo, MEW, vol. 25, p. 799-800.

3.3 Produktadfortoj kaj produktadkondiĉoj, la sinsekvo de la sociaj formacioj

tavoloj ktp.

La produktadfortoj, en sia dialektika rilato de interefiko kun la produktadkondiĉoj, konsistigas tiun elementon en la historia evoluo kiu estas pli moviĝema, submetita al pli rapidaj ŝanĝoj kaj lastinstance decida. Se la donitaj produktadkondiĉoj jam ne donas spacon por la disvolvado de jam ekzistantaj aŭ estiĝantaj produktadfortoj, tiam la homoj estas – pli aŭ malpli frue – devigataj revoluciigi tiujn produktadkondiĉojn kaj alkonduki kongruecon inter la produktadfortoj kaj la produktadkondiĉoj sur pli alta historia skalo.

„La sociaj rilatoj”, skribas Markso, „estas dense ligitaj kun la produktadfortoj. Kun la akiro de novaj produktadfortoj la homoj ŝanĝas sian produktadmanieron, kaj kun la ŝanĝo de la produktadmaniero, la maniero gajni siajn vivrimedojn, ili ŝanĝas ĉiujn siajn sociajn rilatojn. El la manmuelilo rezultas socio kun feŭdaj sinjoroj, el la vapormuelilo rezultas socio kun industriaj kapitalistoj.”²³

La dialektiko de produktadfortoj kaj produktadkondiĉoj, la ekkono abstraktigita de Markso el la historia evoluo, ke la sociaj kondiĉoj ŝanĝiĝas kun la ŝanĝiĝoj de la produktadfortoj, estas unu el la fundamentaj vidpunktoj de la historia materiismo. Tiu dialekto trovas en la konkreta historia evoluprocezo ĉiam sian esprimiĝon en la batalo de la sociaj klasoj kaj en ties realaj ekonomiaj interesoj, kiuj sur donita ŝtupo enkorpiĝas la konservativan aŭ la revolucionan elementon de la sociaj kondiĉoj, de la produktadkondiĉoj.

Per tiu batalo de la klasoj, kies interesoj aŭ kongruas kun la progreso de la produktadfortoj aŭ kontraŭagas ĝin, plenumiĝas – en iu aŭ alia formo, pli aŭ malpli rapide – la

23 Karlo Markso: La mizero de la filozofio, Respondo al Prudono: „La filozofio de la mizero”, Kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso kaj de Henri Mougins, Pri J. P. Prudono (Letero al J. B. v. Schweitzer), Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), Embres-et-Castelmaure, 2009, p. 122.

3. La materiisma koncepto de historio

adaptiĝo de la produktadkondiĉoj al la nivelo de la produktadfortoj. Aŭ, kiel Markso esprimis tion en la jam citita antaŭparolo de sia verko *‘Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio’*:

„Sur certa ŝtupo de evoluo la materiaj produktadfortoj de la socio eniras en kontraŭdiron kun la ekzistantaj produktadkondiĉoj, aŭ, kio estas nur jura esprimo de tio, kun la proprietkondiĉoj, ene de kiuj ili ĝis nun moviĝis. El evoluformoj de la produktadfortoj tiuj kondiĉoj transformiĝas en iliajn malhelpojn. Tiam komenciĝas epoko de socia revolucio.”²⁴

Tiuj interrilatoj de produktadfortoj kaj produktadkondiĉoj estas ankaŭ la *lasta kaŭzo* de la estiĝo kaj de la pereado de la diversaj sociaj formacioj. Kiel ni vidis, la marksismo komprenas sub la nocio de la *socia formacio* la tutaĵon de la sociaj kondiĉoj sur difinita historia ŝtupo de ilia evoluo. Por Markso la socia formacio estas „organika sistemo”, kiu fariĝas historie totalaĵo, per tio ke ĝi subordigas al si ĉiujn elementojn de la socio kaj kreas al ĝi ankoraŭ mankantajn organojn el la socio.²⁵

La marksismo distingas en la historio kvin sinsekvajn sociajn formaciojn: la prasocion; la sklavistan socion; la feŭdisman socion; la kapitalisman socion kaj la socialisman-komunistan socion. Markso, Engelso kaj Lenino verkis ne nur pri la kapitalisma socio kaj pri la kondiĉoj kaj fundamentaj trajtoj de la socialisma socio, sed esploris ankaŭ la antaŭkapitalismajn sociajn formaciojn.²⁶

24 Marx: Vorwort ‘Zur Kritik der politischen Ökonomie’, MEW, vol. 13, p. 9.

25 Marx: Grudrisse der Kritik der politischen Ökonomie, Rohentwurf, p. 189.

26 Kp speciale Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo (MAS), 2010, ISBN 978-2-918300-16-8
Krome de Engelso: „Zur Urgeschichte der Deutschen” kaj „Fränkische Zeit”, MEW, vol. 19, p. 425-518, kaj „Der Deutsche Bauernkrieg”, MEW, vol. 7, p. 327-413; de Karlo Markso: „Formen, die der kapitalistischen

3.3 Produktadfortoj kaj produktadkondiĉoj, la sinsekvo de la sociaj formacioj

Lenino atentigis pri tio ke la scienca determinado de la sociaj kondiĉoj kiel apartenantaj al socia formacio ebligis konstati la historian ripetiĝon kaj regulecon kaj ĝeneralige resumi la situaciojn en la diversaj landoj. Nur tiu ĝeneraligo

„donis tiam la eblecon transiri de la priskribo de la sociaj fenomenoj (kaj ilia juĝado el la vidpunkto de idealo) al ilia strikte scienca analizado, kiu emfazas ekz-e tion kio distingas iun kapitalisman landon disde alia, kaj esploras tion kio estas al ili ĉiuj komuna”.²⁷

Lenino emfazis samtempe ke nur la klarigo de la sociaj kondiĉoj per la produktadrilatoj kaj ties klarigo siavice per la respektiva nivelo de la produktadforto donis la firman bazon por „*prezenti la evoluon de la sociaj formacioj kiel naturhistorian procezon*”; sed ke sen tia koncepto ankaŭ ne povas ekzisti socia scienco.²⁸

Kompreneble Markso, Engelso kaj Lenino ne imagis la historian procezon kiel evoluon okazantan ĉie kaj en ĉiuj cirkonstancoj en precize samaj formoj. Ili sciis, ke en la sinsekvo de la sociaj formacioj ekzistas apartaĵoj, esceptoj, devojiĝoj de la ĝenerala historia irado. Post la rusa Oktobra Revolucio Lenino primokas la meĥanisman koncepton de Karlo Kaŭcko²⁹ kaj de liaj rusaj samideanoj, la menŝevistoj, kaj skribas:

„Al ili ĉia penso estas tute fremda, ke ĉe ĝenerala leĝeco de la evoluo en la tuta mondhistorio unuopaj etapoj de la evoluo, kiuj prezentas apartecon de formo aŭ de sinsekvo de la evoluo, tute

Produktion vorhergehen” en: Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie, Rohentwurf, p. 375-413; krome de Markso: La kapitalo, 1-a volumo, 24-a ĉapitro „La tiel nomata origina akumulado”, en: Karlo Markso: La kapitalo, Kritiko de la politika ekonomio, volumo 1-a, ĉapitroj dekkvara ĝis dudekkvina, (aperonta ĉe MAS fine de 2010).

27 Lenin: Was sind die Volksfreunde, LW, vol. 1, p. 131.

28 Saml.

29 Originale: Karl Kautsky (elpar. Karl Kaŭcki). -vl

3. La materiisma koncepto de historio

ne ekskludendas, sed male supozendas.”³⁰

30 Lenin: Über unsere Revolution, LW, vol. 33, p. 463.

3.4 Historia leĝeco kaj konscia agado de la homoj – Neceso kaj libereco

La marksisma koncepto de la leĝeco de la estiĝo kaj anstataŭigo de la sociaj formacioj kaj per tio de la historia evoluprocezo ne baziĝas sur la kredo je historia fato, je leĝo plenumiĝanta sendepende de la homoj kaj de ilia agado. Jam en siaj unuaj komune verkita libro, la *Sankta familio*, Markso kaj Engelso substrekis ke tute ne estas la historio kiu, „kvazaŭ ĝi estus aparta persono“, uzas la homon kiel rimedon por siaj celoj; la historio estas *nenio* alia ol la agado de la homoj sekvantaj siajn celojn.³¹

Markso, Engelso kaj Lenino parolas pri la historia evoluo ofte kiel pri „*naturhistoria procezo*“, ekz-e Markso en la antaŭparolo al la unua eldono de la *Kapitalo*. Per tio ili tute ne celas ke la leĝeco, la neceso en la historio trudiĝas sammaniere kiel en la naturo, kie temas pri blinde efikantaj fortoj. Male, ili ĉiam eliras de tio, ke tiuj leĝoj realiĝas *en* la agado kaj *per* la agado de la homoj, kiuj konscie alstrebas la kontentigon de siaj bezonoj kaj la atingon de siaj celoj. Per tiu agado de la homoj estiĝas necesa kunteksto, evoluĉeno, kiu estiĝas el ilia materia vivprocezo, el la maniero de la produktado, el la rilatoj de la homoj ene la produktado, en la interŝanĝo de la produktoj ktp. La unua kunteksto sendependa de la volado de la homoj estiĝas per tio ke la homoj ja faras mem sian historion, sed, kiel Markso diras, „*ne el liberaj decidoj, ne sub memelektitaj, sed sub rekte trovitaj, donitaj kaj tradiciitaj cirkonstancoj*“.³²

El tiu historia kunteksto la homgeneracioj ne povas elsalti, ili ne povas fari *absolute novan* komencon, speciale ne koncerne siajn materiajn vivkondiĉojn. Per tio la unua ĉenero de leĝeca, necesa evoluĉeno estas jam donita por

31 Marx-Engels: Die heilige Familie, MEQ, vol. 2, p. 98.

32 Marx: Der achtzehnte Brumaire des Louis Bonaparte, MEW, vol. 8, p. 115.

3. La materiisma koncepto de historio

ĉiu homgeneracio, antaŭ ol tiu lernis agi „memstare”. Krome: La homoj disvolvas la produktadfortojn por povi pli bone kaj pli efike labori, pli produkti kaj pli malmultekoste, kontentigi novajn bezonojn ktp. Sed tiom longe, kiom ili faras tion ne laŭ tutsocia plano, kiom la produktado ne estas reguligata socie, estiĝas efikoj, kiujn nek la tuta socio nek la individuoj kapablas antaŭvidi kaj kiuj trudas sin kvazaŭ malantaŭ la dorso de la homoj. Tiel la historia evoluleĝeco, estiĝanta el la dialektiko de subjektiva homa agado kaj de objektivaj sociaj kondiĉoj kaj fortoj, en la sociaj formacioj karakterizitaj de klasaj antagonismoj, trudiĝas *per elementa forto*, do kvazaŭ „*naturhistoria procezo*”.

En sia verko pri Fojerbaĥo Engelso prezentis detale, kiel la objektivaj historiaj evoluleĝoj trudiĝas, kvankam la homoj individue kaj ofte ankaŭ grupe agas konscie kaj laŭcele. Nur malofte, klarigas li, okazas la volito; la multaj volataj celoj interkruciĝas kaj kontraŭas sin reciproke en la plej multaj kazoj, aŭ ili estas dekomence nerealigeblaj aŭ la rimedoj por ili nesufiĉaj. Kvankam la celoj de la agoj estas volataj, sed la rezultoj, kiuj sekvas la agojn, estas ne volataj, aŭ, kie ili unue ŝajnas kongrui kun la celo, ili havas fine tute aliajn sekvojn ol la volitajn. Tiel ŝajnas kvazaŭ la historiaj okazaĵoj estus dominataj de hazardo. Sed kie sur la surfaco la hazardo ludas sian ludon, tie ĝi estas ĉiam dominata de internaj kaŝitaj leĝoj, kiujn oni devas malkovri.

La historio estas la rezulto de la volo agantaj en diversaj direktoj kaj de ilia multspeca efiko al la ekstera mondo. Do gravas kion la multaj unuopuloj volas; tiu volo estas determinata de pasio aŭ pripensado, kaj tiuj siavice de eksteraj objektoj aŭ de ĉiaj ideaj motivoj. Sed leviĝas la demando, kiuj movfortoj troviĝas malantaŭ tiuj motivoj. La malnova materiismo (antaŭ Markso) ne metis al si tiun demandon, ĝi simple juĝis pragmate laŭ la motivoj de la agantaj homoj kaj konsideris la ideajn movfortojn kiel lastan kaŭzon, sen

3.4 Historia leĝeco kaj konscia agado de la homoj – Neceso kaj libereco

demandi kiuj estas la movfortoj de tiuj movfortoj. La malkonsekvenco kuŝas ne en tio, ke oni agnoskas *ideajn* movfortojn, sed en tio ke oni ne retroiras de ili al ties movantaj kaŭzoj.

Aliflanke la idealisma histori-filozofio – speciale Hegelo – ja ne konsideris la sur la surface videblajn motivojn de la historie agantaj homoj kiel lastajn kaŭzojn, sed ĝi ne serĉis la movantajn fortojn en la historio mem kaj anstataŭe importis ilin elektstere, el la filozofia ideologio. Sed se oni volas trovi la envere lastajn movfortojn de la historio, tiam ili ne povas esti la motivoj ĉe unuopaj, kiom ajn elstaraj homoj, sed tiuj, kiuj movas grandajn amasojn kaj tutajn popolojn kaj klasojn, kaj jen oni trafas sur la *ekonomie* kaŭzita interes-kontraŭeco kaj batalo de la sociaj klasoj.

Lenino esprimis ilustre la saman penson jene:

„El la fakto, ke vi vivas kaj mastrumas, naskas idojn kaj estigas produktojn, interŝanĝas ilin, estiĝas objekte necesa ĉeno de okazaĵoj, evoluĉeno, kiu estas sendependa de via socia konscio kaj de tiu neniam senreste komprenata. La plej alta tasko de la homaro estas kapti tiun objektivan logikon de la ekonomia evoluo (evoluo de la socia esto) en la ĝeneralaj bazaj trajtoj, por adapti al ĝi sian socian konscion kaj tiun de la progresintaj klasoj de ĉiuj kapitalismaj landoj kiom eble plej nete, plej klare, plej kritike.”³³

La marksismo distingas historiajn leĝojn kiuj efikas en ĉiuj sociaj formacioj (ekz-e la leĝo de la determinanta rolo de la produktadfortoj koncerne la produktadkondiĉojn, de la decida rolo de la socia esto koncerne la socian konscion ktp) disde leĝojn, kiuj efikas nur en *kelkaj* sociaj formacioj aŭ en nur *unu* el ili (la leĝo de klasbatalo en antagonisma socio, la specifaj ekonomiaj leĝoj de la kapitalismo ktp). Markso ripete emfazas ekz-e tiun historian limigitecon de la

33 Lenin: Materialismus und Empiriekritizismus, LW, vol. 14, p. 328-329.

3. La materiisma koncepto de historio

ekonomiaj leĝoj de la kapitalismo, kiujn la burĝa ekonomio proklamas „*nerenverseblaj naturleĝoj*” de la socio entute.³⁴

Markso, Engelso kaj Lenino vidas la *liberecon* de la homo ne en la liberigo el la naturleĝoj kaj el ĉia socia evoluleĝeco, kion ili opinias malebla. Libereco ne povas konsisti en la revata sendependeco de la naturleĝoj, sed nur en la ekkono de tiuj leĝoj kaj en la tiel akirita ebleco igi ilin efiki laŭplane por certaj celoj; libereco estas la kapablo povi decidi per kono de la faktoj. Ĝi konsistas do en la regado de ni mem kaj de la ekstera naturo, bazita sur la ekkono de la naturnecesoj. Pro tio necesas meti la objektivajn, fremdajn potencojn, kiuj ĝis nun dominis la historion, sub la kontrolon de la homoj:

„Nur ekde tiam la homoj faros sian historion kun plena konscio mem, nur de tiam la sociaj kaŭzoj ekmovataj de ili havos precipe kaj en kreskanta mezuro ankaŭ la efikojn kiujn ili volas. Ĝi estas la salto de la homaro el la regno de la neceso en la regnon de la libereco.”³⁵

En la tria volumo de la *Kapitalo* Markso kompletigis tiun penson kaj atentigis pri tio ke – koncerne la homan individuon – la libereco en pli strikta senco troviĝas nur *transe* de la materia produktado. Li montris samtempe ke la konscia regulado de la socia produktadprocezo ne povas liberigi la homon el la ligiteco al la „*regno de la neceso*” kaj per tio el la evoluleĝoj kiuj estiĝas rekte el la materia vivsfero.

„La regno de la libero komenciĝas efektive nur tie”, skribas Markso, „kie ĉesas la laboro kiu estas determinata de neceso kaj ekstera celeco: ĝi troviĝas do, laŭ la naturo de la afero, trans la sfero de la vera materia produktado. Kiel la sovaĝulo devas barakti kontraŭ la naturo por kontentigi siajn bezonojn, por konservi kaj reprodukti sian vivon, tiel la civilizito devas

34 Marx: Einleitung zur Kritik der politischen Ökonomie, MEW, vol. 13, p. 618.

35 Engels: Anti-Dühring, MEW, vol. 20, p. 106; 264.

3.4 Historia leĝeco kaj konscia agado de la homoj – Neceso kaj libereco

fari tion, kaj li devas tion en ĉiuj sociaj formoj kaj sub ĉiaj eblaj produktadmanieroj. Kun sia evoluo tiu regno de la naturneceso larĝiĝas, ĉar larĝiĝas liaj bezonoj; sed samtempe la produktadfortoj larĝiĝas, kiuj kontentigas tiujn bezonojn. La libereco en tiu kampo povas konsisti nur en tio, ke la sociiĝinta homo, la asociiĝintaj produktantoj, reguligas tiun sian metabolon kun la naturo racie, metas ĝin sub sian komunan kontroladon, anstataŭ esti de ĝi dominata kvazaŭ de blinda potenco; plenumi ĝin per la plej malgranda fortelspezo kaj sub la kondiĉoj plej dignaj kaj adekvataj al ilia homa naturo. Sed tio restos ĉiam regno de neceso. Transe de ĝi komenciĝas la evoluo de homa forto, kiu konsideras sin kiel propran celon, la vera regno de la libereco, kiu tamen povas ekflori nur sur tiu regno de la neceso, sia bazo.”³⁶

36 Marx: Das Kapital, 3-a volumo, MEW, vol. 25, p. 828.

3.5 Socia esto kaj socia konscio; bazo kaj superstrukturo

Kiel ni vidis, Markso emfazas en la citita antaŭparolo de sia verko *'Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio'*, ke ne estas la konscio de la homoj kiu determinas ilian eston, sed inverse ilia socia esto, kiu determinas ilian konscion. Konscio estas konscia esto, kaj la esto de la homoj estas ilia reala socia vivprocezo, do ilia materia produktado kaj la rilatoj, kiujn ili eniras dum la produktadprocezo. Tiu materiisma elirpunkto distingas la koncepton de la marksismo pri la origino de la spirita vivo principe disde aliaj teorioj.

Markso kaj Engelso montris ke la produktado de la ideoj, de la imagoj, de la konscio estas unue rekte interplektita en la materia agado kaj la materiaj interrilatoj de la homoj, ke tiuj ideoj estas lingvo de la reala vivo:

„La imagado, pensado, la spirita interrilato de la homoj aperas ĉi tie ankoraŭ kiel rekta elfluo de ilia materia konduto. La samo validas pri la spirita produktado, kia ĝi prezentiĝas en la lingvo de la politiko, de la leĝoj, de la moralo, de la religio, de la metafiziko ktp de popolo. La homoj estas la produktantoj de siaj imagoj, ideoj ktp, sed la realaj, efikantaj homoj, tiaj kiaj ili estas kondiĉitaj de certa evoluo de iliaj produktadfortoj kaj de la interrilato kongrua kun tiuj, ĝis al ties plej vastaj formacioj ...

Tute male al la germana filozofio, kiu deiras de la ĉielo al la tero, ĉi tie oni supreniras de la tero al la ĉielo. Tio signifas, ke oni ne eliras de tio, kion la homoj diras, al si iluzias, al si imagas, ankaŭ ne de la diritaj, pensitaj, iluziitaj, imagitaj homoj. ... oni eliras de la reale agantaj homoj, kaj oni prezentas, elirante de ilia vivprocezo ankaŭ la evoluon de la ideologiaj reflektaj eĥoj de tiu vivprocezo. Ankaŭ la estiĝo de nebuloj en la cerbo de la homo estas necesaj sublimatoj de ilia materia, empirie konstatebla kaj kun materiaj premisoj ligitaj vivprocezo. ... la homoj disvolvantaj sian materian produktadon kaj sian materian interrilaton ŝanĝas kun tiu ilia realaĵo ankaŭ sian pensadon

3.5 Socia esto kaj socia konscio; bazo kaj superstrukturo

kaj la produktojn de ilia pensado.”³⁷

Markso, Engelso kaj Lenino eliras de la premiso ke super la *ekonomia bazo* de la socio, do super la tutaĵo de la produktadaj kaj klasaj kondiĉoj de donita historia periodo, leviĝas de ĝi kondiĉita kaj al ĝi responda superstrukturo de politikaj, juraj, filozofiaj, moralaj, artaj, religiaj ideoj kaj institucioj (ŝtato, partioj, klerigaj kaj kulturaj institucioj, eklezioj ktp). Kun la ŝanĝiĝo de la ekonomia bazo ankaŭ la tuta superstrukturo pli aŭ malpli rapide ŝanĝiĝas. En sia verko *‘La dekoka brumero de Louis Bonaparte’* Markso emfazas ke sur la diversaj formoj de proprieto, sur la sociaj ekzistadkondiĉoj leviĝas superstrukturo de diversaj kaj aparte formitaj sentoj, iluzioj, pensmanieroj kaj vivkonceptoj. Tiuj estas kreataj de la tuta respektiva klaso el ties materiaj bazoj kaj el la sociaj kondiĉoj; la unuopa individuo, al kiu ili alfluas per tradicio kaj edukado, povas tiam iluzii ke ili konsistigas la verajn motivojn kaj la elirpunkton de ilia agado.³⁸

El tiu baza ideo Markso, Engelso kaj Lenino deduktas, ke la regantaj ideoj de determinita ekonomia sociformacio estas ankaŭ la ideoj de la reganta klaso. La reganta materia potenco de la socio estas samtempe ĝia reganta spirita potenco. La klaso, kiu disponas pri la rimedoj de la materia produktado, disponas per tio samtempe pri la rimedoj de la spirita produktado, tiel ke per tio mezume la pensoj de tiuj, kiuj ne disponas pri la rimedoj de spirita produktado, estas al ĝi submetitaj. La regantaj pensoj estas nenio alia ol la ideo esprimiĝo de la regantaj materiaj kondiĉoj, la en pensoj formitaj regantaj materiaj kondiĉoj, do de la kondiĉoj kiuj ĝuste faras tiun klason reganta, do la ideoj de ĝia regado.³⁹

37 Marx-Engels: Die deutsche Ideologie, MEW, vol. 3, p. 46.

38 Marx: Der achtzehnte Brumaire des Louis Bonaparte, MEW, vol. 8, p. 139.

39 Marx-Engels: Die deutsche Ideologie, l.c., p. 46.

3. La materiisma koncepto de historio

Tio kompreneble ne signifas ke la marksismo atribuas *ĉiujn* ideojn kaj ĉiujn superstrukturajn fenomenojn de historia epoko al la ideoj de la regantaj klasoj. En la sociaj formacioj fenditaj en klasojn, la klasa antagonismo ekzistanta en la ekonomiaj kondiĉoj devas trovi sian respreguliĝon kompreneble ankaŭ en la superstrukturo, speciale en la ideoj. El la malsamaj vivkondiĉoj de la klasoj, el iliaj kontraŭaj ekonomiaj interesoj elkreskas ankaŭ malsamaj konceptoj pri la socio kaj ties institucioj. La ekspluatataj, subpremataj aŭ en senpoveco tenataj klasoj, per sia situacio kaj siaj interesoj, speciale en la malsuprenira historia evolufazo de socia ordo, estas premataj al opozicio kontraŭ la regantaj ideoj kaj institucioj. Tio videblas en ĉiuj klasbataloj de la historio – en la sklavribeloj de la antikveco same kiel en la bataloj de la laboristoj kontraŭ la kapitalo.

Ju pli la regantaj produktadkondiĉoj jam eniris en kontraŭdiron al la evoluo de la produktadfortoj, des pli akra fariĝas la klasbatalo, des pli ankaŭ la regantaj ideoj kaj institucioj estas pridubataj kaj atakataj de la regataj klasoj. La vekiĝanta kompreno, ke la ekzistantaj institucioj estas malraciaj kaj maljustaj, ke racio fariĝis malracio, bonfaro plago, estas nur signo de tio ke en la produktadmetodoj kaj interŝanĝformoj tute silente okazis ŝanĝoj, kun kiuj la socia ordo, tajlorita por antaŭaj ekonomiaj kondiĉoj, jam ne kongruas.

Ĉi tie necesas tamen atenti, ke la marksismo nur klarigas la originon de la superstrukturaj fenomenoj, de la socia konscio, el la ekonomiaj kondiĉoj, el la socia esto, sed tute ne neas ideojn movfortojn en la historio nek preteratentas la reefikon, la reagon de la ideoj kaj de la tuta superstrukturo al la ekonomia bazo. Jam tre frue, en la *Germana ideologio*, Markso kaj Engelso atentigis pri tio ke ĉe la esplorado de la historia procezo en ĝia totaleco oni devas vidi kompreneble „*ankaŭ la reciprokan influadon de tiuj*

3.5 Socia esto kaj socia konscio; bazo kaj superstrukturo

diversaj flankoj".⁴⁰ La gravan aktivan rolon de la ideoj en la socia vivo la juna Markso jam resumis en la konata eldiro, ke la ideo fariĝas mem materia forto, kiam ĝi kaptas la amasojn. En la sama senco Lenino diras, ke la konscio de la homo ne nur respiegulas la objektivan mondon, sed ankaŭ kreas ĝin.⁴¹

En kelkaj prezentadoj de la materiisma historikoncepto tiu *reciproka interagado* estis neglektita, kio instigis Engelson en sia letero al Mehring al jena konstato:

„Ĉar ni ĉiuj metis unue la ĉefan akcenton sur la *deduktado* de la politikaj, juraj kaj ceteraj ideologiaj ideoj kaj per tiuj ideoj al agoj perataj de tiuj ideoj el la ekonomiaj bazaj faktoj, kaj ni *devis* fari tion. Ĉe tio ni tiam neglektis la formalan flankon favore al la enhava: la manieron laŭ kiu tiuj ideoj ktp estiĝas. Tio donis poste al la kontraŭuloj bonvenan okazon por miskomprenoj respektive misprezentoj ...”⁴²

En kelkaj siaj leteroj el la lastaj vivojaroj, en kiuj Engelso provis forigi tiajn miskomprenojn de la historia materiismo, li interalie emfazas la sekvajn vidpunktojn: La bazo, la ekonomiaj kondiĉoj, estas la *lastinstance* decida elemento de la historia evoluo, sed tute ne la sole efikanta. Engelso klarigas, ke laŭ la materiisma historikoncepto la *lastinstance* decida elemento estas la produktado kaj reproduktado de la reala vivo.

Se tio estas tordita en la senco ke la ekonomia elemento estas la *sole* decida, tiam tiu teoremo estas transformita en abstraktan, absurdan frazon. La ekonomia situacio estas la bazo, sed la diversaj elementoj de la superstrukturo – politikaj formoj de la klasbatalo kaj ties rezultoj, konstitucioj, kiuj estas post venka batalo de la venkanta klaso ankritaj,

40 Marx-Engels: Deutsche Ideologie, MEW, v.c., p. 38.

41 Lenin: Konspekt zu Hegels „Wissenschaft der Logik“, LW, vol. 38, p. 203.

42 Engels an F. Mehring, 1893-07-14, MEW, vol. 39, p. 96.

3. La materiisma koncepto de historio

juraj formoj kaj eĉ la reflektiĝoj de ĉiuj ĉi realaj bataloj en la cerbo de la partoprenantoj, politikaj, juraj, filozofiaj teorioj, religiaj ideoj – influas ankaŭ la evoluon de la historiaj bataloj kaj decidas ĉefe ties *formon*. Estas interagado de ĉiuj ĉi elementoj, en kiu fine per la tuta senfina kvanto de hazardoj (de aferoj kaj okazaĵoj, kies interna kunligiteco estas tiom malproksima aŭ nepruvebla ke ni povas konsideri ĝin ĝin ne ekzistanta, preterlasebla) la ekonomia moviĝo trudiĝas kiel *io necesa*.

Engelso atentigas krome pri la ŝajno de memstareco en la evoluo sur la unuopa ideologia kampo kaj pri la cirkonstanco, ke tie la ekonomiaj kondiĉoj efikas ofte ne rekte, sed *perate*, speciale en la formoj de la idea vivo, kies materialo estas plej malproksima de la ekonomia bazo. Li certas pri la fina supereco de la ekonomia evoluo ankaŭ super tiuj kampoj de ideologio, klarigas Engelso, sed ĝi okazas ene de la kondiĉoj preskribitaj de la unuopa kampo mem, ekz-e en la filozofio per la efikado de ekonomiaj influoj (kiuj siavice efikas plej ofte en sia politika ktp vesto), sur la ekzistanta filozofia materialo kiun liveris la antaŭuloj; la ekonomio kreas ĉi tie nenion nove, sed ĝi determinas la manieron de la modifo kaj pludisvolvado de la ekzistanta pensmaterialo, kaj ankaŭ tio plej ofte malrekte, ĉar la plej grandan rektan efikon sur la filozofio faras la politikaj, juraj, moralaj reflektaj.

En sia eseo *Pri la loĝeja demando*⁴³ Engelso donas rimarkindan ekzemplon pri tiu procezo, en kiu eĉ superstrukturaj fenomenoj, kies rekta rilato al la ekonomia bazo estas ankoraŭ relative facile pruvebla, kun la paso de la evoluo akiras la ŝajnon de memstareco, de sendependeco disde la materiaj vivkondiĉoj de la socio:

„Sur certa tre origina evoluŝtupo de la socio aperas la bezono submeti la ĉiutage reokazantajn agojn de produktado, de dis-

43 Originale: „Zur Wohnungsfrage”. -vl

3.5 Socia esto kaj socia konscio; bazo kaj superstrukturo

trubuado kaj de interŝanĝado de la produktoj sub komunan regulon, zorgi por tio ke la unuopulo submetiĝu al la komunaj kondiĉoj de produktado kaj de interŝanĝado. tiu regulo, komence moro, fariĝas baldaŭ *leĝo*. Kun tiu leĝo estiĝas necesaj organoj taskitaj pri ĝia efikeco – la publika potenco, la ŝtato. Kun la plua socia evoluo la leĝo plu evoluas al pli ol malpli ampleksa leĝaro.

Ju pli komplika tiu leĝaro, des pli ĝia esprimmaniero malproksimiĝas de tiu, en kiu la ordinaraĵaj ekonomiaj vivkondiĉoj de la socio esprimiĝas. Ĝi aperas kvazaŭ memstara elemento, kiu prenas sian ekzistantaĵon kaj la pravigon de sia plua disvolvado ne el la ekonomiaj kondiĉoj, sed el propraj, internaj kaŭzoj, ekzemple el la ‘volnocio’. La homoj forgesas la devenon de sia rajto el siaj ekonomiaj vivkondiĉoj, same kiel ili forgesis sian propran devenon el la animala regno.

Kun la plua evoluo de la leĝaro al komplika, ampleksa tutajaĵo aperas la neceso de nova socia labordivido; elformiĝas stato de profesiaj juristoj, kaj kun tiuj estiĝas la jurscienco. Tiu komparas en sia plua evoluo la jursistemojn de diversaj popoloj kaj diversaj epokoj, ne kiel spuroj de la respektivaj ekonomiaj kondiĉoj, sed kiel sistemoj, kiuj trovas sian pravigon en si mem. La komparo premisas ion komunan: tion oni trovas per tio, ke la juristoj kunmetas la pli aŭ malpli komunan de ĉiuj tiuj jursistemoj kiel naturrajton. Sed la mezurilo, laŭ kiu oni mezuras kio estas naturrajto kaj kio ne, estas ĝuste la plej abstrakta esprimo de la juro mem: la *justeco*. Ekde tiam do la evoluo de la juro estas por la juristoj kaj por tiuj kiuj kredas ilin senkritike, jam nur la strebo ĉiam alproksimigi la homajn kondiĉojn, kiuj esprimiĝas jure, al la idealo de justeco, de la eterna justeco. Kaj tiu justeco estas ĉiam nur la ideologiigita, „ĉieligita” esprimo de la ekzistantaj ekonomiaj kondiĉoj, jen laŭ ilia konservativaj, jen laŭ ilia revolucia flanko.”⁴⁴

Tiu ŝajno de memstara evoluo sur ideologia kampo rilatas, kiel Engelso emfazas, kun tio ke oni tie laboras per pensa materialo, kies originon oni ne plue sekvas. Ĉar tio estas pensprocezo, la ideologo deduktas ĝian enhavon kaj

44 Engels: Zur Wohnungsfrage, MEW, vol. 18, p. 276 s.

3. La materiisma koncepto de historio

ĝian formon el la pura pensado, ĉu el sia propra ĉu el tiu de siaj antaŭuloj; li akceptas la pensmaterialon senkritike kiel produktitan de pensado kaj ne esploras ĝin pri pli malproksima origino sendependa de la pensado, kaj tio estas por li memkomprenebla, ĉar ĉia agado, ĉar *perata* de la pensado, ŝajnas al li ankaŭ *kaŭzita* de la pensado. Estas tiu ŝajno de memstara historio de la ŝtataj konstitucioj, de la jursistemoj, de la ideologiaj ideoj sur ĉiu aparta kampo, kiu antaŭ ĉio blindigas la plej multajn homojn.⁴⁵

Markso kaj Engelso atentigis ankaŭ pri la *historiaj* kaŭzoj de tiu ŝajna memstareco en la socia *labordivido* kaj montris, ke la divido de la laboro fariĝis vera divido nur ekde la momento en kiu aperis divido de la materia kaj spirita laboro. Ekde tiu momento la konscio povas reale iluzii esti io alia ol la konscio de la ekzistanta praktiko, *reale* prezenti ion sen prezenti ion *realan* – ekde tiu momento la konscio kapablas emancipiĝi el la mondo kaj transiri al la starigo de la pura teorio, teologio, filozofio, moralo ktp.⁴⁶

Ĉar la ekonomiaj kondiĉoj konstante ŝanĝiĝas, kvankam kun diversaj grado kaj rapido, tiuj ŝanĝiĝoj devas trovi sian reflektiĝon ankaŭ en la politika-ideologia superstrukturo. Lenino plurfoje substrekis ke la ŝanĝiĝoj, kiuj en la ekonomia bazo kondukis de la kapitalismo de la libera konkurenco al la monopolkapitalismo, produktis en la superstrukturo tendencon de senenhavigo kaj forigo de la burĝa demokratio, de reakcio.⁴⁷ Sed estus malĝuste, se oni volus tiajn ŝanĝojn en la superstrukturo, en la ideologiaj formoj kaj en la ŝtataj kulturaj institucioj rekte kaj ĉiukaze atribui al ekonomiaj ŝanĝiĝoj. Ili dependas altgrade de la konkreta *fortrilato* de la klasoj en donita tempospaco kaj en donita lando. Pro tio Lenino atentigis ankaŭ pri tio, ke ekzemple la

45 Engels an F. Mehring, 1893-07-14, v.c., p. p. 97.

46 Marx-Engels: Die deutsche Ideologie, v.c., p. 26.

47 Lenin: Über eine Karikatur auf den Marxismus, LW, vol. 23, p. 34.

3.5 Socia esto kaj socia konscio; bazo kaj superstrukturo

kapitalismo de la libera konkurenco kiel ankaŭ la monopol-kapitalismo povas evolui ĉe *diversaj* politikaj formoj kaj ĉiujn ĉi formojn submeti al si.

3.6 Klasoj kaj klasbatalo

La teorio de klasbatalo okupas gravan spacon en la materiisma historikoncepto. En la „Manifesto de la Komunista Partio” Markso kaj Engelso konstatis en la jaro 1948: *„La historio de la tuta ĝisnuna historio estas la historio de klasbataloj”*.⁴⁸ En la angla eldono de la Manifesto Engelso aldonis en la jaro 1888:

„Tio signifas, precize dirite, la **skribita** historio. En 1847 la antaŭhistorio de la socio, la socia organiziĝo, kiu antaŭiris ĉiun skribitan historion, estis preskaŭ nekona. Ekde tio Haxthausen malkovris la komunan proprieton je tero en Rusio. Maurer pruvis, ke ĝi estis la socia bazo, de kiu historie eliris ĉiuj germanaj triboj. Kaj iom post iom komprenis, ke la vilaĝa komunumo kun komuna terposedaĵo estis la praformo de la socio, de Hindio ĝis Irlando. Per sia glora malkovro de la vera naturo de gento kaj de ĝia pozicio en la tribo Morgan fine klarigis la internan organiziĝon de tiu praa komunisma socio en sia tipa formo. Per la dissolviĝo de tiu origina komunumo komenciĝas la disiĝo de la socio en apartaj kaj fine antagonismaj klasoj.”⁴⁹

Mi provis sekvi tiun procezon de disvolviĝo en „La origino de la familio, de la privata propio kaj de la ŝtato”, dua eldono, Stuttgart, 1886.⁵⁰ (*Noto de Engels al la angla eldono de 1886 kaj al la germana eldono de 1890*).

Markso, per siaj ampleksaj studoj de la Franca Revolucio de la fino de la 18-a jarcento trafis sur la gravecon de la bataloj de sociaj klasoj gvidataj de kontraŭaj ekonomiaj interesoj. Li trovis speciale la klasbatalojn inter nobelaro kaj burĝaro emfazitaj de la francaj historiistoj de la restaŭra periodo Thierry, Guizot, Mignet. Dum la studado de la politika ekonomio, Markso trovis kiel, ĉefe David Ricardo, priskribis la ekonomiajn bazojn de la interesbataloj de la

48 Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto de la komunista partio, Esperanta traduko kaj postparolo de Detlev Blanke, Progreso, Moskvo, 1990, ISBN 5-01-002341-5. Ĉi tie cit. laŭ la eldono kiel e-libro fare de Franko Luin, p. 35.

49 Saml.

50 En Esperanto: Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata propio kaj de la ŝtato, v.c.

3.6 Klasoj kaj klasbatalo

klasoj. Por klarigi la originon de la klasbatal-teorio kaj tion kio estas la specifeco de la propra koncepto, Markso skribas:

„Kio koncernas nun min, mi ne havas la meriton esti malkovrinta la ekziston de klasoj en la moderna socio nek ilian batalon inter si. Burĝaj historiistoj longe antaŭ mi prezentis la historian evoluon de tiu batalo de la klasoj kaj burĝaj ekonomikistoj ilian ekonomian anatomion. Kion mi faris nove, tio estas 1-e pruvi, ke la *ekzisto de la klasoj* estas ligita nur al *certaj historiaj evolufazoj de la produktado*; 2-e ke la *klasbatalo* kondukas necese al la *diktatoreco de la proletaro*; 3-e ke tiu diktatoreco estas mem nur la transiro al la *forigo de ĉiuj klasoj kaj al senklasa socio*.“⁵¹

Karlo Markso en siaj preparlaboroj por la *Kapitalo* kaj Frederiko Engelso en sia eseo, baziĝante sur la esploraĵoj de Lewis H. Morgano, *La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato* laŭspuris la estiĝon de la klasoj kaj de la klassocio el la prahistoria socia organiziĝo baziĝanta sur komunuma proprietformo. Ili montris, ke la estiĝo de la klasoj, la klasa fendiĝo de la socio atribueblas al ekonomiaj kaŭzoj. Tiuj estas kaŭzitaj ĉefe de la socia labordivido, unue en la disvolvado de kampkulturo kaj brutbredado al specifaj laborbranĉoj kaj la elformiĝo de paŝtistaj triboj, poste en la disigo de metiaj disde la kampkulturaj kaj fine de spirita disde korpa laboro. Nur kun kreskanta socia labordivido kaj pliiĝanta interŝanĝado de produktoj evoluas la privata proprieto, formiĝas esencaj sociaj diferencoj kaj fine klasoj. Markso diras, ke la diferenco je proprieto ene de la sama gento transformas la originan „*unuecon de interesoj ... en antagonismon de la gentanoj*“.⁵²

La kreskigo de la produktado en ĉiuj branĉoj – brutbredado, kampkulturo, hejma metio – donis al la homa laborfor-

51 Marx an Weydemeyer, 1852-03-05, MEW, vol. 28, p. 507-508.

52 Citita de Engelso en: *La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato*, v.c., p. 182.

3. La materiisma koncepto de historio

to la kapablon estigi pli grandan produkton ol necesan por ĝia vivtenado; sed ĝi ankaŭ pliigis la ĉiutagan laborkvanton farendan de la gentanoj kaj faris la enprenon de novaj laborfortoj dezirinda. Tiuj estis liverataj de la milito, la militkaptitoj estis transformataj al sklavoj:

„La unua granda socia labordivido sekvigis per sia pliigo de produktiveco de la laboro, do de la riĉaĵo, kaj per sia plilarĝigo de la produktadkampo, sub la donitaj historiaj ĉiomkondiĉoj, necese la sklavismon. El la unua granda socia labordivido estiĝis la unua granda divido de la socio en du klasojn: mastroj kaj sklavoj, ekspluatantoj kaj ekspluatatoj.”⁵³

Kun la dua granda labordivido, la disigo de la metio disde la kampkulturo, tiu procezo ankoraŭ ampleksiĝis kaj profundiĝis, la sklavoj ĉesis esti simplaj helpantoj, ili estas en iom grandaj grupoj pelataj al la laboro sur kampo aŭ en metiejo. Per la fendiĝo de la produktado en kampkulturo kaj metio oni estigis produktojn rekte por interŝanĝo, do formiĝis la varproduktado kaj kun ĝi la komerco. Tiu nova labordivido kondukas apud la klasa kontraŭeco inter liberuloj kaj sklavoj al diferencoj je posedo ankaŭ inter liberuloj, al diferencigo de riĉuloj kaj malriĉuloj.⁵⁴

Premiso de la fendiĝo en laborantaj kaj alproprigantaj klasojn estas do certa evoluŝtupo de la laborproduktivo. En la *Kapitalo* Markso klarigas tiun procezon:

„Se la laboristo bezonas sian tutan tempon por produkti la vivrimedojn necesajn por la vivtenado de si mem kaj de sia raso, tiam ne restas al li tempo por labori senpage por triaj personoj. Sen certa grado de produktivo de la laboro estas nenia tia tempo disponebla por la laboristo, sen tia kroma tempo nenia pluslaboro kaj do neniaj kapitalistoj, sed ankaŭ neniaj sklavistoj, neniaj feŭdaj baronoj, unuvorte, nenia klaso de grandaj posedantoj. ... Nur ekde kiam la homoj ellaboris sin el siaj unuaj bestaj statoj, ilia laboro do jam estis certagrade sociigita, aperas

53 Saml., p. 178.

54 Saml., p. 181.

3.6 Klasoj kaj klasbatalo

kondiĉoj, en kiuj la pluslaboro de iu fariĝas la ekzistadkondiĉo de la alia.”⁵⁵

La marksismo vidas do en la klasoj kaj en la klasa fend-iĝo de la socio necesan historian evolustadion de la homaro. Ripete Markso kaj Engelso atentigis pri tio ke tia stadio ne eviteblas tiom longe, kiom la socia ĉiomlaboro liveras nur produkton kiu nur malmulte superas la necesan por la plej simpla ekzistado de ĉiuj socianoj, kaj kie la laboro postulas la tutan aŭ preskaŭ la tutan tempon de la granda plimulto de la loĝantaro. En tiu evolufazo de la homa socio ankaŭ ne eviteblas ke formiĝas klaso liberiĝinta el ĉia rekta produkt-anta laboro, kiu prizorgas la „komunajn aferojn” de la socio – la gvidadon de la produktadprocezoj, la ŝtatajn aferojn, leĝaron kaj jursistemon, sciencojn, artojn ktp.⁵⁶

El tiu strikte ekonomia klarigo de la origino de la klasoj kaj de la socia klasfendiĝo jam videblas tio, kion Markso, Engelso kaj Lenino komprenis sub klasoj. Lenino nomis la klasojn

„grandaj homgrupoj, kiuj distingiĝas inter si laŭ sia pozicio en historie determinita sistemo de la socia produktado, laŭ sia (plejparte en leĝoj fiksita kaj formulita) rilato al la produktad-rimedo, laŭ sia rolo en la socia organiziĝo de la laboro kaj sekve laŭ la maniero de akiro kaj la grandeco de la parto je la socia riĉaĵo pri kiu ili disponas. Klasoj estas grupoj de homoj, el kiuj unu povas alproprigi al si la laboron de la alia, pro la malsam-eco de ilia loko en certa sistemo de la socia ekonomio.”⁵⁷

Lenino vidis unu el la plej gravaj atingoj de la materiisma historikoncepto en tio ke ĝi ebligis atribui la senfine multspecajn kaj ŝajne ne sistemigeblajn agojn de la multaj unuopuloj al la objektiva pozicio de grandaj homgrupoj, ĝuste de la klasoj, en la socia produktadprocezo kaj klarigi ilin el

55 Karlo Markso: La kapitalo, ĉapitroj 14-25.

56 Engels: Anti-Dühring, MEW, vo. 20, p. 262.

57 Lenin: Die große Initiative, LW, vol. 29, p. 410.

3. La materiisma koncepto de historio

la vivkondiĉoj kaj interesoj kaŭzitaj de tiu pozicio.⁵⁸

La citita difino de la klasoj jam montras, ke la marksismo vidas en la rilato de la klasoj al la *produktadrimedoj* de socio la plej gravan kriterion de la klasdistingo. Tio ne signifas ke ĝi malalte taksas aliajn klasajn trajtojn – la pozicion en la socia organiziĝo de la laboro, la grandon de la parto de la socia riĉaĵo, kaj la manieron de ĝia akiro. En la Manifesto de la Komunista Partio Markso kaj Engelso emfazas la kontraŭecon de la bazaj klasoj de la respektivaj sociaj formacioj, sed montras samtempe, ke la moderna kapitalisma socio, kompare kun antaŭaj historiaj epokoj, tre simpligis la klasajn kontraŭecojn;

„liberulo kaj sklavo, patricio kaj plebano, barono kaj servutulo, gildano kaj submajstro, staris unu kontraŭ la alia en daŭra opozicio, havis seninterrompan batalon, – foje kaŝe, foje malkaŝe, batalon, kiu ĉiufoje finiĝis per revolucia transformo de la tuta socio aŭ per komuna pereco de la batalintaj klasoj.”⁵⁹

En antaŭaj epokoj de la historio ni preskaŭ ĉie trovas kompletan strukturiĝon de la socio en diversajn klasojn, multspecan gradigon de la sociaj rangoj. En la antikva Romo ni havas patriciojn, kavalirojn, plebanojn, sklavojn; en la mezepoko – feŭdajn sinjorojn, vasalojn, gildanojn, submajstrojn, servutulojn, kaj en ĉiu tia klaso siavice specifajn rangogradigojn. La burĝa socio ne forigis la klasajn antagonismojn, sed nur metis novajn klasojn, novajn subpremkondiĉojn, novajn batalformojn en la lokon de la malnovaj; ĝi simpligis la klasajn kontraŭecojn. La tuta socio fendiĝas pli kaj pli en du grandajn klasojn kiuj staras rekte unu kontraŭ la alia: burĝaron kaj proletaron.⁶⁰

58 Lenin: Der ökonomische Inhalt der Volkstümlerrichtung, LW, vol. 1, p. 425-426.

59 Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto de la Komunista Partio, v.c., p. 35 s. (laŭ la reta eld. de Franko Luin).

60 Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto de la Komunista Partio, v.c., p. 36 (reta eld.)

3.6 Klasoj kaj klasbatalo

Markso en la *Kapitalo* klarigis la procezon de proletiĝo de la socio kaj de simpligo de la klasa antagonismo precipe el la *koncentriĝo* de la kapitalo, el la ruinigo de ĉiam pli kreskanta parto de la tiel nomataj memstaruloj en industrio kaj kampkulturo pro superforta konkurenco de la grandaj kapitalistoj, do el la neniigo de la etproprieto kaj el la transformiĝo de la etproprietoj en salajrulojn, en laboristojn kaj dungitojn. tiu evoluo, la neniigo kaj sorbado de la memstaraj mezaj tavoloj, de tiam senĉese progresis. Sed ion plian, ekz-e ilian kompletan dissolviĝon jam ene de la kapitalisma socio, Markso kaj Engelso neniam antaŭdiris. Lenino jam atentigis pri tio ke la neniigo de malnovaj mezaj tavoloj en la kapitalismo iras sampaŝe kun la elformiĝo de novaj; granda kvanto de mezaj tavoloj estas nepre ĉiam denove kreataj de la kapitalismo (aneksaĵoj de la fabriko, hejmlaboro, etaj metiejoj, kiuj estiĝas pro la bezonoj de la granda industrio, ekz-e de la biciklo- kaj aŭtomobil-industrio estas disvastigitaj tra la tuta lando, ktp). Tiuj novaj etproduktistoj estas nepre reĵetataj en la vicojn de la proletaro.⁶¹

La *klasbatalon* la marksismo klarigas el la malsamaj kaj kontraŭaj *interesoj* de la klasoj, kiuj elkreskas el la ekonomiaj kondiĉoj. Sed la – de la proprietrilatoj kondiĉitaj – politika-jura kaj spirita-morala situacio de la eksplutataj, subpremataj, en senpoveco tenataj sociaj klasoj donas – surbaze de la ekonomiaj interesoj – ankaŭ gravan impulson por la klasbatalo. En la historia batalo de la klasoj Markso, Engelso kaj Lenino vidis la movfortojn de la evoluo en ĉiuj klase fenditaj sociaj formacioj.

Engelso diris: la de Markso unue malkovrita granda movleĝo de la historio estas, ke ĉiuj historiaj bataloj, ĉu okazantaj sur politika, religia, filozofia aŭ sur alie ideologia kampo, estas efektive nur la esprimiĝo de bataloj de sociaj klasoj, kaj ke la ekzistado kaj do ankaŭ la kolizioj de tiuj

61 Lenin: *Marxismus und Revisionismus*, LW, vol. 15, p. 27.

3. La materiisma koncepto de historio

klasoj estas siavice kondiĉitaj de la evolugrado de sia ekonomia situacio, de la maniero de sia produktado kaj de sia per tiu kondiĉita interŝanĝado.⁶²

La marksismo distingas inter la objektiva socia situacio de klaso kaj la subjektiva konscio de la situacio de siaj propraj interesoj. Markso montris, kiel la laboristoj en la batalo pri sia salajro koalicias en labor-asocioj, kaj kiel el tiuj ekonomiaj movadoj fariĝas politika.

„La ekonomiaj kondiĉoj unue transformis la amason de la loĝantaro en laboristojn. La potenco de la kapitalo kreis por tiu amaso komunan situacion, komunajn interesojn. Tiel tiu amaso estas jam klaso fronte al la kapitalo, sed ankoraŭ ne por si mem. En la batalo, kiun ni markis nur en kelkaj fazoj, tiu amaso spertas sian kunecon, konstituas sin kiel klaso por si mem. La interesoj, kiujn ĝi defendas, fariĝas klasinteresoj. Sed la batalo de klaso kontraŭ klaso estas politika batalo.”⁶³

Sed la marksismo neniam egaligis la objektivan socian situacion kaj la el tiu devenantan historian taskon de la laborista klaso kun ties grado de konscio aŭ kun ĝia politika sinteno en iu historia periodo. Male, ĝi eliras el la tezo ke la laborista klaso konsistigas laŭ la ebleco, laŭ la *potenco*, la decidan forton de la hodiaŭa socio. Ĝi povas reale fariĝi tiu forto nur se ĝi fariĝas el „klaso per si” „klaso por si”, se ĝi akiras la konscion de sia ĉioma intereso kiel klaso kaj laŭ tiu konscio agas politike. Tiusence Markso skribas, ke la laborista klaso posedas elementon de sia sukceso, la nombron; sed „*nombroj falas en la pesiltason nur se kombiniĝo unuigas ilin kaj kono gvidas ilin.*”⁶⁴

Markso atentigis pri tio ke ĉia movado de klaso, kiu provas trudi siajn interesojn en ĝenerala, socie deviga

62 Engels: Vorrede zur 3. Auflage von Marx' 'Der achtzehnte Brumaire des Louis Bonaparte', MEW, vol. 21, p. 249.

63 Karlo Markso: La mizero de la filozofio ..., v.c., p. 183-184.

64 Marx: Inauguraladresse der Internationalen Arbeiterassoziation, MEW, vol. 16, p. 12.

3.6 Klasoj kaj klasbatalo

formo, do en la formo de leĝoj, estas movado politika.⁶⁵ Tiuj politikaj movadoj alprenas en la historio pli aŭ malpli frue, laŭ la akriĝo de la klasa antagonismo kaj la grado de matureco de la klasoj, la karakteron de batalo pri la politika potenco. Tiel, Markso kaj Engelso diras en la Manifesto de la Komunista Partio, ke „*la unua paŝo*” en la laborista revolucio estas „*la leviĝo de la proletaro al reganta klaso, la elbatalado de la demokratio*”.⁶⁶

En siaj historiaj kaj politikaj verkoj Markso, Engelso kaj Lenino profunde analizis la siatempajn klasbatalojn kaj speciale la batalojn de la laborista klaso. Pri la enhavo kaj la formoj de tiu klasbatalo ni traktu en la lasta ĉapitro. Tiel, kiel ili en strikte scienca maniero klarigis la estiĝon de la klasoj kaj de la diversaj historiaj bataloj el la ekonomiaj vivkondiĉoj de la socio, tiel ili respondis ankaŭ la demandon pri la ebleco superi la klasan fendiĝon kaj starigi *senklasan* sacion surbaze de la konkretaj sociekonomiaj kondiĉoj kreitaj de la kapitalismo.

La fendiĝo de la socio en klasojn, klarigas Engelso, havis sub certaj kondiĉoj historian pravecon, ĝi baziĝis sur la nesufiĉeco de la produktadnivelo; ĝi estas superata per la plena disvolviĝo de la modernaj produktadfortoj. La forigo de la klasoj premisas historian evolugradon, sur kiu ne nur la ekzisto de iu aŭ alia reganta klaso, sed de posedanta klaso entute fariĝis anakronismo. Ĝi premisas altan gradon de produktadevoluo, sur kiu alproprigo de la produktadrimedoj kaj de la produktoj, kaj per tio de la politika regado, de la monopollo de klereco kaj de spiritalaj atingoj fare de aparta socia klaso fariĝis ne nur superflua, sed ankaŭ obstaklo por la ekonomia, politika kaj intelekta evoluo. Tiu punkto estas, laŭ Engelso, nun atingita. La ebleco certigi al ĉiuj membroj de la socio per socia produktado ekzistadon

65 Marx an Bolte, 1871-11-23, MEW, vol. 33, p. 332-333.

66 Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto de la Komunista Partio, v.c., p. 61 (reta versio).

3. La materiisma koncepto de historio

kiu ne nur materie plene sufiĉas kaj ĉiutage pliriĉiĝas, sed kiu garantias al ili ankaŭ la plenan liberan elformiĝon kaj praktikadon de siaj korpaj kaj spiritaj talentoj, tiu ebleco estas nun, laŭ Engelso, por la unua fojo donita.⁶⁷

⁶⁷ Engels: Anti-Dühring, MEW, vol. 20, p. 263-264.

3.7 La ŝtato

Jam sur pli frua ŝtupo de siaj esploradoj Markso kaj Engelso trafis sur la fakton, ke la ŝtato kaj la ŝtatformoj elkreskis el la ekonomia evoluo de la socio kaj ne inverse. Jam en sia verko „*La germana ideologio*” ili klarigas la estiĝon de la ŝtato, kiun ili komprenas, same historie kiel ĉiujn ceterajn sociajn fenomenojn, el la konkurenco, do el la ekzisto de antagonismaj klasoj. La materia vivo de la individuoj – kiu dependas tute ne nur de ilia sola volo –, la reciproke sin kondiĉantaj produktadmaniero kaj cirkuladformo estas „*la reala bazo de la ŝtato*” kaj restas tia sur ĉiuj ŝtupoj, sur kiuj ekzistas labordivido kaj privata proprieto, tute sendepende de la volo de la individuoj. Tiuj realaj kondiĉoj tute ne kreiĝis de la ŝtatpotenco, sed ili estas, male, la potenco kiu kreas tiun. La individuoj regantaj sub tiuj kondiĉoj devas doni al sia volo kondiĉita de la kondiĉoj „*ĝeneralan esprimon en formo de ŝtata volo*”, kiel leĝon, kies enhavo estas ĉiam determinata de la kondiĉoj de tiu klaso.⁶⁸

Al la idealisma koncepto, kiu vidis en la ŝtato la determinantan, sed en la ekonomiaj kondiĉoj la derivitan elementon de la socia realeco, Markso kaj Engelso kontraŭmetis do sian *materiisman* koncepton. La ŝajno, klarigis Engelso, kongruas kun la tradiciita koncepto; kiel ĉe la unuopulo ĉiuj movfortoj de siaj agoj trairas lian kapon, devas transformiĝi en motivojn de lia volo, tiel ankaŭ ĉiuj bezonoj de la socio, sendepende de kiu klaso regas, devas trairi la ŝtatan volon, por akiri ĝeneralan validecon en formo de leĝo. Tio estas la formala flanko de la afero. Sed la demando estas: kiun enhavon havas tiu nur formala volo, kaj de kie venas tiu enhavo, kial ĝuste tio estas volata kaj ne io alia. Kaj jen ni trovas, ke en la moderna historio la ŝtata volo estas determinata „*de la superpotenco de tiu aŭ alia klaso, lastinstanace de la evoluo de la produktadfortoj kaj de la interŝanĝrilatoj*”.⁶⁹

68 Marx-Engels: Die deutsche Ideologie, MEW, vol. 3, p. 311.

69 Engels: Ludwig Feuerbach, MEW, vol. 21, p. 300.

3. La materiisma koncepto de historio

Detalan prezentadon de la *estiĝo* de la ŝtato el la malnova gentordo ni trovas en la engelsa verko „*La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato*”. Tie li montras, ke la ŝtato ne estas potenco trudita al la socio elektstere, kaj same ne la „realaĵo de la morala ideo”, kiel opiniis Hegelo. La ŝtato estas, male, produkto de la socio sur certa evoluŝtupo, ĝi estas la koncedo, ke tiu socio fendiĝis en nepacigeblaj kontraŭecoj, kiujn ĝi ne povas forigi. Por ke la klasoj kun kontraŭaj ekonomiaj interesoj ne konsumu sin reciproke kaj la socion en senfrukta batalo, potenco kun pozicio ŝajne super la socio fariĝis necesa, kies tasko estas moderigi la konflikton kaj teni ĝin ene de la limoj de la „ordo”. Tiu potenco, estiĝinta el la socio, sed metante sin super ĝin kaj fariĝanta pli kaj pli fremda al ĝi, estas la ŝtato. Engelso nomas tri esencajn trajtojn, kiuj akompanas la ŝtaton ekde ĝia estiĝo: La *teritorian* strukturon, per kiu la malnovaj sangligoj de la gentanoj estis anstataŭigita; la starigon de aparta *publika potenco*, kiu jam ne kongruas kun la loĝantaro organizanta sin mem kiel armitan potencon; kaj fine la *impostojn*, kiuj fariĝas necesaj por konservado de la publika potenco.⁷⁰

Kvankam la ŝtato estiĝis el la konflikto de kontraŭaj klasinteresoj kaj el la bezono bridi klasajn kontraŭecojn, ĝi tamen tute ne staras super aŭ apud la klasoj de donita socio. Ĝi estas, male,

„ĝenerale la ŝtato de la plej potencaj, ekonomie reganta klaso, kiu pere de ĝi fariĝas ankaŭ politike reganta klaso kaj tiel akiras novajn rimedojn por subpremi kaj ekspluati la subpremitan klason. Ekzemple la antikva ŝtato estis antaŭ ĉio la ŝtato de la sklavistoj por subpremado de la sklavoj, kiel la feŭda ŝtato la organo de la nobelaro por subpremado de la servutuloj kaj servutaj kampkulturistoj kaj la moderna reprezenta ŝtato la rimedo por ekspluati dunglaboron per la kapitalo.”⁷¹

70 Frederiko Engelso: *La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato*, l.c., p. 188-190.

71 Saml., p. 190.

3.7 La ŝtato

Engelso nomas kiel escepton periodojn, dum kiuj la batalantaj klasoj troviĝas preskaŭ en ekvilibro, tiel ke la ŝtatpotenco ricevas kiel ŝajna peranto provizore certan memstarecon rilate al ili, kiel ekzemple en la absoluta monarĥio kaj en la bonapartismo.

En siaj skriboj pri la ŝtatoj Markso, Engelso kaj Lenino ĉiam denove emfazas tiun *enhavan* flankon de sia ŝtatteorio: la ŝtaton kiel instrumenton de la regado de iu klaso super unu aŭ pluraj aliaj, sendependa de la formoj de la regado kondiĉitaj de la respektivaj konkretaj historiaj kondiĉoj kaj speciale de la fortrilato de la klasoj. La *politika* dominado havas sian bazon en la *ekonomia* dominado, en la proprieto kaj en la el tiu derivita disponpovo pri la produktadrimedoj de la socio. Por tiu principa aspekto de ĉia ŝtato – la klasregado – la marksimo uzas ankaŭ la noción de *klasa diktatoreco* aŭ diktatoreco. Ambaŭ terminoj estas sinonimaj por politika dominado, por la disponpovo pri la politikaj fortrimedoj (armeo, polico, justec- kaj administra aparato). Tiusence, kaj tute ne en la senco de manko de demokratiaj rajtoj kaj institucioj, la marksisma ŝtatteorio distingas ekz-e nobeldiktatorecon, diktatorecon de la burĝaro kaj diktatorecon de la proletaro. En sia fama verko „Ŝtato kaj revolucio” Lenino formulas tiun ideon jene:

„La formoj de la burĝaj ŝtatoj estas eksterordinare multspecaj, ilia esenco estas tamen unu sama: Ĉiuj tiuj ŝtatoj estas iaj aŭ aliaj, sed en lasta konsekvenco nepre *diktatoreco de la burĝaro*. La transiro de la kapitalismo al komunismo devas kompreneble produkti gigantan amplekson kaj diversecon de la politikaj formoj, sed la esenco ĉe tio estos nepre tio sama: la *diktatoreco de la proletaro*.“⁷²

Ĉia prezento aŭ interpreto de la marksisma ŝtatteorio, kiu malrespektas la vidpunkton, ke la nocio de diktatoreco estas tie uzata tute sendepende de la politikaj formoj de la regado, nur en la senco de la baza nocio de klasa dominado

72 Lenin: Staat und Revolution, LW, vol. 25, p. 425.

3. La materiisma koncepto de historio

entute, signifas do falsadon de tiu teorio. Kompreneble Markso, Engelso kaj Lenino neniam pretervidis la gravecon de diversaj ŝtatformoj por la situacio kaj la batalo de la laborista klaso kaj de la laborista movado. Ili ĉiam engaĝiĝis teorie kaj praktike por tio, ke la laboristoj devas jam en la burĝa socio elbatali kiom eble plej grandan mezuron da demokratiaj rajtoj. En la burĝa-demokratia respubliko ili vidis la plej bonan kondiĉon por la batalo por emancipiĝo de la laborista klaso. Sed ili aldonis, ke eĉ la plej demokratia burĝa respubliko, en kiu la kapitalisma proprieto je produktadrimedoj dominas, estas klasa regado de la burĝaro. La demokratia respubliko, diris Engelso, ja oficiale koncerne la voĉdonrajton kaj aliajn politikajn rajtojn jam nenion scias pri proprietaj diferencoj. En ĝi la riĉularo uzas sian potencon malrekte, sed des pli sekure, unuflanke en la formo de korupteco de la oficistaro, por kiu Usono estas la klasika modelo, aliflanke en formo de alianco inter registaro kaj borso.⁷³

La esencan diferencon inter la klasa regado de la burĝaro kaj tiu de la proletaro, do ankaŭ inter burĝa kaj proleta demokratio, Markso, Engelso kaj Lenino klarigis per la fundamenta diferenco inter ekspluatantaj kaj ekspluatataj sociaj klasoj. La movado de la laborista klaso kiel „*la memstara movado de la giganta plimulto en la intereso de la giganta plimulto*” devas nepre produkti multe pli profundan, realan demokration, ne limigitan de la mallarĝaj baroj de la propriet-monopolo de eta malplimulto, ne nur formalan, sed realan, por la vastaj laborantaj amasoj. En tiu senco Markso kaj Engelso parolas en la „*Manifesto de la Komunista Partio*” pri la leviĝo de la proletaro al reganta klaso kiel samsignifa kun la „*elbatalo de la demokratio*”.⁷⁴

Lenino nomas kiel la decidan diferencon inter burĝa kaj proleta demokratio, ke la unua metas la akcenton sur la

73 Frederiko Engelso: La origino de la familio ..., v.c., p. 191.

74 Markso-Engelso: Manifesto de la ..., e-libro, v.c., p. 61.

3.7 La ŝtato

solena kaj pompa proklamo de iaj liberecoj kaj rajtoj, sed envere ne permesas al la plej granda parto de la loĝantaro, al la laboristoj kaj terkulturistoj, uzi tiujn rajtojn eĉ nur iom sufiĉe, dum inverse la proleta demokratio metas la akcenton sur tio, ĝuste al la amasoj da laboruloj, kiuj estis ekspluatataj de la kapitalo, „*garantii en la praktiko la efektivan aliron al la mastrumado de la ŝtato*”, doni al ili la eblecon „*uzi praktike la havaĵojn de la kulturo, de la civilizacio kaj de la demokratio*”.⁷⁵

Inter la funkcioj, kiujn la ŝtato plenumas en ĉia klase dividita socio, la marksisma ŝtatteorio emfazas ĉefe la funkcion kiel subprem-instrumento kontraŭ tiuj klasoj kaj tavoloj kiuj ne disponas pri la produktadrimedoj. Protekto kaj konservado de la ekzistantaj proprietrilatoj, garantio de la ĝeneralaj sociaj kondiĉoj de ilia reproduktado – tiu ĝia baza funkcio en socio baziĝanta sur la antagonismo de alproprigaj kaj laborantaj klasoj ne plenumebblas nur per organizaj-administraj aŭ ideologiaj-pedagogiaj rimedoj. Por tio necesas diversaj instrumentoj de devigo, de subpremo, de perforto: „*La politika forto en sia propra signifo estas la organizita forto de unu klaso por la subpremado de alia.*”⁷⁶

Markso atentigis ĉefe en siaj historiaj skriboj pri la franca evoluo en la 19-a jarcento pri tio, ke ŝtato kaj ŝtatmaŝinaro en la diversaj stadioj de la burĝa evoluo spertas eksterordinaran pufiĝon. Li nomis kiel taskon de ĉia vera popolrevolucio sur la eŭropa kontinento, „*jam ne, kiel ĝis nun, transmeti tiujn militan-burokratian maŝinaron servantan al la kapitalistoj kaj grundposedantoj ... el unu mano en la alian, sed ĝin rompi*”. Markso vidis en la Pariza Komunumo de 1871 la unuan historian provon de la laborista klaso plenumi ĝuste tion.⁷⁷ Lenino konsideris tiun konstaton

75 Lenin: Entwurf des Programms der KPR (B), LW, vol. 29, p. 94.

76 Marx kaj Engels: Manifesto de la ..., e-libro, v.c., p. 62.

77 Marx an L. Kugelmann [Markso al L. Kugelmann], 1871-04-12, MEW, vol. 33, p. 205.

3. La materiisma koncepto de historio

kiel *fundamentan* en la marksisma ŝtatinstruo.⁷⁸ Sed jam antaŭ la rusa Oktobra Revolucio de 1917 li aldonis, ke krom tiu precipe subprema aparato de la burĝa ŝtato ekzistas alia aparato kiu servas precipe la kalkuladon kaj registradon kaj kiun la laborista klaso, post esti ĝin liberiginta el la subordigo sub la kapitalo, devas utiligi por la konstruado de sia propra ŝtato.⁷⁹

La fakto, ke Markso, Engelso kaj Lenino klarigas la estiĝon kaj la karakteron de la respektiva ŝtatpotenco el la ekonomiaj kondiĉoj, tute ne signifas ke ili ne konsideris la retroefikon de la ŝtato sur la ekonomian bazon. Engelso atentigis pri tio, ke la ŝtato, post kiam ĝi estiĝis, ĝenerale sekvas la evoluon de la ekonomia bazo, sed ke ĝi ankaŭ disvolvas relativan memstarecon kaj ke ĝi siavice retroefikas sur la ekonomiajn kondiĉojn. Temas pri reciproka efiko de du malsamaj fortoj, de la ekonomia movado unuflanke, kaj aliflanke de la politika potenco provizita per propra movado; la ekonomia movado en la esenco trudiĝas, sed ĝi suferas ankaŭ retroefikon. Tiu retroefiko de la ŝtatpotenco povas esti trispeca, ĝi povas iri en la saman direkton kiel la ekonomia evoluo, tiam tiu antaŭen iras pli rapide; ĝi povas, male, iri kontraŭ ĝi, tiam ĝi en ĉiu granda lando pereas; aŭ ĝi povas preskribi al la ekonomia evoluo certajn direktojn kaj fortranĉi aliajn, kio reduktiĝas al unu el la supre menciitaj kazoj.⁸⁰

La marksismo vidas en la ŝtato *historian* fenomenon, kiu, same kiel ĝi estiĝis kun la fendiĝo de la socio en malamikajn klasojn, ankaŭ forpasos kun la superado de tiu fendiĝo. Jam pri la ŝtato de la laborista klaso – pri la provo de la Pariza Komunumo same kiel ankaŭ pri la sovetpotenco –

78 Lenin: Staat und Revolution, LW, vol. 25, p. 418.

79 Lenin: Werden die Bolschewiki die Staatsmacht behaupten? LW, vol. 26, p. 89.

80 Engels an C. Schmidt [Engelso al C. Schmidt], 1890-10-27, MEW, vol. 37, p. 490-491.

3.7 La ŝtato

Engelso kaj Lenino diras, ke ili jam estas „*ne plu ŝtato en ĝia propra senco*”, sed „*la transiro de ŝtato al neŝtato*”.⁸¹ La marksisma ŝtatteorio eliras de tio, ke la ŝtato en la procezo de la evoluo de la komunisma socio formortos kiel *aparta* publika potenco.

La ŝtato – kiel Engelso klarigas tiun penson – estis la oficiala reprezentanto de la socio, ties resumo en videbla korpo, sed ĝi estis tia nur tiom, kiom ĝi estis ŝtato de la reganta klaso – de la sklavistoj, de la feŭda nobelaro, de la burĝaro. Per tio, ke ĝi fine fariĝas la reprezentanto de la tuta socio, ĝi superfluigas sin mem:

„Ekde kiam ne plu ekzistas socia klaso subpremenda, ekde kiam foriĝis kun la klasa regado kaj kun la batalo por la individua ekzistado, estiĝinta pro la ĝisnuna anarĥio de la produktado, ankaŭ la kolizioj kaj ekscesoj, kiuj fontas el ĝi, ekde tiam ne plu ekzistas io subpremenda kio necesigus apartan subpremorton en la nomo de la socio, do ŝtaton. La unua ago, en kiu la ŝtato aperas efektive kiel reprezentanto de la tuta socio – la alproprigo de la produktadrimedo en la nomo de la tuta socio – estas samtempe ĝia lasta memstara ago kiel ŝtato. La interveno de ŝtata potenco en sociajn rilatojn superfluigas en unu kampo post la alia kaj poste endormiĝas per si mem. Sur la lokon de la regado super personoj venas la administrado de aĵoj kaj la gvidado de produktadprocezoj. La ŝtato ne estas ‘forigata’, ĝi formortas.”⁸²

Lenino emfazis, ke tio estos historia procezo „*de longa daŭro*”, kiu dependas de la evolu-rapideco de la pli alta fazo – ne rekte estiĝinta el la kapitalismo – de la komunisma socio, sed ke en tiu estonteco la subordiĝo de unu homo sub la alia, de parto de la loĝantaro sub la alia, malaperos, ĉar la homoj kutimiĝos „*respekti la elementajn regulojn de la socia kunvivado sen perforto kaj sen submetiĝo*”.⁸³

81 Engels an A. Bebel [Engelso al A. Bebel], 1875-03-18/28, MEW, vol. 34, p. 128; Lenin: Staat und Revolution, LW, vol. 25, p. 445.

82 Engels: Anti-Dühring, MEW, vol. 10, p. 261-262.

83 Lenin: Staat und Revolution, LW, vol. 25, p. 483, 469-470.

4. La politika ekonomio

La politika ekonomio okupas elstaran lokon en la teorio de la marksismo kaj speciale en la verko de Karlo Markso. La tri volumoj de la scienca ĉefverko de Markso, la *Kapitalo* kaj la du libroj de la *Teorioj pri la plusvaloro* [originale: „*Theorien über den Mehrwert*“], kiuj iel konsistigas la kvaran volumon de la *Kapitalo*, okupis Markson preskaŭ kvar jardekojn de lia vivo. La eldonado de la dua kaj tria volumoj estis prizorgita de Frederiko Engelso, la *Teorioj pri la plusvaloro* estis unuafoje eldonita – en science ne kontentiga versio – en la jaroj 1905-1910 de Karlo Kaŭcko¹, en sia nuna formo de la Moskva Instituto por Marksismo-Leninismo. Ankaŭ kelkaj el la plej gravaj verkoj de Lenino temas pri la politika ekonomio, inter ili precipe *La evoluo de la kapitalismo en Ruslando* (1899), *La kampkultura programo de la socialdemokratio en la unua rusa revolucio de 1905 ĝis 1907* (1908) kaj *La imperiismo, la plej alta stadio de la kapitalismo* (1916).

Engelso difinis la politikan ekonomion

„kiel sciencon pri la kondiĉoj kaj formoj, sub kiuj la diversaj homaj socioj produktis kaj interŝanĝis, kaj sub kiuj ili laŭ tio ĉiufoje distribuis la produktojn”.²

Tiujn leĝojn, kaj per tio la enhavon de la politika ekonomio, la marksismo konsideras diversaj, laŭ la respektiva socia formacio kaj produktadmaniero. Pri sia ĉefverko, *La kapitalo*, Markso diris, ke la verko celas senvualigi la ekonomian moviĝleĝon de la moderna socio, de la kapitalismo.³ Li esploris en la *Kapitalo* la historian procezon de la estiĝo, de la disvolviĝo kaj de la kadukiĝo de la kapitalisma socio. Ĉe tio li daŭrigis la rezultojn de la klasika angla ekonomiko,

1 Originale: Karl Kautsky. -vl

2 Engels: Anti-Dühring, MEW, vol. 20, p. 139.

3 Karlo Markso: La kapitalo, ... ĉapitroj 1-9, v.c., p. 17.

4. La politika ekonomio

speciale de William Petty, Adam Smith kaj David Ricardo.

La politika ekonomio kiel scenco pri la materiaj bazoj de donita socio estas nature ligita aparte dense kun la interesoj de iu aŭ alia klaso. En la antaŭparolo al la unua eldono de la *Kapitalo* Markso diras, ke sur la kampo de la politika ekonomio la scienca esplorado renkontas ne nur la samajn malamikojn kiel sur aliaj kampoj, sed la

„aparta naturo de la afero kiun ĝi pritraktas alvokas kontraŭ ĝi al batalo la plej akrajn, plej etanimajn kaj plej malamajn pasiojn de la homa brusto, la furiojn de la privatintereso“⁴.

En la postparolo al la dua eldono de la *kapitalo* Markso atentigas pri tio ke la burĝa politika ekonomio povis resti scienco nur tiom longe kiom la klasbatalo restis latentita aŭ montriĝis nur okaze:

„En la jaro 1830 komenciĝis la finfine decida krizo. La burĝaro estis konkerinta en Francio kaj Anglio politikan potencon. Ekde tiam la klasbatalo alprenis, praktike kaj teorie, pli kaj pli eksplikitajn kaj minacajn formojn. Ĝi sonorigis la morttintilon de la scienca burĝa ekonomio. Nun jam ne temis pri tio, ĉu tiu aŭ alia teoremo estas vera, sed ĉu ĝi estas utila al la kapitalo aŭ malutila, komforta aŭ malkomforta, ĉu kontraŭa aŭ ne al la polico.“⁵

Tio estis la degradiĝo de la klasika burĝa ekonomio al vulgarekonomio, kiu, kiel Markso enfazis, jam ne „*esploras la internan kunteniĝon de la burĝaj produktadkondiĉoj*“, sed „*kiu vagadas nur ene de la ŝajna kunteniĝo*“.⁶

Du jarojn post la morto de Markso, 1885, en la antaŭparolo al la dua volumo de la *Kapitalo*, eldonita de Frederiko Engelso, tiu prezentis la specifan sciencan atingon de Markso kiel ekonomikisto kompare kun liaj antaŭuloj en la teorio pri la plusvaloro, kiel Lavoisier la vera fondinto de la

4 Saml.

5 Saml., p. 22.

6 Saml., p. 98.

4. La politika ekonomio

moderna ĥemio kompare kun Priestley kaj Scheele, kiuj ja prezentis la oksigenon, sed sen supozi la signifon de ilia prezentado. La *ekzistado* de la valorparto de la produkto, kiun ni nun nomas plusvaloro, estis rimarkita longe antaŭ Markso; same estis jam eldirita el kiu ĝi konsistas, nome el la produkto de la laboro por kiu la alproprigisto ne pagis ekvivalenton. Sed oni ne progresis pli:

„La unuaj – la klasikaj burĝaj ekonomikistoj – en la plej bona kazo esploris la proporcion de la grandoj, laŭ kiu la laborprodukto estas distribuata inter la laboristo kaj la posedanto de la produktadrimedoj. La aliaj – la socialistoj – juĝis tiun distribuadon maljusta kaj serĉis utopiajn rimedojn por forigi tiun maljustecon. Ambaŭ restis kaptitaj en tiaj ekonomiaj kategorioj kiajn ili estis trovintaj.

Jen aperis Markso. Kaj en preciza kontraŭdiro al ĉiuj siaj antaŭuloj. Tie, kie tiuj vidis *solvon*, li vidis nur *problemon*. Li vidis, ke ĉi tie ne temas pri nura konstato de ekonomia fakto, ĉu pri la konflikto de tiu fakto kun la eterna justeco kaj kun la vera moralo, sed pri fakto alvokita transformi la tutan ekonomion kaj kiu donis la ŝlosilon por la kompreno de la tuta kapitalisma produktado – por tiu, kiu sciis uzi ĝin. Per tiu fakto li esploris ĉiujn ekzistantajn kategoriojn. Por scii, kio estas la plusvaloro, li devis scii, kio estas la valoro. La valorteorio de Ricardo mem estis submetenda al la kritiko. Do, Markso esploris la laboron laŭ la vidpunkto de ĝia valorestiga kvalito kaj konstatis por la unua fojo, kia laboro estigas valoron kaj kial, kaj ke valoro estas entute nenio ol tia laboro koaguliĝinta.

Poste Markso esploris la rilaton de varo kaj mono, kaj li pruvis, kiel kaj kial, pro ĝia imanenta valoreco, la varo kaj la varinterŝanĝo devas produkti la kontraŭecon de varo kaj mono; lia monteorio, bazita sur tio, estas la unua detala kaj nun silente kaj ĝenerale akceptita monteorio. Li esploris la transformiĝon de mono en kapitalon kaj pruvis, ke ĝi baziĝas sur la aĉeto kaj vendo de la laborforto. Per tio ke li ĉi tie anstataŭigis la laboron per la laborforto, la valorestiga eco, li unufrape solvis unu el la malfacilaĵoj ĉe kiuj la Ricardo-a skolo fiaskis: la neeblo akordigi la reciproke interŝanĝon de kapitalo kaj laboro kun la Ricardo-a leĝo de valordeterminado per laboro. Per tio ke li

4. La politika ekonomio

konstatis la distingon de la kapitalo en konstanta kaj varia kapitalo, li sukcesis unue detale prezenti la procezon de estigo de la plusvaloro en ĝia reala sinsekvo kaj per tio klarigi ĝin – kion neniu el liaj antaŭuloj sukcesis; ... li plue esploris la plusvaloron kaj trovis ĝiajn du formojn: la absolutan kaj la relativan plusvaloron, kaj pruvis ilian diversan, sed ambaŭflanke decidan rolon kiun ili ludis en la historia evoluo de la kapitalisma produktado. Surbaze de la plusvaloro li disvolvis la unuan racian teorion de la salajro kiun ni posedas, kaj li donis por la unua fojo la bazajn trajtojn de la historio de la kapitalisma akumulado kaj prezentadon de ĝia historia tendenco.”⁷

⁷ Engels: Vorwort zum 2. Band des ‘Kapital’ [Engelso: Antaŭparolo al la 2-a volumo de la ‘kapitalo’, MEW, vol. 24, p. 16-17.

4.1 Estiĝo kaj disvolvado de la kapitalisma produktadmaniero

Karlo Markso, malsame ol la utopiaj socialistaj tendencoj, ne simple rifuzis la kapitalisman produktadmanieron kaj ties efikojn kiel senvalorajn, sed klarigis ilin, esploris ilin en ilia historia kunteksto, en ilia dumtempa historia neceso kaj iliajn immanentajn leĝojn. Jam en la *Manifesto de la Komunista Partio*, kiu aperis en la jaro 1848, Markso kaj Engelso atentigis pri la giganta kresko de la produktadfortoj, kiujn la kapitalismo estigis kompare kun la feŭdismo kaj kun ĉiuj antaŭaj sociaj formacioj.

„Dum sia apenaŭ centjara klasa regado la burĝaro kreis pli da amasaj kaj pli da kolosaj produktado-fortoj ol ĉiuj antaŭaj generacioj kune. Subjugigo de naturfortoj al la homo, maŝinaro, aplikado de la kemio por industrio kaj agrokulturo, vaporŝipado, fervojoj, elektraj telegrafoj, kultivado de kompletaj mondpartoj, navigebligo de riveroj, tutaj loĝantaroj kvazaŭ elpremitaj el la tero – kiu antaŭa jarcento antaŭsentis, ke tiaj produktado-fortoj dormetis en la sino de la socia laboro?”⁸

Samtempe Markso kaj Engelso jam en la *Manifesto* emfazis ke la kapitalismo kun tiu rapidega evoluo de la produktadfortoj estis revoluciiginta ankaŭ ĉiujn sociajn kondiĉojn pli profunde kaj pli konsekvence ol ĉiuj antaŭaj ekonomiaj epokoj:

„La konstanta revoluciigo de la produktado, la seninterrompa skuado de ĉiuj sociaj statoj, la eterna necerteco kaj moviĝo distingas la epokon de la burĝaro disde ĉiuj aliaj antaŭaj. Ĉiuj fikse enrustiĝintaj rilatoj kun sia postsekvo de malnove honorindaj imagoj kaj vidpunktoj estas dissolvataj, ĉiuj nove formiĝintaj malnoviĝas antaŭ ol ili povas rigidiĝi. Ĉio solida kaj daŭra forvaporigas, ĉio sankta estas profanata, kaj la homoj finfine estas devigataj rigardi per sobraj okuloj sian vivpozicion, siajn reciprokajn rilatojn.”⁹

8 Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto de la Komunista Partio, v.c., p. 41-42.

9 Saml., p. 39-40.

4.1 Estiĝo kaj disvolvado de la kapitalisma produktadmaniero

Tiu antaŭe nekonata rapideco, etendiĝo kaj intenso de la ekonomia evoluo estis de la komenca kapitalismo aĉetita per la plej teruraj sociaj malbonaĵoj kaj katastrofoj, per senprecedenca detruado de homaj kaj materiaj fortoj kaj resursoj. Ĉu la kapitalo, demandas Markso, *„iam ajn sukcesis fari progreson sen treni individuojn kaj tutajn popolojn tra sango kaj koto, tra mizero kaj humiligo?”* Kaj li skizas la mondhistorian lokon de la kapitalisma produktadmaniero jene:

„La burĝa periodo de la historio kreis la materian bazon de nova mondo: unuflanke la mondan trafikon baziĝantan sur la reciproka dependeco de la popoloj kaj la por tio necesajn trafikilojn, aliflanke la disvolvadon de la homaj produktadfortoj kaj la transformadon de la materia produktado en sciencan regadon de la naturfortoj. Burĝa industrio kaj burĝa komerco kreas tiujn materiajn premisojn de nova mondo, same kiel geologiaj revolucioj kreis la surfacon de la Tero. Nur kiam granda socia revolucio majstris la rezultojn de la burĝa epoko, la mondmerkato kaj la modernajn produktadfortojn, kaj submetis ilin al la komuna kontrolado de la plej progresintaj popoloj, nur tiam la homa progreso ne plu similas al tiu aĉa pagana idolo, kiu volis trinki la nektaron nur el la kranioj de mortgitoj.”¹⁰

En la *Kapitalo* Markso prezentis la genezon kaj la evoluon de la kapitalisma socio. Li montris, ke la transiro el la feŭda produktadmaniero fariĝas tie, kie la mon- aŭ varposedanto kapablas antaŭpagi konsiderindan sumon – en alteco super la mezepoka maksimumo – por la produktado.¹¹ Tiu evoluo okazas sur du vojoj: aŭ la produktisto fariĝas komercisto kaj kapitalisto, kontraste al la kampkultura naturaĵ-ekonomio kaj al la gilde ligita mezepoka metio; tiu estas laŭ Markso la vere revoluciiga vojo. Aŭ inverse, la komercisto akaparas rekte la produktadon, vojo, kiu unue

10 Marx: Die künftigen Ergebnisse der britischen Herrschaft in Indien [La estontaj rezultoj de la brita regado en Hindio], MEW, vol. 9, p. 226.

11 Karlo Markso: La kapitalo, ... ĉapitroj unua ĝis naŭa, p. 360.

4. La politika ekonomio

ne revoluciigas la produktadmanieron mem. Ĉe la transformado de la feŭda en la kapitalisman produktadmanieron ludis gravan rolon la komerco, kiu varigas la produkton, *„parte per tio ke ĝi kreas merkaton, parte per tio ke ĝi kondukas al la produktado novajn krud- kaj help-materialojn kaj per tio fondas produktadajn branĉojn, kiuj baziĝas sur la komerco, sur la produktado por la merkato“*.¹²

Prezentante la tiel nomatan originan akumuladon de la kapitalo, Markso montras, ke tiuj elementoj sole ne sufiĉintus, se la mon- respektive var-posedanto ne trovintus sur la merkato laborfortojn, kiuj estis en duobla senco liberaj: liberaj je ligoj al la tero, al feŭda mastro aŭ al la regado de la gildoj; kaj libera je proprieto je produktadrimedoj.

Mono kaj varo ne estas apriorie kapitalo, same kiel ankaŭ produktad- kaj viv-rimedoj ne estas apriorie kapitalo, diras Markso. Tiu transformiĝo okazas nur se du tre malsamaj varposedantoj kontaktiĝas, unuflanke posedantoj de mon-, produktad- kaj viv-rimedoj, kiuj volas plivalorigi sian valorsumon per aĉeto de fremda laborforto, aliflanke liberaj laboristoj, kiuj vendas sian propran laborforton:

*„liberaj laboristoj en la duobla senco, ke nek ili mem apartenas rekte al la produktadrimedoj kiel sklavoj, servutuloj ktp, nek la produktadrimedoj apartenas al ili, kiel ĉe la memmastrumanta terkulturisto ktp, ke ili estas do liberaj kaj senaj je ili. Per tiu dupolusigo de la varmerkato la bazaj kondiĉoj de la kapitalisma produktado estas donitaj. La kapitalrilato premias la disigon de la laboristoj kaj la proprieto je la realiĝkondiĉoj de la laboro. ... La procezo, kiu kreas la kapitalrilaton, povas do esti nenio alia ol la disigoprocezo de la laboristo disde la proprieto je liaj laborkondiĉoj, procezo kiu unuflanke transformas la sociajn viv- kaj produktad-rimedojn en kapitalon, aliflanke la rektajn produktistojn en dunglaboristojn.“*¹³

Per la ekzemplo de Anglio Markso priskribis la terurajn

12 Marx. Das Kapital, 3-a volumo, MEW, vol. 25, p. 346-349.

13 Karl Marx: Das Kapital, 1-a vol., MEW, vol. 23, p. 742.

4.1 Estiĝo kaj disvolvado de la kapitalisma produktadmaniero

cirkonstancojn, en kiuj per eksproprieto de la kampara loĝantaro je sia grundo tiu amaso de proletoj estis liberigita por la industria kapitalisma disvolvado. Li montris samtempe, ke la eksproprieto de multaj memmastrumantaj terkulturistoj kondukis ankaŭ al la neniigo de la kamparaj sekundaraj industrioj kaj tiel kreis por la kapitalisma produktado la internan merkaton, kiun ĝi bezonis.¹⁴ Markso indikas krome la grandan rolon kiun ludis la malkovro de la or- kaj arĝent-landoj en Ameriko kaj la konkero kaj ekspluatado de kolonioj por la plena elformiĝo de la kapitalisma produktadmaniero.¹⁵

En la *Kapitalo* Markso detale esploris, kiel la moderna granda produktado estiĝis el la mezepoka entrepreneto en la tri ŝtupoj de simpla kunlaborado, de manufakturo kaj de la maŝina industrio.

„La formo de la laboro de multaj, kiuj en la sama produktadprocezo aŭ en diversaj, sed kuntenaj produktadprocezoj laboras laŭplane unu apud kaj kun la alia, nomiĝas kunlaborado.”¹⁶

La kunlaborado, baziĝanta sur la labordivido, kreas al si sian klasikan formon en la *manufakturo*, kiu estiĝas en duobla maniero, diras Markso. Aŭ laboristoj el diversaj, memstaraj metioj estas *kunigitaj* en unu laborejo sub la komando de la sama kapitalisto. Aŭ multaj metiistoj, kiuj faras la samon aŭ ion samspecan, estas laborigataj de la sama kapitalisto samtempe en la sama laborejo. Do, unuflanke la manufakturo enkondukas aŭ plu disvolvas labordividon en unu saman produktadprocezon, aliflanke ĝi kombinas antaŭe diversajn metiojn. Sed ĉu simpla aŭ kunmetita, la produktado restas *metieca* kaj do dependa de forto, lerteco, rapideco, certeco de la unuopa laboristo en la manipulado de sia laborilo. La teĥnika bazo estas mallarĝa

14 Saml., p. 775.

15 Saml., p. 779.

16 Karlo Markso: La kapitalo, ... ĉapitroj deka ĝis dektria, v.c., p. 23, 27.

4. La politika ekonomio

kaj ekskludas la sciencan analizon de la produktadprocezo.¹⁷ Aliflanke la manufakturo premisas kreskantan minimumon je kapitalo en la mano de la unuopa kapitalisto kaj la kreskantan transformadon de la sociaj viv- kaj produktadrimedoj en kapitalon.¹⁸

Sed la esenca revoluciigo de la produktado okazis nur per la maŝineca *granda industrio*, kiu naskiĝis el la manufakturo. Dum en la manufakturo la *laborforto* fariĝis elirpunkto de revoluciigo de la produktadmaniero, en la granda industrio tiun rolon transprenas la *laborrimedo*. Markso klarigas, kiel la maŝinsistemo evoluas unue sur materia bazo nekonvena por ĝi kaj devas unue krei novan bazon kongruan kun ĝia propra produktadmaniero. La unuopa maŝino restas naneca tiom longe kiom ĝi devas esti movata nur de homoj, kaj la maŝinsistemo ne povas evolui antaŭ ol la vapormaŝino anstataŭas la trovitajn movfortojn – animalon, venton, akvon. Same la granda industrio estas paralizita tiom longe kiom la maŝino mem estas produktata ankoraŭ metiece:

„La granda industrio devis do akapari sian tipan produktadrimedon, la maŝinon mem, kaj produkti maŝinojn per maŝinoj. Nur tiel ĝi kreis sian adekvatan teĥnikan bazon kaj metis ĝin sur ties proprajn piedojn.”¹⁹

Tiu giganta teĥnika revoluciigo de la produktado per la *industria revolucio* okazis, kiel Markso montris, sub sociaj kondiĉoj kiuj degradis la laboriston al nura ekipaĵo de la maŝino. La aplikado de maŝinaro per si mem mallongigas la labortagon, sed aplikata kapitalisme ĝi kondukas al longigo de la labortago; la maŝinaro faciligas la laboron, sed aplikata kapitalisme ĝi altigas ties intenson; per si mem ĝi estas venko de la homo super la naturforto, sed se ĝi estas aplikata kapitalisme, la homo estas subjugata de la naturforto;

17 Saml., p. 39-42.

18 Saml., p. 65-66.

19 Saml., p. 78, 90, 93.

4.1 Estiĝo kaj disvolvado de la kapitalisma produktadmaniero

per si mem ĝi pliigas la riĉaĵon de la produktanto, aplikata kapitalisme ĝi pli malriĉigas lin.²⁰ Markso atentigas pri tio ke la granda industrio *teĥnike* forigas la manufaturecan labordividon kun ĝia vivolonga aneksado de tuta homo al detala operacio, sed en sia kapitalisma formo reproduktas tiun labordividon eĉ pli monstre.²¹

La moderna industrio konsideras la ekzistantan formon de produktadprocezo neniam definitiva, ĝia teĥnika bazo estas do revolucia, dum tiu de ĉiuj antaŭaj produktadmanieroj estis esence konservativa. Per maŝinaro, ĥemiaj procezoj kaj aliaj metodoj ĝi revoluciigas kun la teĥnika bazo ankaŭ la funkciojn de la laboristoj kaj la sociajn kombinaĵojn de la laborprocezo. Per tio ĝi revoluciigas konstante la labordividon interne de la socio kaj senĉese ĵetas amasojn da kapitalo kaj amasojn da laboristoj el unu produktadbranĉo en la alian; pro tio la naturo de la granda industrio bezonas do ŝanĝon de la laboro, fluecon de la funkcio, ĉiuf flankan moveblon de la laboristo, kvankam ĝi en sia *kapitalisma* formo reproduktas la malnovan labordividon kun ties rigidaj apartecoj. Tiu *absoluta kontraŭdiro* forigas ĉian trankvilon, firmecon, sekurecon de la vivkondiĉo de la laboristo, konstante forbatas el lia mano kun la laborrimedo la vivrimedon kaj minacas superfluigi kun lia parta funkcio la laboriston mem. Tiu kontraŭdiro de la kapitalisma socio furiozas per seninterrompaj viktimoj de la laborista klaso, per la plej senmezura malŝparo de la laborfortoj kaj per la detruoj kaŭzataj de la socia anarĥio. Sed la kapitalisma granda industrio, ĝuste per tiu evoluo, faras demando de vivo aŭ morto

„agnoski la ŝanĝon de la laboroj kaj do kiom eble plej grandan multflankecon de la laboristoj kiel ĝeneralan socian produktadleĝon ... anstataŭigi la partan individuon, la nuran portanton de socia detalfunkcio, per la totale evoluinta individuo, por kiu

20 Saml., p.

21 Saml., p.

4. La politika ekonomio

diversaj sociaj funkcioj estas alternantaj manieroj okupiĝi".²²

Markso atentigas pri la detruoj de la naturaj produktad-kondiĉoj fare de la kapitalismo, kiu disvolvas la produktivon de la laboro per tio ke ĝi *subfosas* la fontojn de ĉia riĉaĵo, la *Teron* kaj la laboriston.²³ Samtempe li montras, kiel la kapitalismo, kiu „*en ĉiu individua afero trudas ekonomion*“, sur tutsocia nivelo kondukas al senmezura „*malŝparo de la sociaj produktadrimedoj kaj laborfortoj*“.²⁴

La *sociaj* konsekvencoj de la evoluo de la kapitalismo el la disa eta varproduktado de la mezepoko kondukis al ĉiam pli forta disvolviĝo de la *baza kontraŭdiro* de la kapitalisma socio. En la varproduktado, tia kia ĝi evoluis en la mezepoko, la proprieto je la produkto baziĝis sur *propra* laboro. La koncentriĝo de la produktadrimedoj en grandaj laborejoj – unue en la manufakturo, poste en la granda industrio – transformis ilin en *sociajn* produktadrimedojn. Sed tiuj produktadrimedoj, jam nur socie moveblaj kaj en moviĝo teneblaj, kaj iliaj produktoj estis daŭre traktataj kvazaŭ ili estus daŭre la produktadrimedoj kaj la produktoj de unuopuloj.

„Dum antaŭe“, skribas Engelso, „la posedanto de la laborrimedoj alproprigis al si la produkton, ĉar ĝi estis ĝenerale lia propra produkto, kaj ĉar fremda helplaboro estis la escepto, nun la posedanto de la laborrimedo daŭre alproprigis al si la produkton, kvankam ĝi jam ne estis lia produkto, sed ekskluzive produkto de *fremda* laboro. Tiel la nun socie produktataj produktoj estis do alproprigataj ne de tiuj, kiuj vere movis la produktadrimedojn kaj vere estigis la produktojn, sed de *kapitalistoj*. Produktadrimedoj kaj produktado fariĝis esence sociaj. Sed ili estas submetataj al formo de alproprigo, kiu premisas la privatan produktadon de unuopuloj, ĉe kiu do ĉiu posedas sian propran produkton kaj surmerkatis ĝin. La produktadmaniero estas submetata al tiu formo de alproprigo,

22 Saml., p.

23 Saml., p.

24 Saml., p.

4.1 Estiĝo kaj disvolvado de la kapitalisma produktadmaniero

kvankam ĝi nuligas ties premison. En tiu kontraŭdiro, kiu donas al la nova produktadmaniero ĝian kapitalisman karakteron, *kuŝas la tuta kolizio de la nuntempo jam ĝerme*. Ju pli la nova produktadmaniero ekregis sur ĉiuj decidaj produktadkampoj kaj en ĉiuj ekonomie decidaj landoj kaj per tio forŝovis la unuopan produktadon al sensignifaj restoj, des pli krude nepre aperis la neakordigeblo de socia produktado kaj kapitalisma alproprigo.”²⁵

25 Engels: Anti-Dühring, MEW, vol. 20, p. 252.

4.2 Varo, valoro kaj mono

En sia analizo de la produktadprocezo de la kapitalo, Markso komencas per la varo, kiu, kiel Lenino esprimis, estas „*la plej simpla, plej ordinara, plej baza, plej amasa, plej ĉiutaga, miliardoble observebla rilato de la burĝa (var-) socio*”.²⁶

La riĉeco de la socio aperas en la kapitalismo kiel giganta kolektaĵo de varoj, la unuopa varo kiel ĝia elementa formo. Por esti interŝanĝeblaj, produktoj devas esti por iu esti utila, devas do kontentigi homan bezonon. Varo estas aĵo kiu unuflanke kontentigas homan bezonon, do posedas *uzvaloron*; aliflanke aĵo fariĝas varo, se ĝi estas la produkto de *laboro* kaj estas produktita por *vendo*. En la varo kaj en la varproduktado tiel jam esprimiĝas specifaj sociaj rilatoj, nome unuflanke certa socia labordivido kaj aliflanke ekonomie memstaraj produktantoj kiuj produktas por la interŝanĝo.

En la varproduktado la uzvaloro estas samtempe la materia portanto de la *interŝanĝvaloro* de la varo. La interŝanĝvaloro aperas unue, kiel Markso diras,

„kiel la kvanta rilato, la proporcio, en kiu uzvaloroj de unu speco interŝanĝiĝas kontraŭ uzvaloroj de alia speco, rilato, kiu konstante ŝanĝiĝas kun tempo kaj loko.”.

Varoj en certaj kvantoj estas egaligitaj inter si, do devas en ili ekzisti *io komuna*. Tiu komuna bazo ne povas esti la *natura* eco de la varoj, kiu konsistigas ilian utilecon, ilian uzvaloron. Kiel uzvaloroj la varoj estas precipe de diversa kvalito, kiel interŝanĝvaloro ili povas esti nur de diversa kvanto. Tio, kio igas varojn komparebla, estas la komuna eco esti *laborprodukto*. La egaleco de du reciproke interŝanĝeblaj varoj devas kuŝi en la socia laboro elspezita por ilia produktado.

Markso montras, ke ekde kiam ni abstraktas la uzvaloron de la varoj, ni abstraktas ĉiujn iliajn utilajn flankojn kaj la

26 Lenin: Zur Frage der Dialektik, LW, vol. 38, p. 340.

4.2 Varo, valoro kaj mono

utilan karakteron de la konkreta laboro enkorpigita en ili kaj ke la laboro konkretigita en ili estas reduktita al sama homa laboro, al *abstrakte homa* laboro. Kiel enkorpiĝoj de tiu al ili komuna socia substanco la varoj estas valoroj.

„Uzvaloro aŭ havaĵo havas do nur valoron, ĉar abstrakte homa laboro estas en ĝi konkretigita aŭ materiigita.”²⁷

Se oni volas mezuri la valoron, tio fareblas nur per la kvanto da „*valorestiga substanco*” entenata en aĵo, kvanto da laboro. Sed ne laboro ĝenerale, kies efikeco povas ja esti tre malsama, estas decida por la valoro de varo, sed la mezume „*necesa socie nepra laboro labortempo*”.

„Socie necesa labortempo”, skribas Markso, estas labortempo necesa por prezenti ian ajn uzvaloron per la ekzistantaj socie normalaj produktadkondiĉoj kaj per la socie mezuma grado da lerteco kaj da intenso de la *laboro*.”²⁸

La valorgrando de varo varias kun la nivelo de la laborproduktivo, kiu estas siavice determinata per la mezuma grado de lerteco de la laboristoj, la evoluŝtupo de la scienco kaj de ĝia teĥnologia aplikeblo, la socia kombinado de la produktadprocezo, la amplekso kaj la efikeco de la produktadrimedoj kaj per la naturkondiĉoj.²⁹

La varo posedas, kiel ni vidis, uzvaloron kaj ankaŭ valoron. Tiu dueca karaktero estas kaŭzata de la *dueco* de la laboro enkorpigita en la varo, jen unu el la plej gravaj malkovroj de Karlo Markso. En la uzvaloroj la plej diversaj specoj de utila laboro estas enkorpigitaj. Tiun en tute specifa formo elspezitan laboron Markso nomas la *konkreta* laboro, la laboro de la lignaĵisto, tajloro, ŝuisto ktp, kiu kreas la uzvaloron de varo. Kiel formanto de uzvaloroj, kiel utila laboro, la laboro estas do ekzistkondiĉo de la homo,

27 Karlo Markso: La kapitalo, volumo I, ĉapitroj unua ĝis naŭa, v.c., p. 51.

28 Saml., p. 52.

29 Saml., p. 53.

4. La politika ekonomio

sendependa de ĉiaj sociaj formoj, eterna naturneceso.³⁰

Sed ĉe la interŝanĝo de varoj la diversaj specoj de konkreta laboro estas egaligataj unu kun la alia. Sekve malantaŭ la diversaj specoj de laboro devas kaŝiĝi io komuna al ĉiuj. Tio estas, kiel Markso pruvas, la produktiva elspezo de homa cerba, nerva kaj muskola forto, de laborforto entute, de same homa aŭ *abstrakta laboro*. Tiu estas la valorestiga laboro; la valoro de la varo prezentas ĝeneralan homan laboron, la ĝeneralan elspezon de homa laboro. Pli malgranda kvanto da komplika laboro estas, koncerne la varvaloron, egaligata al pli granda kvanto da pli simpla laboro.³¹

„Ĉia laboro“, diras Markso, „estas unuflanke elspezo de homa laborforto en fiziologia senco, kaj en tiu eco de sama homa aŭ abstrakte homa laboro ĝi estigas la varvaloron. Ĉia laboro estas aliflanke elspezo de homa laborforto en aparta laŭcela formo, kaj en tiu eco de konkreta utila laboro ĝi produktas uzvalorojn.“³²

Markso emfazas ke unue necesis certa ŝtupo de socia evoluo, la disvolviĝo de la varproduktado, por ebligi la komprenon de tiu fundamenta komplekso.

„La sekreto de la valor esprimo, la sameco kaj sama valideco de ĉiuj laboroj, ĉar – kaj en la mezuro en kiu – ili entute estas homa laboro, elĉifreblas nur, ekde kiam la nocio de homa sameco posedas jam la firmecon de popola konvinko. Sed tio eblas nur en socio, en kiu la varformo estas la ĝenerala formo de laborprodukto, do ankaŭ la rilato de la homoj inter si kiel varposedantoj estas la reganta socia rilato.“³³

Markso esploras en la unua volumo de la *Kapitalo* la diversajn valorformojn kaj la monon. La valoro de la varo, kreita de la laboro en la produktadprocezo, elpaŝas videble nur en la interŝanĝprocezo, kiam unu varo estas egaligata

30 Saml., p. 56.

31 Saml., p. 58.

32 Saml., p. 60.

33 Saml., p. 75

4.2 Varo, valoro kaj mono

kun alia. La *interŝanĝvaloro* estas do la aperformo de la valoro. La aĉeto kaj vendo de varoj premisas ke la valoro de la varoj estu esprimebla en determinita formo (en varo). Tiom longe, kiom la interŝanĝo estas ankoraŭ malmulte evoluinta, en la naturaĵ-ekonomio, oni interŝanĝas produkt-on kontraŭ produkto. Kun la disvolviĝo de la labordivido kaj de la varproduktado, ekde kiam la interŝanĝo atingas vastiĝon kaj kiam fariĝas ĉiam pli malfacila kompari certan kvanton da varo kun certa kvanto da multaj aliaj varoj, aperas la bezono trovi *unu* varon taŭgan servi kiel valorformo de *ĉiuj* aliaj varoj, kiel *ĝenerala ekvivalento*. Tiun rolon transprenas unue – laŭ la evolunivelo de produktado kaj laŭ la naturaj resursoj – en la diversaj landoj diversaj varoj, ekz-e bruto, feloj, feltoj, salo, sklavoj ktp. Sed kun la fluo de la tempo trudiĝas varo aparte taŭga por tiu celo, facile transportebla, ekstreme daŭrema kaj perfekte dividebla – la noblaj metaloj kaj fine aparte oro kaj arĝento. La *mono* estas do varo kiu servas kiel ĝenerala ekvivalento de ĉiuj aliaj varoj, kiu havas la kapablon esti interŝanĝebla senpere kontraŭ ĉiuj ceteraj varoj.

„Ĉar ĉiuj aliaj varoj estas nur apartaj ekvivalentoj de la mono, la mono ilia ĝenerala ekvivalento, ili rilatas kiel apartaj varoj al la mono kiel la ĝenerala varo.”³⁴

Per tio la mono fariĝas en la varproduktanta socio ankaŭ la *rimedo*, per kiu *ĉiuj* bezonoj de la varposedantoj estas kontentigataj, kontraste al la aliaj varoj, kiuj povas kontentigi nur determinitan bezonon.

„Kun pli disvolvita varproduktado”, skribas Markso, „ĉiu varproduktisto devas certigi al si la *nervus rerum*”³⁵, la „socian garantiaĵon”.³⁶ Liaj bezonoj renoviĝas senĉese kaj ordonas

34 Saml., p. 108.

35 Latina esprimo, „nervo de la aferoj”. -vl

36 „Mono estas garantiaĵo.” (John Bellers, „Essay about the Poor, Manufactures, Trade, Plantations, and Immorality”, Londono, 1699, p. 13.

4. La politika ekonomio

senĉesas aĉetadon de fremda varo, dum produktado kaj vendado de lia propra varo kostas tempon kaj dependas de hazardoj. Por aĉeti sen vendi li devas antaŭe esti vendinta sen aĉeti. ... Kun la etendiĝo de la varcirkulado kreskas la potenco de la mono, de la ĉiam frappa, absolute socia formo de riĉaĵo. ... Ĉar ne eblas vidi ĉe la mono kio estas en ĝin transformita, ĉio transformiĝas, ĉu varo aŭ ne, en monon. Ĉio fariĝas vendebla kaj aĉetebla. La cirkulado fariĝas la granda socia retorto, en kiun ĉio enflugas, por poste elveni kiel monokristalo. Al tiu alĥemio rezistas eĉ ne ostoj de sanktuloj kaj ankoraŭ multe malpli la malpli krudaj *sanktaĵoj ekster la komerco de la homoj*. Kiel en la mono ĉia kvalita diferenco de la varoj estas estingita, ĝi siavice kiel radikala egaligisto estingas ĉiajn diferencojn. ... Sed mono estas mem varo, ekstera aĵo, kiu povas fariĝi privata proprieto de ĉiu ajn. La socia povo fariĝas tiel privata povo de la privata persono. ... La moderna socio ... salutas en la orparadizo la brilan enkarniĝon de sia propra vivprincipo.”³⁷

Esti *valormezuro* de la varoj, tio estas la ĉefa funkcio de la mono, nur per la mono la privata laboro de la varproduktistoj trovas sian socian esprimiĝon. Krom tiun plej gravan funkcion la mono plenumas en la kapitalisma socio aliajn funkciojn – kiel cirkuladrimedon, akumuladrimedon, pagrimedon kaj mondomonon.

En fama sekcio de la unua volumo de la *Kapitalo* Markso montris, kiel en la kapitalisma produktadmaniero varo kaj mono alprenas mistikan, fetiĉan karakteron. Sub sociaj kondiĉoj, en kiuj regas la privata proprieto je produktadrimedoj kaj varproduktado, la socia kunteniĝo inter la homoj trovas sian esprimiĝon nur pere de la *interŝanĝo* de aĵoj en formo de varoj. La mistereco de la varformo konsistas en tio, diras Markso, ke ĝi respegulas al la homoj la sociajn karakterojn de sia propra laboro kiel konkretajn karakterojn de siaj laborproduktoj, kiel sociajn naturkvalitojn de tiuj aĵoj. La socia rilato de la *homoj* alprenas la fantazian formon de rilato de *aĵoj*. Kiel en la nebula regiono de

37 Saml., p. 153-155.

4.2 Varo, valoro kaj mono

la religia mondo la produktoj de la homa kapo ŝajnas esti memstaraj estaĵoj dotitaj de propra vivo kaj estantaj en rilato inter si kaj kun la homoj, tiel en la varmondo la produktoj de la homa mano:

„Tion mi nomas fetiĉismo, kiu algluiĝas al la laborproduktoj, ekde kiam ili estas produktitaj kiel varoj, kaj kiu estas do nedisigebla disde la varproduktado.”³⁸

Uzobjektoj fariĝas varoj nur ĉar ili estas produktoj de privataj laboroj faritaj sendepende unu de la aliaj. La komplekso de tiuj privatlaboroj konsistigas la socian ĉiom-laboron. Ĉar la produktistoj eniras socian kontakton nur per la interŝanĝo de siaj laborproduktoj, la specife socia karaktero de iliaj laboroj aperas ankaŭ nur ene de tiu interŝanĝo. La privataj laboroj fariĝas membroj de la socia ĉiomlaboro nur per la rilatoj, kiujn la laborproduktoj kaj la produktistoj eniras per la interŝanĝo. Pro tio, tiuj rilatoj ŝajnas al la produktistoj ne kiel rektaj sociaj rilatoj de la personoj en siaj laboroj, sed kiel *aĵaj* rilatoj de la personoj kaj *sociaj* rilatoj de la aĵoj.

La valoro transformas ĉian laborprodukton en socian hieroglifon. Poste la homoj provis elĉifri la sencon de tiu hieroglifo, malkovri la sekreton de sia propra socia produkto. Ilia propra socia moviĝo posedas por ili la formon de moviĝo de aĵoj, sub kies kontrolo ili staras, anstataŭ kontroli ilin. La formoj, kiuj stampas la laborproduktojn varoj, kaj kiuj estas do premisoj de la varcirkulado, posedas do la firmecon de naturformoj de la socia vivo, kiujn la homoj konsideras neŝanĝeblaj, kvankam envere ili havas nur historie provizoran karakteron; ĉar ĉia mistikeco de la varmondo, ĉia sorĉo kaj iluzio kiu ĉirkaŭas laborproduktojn surbaze de varproduktado, malaperas tuj, kiam oni rigardas *aliajn* produktadmanierojn. La formo de la socia vivprocezo, de la materia produktado, demetas sian mistikan nebulvual-

38 Saml., p. 89.

4. La politika ekonomio

on, „*ekde kiam ĝi, kiel produkto de libere sociiĝintaj homoj, staras sub ties konscia laŭplana kontrolado*”.³⁹

Pri la monfetiĥismo Markso diras, ke varo⁴⁰ ŝajnas ne fariĝi mono nur ĉar la aliaj varoj prezentas ĉiuflanke siajn valorojn en ĝi, sed ĝi ŝajnas inverse prezenti ĝenerale iliajn valorojn en ĝi, ĉar ĝi estas mono:

„La peranta moviĝo malaperas en sia propra rezulto sen postlasi spuron. La varoj, sen sia propra iniciato, trovas sian propran valorformon preta en formo de varkorpo ekzistanta ekster kaj apud ili. Tiuj aĵoj, oro kaj arĝento, kiaj ili venas el la intestoj de la tero, estas samtempe la rekta enkarniĝo de ĉia homa laboro. Pro tio la magio de la mono. La nur atomeca konduto de la homoj en sia socia produktadprocezo kaj pro tio la konkreta formo de iliaj propraj produktadrilatoj, sendependa de ilia kontrolo kaj de ilia konscia individua agado, aperas unue en tio ke iliaj laborproduktoj ĝenerale alprenas la varformon. La enigmo de la monfetiĥo estas do nur la enigmo de la varfetiĥo, kiu frapas la okulojn en sia plej brila formo.”⁴¹

39 Saml., p. 97.

40 Ekz-e oro -vl.

41 Saml., p. 111.

4.3 Salajro, kapitalo, plusvaloro

Ĉe la esplorado de la kaptitalisma proprieto je la produktadrimedoj, de la estiĝhistorio de la kapitalo, Markso eliras de la fakto ke varproduktado kaj evoluinta varcirkulado, do komerco, estas la historiaj premisoj de la kapitalo, ke ties vivhistorio komenciĝas per la mondkomerco kaj la mondmerkato en la 16-a jarcento. La mono, la lasta produkto de tiu procezo, fariĝas ankaŭ unua aperformo de la kapitalo. La senpera formo de la varcirkulado estas la transformado de varo en monon kaj ties retransformado en varon (v-m-v), do vendi por aĉeti. Sed apud tiu formo ekzistas dua, la transformado de mono en varon kaj ties retransformado en monon (m-v-m), do aĉeti por vendi. La mono, kiu en sia moviĝo faras tiun lastan cirkuladon, transformiĝas en *kapitalon*, fariĝas kapitalo kaj estas jam laŭ sia destino kapitalo, klarigas Markso.⁴² Sed tiu operacio estus por la kapitalisto komplete sensenca, se ĉe ĝia fino troviĝus la sama monsumo kiel komence. La kompleta formulo de tiu moviĝo nomiĝas envere: m-v-m', do la rezulto estas *pli alta* monsumo ol la antaŭe pagita.

Tiun kromaĵon super la origina valoro Markso nomas la *plusvaloro*:

„La origine antaŭpagita valoro do ne konserviĝas en la cirkulado, sed en ĝi ĝi ŝanĝas sian valorgrandon, aldonas plusvaloron aŭ plivalorigas sin. Kaj tiu movo ŝanĝas ĝin en kapitalon.”⁴³

Markso atentigas pri la fundamenta diferenco de la du cirkuladoj. La vendo por la vendo, la varcirkulado, servas la alproprigon de uzvaloroj, la kontentigon de bezonoj. Sed la cirkulado de la mono kiel kapitalo estas memcelo, ĉar la plivalorigo de la valoro ekzistas nur ene de la ĉiam renovigata moviĝo:

„Kiel konscia portanto de tiu moviĝo, la monposedanto fariĝas kapitalisto. Lia persono, aŭ pli ĝuste lia poŝo, estas la elirpunkto kaj la revenpunkto de la mono. La objektiva enhavo de tiu

42 Saml., p. 173.

43 Saml., p. 177.

4. La politika ekonomio

cirkulado – la plivalorigo de la valoro – estas lia subjektiva celo, kaj nur en tio ke kreskanta alproprigo de la abstrakta riĉaĵo estas la movanta motivo de liaj operacioj, li funkciis kiel kapitalisto aŭ kiel personigita, per volo kaj konscio dotita kapitalo. La uzvaloro estas do neniam traktenda kiel rekta celo de la kapitalisto. ... Ankaŭ ne la unuopa gajno, sed nur la senlaca moviĝo de la gajno. ... Tiu absoluta riĉiĝinstinkto, tiu pasia ĉasado de valoro ... estas komuna trajto de la kapitalisto kaj de la trezorfaristo, sed dum la trezorfaristo estas nur la freneza kapitalisto, la kapitalisto estas la racia trezorfaristo.”⁴⁴

De kie venas la *alkreskaĵo de la kapitalo*, de kie venas la plusvaloro? Tiun demandon Markso esploras kaj respondas sur strikte scienca ekonomia vojo. La plusvaloro ne povas veni el tio ke la aĉetanto aĉetas la varojn sub ilia valoro, aŭ ke la vendanto vendas ilin super ilia valoro. Ĉar tiam perdoj kaj gajnoj entute kompensigus. Ĝi povas ankaŭ ne veni el ia ajn trompo, ĉar tiel unu kapitalisto povus ja riĉiĝi surkoste de la alia, sed la tuta klaso de kapitalistoj ne povas sin reciproke trompi. Per aĉeto kaj vendo la sumo de la cirkulantaj valoroj ne povas pliiĝi. La pligrandiĝo de la valoro de la mono, kiu devas transformiĝi en kapitalon, povas do nek okazi ĉe tiu mono, nek deveni el aĉeto aŭ vendo de la varo. Ĝi devas okazi per la varo, kiu estas aĉetita, sed ne per ĝia valoro, ĉar ĝi estas aĉetita kaj vendita je sia valoro, sed per ĝia *uzvaloro*; la pligrandiĝo de la valoro devas fondi el la *konsumado* de la varo.

„Por eltiri valoron el la uzado de varo, nia monposedanto devus esti tiom bonŝanca malkovri ene de la cirkuladsfero, sur la merkato, varon, kies uzvaloro mem havas la apartan econ esti fonto de valoro, kies reala uzado estus do mem konkretigo de laboro, pro tio valorkreado. Kaj la monposedanto trovas sur la merkato tian specifan varon – la laborkapablon aŭ la laborforton.”⁴⁵

Markso montris, ke por transformado de mono en kapi-

44 Saml., p. 179-180.

45 Saml., p. 195.

4.3 Salajro, kapitalo, plusvaloro

talon kelkaj historiaj premisoj devas esti plenumitaj. Devas ekzisti homoj kiuj – kontraste al la sklavo de la antikveco kaj al la servutulo de la mezepoko – estas *liberaj* proprietuloj de sia laborkapablo, de sia persono. Aliflanke tiu grupo de homoj devas esti „libera” ankaŭ en alia senco, nome *libera* je la materiaj rimedoj necesaj por realigi sian laborkapablon, libera je proprieto je produktadrimedoj, kaj pro tio *devigata* vendi sian laborforton al la proprieto de la produktadkondiĉoj.

Evidentas, ke tiu rilato ne estas naturhistoria, ĉar la naturo ne produktas unuflanke mon- aŭ var-posedantojn kaj aliflanke nurajn posedantojn de sia laborforto. Sed tio estas ankaŭ ne socia rilato komuna al *ĉiuj* historiaj periodoj, sed la produkto de multaj ekonomiaj revolucioj, de la pereco de tuta serio da pli malnovaj formacioj de la socia produktado (tiu evoluo estis mallonge skizita en la enkonduko al tiu ĉi sekcio). Do, kio karakterizas la kapitalisman epokon, klarigas Markso, estas, ke la laborforto alprenas por la laboristo mem la formon de varo apartenanta al li, kaj ke lia laboro ricevas do la formon de *dunglaboro*.⁴⁶

Markso montras nun, ke la laborforto, kiun la laboristo estas devigata vendi, posedas *valoron* kiel ĉiu alia varo, kaj ke tiu, same kiel ĉe ĉiuj aliaj varoj, estas determinata de la labortempo necesa por ĝia produktado, do ankaŭ reproduktado. Tiu labortempo konsistas el la labortempo necesa por produktado de la *viv- kaj ekzistad-rimedoj*, kiujn la laboristo bezonas por konservi sian laborforton. Por ke la laborfortoj ne formortu, tiuj rimedoj devas ankaŭ sufiĉi por vivteni lian familion kaj elkreskigi siajn infanojn.

Kontraste al aliaj varoj la valordifino de la laborforto entenas *historian* kaj *moralan* elementon. La amplekso de la tiel nomataj necesaj bezonoj kaj la maniero de ilia kontentigo estas diversaj, ili dependas de historiaj kondiĉoj, de

46 Saml., p. 199.

4. La politika ekonomio

la kulturŝtupo de lando, de la kutimoj kaj vivpretendoj, sub kiuj la klaso de la dunglaboristoj elformiĝis kaj evoluis. Sed por certa lando kaj certa periodo la mezumo de la necesaj materialaj kaj kulturaj vivrimedoj estas donita.⁴⁷

La uzvaloro de la laborforto montriĝas nur en sia konsumiĝo, en sia „konsumiĝprocezo”, kiu estas samtempe la *produktadprocezo* de varo kaj de plusvaloro. Al la kapitalisto apartenas same la uzvaloro de la laborforto kaj la produkto estigita en la laborprocezo. En la produktadprocezo la kapitalisto volas atingi du aferojn: li volas unue produkti uzvaloron kiu havas interŝanĝvaloron, *varon* destinitan al vendo. Sed krome li volas produkti varon kies valoro estas *pli alta* ol tiu de la produktadrimedoj necesaj por ĝia produktado kaj de la laborfortoj. Li volas produkti ne nur valoron, sed ankaŭ *plusvaloron*.⁴⁸

Kiel do *estiĝas* la plusvaloro? Sub la kondiĉoj de la kapitalisma produktado, kiu premias certan nivelon de laborproduktivo, la laboristo bezonas por produkti la valoron ekvivalentan al la valoro de sia laborforto nur parton de la labortago. Sed la kapitalisto aĉetis la laborforton de la laboristo por la plena labortago, kaj al li apartenas do ankaŭ la valoro kreita dum la tuta labortempo. La laboristo kostas do al la kapitalisto nur valorprodukton de 3 aŭ 4 laborhoroj, sed li liveras al li valorprodukton de 8 laborhoroj. Tiun *diferencon* inter la valoro de la laborforto kaj tiu de la valoro kreita de la laboristo, la nepagatan pluslaboron, la nepagatan plusprodukton, kiun la kapitalisto alproprigas al si, Markso nomas la *plusvaloro*.

Li pruvas, ke la kapitalisto, per tio ke li transformas monon en varojn, kiuj servas kiel materialo por nova produkto, per tio ke li „*enkorpigas al ilia morta konkreteco vivantan laborforton*”, li samtempe transformas valoron –

47 Saml., p. 200.

48 Saml., p. 217.

4.3 Salajro, kapitalo, plusvaloro

pasintan, konkretigitan, mortan laboron en kapitalon, *en valoron kiu plivalorigas sin mem*. La valorestiga procezo, kiu okazas en la produktadprocezo, fariĝas, daŭrigita trans certa punkto, *plivaloriga procezo*.

„Oni vidas: la diferenco, antaŭe akirita el la analizo de la varo, inter la laboro kreanta uzvaloron kaj la sama laboro kreanta valoron, montriĝis nun kiel distingo de la du diversaj flankoj de la produktadprocezo.

La produktadprocezo kiel unueco el laborprocezo kaj valorestiga procezo estas produktadprocezo de varoj; kiel unueco de laborprocezo kaj plivaloriga procezo ĝi estas kapitalisma produktadprocezo, kapitalisma formo de varproduktado.”⁴⁹

La alproprigo de nepagata laboro fare de la kapitalisto, la ekspluatado de la dunglaboristo, kiel la ekspluatado de la sklavo aŭ de la servutuloj, estas komplete sendependa de tio, ĉu la laboristo ricevas pli bonajn vestaĵojn, manĝaĵojn, pritrakton kaj pli bonan salajron. Tio signifas nur, ke la amplekso kaj efiko de la ora ĉeno, kiun la dunglaboristo jam forĝis al si, permesas malpli da strikteco.

„En la disputoj pri tiu temo”, diras Markso, „oni plej ofte pretervidis la ĉefajn, nome la specifajn diferencojn de la kapitalisma produktado. Laborforto estas tie aĉetata, ne por kontentigi per ĝia servo aŭ per ĝia produkto la personajn bezonojn de la aĉetanto. Ĝia celo estas plivalorigo de lia kapitalo, produktado de varoj kiuj entenas pli da laboro ol kiom li pagas, do entenas valorparton kiu kostas al li neniom kaj kiu estas tamen realigata per la varvendo. Produktado de plusvaloro aŭ plusfarado estas la absoluta leĝo de tiu produktadmaniero.”⁵⁰

Markso montris, ke ne ĉiu produktadrimedo, ĉiu laborilo, ĉiu krudmaterialo, kiuj iam al iu servis al produktado, estas nur pro tio jam kapitalo. Ili fariĝas kapitalo nur sekve al determinitaj *sociaj -historiaj* kondiĉoj, nome kiam ili estas

49 Saml., p. 229.

50 Karlo Markso: La kapitalo, ... ***Ĉapitroj dekkvara ĝis dudekkvina***, p. ...

4. La politika ekonomio

proprieto de kapitalisto, rimedo de ekspluatado de dunglaboro. Pluslaboro trans la la tempo necesa por por memkonserviĝo de la laboristo kaj alproprigo de la produkto de tiu pluslaboro fare de aliaj, do ekspluato de la laboranta homo, tute ne estas invento de la kapitalo, ĝi okazas en ĉiu ekonomia formacio, en kiu la proprieto je la produktadrimedoj estas *monopolo* de parto de la socio. Produktadrimedoj fariĝas kapitalo nur tiam, kiam la proprieto de la produktadrimedoj trovas la laboriston kiu libere disponas pri sia laborforto, sed kiu estas cetere senposeda kaj kies laborforto estas uzata por produktado de varoj kaj kies pluslaboro alprenas la formon de plusvaloro.

„La kapitalo”, diras Markso, „estas mortinta laboro, kiu nur vampire reviviĝas per ensorbo de viva laboro kaj vivas des pli, ju pli ĝi sorbas da ĝi.”⁵¹

En la realo, malantaŭ la nocio de kapitalo kaŝiĝas socia rilato, la rilato inter la proprieto de la produktadrimedoj kaj la dunglaboristo sub la specifaj kondiĉoj de la kapitalisma produktadmaniero. Ne la produktadrimedoj per si mem posedas la miraklan kvaliton certigi al sia posedanto enspezon akiritan ne per laboro; tion kapablas nur tiu de la kapitalisto ankaŭ akirita varo – la laborforto de la dunglaboristo. En siaj eseoj publikigitaj jam en la jaro 1849 en la gazeto *Rheinische Zeitung*, „Dunglaboro kaj kapitalo”,⁵² Markso skribas:

„Kiel sumo de varoj, de interŝanĝvaloro fariĝas kapitalo? Per tio, ke ĝi konservas sin kiel sendependa socia potenco, do kiel la potenco de parto de la socio kaj pliiĝas per la *interŝanĝo kontraŭ la rekta, vivanta laborforto*. La ekzisto de klaso, kiu posedas nenion alian ol la laborkapablo, estas nepre antaŭkondiĉo de la kapitalo.

51 Karlo Markso: La kapitalo, ... Ĉapitroj unua ĝis dektria, ..., p. 269.

52 Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo, Esperantigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009
ISBN 978-2-918300-00-7

4.3 Salajro, kapitalo, plusvaloro

Nur la regado de la akumulita, pasinta, konkretiĝinta laboro super la rekta, vivanta laboro kapitaligas la akumulitan laboron.

La kapitalo ne konsistas el tio ke akumulita laboro servas al la vivanta laboro kiel rimedo por nova produktado. Ĝi konsistas el tio ke la viva laboro servas al la akumulita laboro kiel rimedo por konservi kaj pliigi ĝian interŝanĝvaloron.”⁵³

Pro tio, Mark⁵⁴so nomas la kapitalon „socia produktad-rilato”, „produktadrilato de la burĝa socio”.

En la kadro de tiu ĉi enkonduko en la teorion de la marksismo ne eblas detale prezenti la de Markso esploritajn ekonomiajn kategoriojn, do ekz-e la diversajn formojn de la plusvaloro, la kvoton de plusvaloro kiel ekspluadgradon de la laboristo, la salajron kiel prezon de la varo laborforto ktp. Por la kompreno de la sekvaj klarigoj de tiu ĉi sekcio ni atentigu ankoraŭ pri la de Markso farita distingo de la diversaj kapitalpartoj inter *konstanta* kaj *varia* kapitalo. Markso pravas, ke tiu parto de la kapitalo, kiun la entreprenisto uzas por akiri produktadrimedojn – fabrik-instalaĵojn, maŝinojn, krudmaterialojn, energion ktp – en la produktadprocezo ne ŝanĝas sian valorgrandon. Li nomas ĝin do konstanta kapitalo. Male, tiu parto de la kapitalo kiu estas transormita en laborforton, ŝanĝas sian valoron, ĉar ĝi ja, kiel ni vidis, produktas ne nur sian propran ekvivalenton, sed kromaĵon – plusvaloron. Markso nomas ĝin do la varia kapitalparto aŭ varia kapitalo.

„La samaj kapitalpartoj, kiuj el la vidpunkto de la laborprocezo distingiĝas kiel objektivaj kaj subjektivaj faktoroj, kiel produktadrimedoj kaj laborforto, distingiĝas el vidpunkto de la valorigprocezo kiel konstanta kapitalo kaj varia kapitalo.”⁵⁵

53 Karlo Markso: *Dunlaboro kaj kapitalo*, l.c., p. 19-20.

54 Saml., p. 19.

55 Karlo Markso: *La kapitalo ... ĉapitroj unua ĝis naŭa*, l.c., p. 243.

4.4 Reproduktado kaj akumulado de la kapitalo

Pri tiu temo Markso unue konstatas, ke same kiel socio ne povas ĉesi konsumi, ĝi ne povas ĉesi produkti. La sen-interrompa daŭrigo de la produktadprocezo estas necesa en ĉia ekonomia formacio. Konsiderata en konstanta fluo de sia renoviĝo, ĉia socia produktadprocezo estas do samtempe *reproduktadprocezo*.⁵⁶

Markso distingas inter *simpla* reproduktado, la ripetado de la produktadprocezo sur la sama skalo, kie la nove estigitaj produktoj nur anstataŭas la konsumitajn produktadrimedojn kaj konsumvarojn, kaj *ampleksigita* reproduktado, ĉe kiu la ripetado de la produktadprocezo okazas laŭ ampleksigita skalo kaj la socio produktas, krom la konsumitajn, kromaĵon da produktadrimedoj kaj konsumaĵoj. Por la kapitalisma produktadmaniero, kiu estigis multe pli grandan laborproduktivon ol la antaŭaj sociaj sistemoj, la ampleksigita reproduktado estas karakteriza, ĉe kio kompreneble la simpla reproduktado restas ĉiam elemento de la reproduktado laŭ ampleksigita skalo.

Sed tiu reproduktadprocezo ne estas limigita al la materia produktadprocezo, ĝi entenas, kiel Markso montras, ankaŭ la *socian formon*, en kiu la produktado okazas. Tio, kio estis elirpunkto de la kapitalisma produktadprocezo, la disigo de la objektivaj laborkondiĉoj kaj de la subjektiva laborforto, la alfrontiĝo de la proprietulo de la produktadkaj viv-rimedoj unuflanke, de la proprietulo de sia laborforto aliflanke, pro la kontinueco de tiu procezo en la reproduktado kreiĝas ĉiam denove:

„Unuflanke la produktadprocezo konstante transformas la materian riĉaĵon en kapitalon, en plivalorigajn kaj ĝuajn rimedojn por la kapitalisto. Aliflanke la laboristo konstante elvenas el la procezo tia kia li eniris ĝin – persona fonto de la riĉaĵo, sed senigita je ĉiaj rimedoj realigi tiun riĉaĵon por si ... La laboristo

56 Karlo Markso, La kapitalo, ... ĉapitroj dekkvara ĝis dudekkvina, l.c., p. ...

4.4 Reproduktado kaj akumulado de la kapitalo

produktas do konstante la objektivan riĉaĵon kiel kapitalon, potencon al li fremdan, lin regantan kaj lin ekspluatantan, kaj la kapitalisto same konstante produktas la laborforton kiel subjektivan riĉfonton, disigitan disde ĝiaj propraj konkretigaj kaj realigaj rimedoj, abstraktan, ekzistantan nur en la korpeco de la laboristo, mallonge, la laboriston kiel dunglaboriston. Tiu konstanta reproduktado aŭ eternigo de la laboristo estas la nepraĵo de la kapitalisma produktado.”⁵⁷

Per tio la kapitalisma produktadprocezo reproduktas la disigon de laborforto kaj laborkondiĉoj, ĝi devigas la laboriston ĉiam denove vendi sian laborforton por vivi, kaj ĝi kapabligas la kapitaliston aĉeti tiun laborforton kaj riĉigi sin. La kapitalisma reproduktadprocezo produktas do, kiel Markso emfazas, ne nur varon kaj ne nur plusvaloron, ĝi produktas kaj reproduktas la *kapitalrilaton* mem, unuflanke la *kapitaliston*, aliflanke la *dunglaboriston*.⁵⁸

La ekonomiaj leĝoj imanentaj de la kapitalismo, la ĉasado de nova plusvaloro, la konkurencbatalo devigas la kapitaliston pligrandigi siajn instalaĵojn, plibonigi la tehnikon, do etendi sian kapitalon, transiri de la simpla al la ampleksiĝinta reproduktado. Alivorte tio signifas, ke la kapitalisto devas ĉiam strebi apliki parton de la plusvaloro, kiun li alproprigis, kiel kapitalon, retransformi ĝin en kapitalon. Tiun procezon, la ampleksigitan reproduktadon en kapitalisma formo, Markso nomas la *akumulado* de la kapitalo. La evoluo de la kapitalisma produktado neprigas konstantan pliigon de la kapitalo investita en industria entrepreno kaj la konkurenco trudas al ĉiu individua kapitalisto la leĝojn de la kapitalisma produktadmaniero kiel eksterajn devigajn leĝojn, diras Markso. Ĝi devigas lin konstante etendi sian kapitalon por konservi ĝin, kaj li povas etendi ĝin nur per progresanta akumulado. La akumulado estas la konkero de la mondo de la socia riĉaĵo,

57 Saml., p. ...

58 Saml., p. ...

4. La politika ekonomio

ĝi etendas kun la kvanto de la ekspluatataj laboristoj samtempe la rektan kaj malrektan regadon de la kapitalistoj.⁵⁹

Sed kiel la simpla reproduktado reproduktas la kapitalrilaton mem, tiel la *akumulado* de la kapitalo, do la ampleksigita reproduktado, reproduktas la kapitalrilaton laŭ *ampleksigita skalo*: pli da kapitalistoj aŭ pli grandaj kapitalistoj ĉe unu poluso, pli da dunglaboristoj ĉe la alia. Akumulado de la kapitalo estas do pliigo de la proletaro.⁶⁰ Markso montras, ke sekve al tiu leĝo de la kapitalisma akumulado en la kadro de la kapitalisma produktadmaniero maleblas atingi altecon de salajro por la laboristo, ĉe kiu la reproduktado de la kapitalrilato, nome sur ampleksigita skalo, povus esti serioze endanĝerigita. La malpliigo de la nepagata laboro, de la plusvaloro, povas neniam progresi ĝis punkto, en kiu ĝi endanĝerigus la sistemon mem.⁶¹

En la daŭrigo de sia analizo Markso provas, ke la pliigo de la laborproduktivo fariĝas la plej potenca levilo de la akumulado de la kapitalo. Por atingi pli altan profiton, la kapitalistoj devas pligrandigi la aplikadon de produktadrimedoj – instalaĵoj, maŝinoj, krudmaterialoj –, do la parton de la *konstanta* kapitalo en proporcio al la *varia* kapitalo (laborforto). Tiun proporcion Markso nomas la *organika konsisto* de la kapitalo. Ĝi ŝanĝiĝas konstante en tiu direkto ke la objektiva faktoro pliiĝas proporcie al la subjektiva faktoro, ke la kvanto de la produktadrimedo kreskas pli rapide ol la laborfortoj necesaj por ilia aplikado. Do, laŭ la mezuro, en kiu la pliiĝo de la kapitalo igas la laboron pli produktiva, ĝi malpliigas relative, en proporcio al sia propra grandado, la postulon je laborfortoj. La varia parto de la kapitalo fariĝas laŭ tio ĉiam pli malgranda kompare kun la konstanta.⁶²

59 Saml., p. ...

60 Saml., p. ...

61 Saml., p. ...

62 Saml., p. ...

4.4 Reproduktaĵo kaj akumulado de la kapitalo

Markso poste klarigas, kiel la akumulado kondukas al *koncentriĝo* kaj *centriĝo* de la kapitalo. Ĉar ĉia akumulado estas rimedo por nova akumulado, jam per la simpla akumuladprocezo pliiĝas la kvanto de la riĉaĵo funkcia kiel kapitalo, ĝia koncentriĝo en la manoj de individuaj kapitalistoj. Tiu speco de koncentriĝo estas limigita, unue per la kreskogrado de la socia riĉaĵo, due per la konkurenco kaj displitiĝo de la individuaj kapitaloj. Sed al tiu displitiĝo kaj malaltiro de multaj individuaj kapitaloj kontraŭefikas pli forta tendenco, ilia altiro:

„Tiu estas”, skribas Markso, „koncentriĝo de jam formitaj kapitaloj, nuligo de ilia individua memstareco, ekspropriigo de kapitalisto fare de kapitalisto, transformado de multaj malgrandaj en malmultaj pli grandaj kapitaloj. Tiu procezo distingiĝas disde la unua per tio, ke ĝi premisas nur ŝanĝitan disdividon de jam ekzistantaj kaj funkciaj kapitaloj, ke ĝia agospaco do ne estas limigita per la absoluta kresko de la socia riĉaĵo aŭ per la absolutaj limoj de la akumulado. La kapitalo ŝvelas ĉi tie en unu mano al grandaj kvantoj, ĉar ĝi tie en multaj manoj perdiĝas. Tio estas la vera *centriĝo* kontraste al la akumulado kaj koncentriĝo.”⁶³

Markso montras la kaŭzojn de tiu centriĝo: la konkurenco premas la kapitalistojn produkti pli malmultekoste, sed tio dependas de la grado de laborproduktivo, tiu siavice de la skalo laŭ kiu la produktado okazas. La sekvo estas, ke la pli grandaj kapitaloj batas la pli malgrandajn. Krome kreskas la amplekso de la kapitalo necesa en multaj industribranĉoj por povi konkurenci. Tiel la malgrandaj kapitaloj iras en produktadsferojn, kiujn la granda industrio nur malmulte akaparis.

La konkurenco kaj la kreditsistemo estas la du plej potencaj leviloj de la centriĝo, kiu fariĝas ĉiam pli la dominanta evolutendenco. Nur la centriĝo de la kapitaloj ebligas al la industriuloj esence etendi la skalon de siaj

63 Saml., p. ...

4. La politika ekonomio

operacioj. La mondo estus daŭre sen fervojoj, se ĝi devintus atendi ĝis kiam la akumulado kapabligintaj kelkajn unuopajn kapitalojn konstrui fervojon: la centriĝo, male, sukcesis tion per turno de la mano. La centriĝo altigas kaj rapidigas la efikon de la akumulado kaj samtempe la ŝanĝegojn en la organika konsisto de la kapitalo, kiu pliigas la konstantan parton surkoste de la varia parto.⁶⁴

Per tiu altigo de la organika konsisto de la kapitalo, per la pli rapida kresko de la kvanto de produktadrimedoj proporcie al la laborfortoj, en la diversaj produktadbranĉoj konstante „superfluiĝas” laborfortoj, kiuj devas serĉi alian dungon. Tiu procezo estas unue kompensata per la akumulado de la kapitalo, do per la absoluta etendiĝo ankaŭ de la varia kapitalparto. Sed se la organika konsisto de la kapitalo kreskas pli rapide ol la akumulado, tiam laboristoj estas elpelitaj el la tuta produktado, tiam ili jam ne trovas laboron.

Kun la grandeco de la jam funkcia kapitalo kaj la grado de ĝia kresko, diras Markso, kun la etendiĝo de la produktado kaj la nombro da laboristoj, la kresko de la laborproduktivo, la pli larĝa kaj pli plena fluo de ĉiaj fontoj de riĉaĵo etendiĝas ankaŭ la skalo, laŭ kiu pli granda altiro de laborfortoj fare de la kapitalo estas ligita kun pli granda forŝovo de ili; tiel la laborista loĝantaro produktas do en kreskanta amplekso la rimedojn de sia propra *relativa superfluigo*. Tiu estas loĝantar-leĝo propra al la kapitalisma produktadmaniero. Tiu relativa troa loĝantaro estas unuflanke produkto, aliflanke levilo de la kapitalisma akumulado. Ĝi estas por la kapitalo disponebla industria rezerv-armeo.⁶⁵ La relativa grandeco de tiu industria rezervarmeo kreskas kun la potencoj de la riĉaĵo. La akumulado de riĉaĵo sur unu poluso estas do, laŭ Markso, samtempe akumulado de mizero, laborsufero, sklaveco, nesciado, brutaligo kaj morala degradiĝo sur

64 Saml., p. ...

65 Saml., p. ...

4.4 Reproduktado kaj akumulado de la kapitalo

la kontraŭa poluso, do flanke de la klaso, kiu produktas sian propran produkton kiel kapitalon.

Markso atentigas en la sama kunteksto al tio, ke tiu leĝo estas „*en sia realiĝo modifata per diversaj cirkonstancoj*”, per kiuj li celas ĉefe la batalon de la laboristoj kontraŭ ĝian efikon.⁶⁶ Frederiko Engelso rimarkigis 1891 pri esprimo en la *Erfurta Programkoncepto* de la germana socialdemokratio:

„La organizaĵo de la laboristoj, ilia kreskanta rezistado, eble kontraŭmetos *al la kresko de la mizero* certan digon, sed kio certe kreskas, estas la malcerteco de la ekzistado.”⁶⁷

Tiu ekzistada malcerteco draste esprimiĝas en la kapitalismaj *ekonomiaj krizoj*, kies efikoj estas en la *Kapitalo* esplorataj en diversaj kunteksto. Ĉar en la kapitalismo ne eblas socia planado de la produktadprocezo, tiu procezo okazas en la formo de cikloj, kiuj ripetiĝas en certa period-eco. Ene de tia ekonomia ciklo, „periodoj de meza vigleco, produktado sub alta premo, krizo kaj stagnado” anstataŭas sin reciproke.⁶⁸ En sia „*Kontraŭ-Duringo*” Engelso tre palp-eble prezentis la okaziĝon de la ciklaj krizoj:

„La cirkulado blokiĝas, la merkatoj estas superplenaj, la produktoj kuŝas tie, same amase kiel nevendeblaj, la kontanta mono fariĝas nevidebla, la kredito malaperas, la fabrikoj haltas, al la laborantaj amasoj mankas vivrimedoj, ĉar ili produktis tro da vivrimedoj, bankroto sekvas al bankroto, trudvendo al trudvendo. La blokiĝo daŭras dum jaroj, produktadforto kaj produktoj estas amase malŝparataj kaj detruataj, ĝis kiam la alte stakitaj varamasoj sub pli aŭ malpli granda senvaloriĝo fine defluas, ĝis kiam produktado kaj interŝanĝo iom post iom rekomen- cas funkcii. Iom post iom la rapido altiĝas, komencas trabi, la industria trabo transiras en galopon, kaj tiu pli rapid-

66 Saml., p. ...

67 MEW, vol., 22, p. 231.

68 Karlo Markso: La kapitalo, ... vol. I, ĉapitroj dekkvara ĝis dudekkvina, l.c., p. ... (MEW, vol. 23, p. 661).

4. La politika ekonomio

iĝas ĝis la senbrida kurego de kompleta industria, komerca, kredita kaj spekula obstaklo-vetkuro, por fine post la kolrompaj saltoj ree alveni – en la foso de la kraŝo.”⁶⁹

Markso nomas la krizojn „*perfortaj erupcioj*”, kiuj por la momento „*restarigas la rompitan ekvilibron*”.⁷⁰ Ilia plej granda kaŭzo troviĝas en la *baza kontraŭdiro* de la kapitalismo, la *antagonismo* inter la *socia* karaktero de la produktado kaj la *privata* formo de la *alproprigo*. Periode produktiĝas tro multe da produktad- kaj viv-rimedo por esti profitige aplikeblaj kiel rimedoj por ekspluati laboristojn; tro multe da varoj por esti vendeblaj sub la donitaj konsumkondiĉoj kaj retransformeblaj en novan kapitalon. Ne estas produktata absolute tro da riĉaĵo, sed, kiel diras Markso, „*periode produktiĝas tro da riĉaĵo en siaj kapitalismaj, kontraŭecaj formoj*”.⁷¹ La lasta kaŭzo de la krizoj restas ĉiam la

„malriĉeco kaj konsumlimiĝo de la amasoj kontraŭ la premo de la kapitalisma produktado evolui la produktadfortojn tiom kvazaŭ nur la absoluta konsumkapablo de la socio estus ilia limo”.⁷²

Markso pruvis en la unua volumo de la *Kapitalo* la efikojn de la kapitalisma akumulado per riĉa statistika materialo, same la procezon de la tiel nomata origina akumulado. El la tuta historia evoluo de la kapitalisma produktadmaniero li fine deduktis la *historian tendencon* de la kapitalisma akumulado. En famiĝinta tekstero Markso diras, ke ĉe la elformiĝo de la kapitalismo la mem ellaborita proprieto de la sendependa, kun siaj laborkondiĉoj ligita etproduktisto estis forŝovita fare de la kapitalisma privata proprieto kiu baziĝas sur ekspluatado de fremda, sed formale libera laboro. Nun, ĉar la plua sociigo de la laboro

69 MEW, vol. 20, p. 257.

70 MEW, vol. ...

71 Das Kapital, 3-a vol., MEW, vol. 25, p. 268.

72 Saml., p. 501.

4.4 Reproduktado kaj akumulado de la kapitalo

kaj la plua transformado de la produktadrimedoj en socie aplikatajn estas progresinta, la plua eksproprieto de la privataj proprietuloj akiras novan formon:

„Tiu eksproprieto okazas per la ludo de la imanentaj leĝoj de la kapitalisma produktado mem, per la centriĝo de la kapitaloj. Po unu kapitalisto mortigas multajn. Man-enmane kun tiu centriĝo aŭ kun la eksproprieto de multaj kapitalistoj fare de malmultaj, la kunlabora formo de la laborprocezo evoluas laŭ ĉiam pli kreskanta skalo, la konscia teknika aplikado de la scienco, la laŭplana ekspluatado de la Tero, la transformado de la laborrimedoj en nur komune uzebajn laborrimedojn, la ekonomiigo de ĉiuj produktadrimedoj per ilia uzado kiel produktadrimedoj de kombinita, socia laboro, la englutado de ĉiuj popoloj en la reton de la mondmerkato kaj per tio la internacia karaktero de la kapitalisma reĝimo. Kun la konstante malkreskanta nombro de la kapitalmagnatoj, kiuj uzurpas kaj monopoligas ĉiajn avantaĝojn de tiu transformado, kreskas la kvanto de la mizero, de la premo, de la servuto, de la degeneriĝo, de la ekspluatado, sed ankaŭ la indigno de la ĉiam ŝvelanta amaso de laborista klaso, instruita, unuecigita kaj organizita de la meĥanismo de la kapitalisma produktadprocezo mem. La kapitalmonopolo fariĝas malhelpo de la produktadmaniero, kiu ekfloris kun kaj sub ĝi. La centriĝo de la produktadrimedoj kaj la sociigo de la laboro tiel atingas punkton, kie ili fariĝas neakordigeblaj kun sia kapitalisma ŝelo. Tiu estas krevigata. La horo de la kapitalisma privata propio sonas. La eksproprietoj estas ekspropietigitaj.”⁷³

73 Karlo Markso: La kapitalo, ... *ĉapitroj dekkvara ĝis dudekkvina*, p. ...

4.5 La tendenca falo de la profitkvoto

En la tria volumo de la *Kapitalo* Markso esploris ekonomian leĝon ekstreme gravan por la evoluo de la kapitalismo kaj por la tuta plua historia evoluo, la leĝon de la *tendenca falo de la profitkvoto*. Post analizi en la unua volumo la plej gravajn ekonomiajn leĝojn de la kapitalisma socio kvazaŭ en ilia pura formo, li montras nun, en kiaj *aperformoj* tiuj leĝoj trudiĝas konkrete en la realo. Li montris, kiel ili „*aperas sur la surfaco de la socio, en la agado de la diversaj kapitaloj inter si, la konkurenco, kaj en la ordinara konscio de la produktadagantoj mem.*”⁷⁴

Markso pruvis, ke la *profito* estas nur la aperformo de la plusvaloro. Plusvaloro kaj kvoto de la plusvaloro

„estas la nevideblaĵo kaj la eslorenda esenco, dum profitkvoto kaj do la formo de la plusvaloro kiel profito montriĝas sur la surfaco de la aĉaĵo”.⁷⁵

Markso nomas la kvoton de la plusvaloro, mezuratan ĉe la *varia* kapitalo, la kvoto de la plusvaloro, la kvoton de la plusvaloro mezuratan ĉe la *tuta kapitalo, profitkvoto*. Ju pli altas la profitkvoto, des pli altas la plivaloriga grado de la kapitalo.

Markso klarigas, ke la ĝenerala kresko de la konstanta kapitalo kompare kun la varia, do la pli alta organika konsisto de la kapitalo, sekvigas la tendencon de laŭgrada *falo de la ĝenerala profitkvoto*. Tiu tendenco estas nur esprimo, propra al la kapitalisma produktadmaniero, por la progresanta evoluo de la socia produktadforto de la laboro. Ĉar la kvanto de la aplikata viva laboro ĉiam malkreskas en proporcio kun la kvanto de la produktadrimedoj, kiujn ĝi movas, tial ankaŭ la parto de tiu viva laboro, kiu estas nepagata kaj konkretiĝas en plusvaloro, devas troviĝi en ĉiam malkreskanta *proporcio* al la valorsumo de la aplikata ĉiomkapitalo. Tiu proporcio estas la profitkvoto, kiu devas do

74 Das Kapital, 3-a vol., MEW, vol. 25, p. 33.

75 Saml., p. 53.

4.5 La tendenca falo de la profitkvoto

konstante fali.⁷⁶ La profitkvoto povas fali ĉe kreskanta kvoto de la plusvaloro (grado de ekspluatado de la laboristoj) kaj ankaŭ ĉe kreskanta absoluta kvanto de la profito. Tio lasta ne nur povas okazi, sed devas okazi, surbaze de la kapitalisma produktado.⁷⁷

Ĉio ĉi signifas, ke ekzistas konstante profundiganta kontraŭdiro inter unuflanke la evoluo de la *produktadfortoj*, inter la teĥnika kaj scienca progreso kaj aliflanke la *plivalorigo de la kapitalo*, kiu estas la sola celo de la kapitalisma produktadmaniero.

„La profitkvoto“, diras Markso, „estas la movforto en la kapitalisma produktado, kaj nur tio produktiĝas, kio kaj kiom ĝi produkteblas kun profito.“⁷⁸

Markso montras, ke al la tendenco de malkresko de la profitkvoto kontraŭefikas serio da aliaj faktoroj, kiuj malrapidigas tiun tendencon (kresko de la kvoto de la plusvaloro, do de la grado de ekspluatado de la laboristoj; senlaboreco kiu premas sur la salajro; ŝparemo en la aplikado de konstanta kapitalo; ne ekvivalenta ekstera komerco kun malpli evoluintaj landoj, monopolprofito ktp).

La leĝo de la tendenca falo de la profitkvoto montras aparte klare la *historiajn limojn* de la kapitalismo, ĝiajn nekuraceblajn kontraŭdirojn. Ĝenerale esprimite, skribas Markso, la kontraŭdiro konsistas en tio, ke la kapitalisma produktadmaniero inkludas tendencon de *absoluta* disvolvado de la produktadfortoj, dum ĝi aliflanke celas la konservadon de la ekzistanta kapitalvaloro kaj ĝian maksimuman plivalorigon. Ĝia specifa karaktero estas direktita al la ekzistanta kapitalvaloro kiel rimedo de ĝia kiom eble plej granda plivalorigo. La metodoj por tio estas malpliigo de la profitkvoto, senvalorigo de la ekzistanta kapitalo, disvolv-

76 Saml., p. 223.

77 Saml., p. 227-228.

78 Saml., p. 251.

4. La politika ekonomio

ado de la produktadfortoj surkoste de la jam produktitaj produktadfortoj:

„La kapitalisma produktado konstante strebas superi tiujn al ĝi imanentajn barojn, sed ĝi superas ilin nur per rimedoj, kiuj kontraŭmetas al ĝi denove tiujn barojn kaj laŭ pli potenca skalo. La *vera* baro de la kapitalisma produktado estas la *kapitalo* mem, estas la jeno: ke la kapitalo kaj ĝia memplivalorigo aperas kiel elirpunkto kaj finpunkto, kiel motivo kaj celo de la produktado; ke la produktado estas nur produktado *por la kapitalo* kaj ne inverse la produktadrimedoj nur rimedoj por ĉiam pli ampleksiĝanta formado de la vivprocezo *por la socio* de la produktantoj. La baroj, ene de kiuj la konservado kaj plivalorigo de la kapitalvaloro, kiu baziĝas sur la eksproprietigo kaj malriĉigo de la granda amaso de la produktantoj, povas sole moviĝi, tiuj baroj eniras do konstante en kontraŭdiron kun la produktadmetodoj, kiujn la kapitalo devas apliki por sia celo, kaj kiuj stiras al senlima pliigo de la produktado, al la produktado kiel memcelo, al senkondiĉa disvolvo de la sociaj produktadfortoj de la laboro. La rimedo – senkondiĉa disvolvado de la sociaj produktadfortoj – konstante konfliktiĝas kun la limigita celo, la plivalorigo de la ekzistanta kapitalo. Se do la kapitalisma produktadmaniero estas historia rimedo por disvolvi la materian produktadforton kaj krei la por ĝi taŭgan mondmerkaton, ĝi estas samtempe la konstanta kontraŭdiro inter tiu ĝia historia tasko kaj la al ĝi kongruaj sociaj produktadkondiĉoj.”⁷⁹

79 Saml., p. 259-260.

4.6 La lenina teorio de imperiismo

En siaj esploroj pri la kapitalismo fine de la 19-a kaj en la unuaj du jardekoj de la 20-a jarcento, Lenino rekte daŭrigis Markson kaj Leninon. Tiuj, en la tria volumo de la *Kapitalo* kaj en la *Kontraŭ-Duringo*, elirante de la leĝo de koncentriĝo kaj centriĝo de la kapitalo kaj de la tendenco falo de la profitkvoto, jam atentigis pri la kreskanta rolo de la kapitalo kunigita en akcisosocietoj kaj pri la graveco de la karteloj kaj trustoj. Markso montris, ke la kapitalo, kiu ĉiukaze premias socian koncentriĝon de produktadrimedoj kaj de laborfortoj, ĉi tie ricevas rekte la formon de *socia kapitalo* kaj ke ĝiaj entreprenoj fariĝas el privataj entreprenoj sociaj entreprenoj.

La funkcia kapitalisto transformiĝas en nuran direktanton, mastrumanton de fremda kapitalo, la kapitalproprietulo en nuran monkapitaliston. Kapitalfunkcio kaj kapitalproprietulo estas do disigitaj:

„Tio estas la nuligo de la kapitalisma produktadmaniero ene de la kapitalisma produktadmaniero mem”, diras Markso, „kaj, pro tio, kontraŭdiro kiu neniigas sin mem, kiu evidente prezentiga kiel nura transira punkto al nova produktadformo. ... Ĝi starigas en certaj sferoj la monopolon kaj tial provokas la enmiksiĝon de la ŝtato”.⁸⁰

Ĉar la proprieto ekzistas en la formo de akcio, ĝia moviĝo kaj transigo fariĝas pura rezulto de la borsa ludo, kie la fiŝetoj estas glutataj de la ŝarkoj kaj la ŝafoj de la borsaj lupoj. En la akcissistemo jam ekzistas la kontraŭeco kontraŭ la malnova formo, en kiu sociaj produktadrimedoj aperas kiel individua proprieto, sed la transformado en la akcion restas mem ankoraŭ kaptita en la kapitalismaj baroj. Do, anstataŭ superi la kontraŭecon inter socia produktado kaj privata alproprigo, ĝi nur elformas ĝin en nova formo. Markso konkludas, ke en la historia senco la kapitalismaj entreprenoj same kiel la kooperativaj fabrikoj konsiderendas „*kiel formoj de transiro el la kapitalisma en la asociitan*”

80 Saml., p. 425-454.

4. La politika ekonomio

produktadmanieron, sed ke en la unuaj la kontraŭeco estas negative, en la lasta pozitive nuligita^{81, 82}.

En la lasta eldono de la *Kontraŭ-Duringo* ankoraŭ kontrollegita de li mem, en la jaro 1894, do dek unu jarojn post la morto de Markso, Engelso povis ankoraŭ plu sekvi tiun evolutendencon de la kapitalismo. Li montris, ke la ege kreskintaj produktadfortoj devigis la kapitalistojn, tiom kiom tio eblas ene de la kapitalkondiĉo, agnoski la socian naturon de la produktadfortoj per la starigo de ĉiam pli grandaj akcisosocietoj kaj eĉ per la transformado en ŝtatan proprieton (ekz-e ĉe la fervojoj kaj ĉe la poŝto). Sed nek la transformado en akcisosocietojn nek tiu en ŝtatan proprieton nuligas la kapitalecon de la produktadfortoj, tiom longe kiom la ŝtato estas ŝtato de la kapitalistoj, la idea ĉiomkapitalisto.⁸³

Rekte daŭrigante tiujn konstatojn de Markso kaj Engelso, Lenino analizis dum la unua mondmilito la kapitalismon tian, kia ĝi tiutempe estis evoluinta, speciale en sia verko *La imperiismo kiel plej alta stadio de la kapitalismo*. Lenino eliris de la koncentriĝo de la produktado kaj de la kapitalo, de la ĉiam pli forta etendiĝo de la kapitalismaj *monopoloj* (karteloj, sindikatoj, trustoj, elformiĝo de gigantaj konzernoj, el kiuj kelkaj malmultaj dominas tutajn industribranĉojn), kiuj fariĝis esenca trajto de la kapitalisma ekonomia sistemo. Pere de materialo liverita de la burĝa statistiko Lenino pruvis, ke la evoluo antaŭdirita de Markso, ke el la libera konkurenco, pro la koncentriĝo kaj centriĝo de la kapitalo, el la libera konkurenco elformiĝos la monopoloj, komence de la 20-a jarcento fariĝis la dominanta ekonomia fakto en la kapitalismaj landoj.

81 En la originalo: *aufgehoben* = *aŭfhebita* (dialektika esprimo kiu signifas samtempe *nuligita* kaj *konservata*). -vl

82 Saml., p. 455-456.

83 MEW, vol. 20, p. 258-260.

4.6 La lenina teorio de imperiismo

En tiu evolustadio la monopoloj, sekve al la koncentriĝo de la produktado, estas „*ĝenerala baza leĝo de la kapitalismo*”.⁸⁴ La konkurenco transformiĝis al monopolo, la sekvo estas giganta progreso de la sociiĝo de la produktado, same de la procezo de la tehnikaj inventoj kaj perfektigoj. La sociaj produktadrimedoj restas tamen privata proprieto de eta nombro da personoj, formale la ĝenerala kadro de la libera konkurenco restas valida, sed la premo de la multaj monopolposedantoj sur la ceteran loĝantaron fariĝas ĉiam pli peza kaj pli neeltenebla. El la formiĝo de ĉiopovaj ekonomiaj monopoloj elformiĝis neeviteble dominadrilato kaj la kun tio ligita potenco: la monopolo trabatas al si la vojon ĉie kaj ĉiel. Sed la monopoloj ne kapablas forigi la krizojn, tiuj male akriĝas la ĥaosecon, propran al la kapitalisma produktadmaniero en ĝia tutaĵo. Aliflanke la krizoj siavice tre plifortigas la tendencon al koncentriĝo kaj al la monopolo (tiel en la krizo de la jaro 1900).⁸⁵

Lenino atentigis pri la nova rolo de la *bankoj*, ĉe kiuj okazis rapida koncentriĝo kaj kiuj transformiĝis el modestaj perantoj al grandaj monopolposedantoj. Ili disponas pri preskaŭ la tuta monkapitalo de ĉiuj kapitalistoj kaj etentreprenistoj kaj pri la plej granda parto de la produktadrimedoj kaj fontoj de krudmaterialoj, kaj tio konsistigas „*unu el la bazaj procezoj de la transiro de la kapitalismo en la kapitalisman imperiismon*”.⁸⁶ Manpleno da monopolistoj submetas al si, pere de la bankegoj, per etendigo aŭ malaltigo, faciligo aŭ malfaciligo de la kredito, la komercan kaj industrian operacion de la kapitalisma socio. La procezo de la kapital-koncentriĝo kaj de la monopoliĝo estas ege fortigata kaj rapidigata de la bankoj.⁸⁷

84 Lenin: *Der Imperialismus als höchstes Stadium des Kapitalismus*, LW, vol. 22, p. 204.

85 Saml., p. 209-213.

86 Saml., p. 214.

87 Saml., p. 218-220.

4. La politika ekonomio

Samtempe evoluas person-unuiĝo de la bankoj kun la plej grandaj industriaj kaj komercaj entreprenoj, ambaŭflanka kunfandiĝo per akcipoŝedo kaj reciproka reprezentado en la kontrolkonsilantaroj kaj estraroj. La evoluo de la bankoj al institucioj de vere universala karaktero kaj ĉiam pli granda kunfandiĝo de la banka kun la industria kapitalo al finanĉkapitalo estas por la kapitalismo de la 20-a jarcento karakteriza. Tio estas la transiro „*de la regado de la kapitalo ĝenerala al la regado de la finanĉkapitalo*”.

La enhavo de tiu nocio estas: koncentriĝo de la produktado, el tiu estiĝantaj monopoloj, kunfandiĝo aŭ kunkreskado de la bankoj kun la industrio. La finanĉkapitalo tiras pro sia monopola pozicio kolosajn kaj ĉiam pli grandiĝantajn profitojn el fondaĵoj, el la emisi-funkcio, el ŝtataj pruntoj kaj trudas al la tuta socio tributon favore al la monopolistoj. La disigo de la kapitalproprietato disde la aplikado de la kapitalo en la produktado, de la monkapitalo disde la industria kapitalo, de la kapitalisma rentulo disde la funkcianta entreprenisto atingis sub la regado de la finanĉkapitalo egan etendiĝon.⁸⁸

Kiel kroman esencan trajton de la monopolisma kapitalismo aŭ imperiismo Lenino nomas la kapitaleksporton kiel kompletigon de la vareksporto. Markso atentigis jam en la tria volumo de la *Kapitalo* pri la fenomeno de relativa superproduktado de kapitalo, la *superakumulado*.⁸⁹ En tiu kunteksto li diris, ke kiam kapitalo estas sendita eksterlande, tio ne okazas ĉar ĝi absolute ne povas esti aplikata enlande, sed ĉar ĝi povas akiri eksterlande *pli altan* profitkvoton.⁹⁰ Lenino montris nun, ke ĉe la sojlo de la 20-a jarcento en la koncernaj kapitalismaj landoj estiĝis konsiderinda „kapitalabundo”. Li emfazis, ke la kapitaleksporto okazis tiam speciale en postrestintajn landojn, en kiuj la

88 Saml., p. 224-242.

89 MEW, vol. 25, p. 261 sj.

90 Saml., p. 266.

4.6 La lenina teorio de imperiismo

grundprezoj kaj la salajroj estis malaltaj, la krudmaterialoj malmultekostaj, sed la profitoj tre altaj. Samtempe la kapitaleksporto fariĝas esenca rimedo por subteni la propran vareksporton.⁹¹

En la mezuro, laŭ kiu la kapitaleksporto estis kreskinta kaj la eksterlandaj kaj koloniaj ligoj kaj influferoj de la grandaj monopol-unuiĝoj etendiĝis, okazis inter ili mondvastaj interkonsentoj, la formiĝo de internaciaj karteloj. Lenino ilustris tiun evoluon speciale ĉe la dispartigo de la merkatoj fare de la internaciaj petrol- kaj elektro-konzernoj. La kapitalistoj, diris li, dispartigas la mondon inter si tute ne pro aparta maliceco, sed ĉar la atingita ŝtupo de *koncentriĝo* devigas ilin iri tiun vojon por akiri profitojn; ĉe tio la metodo de la dispartigo estas tiu de la respektiva forto, alia metodo ne povas ekzisti en la kapitalismo.

„Ĉar sub la kapitalismo”, skribis Lenino, „por la dispartigo de la interes- kaj influ-sferoj, de la kolonioj ktp *ne penseblas* alia bazo ol la *forto* de la en tio partoprenantoj, ilia ĝenerale ekonomia, financa, milita kaj alia forto. Sed la forto de la partoprenantoj ŝanĝiĝas malegalece, ĉar *egaleca* evoluo de la unuopaj entreprenoj, trustoj, industribranĉoj kaj landoj ne povas ekzisti sub la kapitalismo.”⁹²

Fine Lenino montris, ke komence de la 20-a jarcento la mondo estis dispartigita inter malmultaj imperiismaj grandpotencoj kaj ke el ekonomie kondiĉitaj kontraŭecoj inter tiuj potencoj devis ekflami akra batalo pri la *novdispartigo* de la mondo. Ju pli alte la kapitalismo estas evoluinta, ju pli la manko de krudmaterialo sentebblas, ju pli evoluintaj estas la konkurenco kaj la ĉasado je krudmaterialoj, des pli akre okazas la batalo por akiri koloniojn kaj la provo dependigi aliajn teritoriojn. Tipa por la epoko de la kapitalisma imperiismo estas ne nur la koloniposedaj kaj la

91 Lenin: Der Imperialismus als höchstes Stadium des Kapitalismus, LW, vol. 22, p. 244-249.

92 Saml., p. 250-257; 300.

4. La politika ekonomio

koloniaj landoj, kiuj estas formale politike sendependaj, „sed en la realo implikitaj en reto de financa kaj diplomatia dependeco”.⁹³

Lenino nomis kiel la *ekonomie* bazan trajton ĉe la elformiĝo de la imperiismo la anstataŭigon de la kapitalisma libera konkurenco per la kapitalismaj monopoloj. Por la imperiismo estas kvin trajtoj decidaj:

„1. Koncentriĝo de la produktado kaj de la kapitalo, kiu atingas tiom altan evoluŝtupon, ke ĝi kreas monopolojn, kiuj en la ekonomia vivo ludas la decidan rolon;

2. kunfandiĝo de la bankkapitalo kun la industrikapitalo kaj estiĝo de financeligariĥio surbaze de tiu ‘financkapitalo’;

3. la kapitaleksporto, malsame al la vareksporto, akiras apartan gravecon;

4. internaciaj monopolismaj kapitalist-unuiĝoj formiĝas, kiuj dispartigas la mondon inter si, kaj

5. la teritoria dispartigo de la Tero inter la kapitalismaj grandpotencoj estas finita.”⁹⁴

Lenino pruvis, ke la imperiismo *politike* signifas la tendencon al reakcio kaj perforto, ke ĝi inkludas la vetkuron de kelkaj grandpotencoj pri hegemonio.

„La imperiismo estas la epoko de la financkapitalo kaj de la monopoloj”, skribis li, „kiuj ĉien alportas la tendencon al dominado kaj ne al libereco. Reakcio sur la tuta linio, egale sub kia politika sistemo, ekstrema akriĝo de la kontraŭecoj ankaŭ sur tiu kampo – jen la rezulto de tiuj tendencoj.”⁹⁵

Lenino samtempe emfazis ke la imperiismo kreas la tendencon je stagnado kaj putrado, ke ĝi estas *parazita* kapitalismo.⁹⁶ Sed estus eraro supozi, diris li, ke tiu putrad-

93 Saml., p. 258-267.

94 Saml., p. 270-271.

95 Saml., p. 302.

96 Saml., p. 280 sj; p. 305.

4.6 La lenina teorio de imperiismo

tendenco ekskludas entute rapidan kreskon; ĝenerale la kapitalismo kreskas signife pli rapide ol antaŭe, sed tiu kresko fariĝas ĝenerale ĉiam pli malegaleca kaj montriĝas aparte en la putrado ĝuste de la plej kapitalfortaj landoj.⁹⁷ En siaj esploraĵoj Lenino atentigis pri la ligiteco inter la imperiismo kaj la oportunismaj tendencoj en la laborista movado, kiuj estas nutrataj per tio ke la kapitalistoj kapablas kvazaŭ korupti unuopajn laboristajn tavolojn el la monopolprofitoj kaj el la elrabado de la koloniaj kaj dependaj landoj.⁹⁸

Lenino determinis la *historian* lokon de la imperiismo kiel pereanta, mortanta kapitalismo. Li atentigis pri la alta grado de sociigo de la produktado kaj de la organizado kaj planado ene de la monopolismaj konzernoj kaj konkludis, ke privatekonomiaj kaj privatproprietaj kondiĉoj estas ŝelo, kiu jam ne kongruas kun la enhavo.⁹⁹ Tiusence li diris, ke la imperiismo, kiu en la unua mondmilito alportis nemezureblan suferon kaj mizeron super la popoloj, estas la „*erao de la proleta, socialisma revolucio*“.¹⁰⁰

Dum la unua mondmilito Lenino atentigis pri la tendenco, ke la monopolisma kapitalismo transformiĝas en la ŝtatmonopolisman, ke en serio da landoj la ŝtato transiris al regulado kaj gvidado de la ekonomiaj procezoj. Sed ĉar tio okazas ĉe konservado de la privata proprieto je la produktadrimedoj, ĝi kondukas al pli granda ekspluatado de la laborantaj amasoj, al fortigo de la reakcio kaj de la milita despotismo. Samtempe Lenino emfazis ke la ŝtatmonopolisma kapitalismo, kiu estis akcelita de la milito, eksterordinare fortigis ĉiujn materiajn-ekonomiajn kaj organizajn premisojn por la socialismo. Ĉe ŝtate gvidata granda

97 Saml., p. 305-306.

98 Saml., p. 286; p. 307.

99 Saml., p. 308.

100 Lenin: Materialien zur Revision des Parteiprogramms [Lenino: Materialoj por revizii la partiprogramon], LW, vol. 24, p. 460.

4. La politika ekonomio

entrepreno, ĉe ŝtatmonopolo, la demando estas, en kies intereso tiu gvidado okazas, diris Lenino, ĉu en la intereso de la bienposedantoj kaj kapitalistoj – aŭ en la intereso de la popolo. En la lasta kazo tio estas paŝo al socialismo. Ĉar la socialismo estas nenio alia ol la venonta paŝo antaŭen trans la ŝtatkapitalisman monopolon. La ŝtatmonopolisma kapitalismo estas „*la plej kompleta materia preparo de la socialismo, ĝia rekta antaŭŝtupo*”.¹⁰¹

¹⁰¹Lenin: *Die drohende Katastrophe und wie man sie bekämpfen soll* [Lenino: La minacanta katastrofo kaj kiel kontraŭbatali ĝin], LW, vol. 25, p. 369-370.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

En pli ampleksa senco de la nocio la tuta mond- kaj histori-koncepto de la marksismo estas nomata scienca socialismo aŭ komunismo. En tiu ĉi sekcio ni pritraktos la sciencan socialismon en pli strikta senco – kiel teorion kaj programon, strategion kaj taktikon de la proletara klasbatalo, de la socialisma revolucio kaj de la konstruado de la socialisma socio.

Objekto de la scienca socialismo estas la klasbatalo de la laborista klaso, ĝia celado historie necese elkreskinta el la evoluo de la kapitalismo mem: la revolucia transformado de la kapitalisma en la socialisman socion; la ekonomiaj, politikaj kaj ideologiaj formoj kaj metodoj de la batalo por tiu celo; la rilato de la interaj celoj kaj taskoj, fontantaj el la diversaj stadioj de la historia evoluo, kun la socialisma celo; la rilatoj de la laborista klaso kaj de ĝiaj batalantoj al la organizita laborista movado kaj de la diversaj partoj kaj pensofluoj de tiu movado inter si; la rilatoj de la laborista klaso al la aliaj laborantaj klasoj kaj tavoloj de la socio kaj al la laborista klaso de la aliaj landoj. Jen kelkaj el la plej gravaj problemaroj, pri kiuj la scienca socialismo okupiĝas. Tiusence Engelso nomas la sciencan socialismon la „*vivanta teorio de la ago, de la laboro kun la laborista klaso en ĉia ebla stadio de ĝia evoluo*“.¹

Markso, Engelso kaj Lenino verkis pri tiuj demandoj ne nur kiel teoriuloj, sed kiel praktikuloj, surbaze de jardekojn longa sperto, kiel gvidantoj kaj konsilantoj de la socialisma laborista movado. Ilia teorio de la klasbatalo de la laborista klaso kaj de la socia revolucio estas ĝeneraligo de tiuj spertoj kaj de la spertoj de la tuta internacia laborista movado de ilia tempo.

1 Engels an Laura Lafargue [Engelso al Laura Lafargue], 1891-05-04, MEW, vol. 38, p. 101.

5.1 De la utopia al la scienca socialismo

Markso kaj Engelso daŭrigis en sia teorio de la scienca socialismo la grandajn utopiajn socialistojn de la frua 19-a jarcento, speciale Sensimonon, Furieron kaj Ovenon. Sed ilia teorio radikas en la fakta *historia* kaj *ekonomia* evoluo de la 1830-aj kaj 1840-aj jaroj, en la unuaj sociaj kaj politikaj movadoj, en kiuj la laborista klaso aperis kiel *memstara* historia forto.

Markso, Engelso kaj Lenino ĉiam emfazis la gravecon de la grandaj socialistaj utopiistoj por ilia propra tempo kiel antaŭuloj de la scienca socialismo. Ĉe tio ili substrekis ke la nematureco de la ideoj kaj postuloj, la limoj kaj la utopieco de iliaj sistemoj estis ŝuldata al la nematureco de la historiaj kondiĉoj, al la ankoraŭ malforta evolunivelo de la kapitalismo kaj al la ankoraŭ malmulte elformita klasa antagonismo inter burĝaro kaj industriproletaro.

„Ili estis devigataj konstrui al si la elementojn de nova socio el la kapo, ĉar tiuj elementoj en la malnova socio ankoraŭ ne elpaŝis ĝenerale videble; ili estis limigitaj por la bazaj trajtoj de sia novkonstruo al la alvoko al la racio, ĉar ili ankoraŭ ne povis alvoki la samtempan historion”, skribis Engelso.²

En la Manifesto de la Komunista Partio Markso kaj Engelso emfazis ke la inventintoj de la utopiaj socialismaj kaj komunismaj sistemoj ekkonis ja la klasan antagonismon kaj la dissolvajn elementojn de la kapitalisma socio, sed vidis ĉe la flanko de la laborista klaso nenian iniciaton, nenian propran politikan movadon; ili ankaŭ ne trovis la materiajn kondiĉojn por la liberigo de la proletaro. Pro tio aperas ĉe ili, anstataŭ la socia movado ilia propra inventemo, anstataŭ la historiaj kondiĉoj de la liberigo de la laboristoj, fantaziaj, anstataŭ la iom post iom okazanta organiziĝo de la proletaro al klaso, aparte elkovita organizado de la socio. Por ili la proletaro ekzistis nur kiel la plej suferanta klaso, ili kredis sin superaj al la klasa antagonismo kaj alvokis la tutan socion sendistinge, eĉ prefere la regantan klason; ili

2 Engels: *Anti-Dühring*, MEW, vol. 20, p. 247.

5.1 De la utopia al la scienca socialismo

opiniis ke oni bezonas nur kompreni ilian sistemon por akcepti ĝin kiel la kiom eble plej bonan. Pro tio ili ankaŭ malakceptis ĉian politikan, speciale revolucionan agon. En la mezuro, laŭ kiu la klasbatalo evoluas kaj formiĝas, la utopiaj sistemoj perdas ĉian praktikan valoron kaj ĉian teorian pravecon.³

Kiam Markso kaj Engelso surbaze de sia materiisma histori-koncepto kaj de siaj ekonomiaj esploradoj ellaboris la bazajn ideojn de la scienca socialismo, tio okazis, kiel videblas el la 3-a sekcio de la *Manifesto de la Komunista Partio*, en la disputo kun multnombraj socialistaj modaj tendencoj samtempaj. Aparte grava ankaŭ por la estonta dislimiĝo de siaj propraj konceptoj estis la kritiko de la etburĝa socialismo kaj de la tiel nomata germana „vera” socialismo. La unua resumiĝas enhave per tio, ke ĝi volas aŭ restarigi la malnovajn antaŭkapitalismajn produktad- kaj propriet-kondiĉojn aŭ perforte ree enfermi la modernajn produktad- kaj cirkulad-rimedojn en la kadron de la malnovaj propriet-kondiĉojn. En ambaŭ kazoj la etburĝa socialismo estas reakcia kaj utopia samtempe, laŭ la *Manifesto*.⁴ La „vera socialismo” dediĉas sin al ĝenerale homa amfervoro kaj pretendas reprezenti socialisman koncepton starantan super ĉiaj klasaj interesoj, kiuj krome rifuzas la politikan batalon kontraŭ la regantaj feŭdaj potencoj, por la ankoraŭ elbatalendaj burĝaj liberecoj. Ĝi proklamas, kiel Markso kaj Engelso tion esprimas, „la germanan filistron tipa homo”.⁵

40 jarojn poste, Engelso klarigas en la antaŭparolo al la angla eldono de la *Manifesto de la Komunista Partio* de 1888, kial la proletaj socialistoj de 1847 kaj 1848 devis nomi sin komunistoj:

3 Karl Marks kaj Friedrich Engels: *Manifesto de la Komunista Partio*, v.c., p. 72-73.

4 Saml., p. 65-70.

5 Saml., p. 70.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

„Sub socialistoj en 1847 oni komprenis unuflanke la adeptojn de diversaj utopiecaj sistemoj: la Owen-istoj en Anglio, la Fourier-istoj en Francio, ambaŭ jam ŝrumpiĝintaj al malrapide formortantaj sektoj; aliflanke la plej multespecajn «socialajn» ĉarlatanojn, kiuj promesis forigi la sociajn mankojn per ĉiuspeca flikado, sen ajna danĝero por kapitalo kaj profito – en ambaŭ kazoj temas pri homoj starintaj ekster la laborista movado kaj prefere serĉintaj subtenon ĉe la «kleraj» klasoj. Tiu parto de la laborista klaso, kiu estis konvinkiĝinta pri la nesufiĉeco de nuraj politikaj reformoj kaj postulinta totalan rekonstruon de la socio, tiu parto siatempe sin nomis komunista. Temis ankoraŭ pri kruda, nerabotita, pure instinkta speco de komunismo; sed ĝi trafis la kardinalan punkton kaj estis sufiĉe potenca en la laborista movado, por krei la utopiecan komunismon, tiun de Cabet en Francio, tiun de Weitling en Germanio. Pro tio do en la jaro 1847 la socialismo estis movado de la meza klaso, la komunismo – movado de la laborista klaso. La socialismo estis «salonakceptebla», almenaŭ sur la kontinento; la komunismo estis la rekta kontraŭo. Kaj ĉar ekde la komenco ni opiniis, ke «la emancipado de la laborista klaso devas esti la faro de la laborista klaso mem», ne povis esti dubo pri tio, kiun el la du nomoj ni elektos. Eĉ pli, ekde tiam ni neniam pensis malkonfesi ĝin.”⁶

Kio distingas la *sciencan* socialismon aŭ komunismon disde la aliaj socialismaj aŭ komunismaj konceptoj, estis precipe jenaj vidpunktoj: *Unue*, ĉi tie la socialismo jam ne estis komprenata kiel idealo, kiel utopia skizo de perfekta socio de sociala justeco, sed science derivita el la historia-ekonomia evoluo de la kapitalisma socio, el la de ĝi kreataj kontraŭdiroj kaj krizoj kaj el la de ĝi estigita klasa antagonismo kaj klasbatalo inter kapitalo kaj laboro, burĝaro kaj proletaro. La socialismo estis nun la *historia rezulto* de la akriĝanta kaj al solvo premanta kontraŭdiro inter unuflanke la gigantaj produktadfortoj kiujn la kapitalismo kreis kaj kiuj evoluis, kaj aliflanke la kapitalismaj proprietrilatoj, kiuj transformas tiujn produktadfortojn en krizoj kaj militoj ĉiam

6 Saml., p. 16.

5.1 De la utopia al la scienca socialismo

denove en detrufortojn kaj kiuj tiel fariĝas malhelpo de la plua evoluo de la homaro.

Due la socialismo kaj komunismo estis nun ne plu pli aŭ malpli elokventa, pli aŭ malpli evidenta alvoko al la racio kaj al la kompreno aŭ al la morala sento de ĉiuj bonintencaj kaj sinceraj homoj. Ĝi estis scienca interpreto de la situacio kaj samtempe praktika alvoko al la rekta intereso de la plej granda kaj ĉiam kreskanta klaso de la moderna socio, de la laborista klaso. Samtempe ĝi estis nun esprimo de okazanta klasbatalo, de la historia movado de la laboristoj, kiuj jam komencis batali por plibonigo kaj ŝanĝo de sia situacio. La kondiĉoj, la vojo kaj la celoj de tiu movado estis nun science formulitaj.

Tiusence Markso diras, ke la scienca komunismo ne estas doktrino, sed movado, ĝi ne eliras de principoj, sed de faktoj, kaj la komunistoj havas kiel kondiĉon ne tiun aŭ alian filozofion, *„sed la tutan ĝisnunan historion kaj speciale ĝiajn nuntempajn faktajn rezultojn en la civilizitaj landoj“*.

*„La komunismo estiĝis el la granda industrio kaj ĝiaj sekvoj, el la starigo de la mondmerkato, el la per tiu donita senbrida konkurenco, el la ĉiam pli perfortaj kaj pli ĝeneralaj komercaj krizoj, kiuj jam nun fariĝis kompletaj mondmerkataj krizoj, el la estigo de la proletaro kaj la koncentriĝo de la kapitalo, el la de tio sekvanta klasbatalo inter proletaro kaj burĝaro. La komunismo, tiom kiom ĝi estas teoria, estas la teoria esprimo de la pozicio de la proletaro en tiu batalo kaj la teoria resumo de la kondiĉoj de la liberiĝo de la proletaro.“*⁷

Lenino nomis kiel kernon de la scienca socialismo, kiel la plej gravan en la marksa instruado *„la klarigon de la mondhistoria rolo de la proletaro kiel de la kreanto de la socialisma socio“*.⁸ La marksismo konkludas tiun historian rolon kaj

7 Marx: *Die Kommunisten und Karl Heinzen* [Markso: La komunistoj kaj Karl Heinzen], MEW, vol. 4, p. 321-322.

8 Lenin: *Die historischen Schicksale der Lehre von Karl Marx*

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

taskon de la laborista klaso el ties *objektiva* pozicio en la socio, speciale en la produktadprocezo. Unue la laborista klaso estas la nombre plej granda klaso de la socio, kiu krome plu kreskas kun la etendiĝo de la industrio kaj la sorbado de larĝaj tavoloj de urbaj kaj kamparaj etproprietuloj. En la evoluintaj landoj ĝi estas la plimulto de la loĝantaro. Krome la laborista klaso staras ekonomie en la centro de la moderna ekonomia vivo, ĝi regas ties vivnervon, sen ĝia laboro industrie evoluinta lando estas tute ne pensebla. La laborista klaso loĝas en la centroj de la kapitalisma socio, la grandurboj; ĝi estas unuigita en gigantaj laborejoj kaj fabrikoj kaj per tio inter ĉiuj laborantaj klasoj kaj tavoloj plej facile organizebla kaj ankaŭ fakte plej bone organizita, kaj pro tio plej agkapabla. Fine kaj ne laste la laborista klaso, per sia situacio en la kapitalisma socio, speciale per la sociala malsekureco de sia ekzistado, estas la klaso, kies intereso plej forte postulas la superadon de la kapitalismo kaj kiu samtempe, ĉar ĝi havas neniam proprajn privilegiojn, kiujn ĝi povus defendi, povas gajni por si aliajn laborantajn tavolojn kiel aliancantojn.

Markso, Engelso kaj Lenino neniam konsideris tiun el la objektiva socia pozicio elkreskintan historian taskon de la laborista klaso izolite de ĝia respektiva subjektiva grado de konscio kaj organiziteco, de ĝia batalsperto kaj batalforto. Ili ĉiam kontraŭis la ideon, ke la historia celo de la laborista movado, la socialismo, aperos per si mem kiel destineca, pasive atendebla rezulto de la historia evoluo. Same ili ankaŭ ne vidis en la klasbatalo de la laboristoj procezon, kiu aŭtomate kaj kun blinda sponteca povo kondukas al la celo. La *historia neceso* kaj leĝeco de la socialismo – tio signifis por ili nur, ke la laborista klaso pro la detruaj kontraŭdiroj kaj katastrofoj de la kapitalismo, pro la kreskanta malsekureco de ĝia ekzistado, estas devigata al principa, do

[Lenino: La historiaj sortoj de la instruo de Karlo Markso], LW, vol. 18, p. 576.

5.1 De la utopia al la scienca socialismo

socialisma eliro. Historie necesa do, ĉar sole kapabla ŝanĝi la socian mizeron kreitan de la kapitalismo kaj ebligi al la laboranta loĝantaro sekuran vivon indan je homoj. En la *Kontraŭ-Duringo* Engelso diras, „*ke revolucio de la produktad- kaj distribu-maniero devas okazi, kiu forigas ĉiujn klasajn diferencojn, se la tuta moderna socio ne devas pereii*”. En tiu palpebla, materia fakto fontas la venkocerteeco de la moderna socialismo.⁹

9 Engels: *Anti-Dühring*, MEW, vol. 20, p. 146-147.

5.2 Celo, enhavo kaj formoj de la batalo de la laborista klaso

Laŭ la opinio de Markso, Engelso kaj Lenino la klasbatalo de la laboristoj estas, kiel ni vidis, laŭ sia historia *celo*, batalo por superi la kapitalismon kaj konstrui la socialisman socion. Laŭ sia respektiva *enhavo* ĝi estas la tiun celon neŝancelante alstrebanta batalo por la ekonomiaj, politikaj, spiritaĵaj kaj moralaj interesoj de la laborista klaso, kiuj rezultas el ĝia konkreta socia situacio, el la donita fortrilato de la klasoj en certa historia evolufazo. La marksismo lasis neniam la plej etan dubon pri tio, ke ĝi konsideras la socian emancipiĝon de la laborantaj homoj ebla nur per fundamenta transformado de la socio. Karlo Markso resumis tiun koncepton epigrame en la frazo: „*La laborista klaso estas revolucia, aŭ ĝi estas nenio.*”¹⁰ Ripete Markso kaj Engelso emfazis, ke en tio kuŝas unu el la esencaj diferencoj inter la batalo de la burĝaro kontraŭ la feŭda nobelaro kaj tiu de la laborista klaso kontraŭ la kapitalo. La burĝaro povis sur la vojo de la klasa kompromiso esti ne nur io, sed eĉ multo, ĉar ĝia ekonomia forto povis disvolviĝi ankaŭ ĉe politika regado de la feŭda nobelaro. La laborista klaso povas en la kadro de la kapitalisma socio ja atingi kelkajn plibonigojn de sia situacio, sed sian socian, politikan kaj spiritan-moralan emancipiĝon nur per socialisma transformego.

Markso, Engelso kaj Lenino komprenis la celon kaj movadon de la laboristoj, iliajn nunajn kaj estontajn interesojn kiel dialektikan unuon, en kiu unu estas *perata* de la alia. Tiu laborista movado, kiu ne en ĉiuj ŝtupoj de sia evoluo konservas en la vido la socialisman celon, devus disflui en la sablo kaj ĉe decidaj punktoj de la historio esti sen orientiĝo. Inverse la laborista movado, kiu elĉerpiĝus en la nura propagando de sia celo, ne kapablus kolekti la sperton kaj la fortojn kiuj sole igas la celon atingebla.

La klasikuloj de la marksismo kontraŭis do same decide

¹⁰ Marx an J. B. v. Schweitzer [Markso al J. B. v. Schweitzer], 1865-02-13, MEW, vol. 31, p. 446.

5.2 Celo, enhavo kaj formoj de la batalo de la laborista klaso

tiujn, kiuj pretis oferi la celon favore al tagaj postuloj, kiel tiujn, kiuj absolutigis la celon kaj neis la neeviteblon de transiraj stadioj. Jam en la *Manifesto de la Komunista Partio* Markso kaj Engelso diris pri la komunistoj, ke ili batalas „por realigi la senpere aktualajn celojn kaj interesojn de la laborista klaso, sed en sia aktuala movado ili samtempe reprezentas la estontecon de la movado”.¹¹ Ali-flanke Engelso post la Pariza Komunumo kritikis la naivecon kaj senpaciencon de tiuj, kiuj kredas ke ilia subjektiva volo sufiĉas pro transsalti ĉiujn interajn etapojn kaj kompromisojn, kaj li respondis al ili:

„La germanaj komunistoj estas komunistoj, ĉar ili tra ĉiuj interaj etapoj kaj kompromisoj, kiuj estis kreitaj ne de ili, sed de la historia evoluo, travidas la finan celon: forigon de la klasoj, starigon de socio, en kiu jam ne ekzistas privata propio je la Tero kaj je la produktadrimedoj.”¹²

Markso, Engelso kaj Lenino determinis la strategion kaj taktikon de la laborista movado de donita historia evolustadio ĉiam surbaze de ĉiuflanka analizo de la ekonomiaj kaj politikaj faktoj kaj tendencoj. Engelso emfazis ke la historia teorio de Markso estas „baza kondiĉo de ĉia kohera kaj konsekvenca revolucia taktiko”.¹³

Lenino resumas la ĝeneralajn trajtojn de marksisma strategio kaj taktiko de la laborista movado jene:

„Nur la objektiva konsidero de la tutaĵo de la interrilatoj de senescepte ĉiuj klasoj de donita socio kaj sekve la konsidero de la objektiva evoluŝtupo de tiu socio kiel ankaŭ de la interrilatoj inter ĝi kaj aliaj socioj, povas servi kiel bazo por ĝusta taktiko de la progresinta klaso. Ĉe tio oni rigardas ĉiujn klasojn kaj

11 Karl Marx kaj Friedrich Engels: *Manifesto ...*, v.c., p. 76.

12 Engels: *Das Programm der blanquistischen Kommune* [Engelso: La programo de la blankiaj komunum-rifuĝintoj], MEW, vol. 18, p. 533.

13 Engels an V. I. Sassulitsch [Engelso al V. I. Sasuliĉ], 1885-04-13, MEW, vol. 36, p. 304.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

ĉiujn landojn ne en ilia stato, sed en ilia dinamiko, t.e. ne en fiksa stato, sed en la moviĝo (kies leĝoj fontas en la ekonomiaj ekzistadkondiĉoj de ĉiu klaso). La moviĝo siavice estas rigardata ne nur el la vidpunkto de la pasinteco, sed ankaŭ el la vidpunkto de la estonteco, kaj pli precize ne laŭ la plata koncepto de la «evoluistoj», kiuj vidas nur malrapidajn ŝanĝojn, sed dialektike.”¹⁴

Poste Lenino citas Markson, kiu atentigis pri tio, ke en la grandaj historiaj evoluoj 20 jaroj ne estas pli ol unu tago, „*kvankam poste povas ree veni tagoj, en kiuj 20 jaroj resumiĝas*” kaj daŭrigas:

„Sur ĉiu evoluŝtupo, en ĉiu momento la taktiko de la proletaro devas konsideri tiun objekte neeviteblan dialektikon de la homa historio, per tio ke ĝi unuflanke uzas la epokojn de politika stagnado aŭ de limake malrapida, tiel nomata «paca» evoluo, por disvolvi la konscion, la forton kaj batalkapablon de la progresinta klaso, kaj per tio ke ĝi aliflanke direktas la tutan laboron al la «fina celo» de la movado de la koncerna klaso kaj aranĝas ĝin por kapabligi tiun klason solvi la grandajn taskojn en la grandaj tagoj, «en kiuj 20 jaroj resumiĝas»”.¹⁵

Laŭ tiu ĝenerala koncepto de la evoluprocezo de la batalo de la laborista klaso Markso, Engelso kaj Lenino orientis ankaŭ sian starpunkton pri la demokratiaj kaj socialismaj taskoj de tiu batalo, pri reformo kaj revolucio. Antaŭ, dum kaj post la revolucio de 1848-1849 Markso kaj Engelso defendis la principon, ke la laboristoj devas subteni la etburĝaron kaj la burĝaron ĉiam, kiam tiuj en la batalo pri demokratia konstitucio kaj pri demokratiaj rajtoj decide elpaŝas kontraŭ la feŭda reakcio. Dum la prusa konsitucikonflikto 1864-1865 Engelso kompletigis tiun penson en la senco, ke la laborista klaso devas batali por burĝaj-demokratiaj rajtoj ankaŭ tiam, kiam la posedburĝaro pro timo antaŭ la laboristoj rezignas pri tiu batalo. Eĉ tiam, opiniis

14 Lenin: *Karl Marx, Kurzer biographischer Abriß* [Lenino: Karlo Markso, Mallonga biografia skizo] ..., LW, vol. 21, p. 64.

15 Saml.

5.2 Celo, enhavo kaj formoj de la batalo de la laborista klaso

Engelso,

„restos al la laborista partio nenio alia ol daŭrigi la de la burĝoj perfiditan agitadon por burĝa libereco, gazetara libereco, kunven- kaj asocia rajto spite al la burĝoj. Sen tiu libereco ĝi mem ne povas libere moviĝi; ĝi batalas en tiu batalo por sia propra vivelemento, por la aero kiun ĝi bezonas por spiri.”¹⁶

Lenino, daŭrigante tiun bazan ideon de Markso kaj Engelso, disvolvis la *strategion* de la kunligo de la demokratio kaj de la socialisma batalo de la laborista klaso sub pli progresintaj historiaj kondiĉoj. En sia imperiismo-analizo li estis substrekinta, ke la kapitalismo de la 20-a jarcento, stampita de la monopoloj, neas la demokration ankaŭ en ĝiaj limigitaj burĝaj formoj, sed ĝuste per tio kreas kiel kontraŭtendencon demokratiajn strebojn en la amasoj.¹⁷ En tiu kunteksto Lenino emfazis du aferojn: unue, ke la decida batalo por demokratiaj postuloj sur ĉiuj kampoj de la socia vivo tute ne kontraŭdiras preparon kaj edukadon de la laborista klaso por la socialisma revolucio, sed ke, male, *„la proletaro, kiu ne faras la ĉiurilate konsekvencon, revolucian batalon por demokratio, ne povas prepari sin por la venko super la burĝaro”*.¹⁸ Due li emfazis, ke la batalo por konsekvenca demokratiismo, kvankam ĝi per si mem ne povas alporti la socialismon, do la transformegon de la ekonomiaj sociaj bazoj, en la reala historia dialektiko ne okazas ‘per si mem’, sed *„influos ankaŭ sur la ekonomio, subtenos ties transformadon, subiĝos al la influo de la ekonomia evoluo”*, kaj ke pro tio *„disvolvado de la demokratio ĝis la fino, trovado de la formoj de tia disvolvado, ilia*

16 Engels: Die preußische Militärfrage und die deutsche Arbeiterpartei [Engelso: La prusa armedemandado kaj la germana laborista partio], MEW, vol. 16, p. 77.

17 Lenin: Antwort an P. Kijewski [Lenino: Respondo al P. Kijevski], LW, vol. 23, p. 14.

18 Lenin: Die sozialistische Revolution und das Selbstbestimmungsrecht der Nationen [Lenino: La socialisma revolucio kaj la rajto de la nacioj je memdeterminado], LW, vol. 22, p. 145.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

provado en la praktiko” konsistigas unu el la integraj taskoj de la batalo por la socia revolucio.¹⁹

Sed el tio jam ankaŭ sekvas, ke Markso, Engelso kaj Lenino ne metas reformon kaj revolucion kiel neharmonieblajn antinomiojn unu kontraŭ la alian, sed ke ili vidis en tio du necesajn kaj kunligitajn flankojn de sama evoluprocezo, el kiuj tamen la batalo por reformoj estas *subordigita* al la revolucia celo de fundamenta transformado de la socio. La marksismo ĉiam engaĝiĝis por reformoj en la ekonomia, politika kaj kultura vivo, eĉ – kiel la klasikuloj emfazas – kun multe pli granda konsekvenco kaj energio ol tiuj, kiuj nomas sin reformistoj. La loko de la socialistoj, diras Engelso, „*estas en la vicoj de la batalantoj por ĉia senpera sukceso atingebla en la intereso de la laborista klaso*”; sed ili akceptas ĉiujn ĉi politikajn aŭ sociajn sukcesojn nur kiel *partopagojn* kaj konsideras „*ĉian revolucion aŭ progreseman movadon kiel paŝon antaŭen sur ilia propra vojo*”.²⁰

Tiel Markso emfazis en sia *Alvoko de la Internacia Laborista Asocio (1864)* – la 1-a Internacio – la gravecon de la sukcesa batalo por la dekhora labortago ne nur kiel „*grandan praktikan atingon*”, sed kiel venkon „*de la politika ekonomio de la laborista klaso*”.²¹ Polemikante kontraŭ tiuj, kiuj opinias, ke per atingo de reformoj, kiuj akiras leĝan forton, la laborista partio plifortigas nur la regantajn potencojn, Markso diris,

„la trudado de tiaj leĝoj transformas, male, tiun potencon, kiu estas nun uzata kontraŭ la laboristoj, en ilian propran servanton; per ĝenerala leĝo la laborista klaso atingas tion, kion ĝi per

19 Lenin: Staat und Revolution [Lenino: Ŝtato kaj revolucio], LW, vol. 25, p. 466.

20 Engels: Die künftige italienische Revolution und die sozialistische Partei [Lenino: La estonta itala revolucio kaj la socialista partio], MEW, vol. 22, p. 440.

21 Marx, in: Inauguraladresse der Internationalen Arbeiterassoziation (1864), MEW, vol. 16, p. 11.

5.2 Celo, enhavo kaj formoj de la batalo de la laborista klaso

multaj izolitaj klopodoj vane alstrebus".²²

Lenino atentigas pri tio, ke inter ĉiuj tendencoj de la laborista movado nur la marksismo ĝuste determinis la rilaton de reformo kaj revolucio. Ankaŭ dum la unua mondmilito kaj poste li postulas, ke la marksistoj devas tute ne rezigni pri la batalo por reformoj; la oportunistoj nur feliĉus, diras li, se la marksistoj lasas nur al ili la batalon por reformoj, sed mem „*evitas engaĝiĝi antaŭ la malbona realo*".²³ Lenino samtempe emfazas, ke estus „*nur burĝa trompo, se oni predikas reformojn por demandoj, kiujn la historio kaj la tuta politika situacio stampas kiel solveblaj nur per la revolucio*".²⁴

Al la ĝeneralaj bazaj trajtoj de la marksisma strategio kaj taktiko de la batalo de la laborista klaso apartenas la rilato de la *internaciaj* kaj la *naciaj* aspektoj de tiu batalo. Jam en la *Manifesto de la Komunista Partio* de 1848 Markso kaj Engelso anoncis la principe *internaciisman* starpunkton de la laborista movado, kiu elkreskas el la komunaj klasinteresoj de la laboristoj de ĉiuj landoj kontraŭ la kapitalo. La laboristoj ne havas patrujon, skribis Markso kaj Engelso. Sed per tio ke la proletaro devas unue konkeri la politikan regadon, „*konstitui sin mem kiel nacion*", ĝi estas mem ankoraŭ nacia, kvankam tute ne en la senco de la burĝaro. Ili aldonis, ke kun la antagonismo de la klasoj ene de la

22 Marx: Instruktionen für die Delegierten des provisorischen Zentralrats für den Genfer Kongreß der Internationalen Arbeiterassoziation [Markso: Instrukcioj por la delegitoj de la provizora centra konsilantaro por la Ĝeneva Kongreso de la Internacia Laborista Asocio], 1866, MEW, vol. 16, p. 194.

23 Lenin: Das Militärprogramm der proletarischen Revolution [Lenino: La armeprogramo de la proletara revolucio], LW, vol. 23, p. 80.

24 Lenin: Vorschläge des Zentralkomitees der SDAPR an die zweite sozialistische Konferenz [Lenino: Proponoj de la Centra Komitato de la SDLPR al la dua socialista konferenco], 1916, LW, vol. 22, p. 175.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

nacio falos la malamikeca pozicio de la nacioj unuj kontraŭ la aliaj.²⁵ La ofte misinterpretitan unuan parton de la penso – la laboristoj ne havas patrujon – Lenino komentis jene:

„... tio signifas, ke a) ĝia ekonomia situacio (le salariat) ne estas nacia, sed internacia; b) ĝia klasa malamiko estas internacia; c) la kondiĉoj por ĝia liberiĝo same; ke ĉ) la internacia unueco de la laboristoj estas *pli grava* ol la nacia.”²⁶

Kompreneble tio ne signifas ke Markso kaj Engelso ne atentis la naciajn movadojn por libereco kaj sendependeco de la popoloj aŭ ke ili eĉ neus ilin. Sed ili juĝis tiun batalon ĉiam el la vidpunkto de la *internaciaj interesoj* de la laborista klaso kaj el la *ĝenerala* historia evoluo antaŭen. Jam en la revolucio de 1848-1849 kaj en la 1-a Internacio Markso kaj Engelso alvokis la laboristan movadon apogi la nacian sendependig-batalon de la poloj, irlandanoj kaj de aliaj subpremataj popoloj. La de ili redaktata *Neue Rheinische Zeitung* proklamis la principon: *Popolo, kiu subpremas aliajn, povas mem ne esti libera*. Ili ankaŭ jam plene konsciis, en la mezo de la 18-a jarcento, pri la neceso de liberiĝo de la kolonie sklavitaj landoj. Markso skribis ekz-e 1853 pri la brita regado en Hindio:

„La hindoj rikoltos la fruktojn de la novaj sociaj elementoj, kiujn la brita burĝaro dissemis en ilia lando, ne pli frue ol ĝis en Britio mem la hodiaŭ regantaj klasoj estos deŝovitaj fare de la industriproletaro aŭ ĝis la hindoj fariĝis mem sufiĉe fortaj por deĵeti unu fojon por ĉiam la anglan jugon.”²⁷

Lenino ĉiuflanke ellaboris la pozicion de la marksisma laborista movado pri la *nacia kaj kolonia demando*. Li eliris de tio, ke la estiĝo de naciaj ŝtatoj, kaŭzita kaj akcelita de

25 Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto ..., v.c., p.

26 Lenin an Inès Armand [Lenino al Inès Armand] 1916-11-20, LW, vol. 35, p. 223.

27 Marx: Die künftigen Ergebnisse der britischen Herrschaft in Indien [Markso: La estontaj rezultoj de la brita regado en Hindio], MEW, vol. 9, p. 224.

5.2 Celo, enhavo kaj formoj de la batalo de la laborista klaso

la kapitalisma evoluo, estas historia progreso, kiun la laborista movado devas subteni. Pro tio li postulis, ke la internaciisma edukado de la laboristoj en la landoj subpremantaj fremdajn naciojn devas centriĝi sur tio „*ke ili propagandas kaj defendas la liberecon de la subpremataj landoj sendependiĝi*”. Lenino samtempe emfazis, ke la socialistoj nature laŭ sia historia celo engaĝiĝas por la unueciĝo, por la *unuiĝo* de la nacioj; sekve la socialisto de malgranda nacio devus inverse meti la akcenton „*sur la dua vorto de nia ĝenerala formulo: Libervola unuiĝo – de la nacioj*”.²⁸

Lenino klarigis, ke dum la burĝaro ĉiam antaŭrangigas siajn proprajn naciajn postulojn kaj metas ilin senkondiĉe, la laborista klaso devas subordigi ilin al la interesoj de sia batalo. Tiusence li diris, ke la rajto je nacia memdeterminado ne estas io absoluta, sed parto de la demokratia kaj socialisma mondmovado. Se en unuopaj kazoj la parto kontraŭdiras la tutaĵon, oni devas malatenti la parton.²⁹ En tiu kunteksto Lenino parolis pri du specoj de politiko, eĉ pri du mondperceptoj en la nacia demando: la burĝa naciismo kaj la proletara internaciismo.³⁰ Li postulis tamen distingi inter la naciismo de subpremanta kaj la naciismo de subpremata nacio. La internaciismo de anoj de subpremanta nacio devas ne limiĝi al la respekto de la formala egaleco de la nacioj, sed ĝi devas strebi al superado de la fakta malegaleco de la nacioj.³¹

28 Lenin: Die Ergebnisse der Diskussion über die Selbstbestimmung [Lenino: La rezultoj de la diskuto pri la memdeterminado], LW, vol. 22, p. 354.

29 Saml., p. 348.

30 Lenin: Kritische Bemerkungen zur nationalen Frage [Lenino: Kritikaj rimarkoj pri la nacia demando], LW, vol. 20, p. 11.

31 Lenin: Zur Frage der Nationalitäten oder der 'Autonomisierung' [Lenino: Pri la demando de etnoj aŭ de la 'aŭtonomecigo'], LW, vol. 36, p. 593.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

Jam tre frue Lenino atentigis la laboristan movadon pri la kontraŭkolonia liberiga batalo de la popoloj subpremataj de la imperiismo, kaj vidis en ĝi potencon aliancanon de la laborista movado. Li postulis de la komunistoj

„subteni ĉian liberigan movadon en la kolonioj ne per vortoj, sed per faroj, postuli la forpelon de siaj propraj imperiistoj el tiuj kolonioj, vekti en la koroj de la laboristoj de sia lando verajn fratecajn sentojn por la laboranta loĝantaro de la kolonioj kaj de la subpremataj nacioj”.³²

Lenino nomis kiel celon de la batalo de la laborista klaso koncerne la interrilaton de la nacioj ĉiam la superadon de la nacia disputo kaj de la nacia izoliĝo; sen la libervola strebado de la laboristoj kaj de la laboruloj de ĉiuj landoj kaj de la nacioj de la tuta mondo „*je ligo kaj je unueco*” la tasko venki super la kapitalismon „*ne povas sukcese plenumiĝi*”.³³

Kiel en la nacia kaj kolonia demando, la pozicio de Markso, Engelso kaj Lenino estas ankaŭ pri la *militoj*, estiĝantaj el la antagonismoj de la klasa socio, determinita de la *internaciaj* interesoj de la laborista klaso kaj de la tuthistoria progreso. La socialistoj, diris Lenino, ĉiam kondamnis la militojn inter la popoloj kiel „*barbaran kaj bestecan aferon*”. Sed ilia pozicio al la milito distingiĝas disde tiu de la burĝaj pacistoj kaj de la anarĥiistoj per ilia kompreno de la neŝanĝebla ligo de la militoj kun la batalo de la klasoj ene de lando.³⁴

Milito estas daŭrigo de politiko, sekve oni devas studi la

32 Lenin: Bedingungen für die Aufnahme in die Kommunistische Internationale [Lenino: Kondiĉoj por la aliĝo al la Komunista Internacio], LW vol. 31, p. 196.

33 Lenin: Ursprünglicher Entwurf der Thesen zur nationalen und zur kolonialen Frage [Lenino: Origina skizo de la tezoj pri la nacia kaj pri la kolonia demando], LW, vol. 31, p. 139.

34 Lenin: Sozialismus und Krieg [Lenino: Socialismo kaj milito], LW, vol. 21, p. 299.

5.2 Celo, enhavo kaj formoj de la batalo de la laborista klaso

politikon antaŭ la milito, la politikon kiu kondukis al la milito kaj estigis ĝin:

„Se la politiko estis imperiisma, t.e. se ĝi defendis la interesojn de la financa kapitalo, se ĝi estis politiko de elrabado kaj subpremado de kolonioj kaj de fremdaj landoj, tiam ankaŭ la milito, kiu rezultas el tiu politiko, estas imperiisma milito. Se la politiko estis politiko de la nacia liberigo, t.e. se ĝi estis esprimo de la amasa movado kontraŭ la nacia subpremado, tiam la milito, kiu rezultas el tiu politiko, estas nacia liberiga milito.”³⁵

La konkreta historia aliro por prijuĝi la karakteron de milito igis Markson kaj Engelson taksu la germanan-francan militon de 1870-1871 por la germana flanko unue kiel defendmiliton, kiu tamen kun la anekso de Alzaco-Loreno transformiĝis al konkera milito. Markso kaj Engelson tiam jam antaŭdiris, ke la anekso preparas la terenon por nova milito:

„Ĝi estas la plej senmanka rimedo transformi la venontan pacon en nuran batalhalton, ĝis kiam Francio estas sufiĉe refortiĝinta por repostuli la perditan terenon. Ĝi estas la plej senmanka rimedo por ruini Germanion kaj Francion per reciproka membuĉado.”³⁶

La sama konkreta historia analizo kapabligis Leninon komence de la unua mondmilito kondamni tiun militon kiel ambaŭflanke *imperiisman* militon kaj, kiel gvidanto de la rusaj marksistoj, fari konsekvencon kaj decideman batalon kontraŭ la milito, kiu kondukis al la venko de la rusa Oktobra Revolucio de 1917.

Markso kaj Engelson, tempe de la germana-franca milito, diris pri la solidareco de la germana kaj franca laborista

35 Lenin: Über eine Karikatur auf den Marxismus [Lenino: Pri karikaturo pri la marksismo], LW, vol. 23, p. 23.

36 Karlo Markso: La interna milito en Francio (1871, La Pariza Komunumo), kun enkonduko de Frederiko Engelson, tradukita de Vilhelmo Lutermano, Mondial, Novjorko, 2005, 137 p., ISBN 1-59569-025-5, p.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

movado, ke ĝi pruvas, ke, kontraste al la kapitalisma socio,³⁷ nova socio estas naskiĝanta, „*kies internacia principo estos la paco, ĉar ĉe ĉiu nacio regas la sama principo – la laboro*”. La unua dispono, kiun Lenino ĉe la pinto de la soveta registaro en novembro 1917 proponis, estis la propono al ĉiuj militantaj popoloj kaj al iliaj registaroj „*tuj komenci intertraktadojn pri justa demokratia paco*”.³⁸ La demando de paco, diris Lenino tiam, estas la plej aktuala, la ĉiujn emocianta demando de la nuntempo.

Koncerne la aplikendajn *batalformojn* Markso, Engelso kaj Lenino opiniis ke la laborista klaso kaj la laborista movado devas kapabli regi ĉiajn formojn kaj metodojn de la batalo, pri kiuj ilia kontraŭulo – la kapitalo – disponas. Engelso parolis pri tio ke la laboristoj devas konduki la klasbatalon laŭ ties *tri* flankoj – la teoria, la politika kaj la ekonomia.³⁹ Dum la antaŭmarksismaj socialistaj pensofluo, sed ankaŭ la reformismaj kaj doktrine sektecaj tendencoj absolutigas respektive unu aŭ alian formon de la batalo, traktas ĝin kvazaŭ miraklan armilon kaj meĥanike kontraŭmetas ĝin al la aliaj, kiujn ili rifuzas, la marksismo strebas uzi multajn batalrimedojn, kunligi ilin kaj apliki ilin laŭ la objektivaj kondiĉoj kaj la subjektiva grado de matureco de la laboristoj mem.

Lenino emfazas ke la laborista klaso, se ĝi volas plenumi sian taskon, devas scii „*regi ĉiujn formojn aŭ flankojn de la*

37 Karlo Markso: Unua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro pri la germana-franca milito, en: Karlo Markso: La interna milito en Francio (1871, La Pariza Komunumo), kun enkonduko de Frederiko Engelso, tradukis Vilhelmo Lutermano, Mondial, Novjorko, 2005, 137 p., ISBN 1-59569-025-5, p. 29.

38 Lenin: Rede über den Frieden auf dem 2. Gesamtrussischen Sowjetkongreß [Parolado pri la paco en la 2-a Tutrusia Sovetkongreso], LW, vol. 26, p. 239.

39 Engels: Ergänzung der Vorbemerkung von 1870 zu „Der deutsche Bauernkrieg” [Engelso: Kompletigo de la antaŭrimarko de 1870 pri „La germana kampulmilito”, p. 516.

5.2 Celo, enhavo kaj formoj de la batalo de la laborista klaso

socia agado sen la plej eta escepto ..."⁴⁰ Li atentigas pri tio ke la marksisma laborista partio ne inventas la diversajn batalformojn, sed resumas la formojn estiĝantajn dum la batalo mem, organizas la batalojn kaj donas al ili konscion.

„La marksismo”, tiel Lenino, „lernas tiurilate ... el la praktiko de la amasoj kaj absolute ne pretendas instrui al la amasoj batalformojn elkovitajn de ‘ĉambro-sistematikistoj’.”⁴¹

Jam en sia verko *La mizero de la filozofio* (1847) kaj jaron poste kune kun Engelso en la *Manifesto de la Komunista Partio* Markso atentigis pri la graveco de la ekonomia-sindikata batalo kaj de la *sindikatoj* kiel la elementa klasorganizaĵo de la laboristoj. Li montris, ke tiu batalo en la mezuro, laŭ kiu ĝi etendiĝas kaj alprenas ĝeneralajn formojn, fariĝas politika batalo.⁴² Poste Markso resumis tiun evlutendencon de la laborista movado jene:

„Ekz-e la provo, en unuopa fabriko aŭ eĉ en unuopa laborejo per striko ktp trudi al la unuopa kapitalisto limigon de la labortempo, estas pure ekonomia demando; male, la movado trudi ekz-e 8-hor-leĝon estas *politika* movado. Kaj tiel kreskas ĉie el la unuopaj ekonomiaj movadoj de la laboristoj *politika* movado, t.e. movado de la klaso, por trudi siajn interesojn en ĝenerala formo, en formo kiu posedas ĝeneralan, socie devigan forton.”⁴³

Engelso nomas la sindikatojn „*la verajn klasorganizaĵojn de la proletaro, en kiuj ĝi elbatalas siajn ĉiutagajn batalojn kun la kapitalo, en kiu ĝi trejnas sin*”.⁴⁴ Markso, Engelso kaj

40 Lenin: Der „linke radikalismus” ... [Lenino: La „maldekstra radikalismo”...], LW, vol. 31, p. 83.

41 Lenin: Der Partisanenkrieg [Lenino: La partizanmilito], LW, vol. 11, p. 202-203.

42 Karlo Markso: La mizero de la filozofio ..., v.c., p. 184,

43 Marx an F. Bolte [Markso al F. Bolte], 1871-11-23, MEW, vol. 33, p. 332-333.

44 Engels an A. Bebel [Engelso al A. Bebel], 1875-03-18/28, MEW, vol. 34, p. 128.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

Lenino duflanke argumentis por la neceso de la sindikata batalo; unuflanke pure ekonomie, por ke la laboristoj povu kontraŭagi la kapitalistan tendencon malaltigi la merkaptoprezon de la varo laborforto – la salajron – al minimuma limo; poste kiel premiso por la pli altaj, politikaj batalformoj. Se la laboristoj „en siaj ĉiutagaj kunpuŝiĝoj kun la kapitalo malkuraĝe cedus”, skribis Markso, „ili senmanke senigus sin je sia kapablo organizi ajnan ampleksan movadon.”⁴⁵

Samtempe Markso, Engelso kaj Lenino atentigis ĉiam pri la limoj de la nur sindikata batalo por pli bona salajro kaj pli bonaj laborkondiĉoj. La laborista klaso devas ne trotaksi la definitivan efikon de tiuj ĉiutagaj bataloj, diras Markso; la sindikatoj maltrafas sian celon komplete, se ili limigas sin al militeto kontraŭ la *efikoj* de la ekzistanta sistemo, anstataŭ samtempe provi ĝin *ŝanĝi*, anstataŭ uzi siajn organizitajn fortojn kiel levilon por la fina liberigo de la laborista klaso.⁴⁶

Elirante de la scio, ke la ekonomia potenco de la kapitalo koncentriĝas en sia politika regado, ke la politika potenco kapabligas la kapitalistojn konservi la sociajn kondiĉojn de la kapitalismo, Markso kaj Engelso proklamis jam en la *Komunista Manifesto* kiel celon de la laborista movado: „*formiĝo de la proletaro al klaso, faligo de la burĝara regado, konkero de la politika potenco fare de la proletaro*”.⁴⁷ En la *Malferma mesaĝo de la 1-a Internacio* Markso diris: ĉar grundsinjoroj kaj kapitalistoj uzas siajn politikajn privilegiojn ĉiam por defendi kaj eternigi siajn ekonomiajn monopolojn, kaj ĉar ili metos ĉian obstaklon al la politika emancipiĝo de la laboristoj, tial la konkero de la politika

45 Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito, tradukita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), p. 59.

46 Saml., p. 60.

47 Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto ..., l.c., p.

5.2 Celo, enhavo kaj formoj de la batalo de la laborista klaso

potenco „*fariĝis la granda devo de la laborista klaso*”.⁴⁸

Pro tio, Markso, Engelso kaj Lenino ĉiam argumentis kontraŭ la teorioj, kiuj rekomendis al la laboristoj en la intereso de la „*pureco de iliaj revoluciaj principoj*” politikan abstinadon, ĉu en parlamenta aŭ eksterparlamentara kampo. La revolucio estas la plej alta ago de politiko, diris Engelso, kaj tiu, kiu volas ĝin, devas voli ankaŭ la rimedon – la politikan agon, kiu preparas la revolucion kaj edukas la laboristojn por ĝi.⁴⁹ Kontraŭ la „maldekstra” radikalismo, kiu post la unua mondmilito postulis, ke la komunistoj ne partoprenu en parlamentaj elektoj kaj en la parlamento, ĉar la burĝa parlamentismo estas trompo kaj historie preterpasita, Lenino respondis, ke la plej danĝera eraro, kiun revoluciuloj povas fari, estas tiu, konsideri sian propran politikan pozicion la objektiva realeco.⁵⁰ Al tiuj, kiuj kondamnis ĉian partoprenon en elektoj kaj en parlamenta laboro kiel oportunismon, Lenino respondis, ke male la rezigno pri utiligado „*de la demokratiaj institucioj, kreitaj de la burĝaro kaj kiujn la burĝaro faris karikaturado, en la donita kapitalisma socio*” estas samsignifa kun la „*kompleta kapitulaco antaŭ la oportunismo*”.⁵¹

Koncerne la pozicion pri perforto en la klasaj disputoj kaj en la politika batalo, Markso, Engelso kaj Lenino distingis inter la volo de la laborista klaso atingi siajn celojn sur paca vojo, kaj la historiaj kondiĉoj, kiuj decidas pri la eblecoj

48 Marx, in der Inauguraladresse der Internationalen Arbeiterassoziation [Markso, en la Malferma mesaĝo de la Internacia Laborista Asocio], MEW, vol. 16, p. 12.

49 Engels: Rede auf der Londoner Konferenz der Internationalen Arbeiterassoziation [Engelso: Parolado en la londona Konferenco de la Internacia Laborista Asocio], MEW, vol. 17, p. 416.

50 Lenin: Der „linke Radikalismus” ... [Lenino: La „maldekstra radikalismo ...], LW, vol. 31, p. 43.

51 Lenin: Antwort an P. Kijewski [Lenino: Respondo al P. Kijevski], LW, vol. 31, p. 15.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

realigi tiun volon kaj kiuj estas determinataj speciale de la perforto kiun uzas la regantaj klasoj. Jam en la antaŭskizoj por la Komunista Manifesto Engelso respondis al la demando: Ĉu la nuligo de la privata proprieto eblos sur paca vojo?

„Estus dezirinde, ke tio eblus, kaj la komunistoj estus certe la lastaj kiuj ribelus kontraŭ tio. La komunistoj scias tro bone, ke ĉiuj konspiroj estas ne nur senutilaj, sed eĉ malutilaj. Ili scias tro bone, ke revolucioj ne fariĝas intence kaj arbitre, sed ke ili estas ĉie kaj ĉiam la necesa sekvo de cirkonstancoj, kiuj estas tute sendependaj de la volo kaj de la gvidado de unuopaj partioj kaj de tutaj klasoj.

Sed ili vidas ankaŭ, ke la evoluo de la proletaro en preskaŭ ĉiuj civilizitaj landoj estas perforte subpremata kaj ke per tio la kontraŭuloj de la komunistoj laboras mem plenforte por la revolucio. Se tio pelas la subpreman proletaron fine en revolucion, tiam la komunistoj same per la ago kiel nun per la vorto defendos la kaŭzon de la proletoj.”⁵²

La saman penson esprimis Lenino, kiam li diris, ke la laborista klaso kompreneble preferus transpreni la potencion *pace*.⁵³

La klasikuloj de la marksismo aliris tiun kiel ĉiujn aliajn politikajn demandojn strikte historie, el la vidpunkto de la realaj fortilatoj kaj de la ceteraj konkretaj kondiĉoj de la batalo de la klasoj. La evoluo de la historio montris al ili, ke perforto internen kiel eksteren estis ĉiam la rimedo de reakciaj regantaj klasoj, kiuj defendis sian potencon kaj siajn privilegiojn kontraŭ ekonomie kaj politike subpremataj

52 Frederiko Engelso: Principoj de komunismo, en: Karlo Markso, Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo, Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, ISBN 978-2-918300-17-5 p. 35-58, ĉi tie p.47.

53 Lenin: Eine rückläufige Richtung in der russischen Sozialdemokratie [Lenino: Malprogresenda tendenco en la rusa socialdemokratio], LW, vol. 4, p. 270.

5.2 Celo, enhavo kaj formoj de la batalo de la laborista klaso

klasoj, kaj kiuj per tio lasis al tiuj klasoj nenian alian elirvojon ol siavice uzi perforton. Markso faris nur la konkludon de la historio de la burĝaj revolucioj de Anglio en la 17-a, Francio en la 18-a, Germanio en la 19-a jarcento kaj la bilancon de la elformiĝo de la kapitalisma el la feŭdisma socio entute, kiam li konstatis, ke la perforto estas „*la akuŝisto de ĉia malnova socio kiu gravedas je nova*”.⁵⁴

Markso kaj Engelso nur primokis tiujn burĝajn politikistojn kaj ideologiistojn, kiuj asertis baziĝi sur la atingoj de 1789 kaj 1848, sed por ilia estonteco kaj por ĉia estonteco rifuzis revoluciajn movadojn kaj revoluciojn kiel ion simple kontraŭleĝan, malpravan kaj abomenindan. Kiam dum la escepto-leĝoj de Bismarko kontraŭ la germana socialdemokrataro (1878-1890) la burĝa flanko ripete proponis al la socialdemokrata partio ke ĝi definitive rezignu pri revolucio, Engelso skribis al Aŭgusto Bebelo:

„La ekzistanta stato en la tuta Eŭropo estas la rezulto de revolucioj. La jura bazo, la historia juro, la leĝeco, estas ĉie miloble traktuata aŭ tute renversita ... La rajto je revolucio ekzistis – alie la nunaj regantoj estus ja senrajtaj –, sed ĝi de nun devas jam ne ekzisti. En Germanio la ekzistanta stato baziĝas sur la revolucio, kiu komenciĝis en 1848 kaj finiĝis en 1866. 1866 estis kompleta revolucio. Kiel Prusio nur per perfido kaj milito kontraŭ la germana regno, aliancite kun eksterlando (1740, 1756, 1795), fariĝis io, tiel ĝi sukcesis starigi la german-prusan regnon nur per perforta renverso de la Germana Ligo kaj per interna milito. ... Post la venko ĝi renversis tri tronojn de Dia favoro kaj aneksis la teritoriojn kune kun tiu de la ekse Libera Urbo Frankfurturto ... Sed kiu agas per sango kaj fero, tiu ne kondamnu aliulojn kiel revoluciulojn. Se la partio konservas nur la rajton esti ne pli kaj ne malpli revolucia ol la regna registaro estis, tiam ĝi havas ĉion kion ĝi bezonas.”⁵⁵

54 Karlo Markso: La kapitalo, ... ĉapitroj dekkvara ĝis dudekkvina, p.

55 Engels an A. Bebel [Engelso al A. Bebelo], 1884-11-18, MEW, vol. 36, p. 238-239.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

En la enkonduko al *Klasbataloj en Francio* de Markso, Engelso rimarkigis 1895, ke la tiel nomataj ordopartioj pereas pro la leĝaj cirkonstancoj kreitaj de ili mem, dum la socialistaj partioj de „*ribelo ricevas dikajn muskolojn kaj ruĝajn vangojn*”.⁵⁶

56 Engels: Einleitung zu Marx' Klassenkämpfe in Frankreich
[Engelso: Enkonduko en 'Klasbataloj en Francio' de Markso],
MEW, vol. 22, p. 525.

5.3 Sponteco kaj konscio. La marksisma laborista partio

El la cirkonstanco, ke la ekonomia kaj politika potenco de la kapitalo signifas samtempe spiritan potencon, do dominadon de la burĝa konscio, kaj ke la klasbatalo okazas do ankaŭ sur teoria-ideologia kampo, Markso, Engelso kaj Lenino konkludis unuarangecon de la *klaskonscio* kaj de la *amasorganizigo* de la laboristoj.

La tuta evoluo de la laborista movado instruis al ili, ke la sociaj konsci-enhavoj, kiuj elformiĝas inter la laboristoj sponte surbaze de ilia socia situacio, estas tio, kion Lenino nomis sindikatisma konscio. Temas pri elementa kompreno de la kontraŭeco inter laboristoj kaj entreprenistoj, pri la konvinko, ke oni devas kuniĝi en ligoj, batali kontraŭ la entreprenistoj, trudi al la registaro iujn aŭ aliajn leĝojn necesajn por la laboristoj.⁵⁷ Sed tiu konscio entenas nek ĝustan interpreton de la tutsocia klas-antagonismo inter laborista klaso kaj burĝaro nek de la ekonomiaj kaj historiaj leĝecoj kaj evolutendencoj de la kapitalisma socio. Ambaŭ ekkoneblas nur sur *scienca* bazo. Pro tio la scienca socialismo, kiel Lenino montris, povis esti ellaborata nur de revoluciaj teoriuloj, kiuj socie devenis el la burĝa intelektularo.⁵⁸

Sed se la sponta konscio de la laboristoj restas ene de burĝaj limoj, tiam necesas memstara, organizita, konsciiga forto en la laborista klaso. Ĉar Markso, Engelso kaj Lenino, kiel ni vidis, venis el la analizo de la kapitalismo kaj de la historiaj spertoj krome al la konkludo, ke la socia liberiĝo de la laborista klaso eblas nur sur politika-revolucia vojo, ili povis vidi tiun forton, tiun plej gravan instrumenton de la mememancipiĝo de la laboristoj nur en *politika* organizaĵo, en *laborista partio* armita per la scienca socialismo.

Pri tiu laborista partio, Markso Engelso diris jam en la Komunista Manifesto, ke ĝi distingiĝas disde aliaj proletaj

57 Lenin: Was tun? [Lenino: Kion fari?], LW, vol. 5, p. 385-386.

58 Saml.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

unuigoj unuflanke per tio, ke ili „en la diversaj naciaj bataloj de la proletoj elstarigas kaj respektigas la komunajn interesojn de la tuta proletaro, sendependajn de la nacieco” kaj aliflanke per tio, ke

„en la diversaj evoluŝtupoj, kiujn trapasas la batalo inter proletaro kaj burĝaro, ili ĉiam reprezentas la interesojn de la tuta movado.”

„Do, la komunistoj praktike estas la plej energia, ĉiam antaŭenpuŝa parto de la laboristaj partioj de ĉiuj landoj; ilia avantaĝo rilate la alian amason de la proletaro estas, ke ili disponas ekkonojn pri la kondiĉoj, la marŝlinio kaj la ĝeneralaj rezultoj de la proleta movado.”⁵⁹

En la decidoj de la londona konferenco de la Internacia Laborista Asocio de 1871, verkitaj de Markso kaj Engelso, oni emfazis, ke la laborista klaso kontraŭ la ĉioma potenco de la posedantaj klasoj povas agi nur kiel klaso,

„per tio ke ĝi konstituas sin mem kiel aparta politika partio, kontraste al ĉiuj malnovaj parti-estiĝoj de la posedantaj klasoj”.⁶⁰

En 1892 Engelson emfazas en letero la *ĝeneralan validecon* de tiu postulo:

„En nia taktiko, unu afero certas por ĉiuj modernaj landoj kaj tempoj: instigi la laboristojn starigi propran, sendependan partion kontraŭan al ĉiuj burĝaj partioj.”⁶¹

Elirante de tiu baza penso, Lenino ĝeneraligis la spertojn dum la periodo de la 2-a Internacio kaj speciale tiujn de ĝia kadukiĝo en oportunismo en la unua mondmilito, kaj li pli

59 Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto ..., v.c., p. 52.

60 Marx-Engels: Beschlüsse der Londoner Konferenz der Internationalen Arbeiterassoziation [Markso-Engelson: Decidoj de la Londona Konferenco de la Internacia Laborista Asocio] (1871), MEW, vol. 38, p. 446.

61 Engels an K. Kautsky [Engelson al K(arlo) Kaŭcko], 1892-09-04, MEW, vol. 38, p. 446.

5.3 Sponteco kaj konscio. La marksisma laborista partio

ampleksigis la teorion pri la rolo kaj la karaktero de la revolucia laborista partio. Li montras, ke la politika partio estas la *plej alta* klasa organizaĵo de la laboristoj, kiu devas kapabli majstri kaj kunordigi ĉiujn formojn de la klasbatalo, unuigi partajn kaj ĉiomajn interesojn, aktualajn kaj estontajn celojn, naciajn kaj internaciajn taskojn. Venko de la revolucia movado maleblas sen revolucia partio, kiu ĝuas la fidon de la laborista klaso kaj kiu scias observi kaj influi la emojn de la amasoj. Tiu partio devas esti kapabla

„ligi sin kun la proletaraj, sed ankaŭ kun la neproletaraj laborantaj amasoj, proksimiĝi al ili, eĉ, se oni volas, ĝis certa grado kunfandiĝi kun ili”.⁶²

Lenino ĉiam denove emfazis la postulon je *plej densa* ligiĝo al la laboristaj amasoj. Ĵeti sole la avangardon en decidan batalon, diris li, kiam la laborista klaso kaj la larĝaj amasoj ankoraŭ ne rekte subtenas la avangardon aŭ almenaŭ kondutas kun favora neŭtraleco al ĝi, estus ne nur stultaĵo, sed ankaŭ krimo.⁶³ Post la venko de la rusa Oktobra Revolucio Lenino skribis, ke unu el la plej danĝeraj eraroj de la komunistoj estas la imago, ke revolucio fareblus sole de revoluciuloj; sen alianco kun nekomunistoj sur la plej diversaj agadkampoj oni ne povus eĉ paroli pri sukcesa konstruado de komunismo.⁶⁴

En la partiteorio de Lenino, la emfazo de la batalo kontraŭ ĉiaj formoj kaj nuancoj de la *oportunismo* havas apartan gravecon. Malcedemo kontraŭ ĉia oportunismo en teorio kaj praktiko estas por marksisma laborista partio nepra, ĉar nur tiel ĝi povas ŝirmi sin kontraŭ la burĝaj kaj etburĝaj influoj, kiuj efikas al ĝi el la tuta socio, konservi

62 Lenin: Der „linke Radikalismus“ ... [La „maldekstra radikalismo“ ...], v.c., LW, vol. 31, p. 29; p. 9.

63 Saml., p. 80.

64 Lenin: Über die Bedeutung des streitbaren Materialismus [Lenino: Pri la graveco de batalema materiismo], LW, vol. 33, p. 213.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

sian revolucion identecon kaj kontinuecon trans fluo kaj malfluo, venkoj kaj malvenkoj de la movado, disvolvi sian agkapablon kaj plenumi sian rolon kiel avangardo.

Markso, Engelso kaj Lenino vidis en la dekstra reformismo (socialreformismo, kiu dum la unua mondmilito transformiĝis en socialŝovinismon) respeguliĝon de la premo de la burĝaro sur la laboristan klason kaj la laboristan movadon. Ili nomis ĝiajn esencajn trajtojn:

- la anstataŭigon de la teorio kaj praktiko de klasbatalo per la ideo de klasharmonio kaj per la praktiko de la klasa kunlaborado;

- la rezignon pri la socialismaj celoj – la konkero de la politika potenco de la laborista klaso kaj la sociigon de la produktadrimedoj;

- la rezignon pri la memstareco de la laborista partio kiel klaspartio;

- la fordonon de la internaciisma sinteno de la laborista movado favore al komuna „naciaj” interesoj kun la kapitalo.

En cirkulero kontraŭ oportunisma grupo en la germana socialdemokratio dum la tempo de la „socialista leĝo” 1879 (direktita al Aŭgusto Bebelo⁶⁵, Vilhelmo Libkneĥto kaj aliaj gvidantoj), Markso kaj Engelso nomas la oportunismon i.a. jene:

„Anstataŭ decida politika opozicio – ĝenerala perado; anstataŭ la batalo kontraŭ registaro kaj burĝaro – la provo gajni kaj persvadi ilin; anstataŭ spita rezistado kontraŭ desupraj misaĵoj – humila submetiĝo kaj la koncedo ke oni meritis la punon. Ĉiuj historie necesaj konfliktoj estas alie interpretataj kiel miskomprenoj kaj ĉiuj diskutoj finitaj per aserto ke en la ĉefa afero ni ja ĉiuj samopinias.”

65 Germane respektive: August Bebel; Wilhelm Liebknecht. -vl

5.3 Sponteco kaj konscio. La marksisma laborista partio

La klasbatalo inter burĝaro kaj proletaro estas ja agnoskata sur la papero, sed en la praktiko „*prisilentata, malklarigata, malfortigata*”; la socialdemokratio jam ne estu laborista partio kaj ne ŝarĝu sin per la malamo de la burĝaro; anstataŭ emfazi pli antaŭajn celojn kiuj fortimigas la burĝaron, ĝi devas uzi siajn forton kaj energion „*por etburĝaj flikreformoj*”.⁶⁶

En kritiko en la jaro 1891, de la Propono de la Erfurta Partiprogramo, publikigita de la partiestraro de la germana socialdemokratio, Engelso diras, ke la forgeso de la decidaj vidpunktoj favore al la momentaj interesoj estas serioza danĝero por la laborista partio, ĉar

„tiu forlaso de la estonteco de la movado pro la aktualeco de la movado povas esti ‘sincere’ intencita, sed oportunismo ĝi estas kaj restas, kaj la ‘sincera’ oportunismo estas eble la plej danĝera el ĉiuj”.⁶⁷

Lenino karakterizis dum la unua mondmilito la politikan enhavon de la oportunismo jene:

„Kunlaborado de la klasoj, rezigno pri la diktatoreco de la proletaro, rezigno pri revoluciaj agoj, senkondiĉa agnosko de la burĝa leĝeco, malfido al la proletaro, fido al la burĝaro ... La socialŝovinismo estas la perfekta oportunismo. Ĝi maturiĝis al malferma, ordinara alianco kun la burĝaro kaj kun la militstabejoj.”⁶⁸

Sed kun la sama konsekvenco Markso, Engelso kaj Lenino kontraŭbatalis ankaŭ la inversan flankon de tiu oportun-

66 Marx-Engels, an Bebel, Liebknecht, Bracke und andere [Markso-Engelso al Bebelo, Libkneĥto, Brako kaj aliaj], 1879-09-17/18, MEW, vol. 34, p. 405-406.

67 Engels, in einer Kritik an dem Entwurf des Erfurter Parteiprogramms [Engelso, en kritiko al la Propono de la Erfurta Partiprogramo]

68 Lenin: Der Opportunismus und der Zusammenbruch der II. Internationale [Lenino: La oportunismo kaj la kolapso de la 2-a Internacio], LW, vol. 22, p. 111-112.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

ismo – la ultramaldekstrajn, doktrinece sektecajn kaj anarĥismajn ideojn kaj praktikojn. Kiel esencajn trajtojn de tiu tendenco ili nomis:

- la memizoliĝo disde la ĝenerala sindikata kaj politika laborista movado;

- la mankantan volon kaj la nekapablon eliri de la respektivaj konkretaj bezonoj kaj postuloj de la laboristoj;

- la neado de necesaj aliancoj kun aliaj progresemaj politikaj fortoj;

- fine la anstataŭigo de la nur konkrete historie determineblaj revoluciaj postuloj per abstrakta revoluci-kriaĉado, la rifuzo de ĉiaj necesaj transiraj stadioj de la movado.

Kontraŭ la doktrinece sektecaj tendencoj Engelso diris, ke la marksisma teorio ne estas dogmo, sed la prezentado de evoluprocezo, kaj ke tiu procezo inkludas sinsekvajn fazojn. Pro tio li postulis de la socialistoj

„engaĝiĝi por ĉia vere ĝenerala movado de la laborista klaso, akcepti ties faktan elirpunkton kiel tian kaj alporti ĝin paŝon post paŝo al la teoria alteco per tio ke ili montras, kiel ĉiu farita eraro, ĉiu suferita malvenko estis sekvo de malĝustaj teoriaj ideoj en la origina programo”.⁶⁹

Engelso parolas pri la senutileco eĉ de teorie grandparte ĝusta platformo, „*se ĝi ne scias ligiĝi kun la realaj bezonoj de la homoj*”.⁷⁰

Lenino atentigis pri tio, ke inter socialismo kaj anarĥismo estas profunda abismo, kiun „*la influspionoj de la sekreta polico aŭ la gazetaraj servutuloj de la reakciaj registaroj vane provas prezenti kiel ne ekzistantan*”. La mondpercepto

69 Engels an F. Kelley-Wischnewetzky [Engelso al F. Kelley-Wischnewetzky], 1886-12-28, MEW, vol. 36, p. 589.

70 Engels an F. A. Sorge [Engelso al F. A. Sorge], 1891-04-08, MEW, vol. 38, p. 80.

5.3 Sponteco kaj konscio. La marksisma laborista partio

de la anarĥiistoj estas, laŭ li, inversigita burĝa mondpercepto, ilia individuisma teorio la tuta malo de socialismo. Iliaj opinioj esprimas „*la regadon de la blinda hazardo super la izolita, sole staranta etproduktisto*”.⁷¹ Lenino diris ke anarĥiismo kaj ultramaldekstra revoluciismo havas la samajn radikojn, la „*furioziĝintan etburĝon*”, kies revoluciismo transformiĝas rapide en „*submetiĝemon, apation kaj fantaziemon*” kaj kiu lasas sin kuntreni de iu aŭ alia burĝa moda tendenco ĝis „*frenezezo*”.⁷²

Lenino aparte decide kontraŭis la revolucion *frazon*, kiu ripetis revoluciajn sloganojn sen konsideri la objektivajn cirkonstancojn.⁷³ Revoluciuloj plej ofte rompis al si la kolon, diris li,

„kiam ili komencis skribi revolucion per grandaj literoj, altigi la revolucion al io preskaŭ dieca, perdi la kapon, perdi la kapablon tute fridsange kaj sobre pripensi, pritaksi kaj ekzameni, je kiu momento, sub kiaj cirkonstancoj kaj sur kiu agadkampo oni devas scii agi «revolucie» kaj je kiu momento, sub kiaj cirkonstancoj kaj sur kiu agadkampo oni devas scii transiri al reformisma agado”.⁷⁴

Koncerne la organizajn principojn de la marksisma laborista partio, Markso, Engelso kaj Lenino strebis en teorio kaj praktiko kunigi du bazajn elementojn: la *demokratiajn* diskutadon kaj ellaboradon de la politiko; kaj la kunordigitan, *unuëcan* agon, nepran por partio kun grandaj historiaj celoj kaj kun potencaj, siavice bone organizitaj kontraŭuloj. Lenino esprimis tiun ideon jene:

71 Lenin: Sozialismus und Anarchismus [Lenino: Socialismo kaj anarĥiismo], LW, vol. 10, p. 59.

72 Lenin: Der „linke Radikalismus“ ... [Lenino: La „maldekstra radikalismo“ ...], LW, vol. 31, p. 16-17.

73 Lenin: Über die revolutionäre Phrase [Lenino: Pri la revolucia frazo], LW, vol. 27, p. 1.

74 Lenin: Über die Bedeutung des Goldes [Lenino: Pri la graveco de la oro] ..., LW, vol. 33, p. 92.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

„Unueco de la ago, libereco de la diskuto kaj de la kritiko – tiel tekstas nia difino. Nur tia disciplino indas je la demokratia partio de la plej progresinta klaso. La forto de la laborista klaso estas la organizaĵo. Sen organizaĵo de la la amasoj la proletaro estas nenio. Organizite ĝi estas ĉio. Organiziteco estas unueco en la ago, estas unueco de la praktika agado.”⁷⁵

Por sukcese plenumi la organizan rolon de la laborista klaso, necesas plej strikta disciplino.⁷⁶ Same necesas la subordiĝo de la malplimulto sub la plimulton, de la parto sub la tuton.⁷⁷

Lenino atribuis grandan gravecon ankaŭ al la konstanta kritiko kaj memkontrolado de la partia agado. La sinteno de politika partio al siaj eraroj, skribis li, estas unu el la plej gravaj kaj sekuraj kriterioj por la seriozeco de partio kaj por la fakta plenumado de siaj devoj kontraŭ ĝia klaso kaj la laborantaj amasoj:

„Malkaŝe konfesi eraron, malkovri ĝiajn kaŭzojn, analizi la cirkonstancojn, kiuj estigis ĝin, zorge ekzameni la rimedojn por forigi la eraron – jen la trajto de serioza partio, tio signifas plenumado de ĝiaj devoj, tio signifas edukado kaj trenado de la klaso kaj poste ankaŭ de la amaso.”⁷⁸

75 Lenin: Der Kampf gegen die kadettisierenden Sozialdemokraten und die Parteidisziplin [Lenino: La batalo kontraŭ la kadetimitajn socialdemokratojn kaj la partidisciplino], LW, vol. 11, p. 314.

76 Lenin: Der „linke Radikalismus“ ... [Lenino: La „maldekstra radikalismo“ ...], LW, vol. 31, p. 29.

77 Lenin: Ein Schritt vorwärts, zwei Schritte zurück [Lenino: Unu paŝon antaŭen, du paŝojn returnen], LW, vol. 7, p. 391.

78 Lenin: Der „linke Radikalismus“ ... [Lenino: La „maldekstra radikalismo“ ...], LW, vol. 31, p. 42.

5.4 La socialisma revolucio

El la historia evoluo, el la burĝaj revolucioj de la 17-a, 18-a kaj 19-a jarcentoj, el la siatempaj klasbataloj kaj laboristaj movadoj, Markso, Engelso kaj Lenino konkludis, ke la *fundamentaj* sociaj ŝanĝoj, kiuj portis novan klason al la potenco kaj preparis la vojon al nova socisistemo, okazis sur la vojo de *politikaj revolucioj*. Tio ne povis esti alia en socio bazita sur la klasa antagonismo, kaj ĝi estis pruvita per la historio speciale ekde la granda franca revolucio de 1789 ĝis 1793.

Sed ĉar la klasa kontraŭeco inter burĝaro kaj laborista klaso estis ankoraŭ pli fundamenta ol ekz-e tiu inter feŭdaj grundsinjoroj kaj burĝaro, tiu historia evoluleĝo devas esti tiom pli valida por la liberiga batalo de la laborista klaso. Tiusence Markso diris, ke nur ĉe ordo de la aferoj, ĉe kiu jam ne ekzistas klasoj kaj klasa kontraŭeco, la „sociaj evolucioj *ĉesas esti politikaj revolucioj*”.⁷⁹

Konkero de la politika potenco estas laŭ Markso kaj Engelso la plej proksima celo de ĉia socia revolucio, kaj ĝi konsistigas ankaŭ la unuan paŝon en la laborista revolucio. Por atingi la ŝanĝon de la socio, la venkanta laborista klaso devas, kiel Engelso klarigas, ekpreni la organizitan politikan ŝtatpotencon kaj respektigi tiun potencon, por ke ĝi „*povu teni siajn kapitalistajn kontraŭulojn senpotencaj kaj trudi tiun ekonomian revolucion, sen kiu la tuta venko devus finiĝi en nova malvenko ...*”⁸⁰ En tiu kunteksto li emfazas, ke ĝuste en tio troviĝas la esencaj diferencoj de marksismo kaj anarĥismo ...⁸¹

Markso, Engelso kaj Lenino ĉiam emfazis, ke ĉiu grava revolucio posedas soci-ekonomian enhavon, ke en ĝi oni fine batalas pri la formado de la proprietkondiĉoj:

79 Karlo Markso: La mizero de la filozofio ..., v.c., p. 185.

80 Engels an P. H. van Patten [Engelso al P. H. van Patten], 1883-04-18, MEW, vol. 36, p. 11-12.

81 Saml.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

„En la angla kiel en la franca revolucio la propriet-demando prezentiĝis tiel, ke temis pri la respektigo de la libera konkurenco kaj pri la nuligo de la feŭdaj proprietrilatoj, ekz-e bien-sinjoreco, gildoj, monopoloj ktp, kiuj estis transformiĝintaj en malhelpojn por la industrio evoluinta de la 16-a ĝis la 18-a jarcento.”⁸²

Pri la proletara revolucio Markso kaj Engelso diris, ke la proletaro

„uzos sian politikan regadon por iom post iom eltiri el la burĝaro la tutan kapitalon, por centralizi ĉiujn produktado-instrumentojn en la manon de la ŝtato – tio signifas la proletaro, organizita kiel reganta klaso – kaj por multigi kiom eble plej rapide la produktado-fortojn.”⁸³

La pruvon de la historia neceso de socialisma revolucio la marksismo faras, kiel ni jam vidis, per la *objektivaj* kontraŭdiroj de la kapitalisma socio, el krizoj kaj katastrofoj kiujn ĝi produktas; la marksismo pravas strikte ekonomie, diras Engelso, ke la kapitalisma evoluo

„estas samtempe la evoluo de la elementoj de socia revolucio: la evoluo – unuflanke de klaso, kies vivkondiĝo pelas ĝin neceso al la socia revolucio, de la proletaro – aliflanke de produktadfortoj, kiuj, elkreskintaj el la kadro de la kapitalisma socio, devas nepre krevigi ĝin, kaj kiuj samtempe donas la rimedojn por unufoje por ĉiam forigi la klasajn diferencojn en la intereso de la socia progreso mem”.⁸⁴

Markso, Engelso kaj Lenino kontraŭis la opinion, ke la revolucio komprenendas kiel unufoja perforta ago. La granda eraro ĉe la germanoj, skribis Engelso, estas „*imagi*

82 Marx: Die moralisierende Kritik und die kritisierende Moral [La moralizanta kritiko kaj la kritikanta moralo], MEW, vol. 4, p. 341.

83 Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto de la Komunista Partio, v.c., p. 61.

84 Engels: Zur Wohnungsfrage [Engelso: Pri la loĝej-demando], MEW, vol. 18, p. 273.

5.4 La socialisma revolucio

al si la revolucion kiel aferon fareblan en unu nokto". Envere ĝi estas „*plurjara evoluprocezo de la amasoj sub akcelantaj cirkonstancoj*".⁸⁵ En la sama senco diris Lenino, ke la socialisma revolucio estas „*ne unuopa ago*", sed „*tuta epoko da plej akraj klaskonfliktoj*".⁸⁶ La socialisma revolucio kiel sekvo de objektiva akriĝo de la klasaj kontraŭecoj kaj kiel evoluprocezo sub akcelantaj kondiĉoj estas do ne artefarite kaj laŭ mendo farebla, oni ne povas fiksi ĝin al tiu aŭ alia tempopunkto, ĝi maturiĝas „*en la procezo de la historia evoluo*".⁸⁷

Sekve, la socialisma revolucio premisas revolucionan situacion, por kiu Lenino citas la sekvajn plej gravajn kondiĉojn:

Unue, la regantaj klasoj devas jam ne kapabli konservi sian regadon senŝanĝe, necesas ke aperis iu aŭ alia krizo de la „*supraj tavoloj*", krizo de ilia politiko:

„Por ke okazu la revolucio, ĝenerale ne sufiĉas ke la ‘malsupraj tavoloj’ ‘ne volas vivi’ laŭ la malnova maniero, necesas ankaŭ, ke la ‘supraj tavoloj’ laŭ la malnova maniero ‘ne povas vivi’.”

Due, skribas Lenino, la senhaveco kaj la mizero de la subpremataj klasoj devas esti akriĝintaj „*trans la ordinara mezuro*".

Trie, pro tiuj kaŭzoj, la aktiveco de la amasoj pliiĝas, kiuj en ŝtormaj tempoj, per la tuta kriza situacio kaj ankaŭ per la disponoj de la „*supraj tavoloj*", estas pelataj al memstara historia agado:

„Sen tiuj objektivaj ŝanĝoj, kiuj estas sendependaj de la volo ne

85 Engels an Bernstein [Engelso al Bernstein], 1883-08-27, MEW, vol. 36, p. 55.

86 Lenin: Die sozialistische Revolution und das Selbstbestimmungsrecht der Nationen [Lenino: La socialisma revolucio kaj la rajtoj de la nacioj je memdeterminado], LW, vol. 22, p. 145.

87 Lenin: Referat auf der Moskauer Gouvernementskonferenz der Betriebskomitees [Lenino: Prelego ĉe la Moskva Gubernia Konferenco de la Entreprenkomitatoj], LW, vol. 47, p. 549.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

nur de unuopaj grupoj kaj partioj, sed ankaŭ de unuopaj klasoj, revolucio ĝenerale ne eblas.”⁸⁸

Markso, Engelso kaj Lenino tre alte taksis la konstaton, ke la socialisma revolucio ne estas la faro de malgranda malplimulto da revoluciuloj, sed povas esti nur la faro de la popolamasoj, de la plimulto de la laborista klaso kaj de la laboranta loĝantaro entute. En la enkonduko al *Klasbataloj en Francio* de Markso, Engelso diris, ke ĉiuj ĝisnunaj regantaj klasoj estis nur malgrandaj malplimultoj kontraŭ la regataj popolamasoj; ĉiuj ĝisnunaj revolucioj estis revolucioj de malplimultoj. Sed nun jam pasis la epoko de la surpriz-atakoj, de revolucioj faritaj de malgrandaj konsciaj malplimultoj ĉe la pinto de senkonsciaj amasoj:

„Kie temas pri kompleta transformo de la socia organizo, tie la amasoj devas mem partopreni, mem jam esti komprenintaj, pri kio temas, por kio ili engaĝiĝas per sia korpo kaj vivo.”⁸⁹

Post la spertoj de la rusa Oktobra Revolucio kaj post la malvenkoj de la laboristoj en la mezeŭropaj revolucioj de 1918 kaj 1919, Lenino substrekiis tiun penson kaj klarigis, ke komunisto, kiu ne komprenas, ke en Eŭropo, kie grava parto de la laboristoj estas organizita, „oni devas gajni la pliparton de la laborista klaso”, tiu estas „perdita por la komunista movado”.⁹⁰

Laŭ la marksismo, ne eblas sukcesigi la socialisman revolucion fare nur de la laborista klaso. Tiu bezonas por tio aliancantojn, ĝi devas strebi tiri sur sian flankon la ceterajn laborulojn, speciale la terkulturistojn kaj la urbajn

88 Lenin: Der Zusammenbruch der II. Internationale [Lenino: La kolapso de la 2-a Internacio], LW, vol. 21, p. 206-207.

89 Engels: Einleitung zu Marx' Klassenkämpfe in Frankreich [Engelso: Enkonduko en 'Klasbataloj en Francio' de Markso], MEW, vol. 22, p. 513; 523.

90 Lenin: Rede auf dem III. Kongreß der Kommunistischen Internationale [Lenino: Parolado en la 3-a Kongreso de la Komunista Internacio], LW, vol. 34, p. 499.

5.4 La socialisma revolucio

etburĝajn tavolojn aŭ almenaŭ instigi ilin al favora neŭtraleco. Jam el la revolucio de 1848 kaj speciale el la franca evoluo Markso konkludis en letero al Engelso, ke revolucio sur la kontinento dependos de la ebleco „*subteni la revolucion per ia dua eldono de la kampula milito*”.⁹¹ Lenino sekvis tiun politikon en la rusa revolucio de 1905-1907 kaj ankaŭ en la Oktobra Revolucio de 1917:

„En la momento de la oktobra renverso”, skribas li, „ni faris ja ne formalan, sed tre gravan (kaj tre sukcesan) politikan blokon kun la etburĝa kamparanaro, per tio ke ni tute kaj plene, sen ajna ŝanĝo, transprenis la agrarprogramon de la socialrevolu-ciuloj, t.e. ni faris sen ajna dubo kompromison, por pruvi al la kamparanoj, ke ni ne volas trakti ilin kiel malplimulton, sed ke ni volas interkompreniĝi kun ili.”⁹²

Lenino primokis la ideon ke povas ekzisti „pura” socia revolucio, ĉe kiu sur unu flanko kolektiĝas armeo kaj deklaras: „Ni estas por la socialismo” kaj sur la alia flanko la alia armeo anoncas: „Ni estas por la imperiismo”. Kiu atendas „puran” socialisman revolucion, tiu neniam spertos ĝin, tiu estas revoluciulo nur vorte kaj ne komprenas la realan revolucion; la socialisma revolucio en Eŭropo ne povas esti alia ol „*eksplodo de la amasbatalo de ĉiuj kaj ĉiaj subprematoj kaj malkontentuloj*”.⁹³

Jam post la spertoj de la juniaj bataloj de la parizaj laboristoj en la jaro 1848 kaj post la sekvaj okazaĵoj Markso kaj Engelso atentigis pri la ekstreme malfacilaj taskoj de revolucia movado de la laboristoj – kompare kun la burĝaj revolucioj:

91 Marx an Engels [Markso al Engelso], 1856-04-16, MEW, vol. 28, p. 47.

92 Lenin: Der „linke Radikalismus” ... [Lenino: La „maldekstra radikalismo” ...], LW, vol. 31, p. 58.

93 Lenin: Die Ergebnisse der Diskussion über die Selbstbestimmung [Lenino: La rezultoj de la diskuto pri la memdeterminado], LW, vol. 22, p. 363-364.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

„Burĝaj revolucioj”, skribis Markso en la ‘Dekoka brumero’, „sturmas rapide de sukceso al sukceso, iliaj dramecaj efektoj superas unu la alian, homoj kaj aĵoj ŝajnas esti muntitaj per fajrobriľantoj, ekstazo estas la spirito de ĉiu tago; sed ili estas mallongvivaj, ili baldaŭ atingis sian apogeon, kaj longa kapdoloro plagas la socion, antaŭ ol tiu lernas alproprigi al si la rezultojn de sia ŝtorma periodo. Proletaraj revolucioj, male, kiel tiuj de la 19-a jarcento, konstante kritikas sin mem, interrompas sin ade en sia evoluo, revenas al la ŝajne atingito por rekomenci ĝin denove, kruele ĝisfunde primokas la duonaĵojn, malfortaĵojn kaj mizerecojn de siaj unuaj provoj, ŝajnas faligi siajn kontraŭulojn por por ke tiuj suĉu novajn fortojn el la tero kaj restarigu sin pli gigante kontraŭ ili, ĉiam denove fortimiĝas antaŭ la malcerta monstreco de siaj propraj celoj, ĝis kiam la situacio estas kreita, kiu malebligas ĉian retroiron, kaj kiam la kondiĉoj mem krias: Hic Rhodus, hic salta! Jen la rozo, jen dancu!”⁹⁴

Malsame ol ĉiaj utopiaj kaj etburĝaj socialistaj tendencoj, Markso, Engelso kaj Lenino neniam provis detale antaŭdiri la vojojn, kiujn la socialisma revolucio iros en la diversaj landoj. Tion ili ĉiam sciis dependa de la konkretaj historiaj kondiĉoj, de la fortrilato de la klasoj, kiuj regos en la momento de revolucia evoluo. Ili emfazis, ke formoj kaj rimedoj de la batalo, la akreco kaj plejakriĝo, kiujn ĝi spertos, en tiaj situacioj dependas ofte de la demando, ĉu kaj kiagrade la malnovaj regantaj klasoj ĉe la defendo de siaj privilegioj povas uzi perforton. Lenino diris, ke Markso ne ligis al si nek al la estontaj gvidantoj de la socialisma revolucio la manojn „koncerne la formojn, la metodojn, la manieron de la transformego”.⁹⁵

Markso konsideris pacan evoluon de la socialisma revolucio en landoj kun fortaj demokratiaj institucioj kaj

94 Marx: Der achtzehnte Brumaire des Louis Bonaparte [Markso: La dekoka brumero de Louis Bonaparte], MEW, vol. 8, p. 118.

95 Lenin: Über ‘linke’ Kinderei und über Kleinbürgerlichkeit [Lenino: Pri ‘maldekstra’ infanaĵo kaj pri etburĝeco], LW, vol. 27, p. 336.

5.4 La socialisma revolucio

tradicioj (en parolado en Amsterdamo li nomis en la jaro 1872 Usonon, Anglion kaj Nederlandon) tute ebla.⁹⁶ Tiam Lenino skribis, ke, se ekzistas nedisputata instruo pruvita de la faktoj, tiam tiu,

„ke sole nur alianco de la bolŝevistoj kun la socialrevoluciuloj kaj kun la menŝevistoj, sole nur la tuja transigo de la tuta potenco en la manojn de la sovetoj malebligis internan militon en Ruslando”,

„ĉar kontraŭ tia alianco nenia interna milito komencita de la burĝaro estus pensebla.

„Per la transpreno de la tuta potenco”, skribis Lenino, „la sovetoj povus ankoraŭ nun – kaj tio estas verŝajne la lasta ŝanco – certigi la pacan evoluon de la revolucio, la pacan elekton de la deputitoj fare de la popolo, la pacan batalon de la partioj ene de la sovetoj, la elprovaĵon de la programoj de la diversaj partioj per la praktiko, la pacan transiron de la potenco el la manoj de unu partio en tiujn de alia.”⁹⁷

Eĉ post la spertoj de la Pariza Komunumo, Markso kontraŭis la fiksadon de ia antaŭe ellaborenda programo por socialisma revolucio. Oni ne povas solvi ekvacion, diris li, kiu ne entenas la elementojn de sia solvado. La doktrineca kaj nepre fantazia anticipo de agprogramo de estonta revolucio igas nur malkoncentrigi de la nuna batalo; kun la momento de la eksplodo de reala proletara revolucio, „*doniĝus ankaŭ la kondiĉoj de ĝia (kvankam certe ne idilia) rekta venonta agmaniero*”.⁹⁸

Markso, Engelso kaj Lenino limiĝis al fiksado de la bazaj

96 Marx: Rede über den Haager Kongreß [Markso: Parolado pri la Haga Kongreso], MEW, vol. 18, p. 160.

97 Lenin: Die russische Revolution und der Bürgerkrieg [Lenino: La rusa revolucio kaj la interna milito], LW, vol. 26, p. 19 s.; Die Aufgaben der Revolution [La taskoj de la revolucio], saml., p. 43; p. 50-51.

98 Marx an F. Domela-Nieuwenhuis [Markso al F. Domela-Nieuwenhuis], 1881-02-12, MEW, vol. 35, p. 160.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

celoj de socialisma revolucio – konkeron de la politika potenco fare de la laborista klaso, sociigon de la plej gravaj produktadrimedoj, aliancon de la laborista klaso kun la ceteraj laborulaj tavoloj – kaj lasis la detalojn al la historia evoluo. Kiam tiu kondukis 1917 al la venko de la rusa revolucio, Lenino diris, ke al kelkaj bazaj trajtoj de la Oktobra Revolucio atribueblas sendube *internacia* validoj.⁹⁹ Samtempe li emfazis, ke neniuj nacio atingos „*per la precize sama maniero*” la socialismon, kaj ke ĉiu alportos al tiu evoluo ion propran.¹⁰⁰ Li postulis kunligon de la ĝenerale validaj principoj kun konkreta aplikado de tiuj principoj al la diversaj kondiĉoj en la diversaj landoj.¹⁰¹

Lenino esprimis sin decide kontraŭ la eksporto de la revolucio kaj diris, ke tia „teorio” estus kompleta rompo kun la marksismo,

„ĉar tiu ĉiam rifuzis la ‘alvipadon’ de revolucioj, kiuj evoluas laŭ la mezuro, en kiu la klasaj antagonismoj, kiuj kaŭzas revoluciojn, akiras ĉiam pli grandan akrecon”.¹⁰²

Kelkajn jarojn post la venko de la Oktobra Revolucio Lenino diris, ke la ĉefan influon de la soveta potenco al la internacia revolucio „*ni faras nun per nia ekonomia politiko*”, ke la batalo estas mondnivele transigita al tiu kampo.¹⁰³

99 Lenin: Der „linke Radikalismus” ... [Lenino: La „maldekstra radikalismo” ...], LW, vol. 31, p. 5.

100 Lenin: Über eine Karikatur auf den Marxismus ... [Lenino: Pri karikaturo pri la marksismo ...], LW, vol. 23, p. 64.

101 Lenin: Der „linke Radikalismus” ... [Lenino: La „maldekstra radikalismo” ...], LW, vol. 31, p. 79.

102 Lenin: Seltsames und Ungeheuerliches [Lenino: Io stranga kaj monstra], LW, vol. 27, p. 56.

103 Lenin: X. Gesamttrussische Konferenz der KPR (B) [10-a Tutrusia Konferenco de la KPR (B)], LW, vol. 32, p. 458.

5.5 Bazaj trajtoj de la socialisma kaj komunisma socio

Same kiel la klasikuloj de la marksismo ĉiam rifuzis doni precizan bildon pri la formoj kaj metodoj de estonta socialisma transformego, tiel ili kontraŭis ankaŭ koncepti sur la labortablo la socialisman kaj komunisman socion de la estonteco. Markso kaj Engelso ĉiam kontentiĝis prezenti la bazajn trajtojn de la nova socio, la fundamentajn kondiĉojn por ĝia ekzistado kaj evoluo, kaj ankaŭ la grandan historian direkton de tiu evoluo, sed ĉio alia estu lasita al la generacioj kiu stariĝas rekte antaŭ la tasko starigi la novan socian konstruaĵon. Lenino skribis ankoraŭ du monatojn antaŭ la rusa Oktobra Revolucio:

„Ni ne asertas, ke Markso aŭ la marksistoj konas la vojon al la socialismo en ĉiuj ĝiaj detaloj. Tio estus sensencaĵo. Ni konas la direkton de tiu vojo, ni scias, kiuj klasaj fortoj estas gvidaj sur tiu vojo, sed tio fariĝas konkreta, praktika nur per la sperto de la milionoj, ekde kiam ili atakas la aferon.”¹⁰⁴

Markso, Engelso kaj Lenino eliris de la historia-materiisma baza penso, ke ĉiu nova socio estas materie preparata de la evoluo de la malnova. Tiuj materiaj-ekonomiaj premisoj, speciale certa evolunivelo de la produktadfortoj, kiu estas kreata de la kapitalisma produktadmaniero, estas por la socialismo nepraj. Al tiuj premisoj apartenas tia disvolviĝo de la kontraŭdiroj imanentaj de la kapitalismo, kiuj, kiel jam menciite, puŝas la laboristan klason kaj entute la laborulan loĝantaron al fundamenta transformado de la sociaj kondiĉoj.

„La kontraŭdiro inter la ĝenerala socia potenco, al kiu la kapitalo formiĝas”, skribas Markso, „kaj de la privata potenco de la unuopaj kapitalistoj super tiuj sociaj produktadkondiĉoj disvolviĝas ĉiam pli akre kaj inkludas la nuligon de tiu kondiĉo, per tio ke ĝi inkludas samtempe la ellaboradon de la produkt-

104 Lenin: Au dem Tagebuch eines Publizisten [Lenino: El la taglibro de ĵurnalisto], LW, vol. 25, p. 289.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

adkondiĉoj al ĝeneralaj, komunaj, sociaj produktadkondiĉoj.”¹⁰⁵

Markso kaj Engelso celis per tiuj ekonomiaj kondiĉoj tute ne nur la nivelon de la plej alte evoluintaj kapitalismaj landoj. Ĉe nombrado de la landoj, en kiuj ekde 1848 la granda industrio estis rapide evoluinta, Engelso nomis ankaŭ jam Rusion. Al la riproĉo, ke Rusio tempe de la revolucio de 1917 estis ekonomie kaj civilize ankoraŭ ne matura por la socialismo, Lenino respondis jam en 1923. Li demandis, ĉu popolo, kiu trafis sur revolucionan situacion, tian kia prezentiĝis en la dua mondmilito, pro la senperspektiveco de sia situacio, ne povas ĵeti sin en batalon kiu almenaŭ malfermos al ĝi ian perspektivon akiri *„pro si ne tute ordinarajn ŝancojn por pluevoludado de la civilizacio”*. Se por la starigo de la socialismo necesas certa kulturenivelo, kvankam neniu povas diri, kia tiu kulturenivelo estas, ĉar ĝi estas malsama en ĉiu eŭropa lando, kial Rusio ne komenca, sur revolucia vojo, akiri la kondiĉojn por tiu nivelo kaj poste, surbaze de la socialisma ŝtatpotenco, iri antaŭen kaj atingi la nivelon de la aliaj popoloj?¹⁰⁶

Kiel necesan kondiĉon por la starigo de la socialisma socio Markso, Engelso kaj Lenino konsideris ĉiam la politikan potencon de la laborista klaso. Engelso nomas ĝin *„la sola pordo en la novan socion”*.¹⁰⁷ Markso vidis en la Pariza Komunumo de 1871 la elementan formon de tia potenco,

„registaron de la laborista klaso, la rezulton de la batalo de la produktanta kontraŭ la alpropriganta klaso, la fine malkovritan politikan formon, sub kiu la ekonomia liberigo de la laboro povis plenumiĝi”.¹⁰⁸

105 Marx: Das Kapital, 3. Band [Markso: La kapitalo, 3-a volumo], MEW, vol. 25, p. 274.

106 Lenin: Über unsere Revolution [Lenino: Pri nia revolucio], LW, vol. 33, p. 463-465.

107 Engels an G. Trier [Engelso al G. Trier], 1889-12-18, MEW, vol. 37, p. 326.

108 Karlo Markso: La interna milito en Francio, v.c., p.

5.5 Bazaj trajtoj de la socialisma kaj komunisma socio

La sovetpotencon, kreitan sub pli evoluintaj historiaj kondiĉoj de la Oktobra Revolucio en 1917, Lenino nomis laborista-kaj-kampula potenco, kiu alportas kun si tian ŝanĝon de la demokratiaj formoj kaj institucioj,

„ke la de la kapitalismo servutigitoj, ke la laborantaj klasoj, en mezuro ankoraŭ neniam vidita en la mondo, efektive uzas la demokration”.¹⁰⁹

Kroman esencan kondiĉon por starigo de la socialisma socio la marksismo vidas en la *sociigo* de la produktadrimedoj, en ilia transigo en ŝtatan kaj kooperativan proprieton. Per tiu postulo la „moderna laborista socialismo” distingiĝas principe disde ĉiaj diversaj nuancoj de la burĝa kaj de la etburĝa socialismo, emfazis Engelso.¹¹⁰ Ĉe tio la klasikuloj de la marksismo lasis nenian dubon pri tio, ke ili konsideras la ŝtatan, do la tutsocian formon de proprieto, pro *objektivaj* kialoj, fontantaj el la karaktero de la moderna grandproduktado mem, la decidan proprietformon en la socialisma socio.

Markso kaj Engelso atentigis jam pri tio, ke la el la koncentriĝo kaj centriĝo de la kapitalo estiĝintaj akcisosocietoj kaj trustoj ĝis ŝtataj formoj de proprieto ene de la kapitalismo ne estas la solvo de la konflikto inter produktadfortoj kaj produktadkondiĉoj, sed ke ili kaŝas en si „la formalan

109 Lenin: Thesen und Referate auf dem I. Kongreß der Kommunistischen Internationale [Lenino: Tezoj kaj prelegoj en la 1-a Kongreso de la Komunista Internacio], LW, vol. 18, p. 479. –

Pri tiu situacio, kiu daŭris nur mallonge en Rusio, vd la kontribuaĵojn en „Oktobra Revolucio kaj la sekvoj”. Moshe Lewin: La Oktobra Revolucio rezistas al la historio; Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovet socio; Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj, Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, ISBN 978-2-918300-07-6 -vl

110 Einleitung zu Marx’ „Klassenkämpfe in Frankreich” [Engelso: Enkonduko al Markso: Klasbataloj en Francio], MEW, vol. 22, p. 511.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

rimedon, la manieron de la solvo". Per tio, ke la kapitalisma produktadmaniero premas pli kaj pli al transformado de la grandaj, sociigitaj produktadrimedoj en ŝtatan proprieton, Engelso skribis,

„ĝi montras mem la vojon al plenumado de tiu transformego. *La proletaro alprenas la ŝtatpotencon kaj transformas la produktadrimedojn unue en ŝtatan proprieton*".¹¹¹

Kiel jam menciite, Lenino nomis la ŝtatmonopolisman kapitalismon, kiu estiĝis dum la unua mondmilito, „*la kompleta materia preparo de la socialismo, ĝia senpera antaŭŝtupo*".¹¹²

La marksismo vidas do en la ŝtata proprieto la ĉefan formon de socialisma proprieto, ĉar la gigantaj modernaj produktadfortoj, produktitaj de la kapitalismo, aplikeblas por la utilo de la tuta popolo ne en konkurenco kaj diseriĝeco de izolitaj kaj disigitaj etaj komunumoj, sed nur per *tutsocia* planado, gvidado kaj kontrolado. Tiel Engelso primokis en la *Kontraŭ-Duringo* la apartigitajn ekonomiajn komunumojn proponitajn de Eugen Dühring¹¹³, kiuj devis posedi „*ekskluzivan proprietraĵon*” ankaŭ kontraŭ la socio; dum Duringo volis per ŝtatigo de la komerco tiri la *aĵojn* el la konkurenco, diris Engelso, li volas submeti la produktantan homon daŭre al la konkurenco.¹¹⁴ Pro la sama kialo Engelso kontraŭis ankaŭ la limigitecon de la – kiel li nomis ĝin – „*municipa socialismo*” de la socialreforma brita „Fabian Society”.¹¹⁵ La ŝtata proprietformo rezultis por

111 Engels: Anti-Dühring [Engelso: Kontraŭ-Duringo], MEW, vol. 20, p. 260-261.

112 Lenin: Die drohende Katastrophe und wie man sie bekämpfen soll [Lenino: La minacanta katastrofo kaj kiel kontraŭbatali ĝin], LW, vol. 15, p. 370.

113 En E-o: Duringo. -vl

114 Engels: Anti-Dühring [Engelso: Kontraŭ-Duringo], MEW, vol. 20, p. 269.

115 Engels an F. A. Sorge [Engelso al F. A. Sorge], 1893-01-18,

5.5 Bazaj trajtoj de la socialisma kaj komunisma socio

Markso, Engelso kaj Lenino do el la granda kaj la pezo de la modernaj produktadrimedoj kaj produktoj kaj ankaŭ el la celo kiom eble plej efike trudi la ĉiomintereson de la socialisma socio kontraŭ partaj kaj apartaj interesoj kun ilia neevitebla tendenco al memstariĝo:

„Kaj ke ni ĉe la transiro en la plenan komunisman ekonomion devas apliki la kooperativan mastrumadon en etendita mezuro, pri tio Markso kaj mi neniam dubis. Sed la afero devas esti aranĝita tiel, ke la socio, do unue kiel ŝtato, konservas la proprieton je la produktadrimedoj kaj ke tiel la apartaj interesoj de la kooperativo kontraŭ la tuta socio ne povas fiksiĝi.”¹¹⁶

En kiom eble plej rapida kaj plej ampleksa disvolvado de socialisma grandindustrio, troviĝanta en ŝtata propio kaj sub socia kontrolo, Lenino vidis la decidan taskon de la socialisma konstruado en Sovetruslando post la revolucio. Nur se oni sukcesas, per plej ŝparema mastrumado antaŭenigi la evoluon de la maŝineca grandindustrio kaj la provizadon de la lando per elektro, Sovetunio povos defendi sian lokon en la kapitalisma ĉirkaŭaĵo, diris Lenino.¹¹⁷

Speciale por la transigo de la etkampula produktado en la socialisman produktadmanieron jam Markso kaj Engelso proponis la kooperativan proprietformon. Markso diris, ke la laborista klaso devus kiel registaro fari disponojn, per kiuj la kampulo vidu sian situacion rekte plibonigita, kiuj povus do gajni lin por la revolucio; sed disponoj, kiuj ĝerme jam faciligas la transiron el la privata propio je grundo en kolektivan proprieton, tiel ke la kampulo per si mem ekonomie venas al tio.¹¹⁸ Lenino vidis en tio centran proble-

MEW, vol. 39, p. 8.

116 Engels an A. Bebel [Engelso al A. Bebel], 1886-01-23, MEW, vol. 36, p. 426.

117 Lenin: Lieber weniger, aber besser [Lenino: Prefere malpli, sed pli bone], LW, vol. 33, p. 489-490.

118 Marx: Konspekt von Bakunins „Staatlichkeit und Anarchie“ [Markso: Konspekto de Bakuno „Ŝtateco kaj anarĥio“], MEW,

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

mon de la socialisma transformado de la juna Sovetunio. La kooperativoj, diris li, sub la kondiĉo de disponpovo de la ŝtato pri ĉiaj grandaj produktadrimedoj, de la proletara ŝtatpotenco, de la alianco de la laborista klaso kun la laborantaj kampuloj sub gvidado de la laboristoj, la kooperativoj estas ĉio, kio necesas por starigi la socialisman socion.¹¹⁹

Ĉe la karakterizado de la fundamentaj trajtoj de socialisma socio, Markso, Engelso kaj Lenino emfazas la planecon de la ekonomia procezo, la neceson de „*socie-planeca regulado de la produktado laŭ la bezonoj de la tutaĵo kiel de ĉiu unuopulo*“.¹²⁰ Lenino deklaris, ke la socialismo estas nepensebla sen la teĥniko kaj la scienco kreitaj de la kapitalismo kaj sen planeca ŝtata organizado de la produktado kaj de la distribuado de la produktoj.¹²¹ Nur per tia – en la kapitalismo ne ebla – tutsocia planado kaj regulado de la ekonomiaj procezoj, laŭ la opinioj de la klasikuloj de la marksismo, la blinda efikado de ekonomiaj leĝoj supereblas, ĝustaj proporcioj de la ekonomia disvolvado eblas kaj konstanta pliiĝo de la socia riĉaĵo sen ekonomiaj krizoj atingeblas. Tuj post la fino de la interna milito kaj de la eksterlanda interveno Lenino postulis en la jaro 1921 ellabori „*ĝeneralan ŝtatan ekonomian planon por la plej proksima tempo*“.¹²²

Markso, Engelso kaj Lenino atribuis grandan gravecon al la *spirita-kultura* transformado en la socialisma kaj komun-

vol. 18, p. 633.

119 Lenin: Über das Genossenschaftswesen [Lenino: Pri la kooperativa sistemo], LW, vol. 33, p. 454.

120 Engels: Anti-Dühring [Engelso: Kontraŭ-Duringo], MEW, vol. 20, p. 261.

121 Lenin: über die Naturalsteuer [Lenino: Pri la natureca imposto], LW, vol. 32, p. 346.

122 Lenin: An Genossen Krshishanowski, an das Präsidium der staatlichen Plankommission [Lenino: Al la kamarado Kjiŝanovski, al la prezidantoj de la ŝtata plankomisiono], 1921-05-14, LW, vol. 32, p. 387.

5.5 Bazaj trajtoj de la socialisma kaj komunisma socio

isma socio. Jam en la *Kapitalo* Markso atentigis pri tio ke la „*edukado en la estonteco*” por ĉiuj infanoj super certa aĝo „*kunligos produktivan laboron kun instruado kaj gimnastiko ... kiel la solan metodon produkti ĉiuflanke evoluintajn homojn*”. Li antaŭdiris, ke post akirita politika potenco „*la laborista klaso konkeros ankaŭ la spacon por instruado de teĥnologio, teoria kaj praktika, en la laboristaj lernejoj*”.¹²³ Celo de la nova socio devas esti,

„anstataŭigi la partan individuon, kiu estas nur portanto de socia detala funkcio, per la plene disvolvita individuo, por kiu diversaj sociaj funkcioj estas manieroj okupiĝi kiuj sekvas unu la alian”.¹²⁴

Lenino emfazis post la socialisma revolucio, ke nova kulturo povas estiĝi nur per ĝisfunda kono kaj kritika ekzamenado de la *tuta* en la evoluo de la homaro kreita kulturo. La proletara kulturo ne falas el la ĉielo, diris li, ĝi ne estas invento de uloj kiuj deklaras esti fakuloj pri proleta kulturo, sed ĝi devas „*esti la laŭleĝa pluevoluado de tiu sumo da konoj*”, kiujn la homaro ellaboris al si sub la jugo de la socioj de bienposedantoj kaj de oficistoj.¹²⁵ Sen ekposedi la tutan sciencon kaj teĥnikon, ĉiujn konojn kaj la arton, la komunisma socio ne konstrueblas.¹²⁶

La marksismo komprenas la socialisman socion ne kiel ion unufoje por ĉiam pretan, sed – kiel ĉiujn aliajn sociajn fenomenojn – kiel estantan en konstanta ŝanĝiĝo kaj transformiĝo.¹²⁷ Lenino skribis, ke nur kun la socialismo

123 Karlo Markso: *La kapitalo*, ... ĉapitroj deka ĝis dektria, ..., v.c., p. 216.

124 Saml., p. 215-216.

125 Lenin: *Die Aufgaben der Jugendverbände* [Lenino: *La taskoj de la junulligoj*], LW, vol. 31, p. 267.

126 Lenin: *Erfolge und Schwierigkeiten der Sowjetmacht* [Lenino: *Sukcesoj kaj malfacilaĵoj de la sovetpotenco*], LW, vol. 29, p. 55.

127 Engels an O. v. Boenigk [Engelso al O. v. Boenigk], 1890-08-21, MEW, vol. 37, p. 447.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

komenciĝas la rapida, vera moviĝo antaŭen de la laborantaj amasoj sur ĉiuj kampoj de la publika kaj persona vivo, „*unue per partopreno de la plimulto de la loĝantaro kaj poste de la tuta loĝantaro*”.¹²⁸

La marksismo distingas *du stadiojn* de la komunisma socio, ĉe kiu la socialismo estas la unua, el la kapitalismo devenanta malpli alta fazo. La socialisma socio, klarigas Markso, estas ekonomie, morale, spirite ankoraŭ makulitaj per la „*denaskaj makuloj de la malnova socio, el kies utero ĝi venas*”. La sama rajto de la produktantoj, la sama mezuro de la laborefiko, estas ankoraŭ makulita de burĝa baro, ĝi estas juro de malegaleco kiel ĉia juro, ĉar ĝi mezuras malegalajn individuojn per sama skalo. Por eviti tiajn misojn, la rajto devas esti, anstataŭ sama, malsama:

„Sed tiuj misoj estas neeviteblaj en la unua fazo de la komunisma socio, kia ĝi ĵus eliris el la kapitalisma socio post longaj naskokonvulsioj. La rajto povas esti neniam pli alta ol la ekonomia konstruaĵo kaj la de ĝi kondiĉita kulturevoluo de la socio.

En pli alta fazo de la komunisma socio, post kiam la sklaviga subordigado de la individuoj sub la labordividon, per tio ankaŭ la kontraŭdiro de spirita kaj korpa laboro malaperis; post kiam la laboro fariĝis ne nur rimedo por vivado, sed mem la unua vivbezono; post kiam kun la ĉiuflanka disvolviĝo de la individuoj kreskis ankaŭ iliaj produktfortoj kaj ĉiuj fontoj de la kooperativa riĉeco fluas pli plene – nur tiam la mallarĝa burĝa jurhorizonto plene transpaŝeblas kaj la socio povas skribi sur sian standardon: Ĉiu laŭ siaj kapabloj, al ĉiu laŭ liaj bezonoj!”¹²⁹

Lenino rimarkigis en 1917, ke la evoluo al pli alta fazo de la komunisma socio, al nuligo de la klasoj kaj de la labordivido, al forigo de la kontraŭeco de spirita kaj korpa laboro, al la formortado de la ŝtato, estos procezo de longa

128 Lenin: Staat und Revolution [Lenino: Ŝtato kaj revolucio], LW, vol. 25, p. 486.

129 Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, v.c., p. 25-26.

5.5 Bazaj trajtoj de la socialisma kaj komunisma socio

daŭro.¹³⁰

En la komunisma socio regos la leĝo de la *ekonomio de la tempo*, diris Markso. Kiel ĉe la unuopa individuo, la ĉiuflankeco de la socia evoluo, de ĝia ĝuado kaj de ĝia agado, dependas de ĝia ŝparado de tempo. Ekonomio de tempo, en tio fine dissolviĝas ĉia ekonomio. La socio devas laŭcele dividi sian tempon por atingi produktaĵon laŭ siaj ĉiombazonoj. Ekonomio de tempo same kiel laŭplana distribuado de la labortempo al la diversaj branĉoj de produktado restas do „*unua ekonomia leĝo*” surbaze de la komuna produktado, ĝi fariĝas leĝo eĉ en pli alta grado.¹³¹ En la sama senco troviĝas la konstato de Lenino, ke la laborproduktivo estos „*lastinstance la ege plej grava, la decida por la venko de la nova socia ordo*”.¹³²

La baza principo de la komunisma socio, klarigas Markso, estos „*la plena kaj libera evoluo de ĉiu individuo*”.¹³³ El la evoluo de la produktadfortoj kaj el la sociaj produktadkondiĉoj, kiuj kongruas kun ili, neeviteble rezultas, kiel Markso montris, pozicio de la laboranta individuo, kiu kongruas kun ili. Nur socio, kiu akiris la konscian kontrolon super la produktado kaj super la tuta socia vivprocezo, kapablas produkti liberajn individuojn:

„Personaj dependecrilatoj (unue tute spontaj) estas la unuaj sociaj formoj, en kiuj la homa produktivo evoluas nur en malgranda amplekso kaj sur izolitaj punktoj. Persona sendependeco, bazita sur *aĵa* dependeco, estas la dua granda formo, en kiu estiĝas sistemo de ĝenerala socia metabolo, de la universalaj rilatoj, de ĉiufrankaj bezonoj kaj universalaj kapabloj. Libera

130 Lenin: Staat und Revolution [Lenino: Ŝtato kaj revolucio], LW, vol. 25, p. 483.

131 Marx: Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie [Markso: Skizoj de la kritiko de la politika ekonomio], p. 89.

132 Lenin: Die große Initiative [Lenino: La granda iniciato], LW, vol. 29, p. 416.

133 Karlo Markso: La kapitalo, ... 23-a ĉapitro, p.

5. Scienca socialismo kaj laborista movado

individueco, bazita sur la universala evoluo de la individuoj kaj la subordigo de sia komuna, socia produktivo, kiel de sia socia kapablo, estas la tria ŝtupo.”¹³⁴

134 Marx: Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie [Markso: Skizoj de la kritiko de la politika ekonomio], p. 75.

Literaturindikoj

Tiuj ĉi mallongaj indikoj por legado limiĝas al elekto inter la plej gravaj verkoj kaj laboraĵoj de Markso, Engelso kaj Lenino. La strukturo estas laŭ la ĉefaj sekcioj de tiu ĉi libro. La fontindikoj estas laŭ la eldonoj de Markso-Engelso kaj de Lenino de la Dietz-eldonejo, Berlino (mallongigoj: MEW [Marx-Engels Werke] kaj LW [Lenin Werke] [...])

Aldono de la tradukinto: En tiuj kazoj, en kiuj la proponata teksto ekzistas jam en Esperanto, la koncerna literaturindiko resendas al tiu eldono. La ceteraj legproponoj, ĉar ankoraŭ ne disponeblaj en Esperanto, aperas ĉi tie en malpli granda litertiparo. -vl

Literaturo pri Sekcio 1: Pri la estiĝhistorio de la marksismo

- **Karlo Markso: Pri la juda demando**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, 51 paĝoj, ISBN 978-2-918300-29-8
- K. Marx: Zur Kritik der Hegelschen Rechtsphilosophie. Einleitung [K. Markso: Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio. Enkonduko], MEW, vol. 1, p. 378-391; M-E-A-W, vol. 1, p. 9-25.
- F. Engels: Umriss zu einer Kritik der Nationalökonomie [F. Engelso: Konturoj de kritiko de la politika ekonomio], MEW, vol. 1, p. 499-524.
- K. Marx: Ökonomisch-philosophische Manuskripte [K. Markso: Ekonomiaj-filozofiaj manuskriptoj] (1844), MEW Ergänzungsband, I. Teil, p. 467-588.
- F. Engels – K. Marx: Die heilige Familie oder Kritik der kritischen Kritik [F. Engelso – K. Markso: La sankta familio aŭ la kritiko de la kritikista kritiko], MEW, vol. 2, p. 7-223.
- F. Engels: Die Lage der arbeitenden Klasse in England [F. Engelso: La situacio de la laboranta klaso en Anglio], MEW, vol. 2, p. 229-506.

Literaturo pri Sekcio 2: La dialektika materiismo

- **Karlo Markso: Tezoj pri Fojerbaho**, en: Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaho; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, 58 paĝoj, ISBN 978-2-918300-17-5, p. 6-9.
- **Karlo Markso: La mizero de la filozofio, 2-a ĉapitro § 1, La metodo**, en: Karlo Markso: La mizero de la filozofio, respondo al J.B. Prudono: „La filozofio de la mizero”; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; **Pri J. B. Prudono**. Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, 197 paĝoj, ISBN 978-2-918300-08-3, p. 116-138.
- K. Marx: Einleitung zur Kritik der politischen Ökonomie [K. Markso: Enkonduko al la Kritiko de la politika ekonomio], MEW, vol. 13, p. 615-642.
- **Karlo Markso: Postparolo al la 2-a eldono de la Kapitalo**, en: Karlo Markso: La kapitalo, Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio, Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, **Ĉapitroj unua ĝis naŭa**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, 378 paĝoj, ISBN 978-2-918300-13-7, p. 19-28.
- F. Engels: Herrn Eugen Dührings Umwälzung der Wissenschaft (Anti-Dühring) [F. Engelso: La transformego de la scienco fare de s-ro Eugen Dühring (Kontraŭ-Duringo)], MEW, vol. 20, p. 1-303.
- F. Engels: Dialektik der Natur [F. Engelso: Dialektiko de la naturo], MEW, vol. 20, p. 307-568.
- F. Engels: Ludwig Feuerbach und der Ausgang der klassischen deutschen Philosophie [F. Engelso: Ludoviko Fojerbaho kaj la fino de la klasika germana filozofio], MEW, vol. 21, p. 263-307.
- F. Engels: Die Entwicklung des Sozialismus von der Utopie zur Wissenschaft [F. Engelso: La evoluo de la socialismo de la utopio al scienco], MEW, vol. 19, p. 189-228.
- W. I. Lenin: Materialismus und Empirioskritizismus [V.I. Lenino: Materiismo kaj empirioskriticismo], LW, vol. 14, p. 9-366.
- W. I. Lenin: Karl Marx – kurzer biographischer Abriß [V. I. Lenino: Karlo Markso – mallonga biografia skizo], LW, vol. 21, p. 34-80.

Literaturo pri Sekcio 2: La dialektika materiismo

- W. I. Lenin: Philosophische Hefte [V. I. Lenino: Filozofiaj kajeroj], LW, vol. 38, p. 7-682.
- W. I. Lenin: Über die Bedeutung des streitbaren Materialismus [V. I. Lenino: Pri la graveco de la batalpreta materiismo], LW, vol. 33, p. 213-223.

Aldono de la tradukinto: Ĵus aperis aktualaj kontribuoj pri tiu ĉi temaro:

Aktualaj verkoj en E-o pri La dialektika materiismo

– **La homo kaj lia naturo – La bildo pri la homo en la kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj.** Lucien Sève: Ĉu la homo? – La marksa antropologio kaj ĝiaj bazaj konceptoj; Werner Seppmann: Mond- kaj hom-bildoj – Pri la formoj de ideologiaj potencreproduktado; Helga E. Hörz: Ĉu la hombildo krizas?; Hans-Peter Brenner: Biopsiĥosocia unuo homo – kogna cerbesplorado kaj ties impulsoj por la marksisma hombildo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, ISBN 978-2-918300-15-1;

– **Werner Seppmann: Laboro kaj dialektiko – Pri la emancip-horizonto de la Marksa pensado;** Harald Neubert: La „historia misio de la laborista klaso” ĉe Markso kaj Engelso kaj la historia realeco; Hans Kölsch: Kubo – Heinz Dieterich – kontraŭe; Otto Meyer: Teologio de liberigo – ĉu etikedo-trompo aŭ paŝoj al emancipiĝo? Eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, ISBN 978-2-918300-18-2

Literaturo pri Sekcio 3: La materiisma histori-koncepto

- **Karlo Markso: Tezoj pri Fojerbaĥo**, en: Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, 58 paĝoj, ISBN 978-2-918300-17-5, p. 6-9.
- K. Marx, F. Engels: Die deutsche Ideologie [K. Markso, F. Engelso: La germana ideologio], MEW, vol. 3, p. 13-530.
- **Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto de la Komunista Partio**, Esperanta traduko kaj postparolo de Detlev Blanke, Progreso, Moskvo, 1990, ISBN 5-01-002341-5.
- K. Marx: Zur Kritik der politischen Ökonomie [K. Markso: Kontribuajo al la kritiko de la politika ekonomio], MEW, vol. 13, p. 7-11
- **Frederiko Engelso: Kontribuo de la laboro en la homiĝo de la simio**, en: Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, 58 paĝoj, ISBN 978-2-918300-17-5, p. 20-34.
- **Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, 204 paĝoj, ISBN 978-2-918300-16-8
- F. Engels: Briefe an Schmidt, Bloch, Mehring, Borgius [F. Engelso: Leteroj al Schmidt, Bloch, Mehring, Borgius] (1890-1894), MEW, vol. 37, p. 435-438; 462-465; 488-495; vol. 39, p. 96-100; p. 205-207.
- W. I. Lenin: Was sind die „Volksfreunde“ und wie kämpfen sie gegen die Sozialdemokraten? [V. I. Lenino: Kio estas la „popolamikoj“ kaj kiel ili batalas kontraŭ la socialdemokratoj?], LW, vol. 1, p. 119-338.
- W. I. Lenin: Karl Marx – kurzer biographischer Abriß [V. I. Lenino: Karlo Markso – mallonga biografia skizo], LW, vol. 21, p. 34-80.
- W. I. Lenin: Staat und Revolution [V. I. Lenino: Ŝtato kaj revolucio], LW, vol. 25, p. 393-507.
- W. I. Lenin: Über den Staat [V. I. Lenino: Pri la ŝtato], LW, vol. 29, p. 460-479.

Literaturo pri Sekcio 4: La politika ekonomio

- **Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), Embres-et-Castelmaure, 2009, 41 paĝoj, ISBN 978-2-918300-00-7
- **Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, dua eldono, Monda Asembleo Socia (MAS), Embres-et-Castelmaure, 2010, 61 paĝoj, ISBN 978-2-918300-01-4
- **Karlo Markso: La kapitalo** (disponibla en Esperanto, ĝis fine de 2010, la tri libroj de la unua volumo:) Karlo Markso: La kapitalo, Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio, Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, **Ĉapitroj unua ĝis naŭa**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS) 2009, 378 paĝoj, ISBN 978-2-918300-13-7; ... **Ĉapitroj deka ĝis dektria**, ..., 2010, 243 paĝoj, ISBN 978-2-918300-14-4 kaj Ĉapitroj dekkvara ĝis dudekkvina, ... 2010, ISBN 978-2-918300-30-4.¹
- W. I. Lenin: Der Imperialismus als höchstes Stadium des Kapitalismus [V. I. Lenino: La imperiismo kiel plej alta stadio de la kapitalismo], LW, vol. 22, p. 191-309.

1 Nialingve ekzistas resumoj de la unua libro de la *Kapitalo*. Carlo Cafiero: Kompendio de la Kapitalo de Karlo Markso, [Esperanta traduko el la franca de Petro Levi], Eldona Fako Koooperativa de SAT, s.l., 2009, ISBN 978-2-918053-00-2, 155 paĝoj. Recenzo pri tiu libro: Legi la marksan „Kapitalon” resume, Recenzo de Cafiero: *Kompendio de la Kapitalo de Karlo Markso*: <<http://mas-eo.org/article404.html>>. Pli mallonga resumo de la sama volumo de la *Kapitalo*, verkita de Frederiko Engelso, troviĝas en la unua volumo de la E-a eldono de la *Kapitalo* mem: Frederiko Engelso: La *Kapitalo* de Markso, (9 p.), en: Karlo Markso: La kapitalo ... Ĉapitroj unua ĝis naŭa, v.c., p. 362-371. -vl

***Aldono de la tradukinto: ĵus aperis aktualaj
kontribuajoj pri tiu ĉi temaro:***

**Aktualaj verkoj en E-o pri *Politika
ekonomio***

– Jörg Goldberg k.a.: *Ekonomia krizo – Analizoj n-ro*

1. Jörg Goldberg: La historia pozicio de la nuna ekonomia krizo – pli da demandoj ol respondoj; Horst Hensel: La nomoj de la mono – kontriguajo al karakterizo de la nuna kapitalismo; Harald Werner: Notoj pri la psikologio de la krizo; Sarah Wagenknecht: Brulfaristoj kiel fajrobrigado – Kritiko de la krizmastrumado. Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, 57 p., ISBN 978-2-918300-09-0;

– *Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 2.* Joachim Bischoff: La

financkrizo kaj alternativoj; Andreas Fisahn: Demokratia stirado de la ekonomio; Manfred Sohn: Dek tezoj por sociigo de la cirkuladsfero; Luciano C. Martorano: Socialismo, sociigo, demokratio; Manfred Lauermann: La dialektika planekonomio de Ĉinio – respondo al la financkrizo. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, 81 p., ISBN 978-2-918300-12-0;

– *Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 3 (2010)*, Werner Sepp-

mann: Riskokapitalismo; Richard Sorg: Domenico Losurdo interpretas Niĉeon; Christina Kaindl: Subjektiveco en la krizo; Harald Werner: La krizo en la ordinara konscio; Christoph Butterwegge: Mondekonomia krizo, evoluo de la socialŝtato kaj malriĉeco, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, ISBN 978-2-918300-22-9

Literaturo pri Sekcio 5: Scienca socialismo kaj laborista movado

- **Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto de la Komunista Partio**, Esperanta traduko kaj postparolo de Detlev Blanke, Progreso, Moskvo, 1990, ISBN 5-01-002341-5.
- K. Marx: Klassenkämpfe in Frankreich [Karlo Markso: Klasbataloj en Francio], MEW, vol. 7, p. 9-107.
- F. Engels: Revolution und Konterrevolution in Deutschland [F. Engeso: Revolucio kaj kontraŭrevolucio en Germanio], MEW, vol. 8, p. 3-108.
- K. Marx: Der achtzehnte Brumaire des Louis Bonaparte [K. Markso: La dekoka brumero de Louis Bonaparte], MEW, vol. 8, p. 111-207.
- K. Marx: Inauguraladresse und Provizorische Statuten der Internationalen Arbeiter Assoziation [K. Markso: Malferma mesaĝo kaj Provizora statuto de la Internacia Laborista Asocio], MEW, vol. 16, p. 5-16.
- **Karlo Markso: La interna milito en Francio (1871, La Pariza Komunumo)**, kun enkonduko de Frederiko Engelso, tradukita de Vilhelmo Lutermano, Mondial, Novjorko, 2005, 137 paĝoj, ISBN 1-59569-025-5.
- **Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo**, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso kaj la letero al Bracke, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2-a eldono, 2010, 41 paĝoj, ISBN 978-2-918300-21-2.
- K. Marx, F. Engels: Zirkularbrief an August Bebel, Wilhelm Liebknecht, Wilhelm Bracke u.a. [K. Markso, F. Engelo: Cirkulero al Aŭgusto Bebelo, Vilhelmo Libkneĥto, Vilhelmo Brako k.a.], MEW, vol. 34, p. 401-408.
- F. Engels: Die Entwicklung des Sozialismus von der Utopie zur Wissenschaft [F. Engelo: La evoluo de la socialismo de la utopio al scienco], MEW, vol. 19, p. 189-228.
- W. I. Lenin: Was tun? (Brennende Fragen unserer Bewegung) [V. I. Lenino: Kion fari? Brulantaj demandoj de nia movadi], LW, vol. 5, p. 355-551.
- W. I. Lenin: Ein Schritt vorwärts, zwei Schritte zurück [V. I. Lenino: Unu paŝon antaŭen du paŝojn returnen], LW, vol. 6, p. 197-430.
- W. I. Lenin: Zwei Taktiken der Sozialdemokratie in der demokratischen Revolution [V. I. Lenino: Du taktikoj de la socialdemokrataro en la demokratia revolucio], LW, vol. 9, p. 1-130.
- W. I. Lenin: Sozialismus und Krieg [V. I. Lenino: Socialismo kaj milito], LW, vol. 21, p. 295-341.

Literaturindikoj

- W. I. Lenin: Der Opportunismus und der Zusammenbruch der II. Internationale [V. I. Lenino: La oportunismo kaj la kolapso de la 2-a Internacio], LW, vol. 21, p. 446-460.
- W. I. Lenin: Der Imperialismus als höchstes Stadium des Kapitalismus [V. I. Lenino: La imperiismo kiel plej alta ŝtupo de la kapitalismo], LW, vol. 22, p. 191-309.
- W. I. Lenin: Die Aufgaben des Proletariats in unserer Revolution [V. I. Lenino: La taskoj de la proletaro en nia revolucio], LW, vol. 24, p. 39-77.
- W. I. Lenin: Die drohende Katastrophe und wie man sie bekämpfen soll [V. I. Lenino: La minacanta katastrofo kaj kiel kontraŭbatali ĝin], LW, vol. 25, p. 327-377.
- W. I. Lenin: Werden dei Bolschewiki die Staatsmacht behaupten? [Ĉu la bolŝevistoj konservos la ŝtatpotencon?], LW, vol. 26, p. 69-121.
- W. I. Lenin: Zweiter Gesamtrussischer Kongreß der Sowjets der Arbeiter- und Bauerndeputierten [V. I. Lenino: Dua tutrusia kongreso de la sovetoj de la laboristaj kaj kampulaj deputitoj], LW, vol. 26, p. 233-255.
- W. I. Lenin: Die nächsten Aufgaben der Sowjetmacht [V. I. Lenino: La venontaj taskoj de la sovetpotenco], LW, vol. 27, p. 225-268.
- W. I. Lenin: Die proletarische Revolution und der Renegat Kautsky [V. I. Lenino: La proletara revolucio kaj la renegato Kaŭcko], LW, vol. 28, p. 225-327.
- W. I. Lenin: Entwurf des Programms der KPR (B) [V. I. Lenino: Malnetajo de la programo de la KPR (B)], LW, vol. 29, p. 81-124.
- W. I. Lenin: Die große Initiative [V. I. Lenino: La granda iniciato], LW, vol. 29, p. 397-424.
- W. I. Lenin: Der „linke Radikalismus“, die Kinderkrankheit im Kommunismus [V. I. Lenino: La „maldekstra radikalismo“, la infanmalsano en la komunismo], LW, vol. 31, p. 1-106.
- W. I. Lenin: Über die Naturalsteuer [V. I. Lenino: Pri la naturec-imposto], LW, vol. 32, p. 341-380.
- W. I. Lenin: Über das Genossenschaftswesen [V. I. Lenino: Pri la kooperativ-sistemo], LW, vol. 33, p. 453-461.
- W. I. Lenin: Wie wir die Arbeiter- und Bauerninspektion reorganisieren sollen [V. I. Lenino: Kiel ni reorganizu la laboristan kaj kampulan inspektadon], LW, vol. 33, p. 468-473.
- W. I. Lenin: Lieber weniger, aber besser [V. I. Lenino: Prefere malpli, sed pli bone], LW, vol. 33, p. 474-490.

***Aldono de la tradukinto: Ĵus aperis aktualaj
kontribuajoj pri tiu ĉi temaro:***

**Aktualaj verkoj en E-o pri *Scienca
socialismo kaj laborista movado***

- **Oktobra Revolucio kaj la sekvoj.** Moshe Lewin: La Oktobra Revolucio rezistas al la historio; Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovet socio; Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, 48 p., ISBN 978-2-918300-07-6;
- **Kien Ĉinio? Dek du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj.** François Jullien: Ĉinscienco en sakstrato – Ĉinio en la spegulo de Okcidento; Manfred Szameitat: Sukcesa, sed ne socialisma; Ingo Nentwig: Naciaj malplimultoj kaj politiko pri naciaj malplimultoj en la PR Ĉinio; Barry Sautman: Protestoj kaj separismo en Tibeto; Michael Parenti: La mito de Tibeto; Enfu Cheng: Fundamentaj trajtoj de la socialisma merkatekonomio; Juan Xinhua: Harmonia socio, salajrolaboro kaj klasbataloj; Theodor Bergmann: La socialisma disvolvo-strategio de la PR Ĉinio; Li Bingyan: Ĉinio sub influo de la novliberalismo; Helmut Peters: Popolrespubliko Ĉinio: 30 jaroj da reform- kaj malferm-politiko; Jean-Louis Rocca: Ĉu la ĉina meza klaso estas revolucia? Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, 142 p., ISBN 978-2-918300-06-9;
- **Domenico Losurdo: Ĉu fuĝi el la historio? La rusa kaj la ĉina revolucio hodiaŭ.** El la itala germanigis Erdmute Brielmayer kaj Hermann Kopp, elgermanigis Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, 199 p., ISBN 978-2-918300-26-7;
- **Roger Martelli: La komunismo estas bona partio – diru al ĝi JES! – Parto unua.** Elfrancigita de Vilhelmo

Literaturindikoj

Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, ISBN 978-2-918300-36-6 (La parto unua konsistas el la 75 unuaj paĝoj de la teksto)

Rimarkoj de la tradukinto

La fontindikoj troviĝas en la piednotoj sampaĝe kun la koncerna citaĵo. Se la referenco koncernas jam en Esperanto alireblan tekston, la citaĵo kaj la fontindiko estas laŭ tiu.

Propraj nomoj, se ili jam ekzistas en la E-a literaturo, aperas en sia E-a formo. Propraj nomoj, kiuj ankoraŭ ne ekzistas en E-o, se ili estas ofte uzataj en tiu ĉi libro aŭ en cetera marksisma literaturo, estas ĉi tie E-igitaj. Mi konscias ke ne ekzistas kontentiga solvo por la problemo de la propraj nomoj en E-o. Germanaj legantoj povus ofendiĝi vidante *Goethe* aŭ *Marx* en formo de Goeto kaj Markso, sed la libro ne estas destinita por germanlingvanoj – ili povas legi la libron en sia germana lingvo. Kia ajn aliro havas siajn mankojn. Mia elekto estas tiu, kiu povus kontentigi mondvasle la plej multajn E-istojn.

La titoloj de marksaj kaj engelsaj verkoj jam alireblaj en Esperanto estas listigitaj ankaŭ en la indekso, tie koneblaj per *kursivo*, kaj tiel ĉiuj mencioj kaj citaĵoj el tiuj Esperantaj tekstoj de la klasikuloj de marksismo facile videblas. Kiel konstateblas, ankoraŭ tute mankas verkoj de Lenino en Esperanto, citaĵoj el liaj verkoj estas do ĉiuj tradukitaj el siaj germanlingvaj fontoj, kiuj ja estas siavice tradukitaj el la rusa. Espereble en estonta reeldono jam disponeblos aŭtentaj tradukoj de leninaj verkoj el la rusaj originaloj. Ĉiukaze mi ŝatus instigi niajn rusajn amikojn okupiĝi pri tiu grava tasko.

La indekso, – nekutima miksaĵo de aŭtoraj nomoj, titoloj de verkoj, de gazetoj, nomoj de lokoj, de organizaĵoj, kaj, ĉefe, de multegaj plej diversaj ŝlosilvortoj – ŝajnas unuavide ne tre kohera aranĝo. Tamen, tiel eblas trovi koncernan teksteron pri konata, aparte marksisma nocio – ekz-e *tendenca falo de la profitkvoto*, *fremdiĝo*, *organika konsisto de la kapitalo* ktp –, temojn pri kiuj la marksismo disting- iĝas disde diversaj aliaj konceptoj – ekz-e *ŝtato*, *anarĥio*, *anarĥiismo*, *diktatoreco de la proletaro*, *oportunismo* ktp –,

sed fine ankaŭ multajn ŝajne banalajn vortojn, kiuj iel ludas rolon en la marksismo.

Uzo de la indekso por okaza enrigardado – por tio la *enhavtabelo* komence de la libro estas verŝajne eĉ pli interesa – tamen ne povas anstataŭi la regulan legadon de la libro, kiel cetere la legado de tiu ĉi libro ne povas anstataŭi la legadon de la klasikuloj mem. Ĝi volas ja esti nenio alia ol enkonduko en la studadon de la marksismo, kaj pro tio ĝi proponas ĉe sia fino liston de unue studindaj verkoj.

Ke tro multaj da tiaj studindaj verkoj ankoraŭ ne ekzistas nialingve, estas bedaŭrinda fakto. Sed aliflanke estas tute nova situacio ke ja disponeblas nialingve certa bazo de marksisma literaturo en Esperanto. Espereble tio instigas al studado de tiuj verkoj.

Kvankam la tradukado kaj publikigado de la marka *Kapitalo* progresas, necesas konscii ke tiu tasko estas tre granda kaj ke la apero de ĉiuj kvar volumoj en Esperanto (kiuj eĉ ne ĉiuj tradukiĝis al pluraj t.n. grandaj lingvoj) bezonas multan tempon kaj paciencon. La apero de la unua volumo de tiu verkego invitas tamen jam nun al studado kaj diskutado de diversaj temoj tie pritraktataj. Pro tio naskiĝis la diskutlisto <kapitalrondo@yahoogroups.com>, al kiu ĉiu leganto povas aliĝi. Kvankam tiu diskutlisto proponas diskuti ĉefe teksterojn en la *Kapitalo*, kompreneble eblas diskuti tie ne nur la *Kapitalon* mem, sed ankaŭ nociojn, rimarkojn, eldirojn de Markso (aŭ Engelso) en aliaj verkoj. Kaj, sekve, la legantoj ankaŭ de tiu ĉi libro estas invititaj dividi en tiu diskutlisto kun aliaj marksemuloj siajn rimarkojn pri la enhavo de tiu ĉi libro.

Do, bonvenon en la diskutlisto *kapitalrondo*!

Vilhelmo Lutermano

Indekso

abelo.....	107
absoluta monarĥio.....	139
absoluta spirito.....	48
abstrakta individuo.....	70
administrado.....	139
agnostikismo.....	97
akcio.....	181
akcisocieto.....	181p.
aksiomoj.....	96
akumulado de la kapitalo.....	147, 171pp., 176
akumuladrimedo.....	160
Allgemeine Augsburger Zeitung.....	20
alproprigo.....	154p., 163p., 166pp., 176, 181
alproprigprocezo.....	95p.
alvokiteco.....	99
Alzaco-Loreno.....	205
amasoj.....	101, 215, 224
Ameriko.....	151
Amsterdamo.....	227
analizo.....	197
anarĥiismo.....	218p., 221
anarĥiistoj.....	204, 219
anarĥio.....	143, 153
Anglio.....	23, 211, 227
antagonismaj klasoj.....	137
antagonismo. 44, 81, 103, 116p., 122, 128p., 135, 141, 176, 190, 192, 201, 204, 221, 228	
antaŭhistorio.....	103
antikristo.....	17
antikveco.....	122
antropogenezo.....	105

antropologio.....	18
aperformo.....	91, 159, 163, 178
aperformo kaj esenco.....	90
aprioro de la naturo.....	104
apudeco.....	88
araneo.....	107
arĝento.....	159, 162
armeo.....	139
armita potenco.....	138
arto.....	100, 131
ateismo.....	19
Auerbach, Berthold.....	35
aŭfhebi.....	56, 182
aŭfhebo.....	41
avangardo.....	215p.
Babeuf.....	34
Bacon.....	82
bankkapitalo.....	186
banko.....	183p.
bankroto.....	175
Barmeno.....	23
Bauer, Bruno.....	14, 18, 20, 26, 50p.
Bauer, Edgar.....	20
bazo.....	126, 142
Bebelo (Bebel).....	211, 216
Bentham.....	54
Berlino.....	20
bestoj.....	104
bezono.....	156, 159, 163
bezonoj.....	106, 115p., 119
biologio.....	83
Bismarko.....	211
bolŝevistoj.....	227
Börne.....	11
borso.....	181
Bremeno.....	20, 50
Britio.....	202

Indekso

Bruselo.....	61, 63p.
brutaligo.....	174
brutbredado.....	129
bruto.....	159
Bund der Gerechten.....	23
burĝaro.....	148, 192, 196
burĝaro kaj proletaro.....	132
buŝorganoj.....	106
Cabet.....	54
Carlyle.....	31, 58
celoj.....	115
centriĝo de la kapitalo.....	173p., 177, 181, 231
cerbo.....	74, 106
Cieszkowski.....	15
cikloj.....	175
cirkonstancoj.....	54, 102
cirkulado.....	163, 175
cirkuladrimedo.....	160
civitanaj rajtoj.....	26
Cottonopolis.....	21
ĉartismo.....	58, 60p.
ĉartistoj.....	22, 63
ĉasisto.....	105
ĉiomkapitalisto.....	182
ĉiomlaboro.....	161
Darmŝtato.....	61
Darvino.....	68, 84, 100, 104
demokratia respubliko.....	140
demokratiaj rajtoj.....	140
demokratio.....	19, 25, 135, 140, 198p., 231
demokratio - burĝa kaj proleta.....	140
demokratio burĝa.....	140
demokratio proletara.....	140

Indekso

determinismo.....	91
Deutsche Jahrbücher.....	19
Dezamy.....	54
dialektiko.....	198p.
dialektiko subjektiva.....	86
Diderot.....	72
Die Neue Zeit.....	65
Dietzgen.....	79
diktatoreco.....	139
diktatoreco de la burĝaro.....	139
diktatoreco de la proletaro.....	129, 139, 217
diktatoreco de nobelaro.....	139
dio.....	16, 28, 48
disciplino.....	220
disertacio.....	18
distribuido.....	110, 234, 237
disvolviĝo.....	80
doktrino.....	193
duismo.....	25, 73p.
duismo de spirito kaj naturo.....	73
dunglaboro.....	168
dunglaboristo.....	150, 167, 168, 171
dunglaboro.....	138, 165
<i>Dunglaboro kaj kapitalo</i>	110, 168p.
dungo.....	174
Duringo (Dühring).....	232
ebleco kaj realeco.....	90
Ejnŝtejno.....	77
ekkonkapablo.....	98
ekkonprocezo.....	98
ekkonteorio.....	78, 86, 89, 94p., 97, 99
ekonomiaj krizoj.....	175
ekonomiigo.....	177

Indekso

ekonomio.....	124
ekspluadgrado.....	169
ekspluatado.....	167p., 177, 179
eksporto de la revolucio.....	228
eksproprieto.....	151, 173, 177
eksterigo.....	47
ekvilibro.....	78
Elberfeldo.....	61
elektaj.....	209
emancipiĝo.....	27, 30, 50, 140, 196, 208
empiriokriticismo.....	75, 94
energio.....	77, 89
enhavo kaj formo.....	90
entreprenisto.....	169
epikura naturfilozofio.....	18
Erfurta Partiprogramo.....	217
Erfurta Programkoncepto.....	175
esenco.....	91
esto.....	102
etapoj.....	113
etproduktistoj.....	133
etproprieto.....	133
evoluceno.....	115, 117
evolukoncepto.....	83
evoluleĝoj.....	116, 118
evoluo.....	117, 119
evoluprocezo.....	81, 83
evoluŝtupo.....	102
evoluteorio.....	86
Fabian Society.....	232
familio.....	165
feloj.....	159
feltoj.....	159

Indekso

fenomenologio de la spirito.....	51
fervoyo.....	174, 182
fetiĉeco.....	160
fetiĉismo.....	161
feŭdaj sinjoroj.....	132
feŭdismo.....	112, 148
Fihto.....	15
filozofio.....	124, 126, 193
financkapitalo.....	184, 186, 205
financoligarĥio.....	186
fiŝkaptisto.....	105
fiziko.....	77, 83
Fojerbaĥo....11p., 14pp., 20, 24, 26, 28, 35, 39, 41, 44, 46, 48, 51, 54, 56, 60, 66, 69p., 72, 74, 105, 116	
fojerbaĥtezoj.....	70
formortado de la ŝtato.....	236
fortrilato.....	126, 139, 196, 226
Franca Revolucio.....	81, 128, 221
Francio.....	205, 211
Frankfurto.....	211
Franklin, Benjamin.....	105
fremdigita laboro.....	36, 38, 40
fremdigo.....	38, 41pp., 47
fremdiĝo.....	16, 39, 41, 43, 47, 55
fremdiĝo de la homo disde la homo.....	40
Furiero (Fourier).....	10, 15, 34, 54, 192
Gay.....	54
gento.....	128p.
gentordo.....	138
geologio.....	83
Germana Ligo.....	211
Germanaj jarlibroj.....	19
Germanaj-francaj jarlibroj.....	24, 26, 31, 37

Indekso

Germanio.....	23, 62, 205, 211, 217
gildanoj.....	132
gildo.....	150
Goeto (Goethe).....	45
Gucko (Guckow).....	11
Guizot.....	34, 128
ĝenerala ekvivalento.....	159
ĝuaj rimedoj.....	170
Hanovro.....	56
Harney.....	63
Haxthausen.....	128
hazardo.....	116, 124, 160
hegela jurfilozofio.....	24, 26
hegela ŝtatjuro.....	24
Hegelo.....	14p., 18, 23pp., 35, 39, 47p., 51, 57, 62, 66, 68, 72, 79pp., 84p., 87p., 90, 92, 94p., 117, 138
hegemonio.....	186
Hejno (Heine).....	11, 35
Helmholco.....	77
Helvetio.....	54
Helvetius.....	72
Herwegh, Georg.....	33
Hess, Moses.....	15, 19, 33, 35, 41, 60
Hindio.....	128, 202
historia rolo.....	50
historio.....	49
Holbaĥo (Holbach).....	35, 72
homa individuo.....	69
homaro.....	103
homrajto je privata proprieto.....	26
homrajtoj.....	26
humanismo.....	19
Hume.....	16

Indekso

ĥaoseco.....	183
ĥemio.....	83p., 95, 146
idealismo.....	72, 77pp., 97
idealo.....	113, 192
ideoj.....	48, 120pp., 126
ideologiaj formoj.....	103
ideologio.....	117, 124
ideologo.....	125
iluzioj.....	121
imanentaj kontraŭdiroj.....	87
imperiismo.....	184pp., 199, 204
impostoj.....	138
individo.....	103
industria revolucio.....	152
industria rezervarmeo.....	174
industrikapitalo.....	186
industrio.....	105, 151
infanoj.....	165
instinkto.....	107
interefiko.....	111
interesoj.....	122
Internacia Laborista Asocio.....	214
internaciismo.....	201pp., 216
Internacio.....	214
interŝanĝado.....	125
interŝanĝo.....	158pp., 175
interŝanĝprocezo.....	158
interŝanĝvaloro.....	156, 159, 166
irlandanoj.....	202
Irlando.....	128
Jesuo.....	14
judoj.....	26
Junges Deutschland.....	20

Indekso

junhegelanoj.....	14, 18, 20, 34, 50pp.
juro.....	100, 110, 236
jurscienco.....	125
jursistemo.....	125, 131
justeco.....	125, 139
kampanoj.....	225
kampkulturo.....	129
Kantio.....	15, 23, 95
kapitaleksporto.....	184pp.
kapitalismo.....	112
kapitalisto.....	164
kapitalo.....	150, 164, 167pp.
kapitalo konstanta.....	169, 172, 179
kapitalo socia.....	181
kapitalo varia.....	169, 172
kapitalrilato.....	150, 171
kartelo.....	181p., 185
Kaŭcko (Kautsky).....	113, 144
kaŭzeco.....	88, 90
kaŭzo.....	116
kavaliroj.....	132
Kenigsbergo (Königsbert / Kaliningrado).....	16
klasa dominado.....	139
klasbatalo.....	44, 59, 61, 117, 122p., 128p., 133, 135, 189, 191pp., 196, 215
klasdistingo.....	132
klasharmonio.....	216
klaskonscio.....	213
klaso.....	121, 137, 168, 193p., 222, 224
klaso per si.....	134
klaso por si.....	134
klasoj.....	110, 117, 128pp., 133, 138
klasoj-difino.....	131

Indekso

klasregado.....	139
klasstrukturo.....	25
kolektivo.....	233
kolonioj.....	151, 185, 202, 204p.
Kolonjo.....	22
komerco.....	130, 150, 163, 179
kompromisoj.....	197
komunismo.....	23, 42, 62, 192p., 233, 235p.
komunisto.....	22
komunistoj.....	191pp., 197, 210, 215
koncentriĝo de la kapitalo..	133, 173, 181pp., 193, 231
konkreta kaj abstrakta.....	90
konkreteco.....	94
konkurenco....	32, 133, 137, 171, 173, 178, 183, 185p., 193, 222, 232
konkurenco kaj monopolo.....	32
konscio.....	79, 102, 104, 120, 122, 126, 194, 198
konstitucioj.....	123
konsumado.....	164
konsumkapablo.....	176
konsumkondiĉoj.....	176
konsumlimiĝo.....	176
kontraŭdiro.....	179, 192, 229, 236
kontraŭdiro absoluta.....	153
kontraŭeco.....	181
<i>Kontribuo de la laboro al la homiĝo de la simio.....</i>	101, 106
konzerno.....	182
kooperativo.....	231, 233p., 236
kraŝo.....	176
kredito.....	175, 183
kreditsistemo.....	173
kresko.....	187

Indekso

kristanismo.....	17, 21, 72
kritiko.....	220
<i>Kritiko de la Gotaa Programo</i>	236
krizo komerca.....	22
krizoj.....	33, 176, 183, 192p., 222, 234
krudmaterialo.....	183, 185
kulturo.....	235
kunlaborado.....	106, 110, 151
kvalitaj ŝanĝiĝoj.....	77, 89
kvalito.....	156
kvanto.....	156
kvoto de plusvaloro.....	169
<i>La interna milito en Francio</i>	205p., 230
<i>La kapitalo</i>36, 45, 81, 84, 86, 107, 109, 131, 144, 149, 151, 157, 167pp., 175, 177, 211, 235, 237	
La Mettrie.....	72
<i>La mizero de la filozofio</i>	111, 207, 221
<i>La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato</i>	112, 128p., 129, 138, 140, 141
labordivido.....	110, 125p., 129p., 151, 153, 159, 236
laborforto.....	146, 150, 152, 158, 164pp., 168p., 171
labori.....	116
laboriloj.....	104, 106
laborintenso.....	152, 157
laboristo.....	165
laborkondiĉoj.....	171
laboro.....	74, 104pp., 157, 236
laboro - ekzistkondiĉo de la homo.....	157
laboro - naturneceso.....	158
laboro abstrakta.....	158
laboro akumulita.....	169
laboro fremda.....	154
laboro mortinta.....	168

Indekso

laboro propra.....	154
laboro valorestiga.....	158
laboro viva.....	168p.
laborobjekto.....	109
laborprocezo.....	109, 167
laborproduktivo.....	130, 172p.
laborprodukto.....	156
laborrimedo.....	152
laborrimedoj.....	109
laborsufero.....	174
labortago.....	152, 166
labortempo.....	157, 165
lando.....	166
laringo.....	106
Lasalo (Lassalle, F.).....	84
Lavoisier.....	145
leĝeco.....	115
leĝo.....	25, 137
leĝoj.....	116, 120
Lepsiko.....	50
Lesingo (Lessing).....	35
Leske.....	61
Levasseur de la Sarthe.....	34
libera laboristo.....	150
libereco.....	26, 118p., 150, 165, 186, 202p.
libereco de diskuto kaj kritiko.....	220
liberecoj.....	141
Libkneĥto (Liebknecht).....	216
lignaĵisto.....	157
Ligo de la Justuloj.....	63
Ligo de la Komunistoj.....	62, 64
lingva komunikado.....	95
lingvo.....	45, 74, 106, 120

Indekso

Locke.....	82
logiko.....	25
loĝkondiĉoj.....	57
Londono.....	63p.
MacCulloch.....	31
malcerteco de la ekzistado.....	175
malemancipado.....	44
malsekureco.....	194
maltusa loĝantarteorio.....	32
mamuloj.....	104
manĉestra kotonindustrio.....	32
Manĉestro.....	21p., 63, 84
<i>Manifesto de la Komunista Partio</i>	40, 64, 101, 128, 132, 135, 140p., 148, 190p., 191, 197, 201p., 207p., 210, 213p., 222
mano.....	106
manufakturo.....	151
maso.....	77
maŝinaro.....	152p.
maŝino.....	152
maŝinsistemo.....	152
matematiko.....	77
materiismo.....	73
materio.....	75p., 78
Maurer.....	128
Mayer.....	77
Mehring.....	123
memakordiĝo.....	19, 24, 35, 42
memdeterminado.....	203
memfremdiĝo.....	40, 43, 55
memkonscio.....	51
memkontrolado.....	220
memmoviĝo.....	86p., 90, 94

Indekso

memproduktiĝo.....	48
menŝevistoj.....	113, 227
merkato.....	150, 164, 175
metabolo.....	104, 107, 119
metafiziko.....	51, 82, 120
mezaj tavoloj.....	133
mezepoko.....	154
Mignet.....	128
militkaptitoj.....	130
milito.....	130, 204p., 211
Mill.....	31
mizerejo.....	29
mizero.....	29, 174, 177, 223
modulado.....	106
Moll.....	63
moncirkulado.....	163
mondkomerco.....	163
mondmerkato.....	149, 163, 177, 180, 193
mondmilito.....	214
mondmono.....	160
monfetiĉo.....	162
monismo.....	74
monkapitalisto.....	181
monkapitalo.....	184
mono.....	150, 159p., 162p., 166, 175
monopolkapitalismo.....	126
monopolo.....	32, 38, 181pp., 186, 199
monopolprofito.....	179
monteorio.....	146
moralo.....	120, 126
Morgano (Morgan).....	128p.
moro.....	125
Moskvo.....	65

Indekso

movado.....	193
movado politika.....	135
movforto.....	116
moviĝformoj.....	76p.
moviĝo.....	76, 80, 89p.
mozelaj kampkulturistoj.....	19
multflankeco de la laboristo.....	153
naciismo.....	203, 216
nacio.....	201, 204, 214
naturaj-ekonomio.....	149, 159
naturalismo.....	48
naturdialektiko.....	83p.
naturfortoj.....	152, 149
naturkoncepto.....	105
naturleĝoj.....	118
naturneceso.....	118, 119, 158
naturrejto.....	125
natursciencoj.....	32, 68, 76, 83
neandertala homo.....	104
neceso kaj hazardo.....	90
Nederlando.....	227
nefremdigita laboro.....	41
negacio de la negacio.....	48, 87pp.
nesciado.....	174
neŝtato.....	143
Neue Rheinische Zeitung.....	202
New Moral World.....	63
nobelaro.....	22, 138, 196
nobelaro kaj burĝaro.....	128
Northern Star.....	63
Oktobra Revolucio....	113, 142, 205, 215, 224p., 228p., 231
oportunismo.....	209, 214pp.

Indekso

opozicio.....	122
organika konsisto de la kapitalo.....	172, 174, 178
organiziteco.....	220
origina akumulado de la kapitalo.....	150, 176
origino de la familio.....	112, 129
origino de la klasoj.....	131
oro.....	159, 162
Oveno (Owen).....	10, 54, 192
pacistoj.....	204
paco.....	206
pagrimedo.....	160
parazita kapitalismo.....	186
Pariza Komunumo.....	141p., 197, 227, 230
Parizo.....	24, 27, 63
parlamentismo.....	209
parolorganoj.....	106
partio.....	213pp., 219p., 224
partiteorio.....	215
paŝtistaj triboj.....	129
patricioj.....	132
patrujo.....	201
pensado.....	106
pensmanieroj.....	121
pensmaterialo.....	124
percepto.....	75
perforto.....	186, 209pp.
Petty.....	11, 145
planado, planeco.....	232, 234
plebanoj.....	132
plivalorigaj rimedoj.....	170
plivalorigo.....	163p., 167, 178pp.
plusfarado.....	167
pluslaboro.....	130p., 166, 168

Indekso

plusprodukto.....	166
plusvaloro.....	145pp., 163p., 166pp., 171p., 178
polico.....	139
politika ekonomio - difino.....	144
politikaj rajtoj.....	140
politiko.....	24, 120, 205, 209, 230
poloj.....	202
popolsuvereneco.....	19
postulo kaj propono.....	32
poŝto.....	182
pragmateco.....	116
prakomunisma socio.....	128
praktikaj bezonoj.....	95
praktiko.....	66, 70, 74, 95, 97, 126, 227
prasocio.....	112
Priestley.....	146
<i>Pri la juda demando</i>	26, 27, 239
<i>Principoj de komunismo</i>	210
privilegioj.....	194, 208, 210
procezo.....	80
produktadfortoj.....	32, 109, 111, 116, 120, 148p., 179
produktadkondiĉoj.....	103, 110pp.
produktadmaniero.....	102, 119, 150, 167p., 177
produktadnivelo.....	135
produktado.....	96, 100, 102, 105, 107, 125
produktadprocezo.....	131, 158, 167, 170p., 194
produktadrilatoj.....	102, 162
produktadrimedoj...110, 132, 150, 154, 165, 167, 169,	
177, 197, 233	
produkti.....	116
profetaĵoj.....	60
profitkvoto.....	178p., 184
profito.....	178, 184

Indekso

programo.....	189
proletaro.....	133, 172, 192p., 222
proletiĝo.....	133
Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!.....	64
proprietkondiĉoj.....	110
proprieto.....	139, 181
proprietrilatoj.....	102
protoplasmo.....	106
Prudono (Proudhon).....	34, 62
Prusio.....	211
psiĥo.....	73
publika potenco.....	138
purgatorio.....	17
radikala demokratio.....	26
rajtoj.....	141
reakcio.....	186p.
reciproka efiko.....	91
reflekto.....	97
reformismo.....	216
reformo.....	200p.
registaro kaj borso.....	140
regno de la libereco.....	119
regno de la neceso.....	119
reguliganta principo.....	19
regulo.....	125
Rejna Gazeto.....	19p., 22, 24
relativeco.....	78
religikritiko.....	69
religio.....	28pp., 100, 104, 120, 124
reproduktado.....	165
reproduktado ampleksiĝinta.....	171
reproduktado simpla.....	171
reproduktadprocezo.....	170p.

Indekso

respeguliĝo.....	122
revelacio.....	20
revolucio.....	33, 102, 112, 135, 209pp., 224pp.
revolucio paca.....	60
rezistado.....	175
Rheinische Zeitung.....	18, 168
Ricardo.....	11, 31, 37, 105, 128, 145p.
riĉiĝinstinkto.....	164
riĉuloj kaj malriĉuloj.....	130
Robspjero (Robespierre).....	34
Romo.....	132
Ruge.....	14p., 19, 23p., 26, 29
Rusio.....	128, 230
Rusoo (Rousseau).....	35
Saint Just.....	34
salajro.....	167, 169, 179, 185, 208
salajro-teorio.....	147
<i>Salajro, prezo kaj profito</i>	208
salo.....	159
saltoj.....	87
sangligoj de gentanoj.....	138
Say, Jean-Baptiste.....	34
Schapper.....	63
Scheele.....	146
Schmidt.....	82
Schorlemmer.....	84
Schulz, Wilhelm.....	34, 44
scienca analizo.....	152
scienca socialismo.....	101
sciencscienco.....	67
sekteco.....	218
sendependeco.....	118
senklasa socio.....	129, 135

Indekso

senlaboreco.....	179
senpartieco.....	66
Sensimono (Saint Simon).....	9
sensorganoj.....	45
sentoj.....	121
senvalagiĝo.....	175
servutuloj.....	132, 138, 165
silezia teksistribelo.....	35
simio.....	101, 106
sindikatoj.....	207
Sismondi.....	34
Skarbek, Frederic.....	34
sklavismo.....	112, 130
sklavistoj.....	138
sklavo.....	165
sklavoj.....	130, 132, 159
sklavribejoj.....	122
Smith, Adam.....	11, 31, 37, 105, 145
socia scienco.....	113
sociaj formacioj.....	112
sociaj rilatoj.....	111
socialismo.....	192p., 229, 234pp.
socialismo-komunismo.....	112
socialistoj.....	192
socialreformismo.....	216
socialrevoluciuloj.....	225, 227
socialŝovinismo.....	216p.
solidareco.....	205
sovetoj.....	227, 231
sovetpotenco.....	142
Sovetunio.....	233p.
spaco kaj tempo.....	78
speguladteorio.....	98

Indekso

spegulbildo.....	94
speguliĝo.....	97, 106
Spinozo.....	51
stagnado.....	175
statistiko.....	182
strategio.....	189, 197, 201
Strauß.....	14, 50
striko.....	207
subjekto kaj objekto.....	83
submajstroj.....	132
submetiĝo.....	125, 143
substanco.....	51
superakumulado.....	184
superfluigo relativa.....	174
superstrukturo.....	101p., 121pp., 126
Svisa Respublikano.....	22
ŝanĝiĝo.....	80, 94
ŝanĝiĝo de la kvanto en kvaliton.....	87, 89, 91
Ŝelingo (Schelling).....	20
ŝtata proprieto.....	182
ŝtata volo.....	137
ŝtatformoj.....	25, 137, 140
ŝtatmonopolisma kapitalismo.....	232
ŝtatmonopolismo.....	187
ŝtatmonopolo.....	188
ŝtato.....	19, 24p., 100, 121, 125, 131, 138, 181p., 222, 231, 233
ŝtato - endormiĝo.....	143
ŝtato - formortiĝo.....	143
ŝtato - ĝia "reala bazo".....	137
ŝtato - ĝia estiĝo.....	138
ŝtato - ĝia retroefiko.....	142
ŝtato - superfluigi.....	143

Indekso

ŝtato antikva.....	138
ŝtato de la laborista klaso.....	142
ŝtato feŭda.....	138
ŝtato moderna reprezenta.....	138
ŝtatpotenco.....	137
ŝtatteorio.....	139, 141, 143
ŝuisto.....	157
tajloro.....	157
taktiko.....	189, 197, 201, 214
teĥniko.....	171
teksisto.....	107
tendenca falo de la profitkvoto.....	178p., 181
teologio.....	16, 126
teorio.....	126, 189, 215, 218
teorioj.....	124
terkulturisto.....	150
<i>Tezoj pri Fojerbaĥo</i>	67, 70, 95
The New Moral World and Gazette of the Rational Society.....	22
Thierry.....	34, 128
trafiko monda.....	149
transformiĝo.....	80
trapenetriĝo de la kontraŭecoj.....	87
trezorfaristo.....	164
trompo.....	164
trudvendo.....	175
trusto.....	181p., 185, 231
tutsocia plano.....	116
universaleco.....	30, 39
universo.....	76p., 83
unueco de ago.....	220
unueco de la kontraŭecoj.....	86, 90
Usono.....	140, 227

Indekso

utopiistoj.....	23, 190, 191, 192
uzobjekto.....	161
uzvaloro.....	156pp., 163p., 166p.
Vajtlingo (Weitling).....	23, 33, 63
valordifino.....	165
valoresprimo.....	158
valorestiga substanco.....	157
valorestigo.....	146, 167
valorformo.....	162
valorkreado.....	164
valormezuro.....	160
valoro.....	146, 157p., 161p., 164pp.
valorteorio.....	146
vampireco.....	168
vapormaŝino.....	152
varcirkulado.....	160p., 163
varfetiĉo.....	162
varformo.....	158, 160, 162
varintersanĝo.....	146
varmerkato.....	107, 150
varmo.....	76
varo.....	146, 150, 156pp., 161p., 165pp., 171, 176
varproduktado.....	130, 154, 156, 158p., 161, 163
varvaloro.....	158
vasaloj.....	132
vendo.....	156
vertebruloj.....	104
vigleco.....	175
vilaĝa komunumo.....	128
vivbezonoj.....	102
vivkonceptoj.....	121
vivrimedoj.....	175
voĉdonrajto.....	140

Indekso

volnocio.....	125
Voltero (Voltaire).....	35
Vorwärts.....	65
Wagner, A.....	95
Zuriko.....	22

Monda Asembleo Socia (MAS) ...

... estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto (reta, laŭokaze papera) *Le Monde diplomatique en Esperanto* (<http://eo.mondediplo.com>) volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retpoŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado la tekstojn kunigitajn en la ĉi tie listigita libro „*Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ...*”. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: <http://mas-eo.org> enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado – ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj – jen en la vico de ilia apero:

1. – C. F. Ramuz: Aline (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-0-2

2. – Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseoj pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-2-6

3. – Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, 2007, 59 p., ISBN 978-2-9529537-1-9

4. – Kubaj infanrakontoj, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, 2007, 120 p., ISBN 978-2-9529537-4-0

5. – GBEGLO Koffi: Esperantujismo, 2008, 72 p., ISBN 978-2-9529537-5-7

6. – Johano Besada: Eseoj, 2008, 92 p., ISBN 978-2-9529537-3-3

7. – Karlo Markso: Nerefuteblaj citaĵoj, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2008, p. 91 p., ISBN 978-2-9529537-8-8

8. – Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj (2 paroladoj), elhispanigita de Amparado Cisnero, 2009, 84 p., ISBN 978-2-9529537-7-1

9. – Dominique Vidal kun Sébastien Boussois: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn 1947-1949, elfrancigis Vilhelmo Lutermano, 2009, 361 p., ISBN 978-2-9529537-6-4

10. – Unuiĝintaj Nacioj: Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Univerŝala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj – trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009, 230 p., ISBN 978-2-9529537-9-5

11. – Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-00-7

12. – Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009, 52 p., ISBN 978-2-918300-02-1

13. – Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-21-2

14. – Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo, 2009, 103 p., ISBN 978-2-918300-05-2

15. – Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio. Tri infanteatraĵoj. Elhispanigitaj de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kaj Vilhelmo Lutermano, 2009, 112 p., ISBN 978-2-918300-04-5

16. – Kien Ĉinio? Dek-du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj. François Jullien: Ĉinscienco en sakstrato – Ĉinio en la spegulo de Okcidento; Manfred Szameitat: Sukcesa, sed ne socialisma; Ingo Nentwig: Naciaj malplimultoj kaj politiko pri naciaj malplimultoj en la PR Ĉinio; Barry Sautman: Protestoj kaj separismo en Tibeto; Michael Parenti: La mito de Tibeto; Enfu Cheng: Fundamentaj trajtoj de la socialisma merkatekonomio; Jian Xinhua: Harmonia socio, salajrolaboro kaj klasbataloj; Theodor Bergmann: La socialisma disvolvo-strategio de la PR Ĉinio; Rolf Berthold: Pri la interna kaj ekstera politiko de la KP de Ĉinio; Li Bingyan: Ĉinio sub influo de la novliberalismo; Helmut Peters: Popolrespubliko Ĉinio: 30 jaroj da reform- kaj malferm-politiko; Jean-Louis Rocca: Ĉu la ĉina meza klaso estas revolucia? Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009, 142 p., ISBN 978-2-918300-06-9

17. – Karlo Markso: La mizero de la filozofio, respondo al J. B. Prudono: „La filozofio de la mizero”; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; **Pri J. B. Prudono.** Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009, 196 p., ISBN 978-2-918300-08-3

18. – Jörg Goldberg k.a.: Ekonomia krizo – Analizoj n-ro 1, Jörg Goldberg: La historia pozicio de la nuna ekonomia krizo – pli da demandoj ol respondoj, Horst Hensel: La nomoj de la mono – kontribuaĵo al karakterizo de la nuna kapitalismo, Harald Werner: Notoj pri la psikologio de la krizo,

Sarah Wagenknecht: Brulfaristoj kiel fajrobrigado – Kritiko de la krizmas-trumado, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, 2009, 57 p., ISBN 978-2-918300-09-0

19. – Salim Lamrani (komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo – La Kuba Kvinopo, Howard Zinn: La radikoj de la politiko de Usono rilate Kubon, **Noam Chomsky:** Kubo kaj Usono – preskaŭ duonjarcento da teroro, **William Blum:** La nepardonebla revolucio, **Michael Parenti:** Agreso kaj propagando kontraŭ Kubo, **Piero Glejeses:** Kubo, Afriko kaj la kvin kubanoj, **Ignacio Ramonet:** Miamo, nesto de teroristoj, **Salim Lamrani:** La Kuba-Usona Nacia Fondaĵo (KUNF) kaj la internacia terorismo, **Leonard Weinglass :** La proceso kontraŭ la Kuba Kvinopo, **Wayne Smith:** Trista paĝo en la historio de usona juro, **Saul Landau:** Kvin kubanoj en malliberejo: viktimoj de la obsedo de Bush, **Michael S. Smith:** Raporto pri du procesoj, **James Petras:** La Kvin Kubanoj – kandidatoj por la Nobel-premio, **Jitendra Sharma:** Veraj batalantoj kontraŭ terorismo, **Ricardo Alarcón de Quesada:** La kazo de la Kvin –pruvo de la terorismo de Usono kontraŭ Kubo, **Gianni Miná:** Historio kiun la amaskomunikiloj kaŝas – la kvin kubanoj, **Nadine Gordimer:** La homaro kiel reflektado de la justeco, tradukoj de div. MAS-anoj, 2009 tradukoj de div. MAS-anoj, 2009, ISBN 978-2-918300-10-6

20. – Elisée BYELONGO IŜELOKE: Eĥoj el Bembujo. Tradicio, rilatoj kun Banyamulenge, la genezo de la milito en Kongolan0-11-3do-Kinŝaso, kaj la diasporo rilate al Esperanto, 2009, 91 p., ISBN 978-2-918300-11-3

21. – Oktobra Revolucio kaj la sekvoj. Moshe Lewin: La Oktobra Revolucio rezistas al la historio; Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovet socio; Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, 48 p., ISBN 978-2-918300-07-6

22. – Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 2, Joachim Bischoff: La financkrizo kaj alternativoj, Andreas Fisahn: Demokratia stirado de la ekonomio, Manfred Sohn: Dek tezoj por sociigo de la cirkuladsfero, Luciano C. Martorano: Socialismo, sociigo, demokratio, Manfred Lauermann: La dialektika plan-ekonomio de Ĉinio – respondo al la financkrizo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009, 81 p., ISBN 978-2-918300-12-0

23. – La homo kaj lia naturo – La bildo pri la homo en la kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj. Lucien Sève: Ĉu la homo? – La marka antropologio kaj ĝiaj bazaj konceptoj, Werner Seppmann: Mond- kaj hom-bildoj – Pri la formoj de ideologiaj potence reproduktado, Helga E. Hörz: Ĉu la hombildo krizas? Hans-Peter Brenner: Biopsihosocia unuo homo – kognita cerbesplorado kaj ties impulsoj por la marksisma hombildo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009, ISBN 978-2-918300-15-1

24. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj unua ĝis naŭa, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2009, 381 p., ISBN 978-2-918300-13-7

25. – Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verkoj, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2010, ISBN 978-2-918300-17-5

26. – Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010, ISBN 978-2-918300-16-8

27. – Arnold Petersen: Komentoj al la „Komunista Manifesto”, tradukis el la angla kaj kompilis T. Veder, (reviziita reeldono de la sama, S.A.T., Parizo 1933), 2010, ISBN 978-2-918300-19-9

28. – Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 3 (2010), Werner Seppmann: Riskokapitalismo; Richard Sorg: Domenico Losurdo interpretas Niĉeon; Christina Kaindl: Subjektiveco en la krizo; Harald Werner: La krizo en la ordinara konscio; Christoph Butterwegge: Mondekonomia krizo, evoluo de la socialŝtato kaj malriĉeco, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010, ISBN 978-2-918300-22-9

29. – Werner Seppman: Laboro kaj dialektiko – Pri la emancip-horizonto de la Marksa pensado; Harald Neubert: La „historia misio de la laborista klaso” ĉe Markso kaj Engelso kaj la historia realeco; Hans Kölsch: Kubo – Heinz Dieterich – kontraŭe; Otto Meyer: Teologio de liberigo – ĉu etikedo-trompo aŭ paŝoj al emancipiĝo? Eseo elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2010, ISBN 978-2-918300-18-2

30. – Adjévi ADJE: El togolanda saĝosako, 2010, ISBN 9782-918300-20-5

31. – Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo. Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010, ISBN 978-2-918300-25-0 (nur rete)

32. – Ivan Efremov: La nebulozo de Andromedo, Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, 2010, ISBN 978-2-918300-24-3

33. – Domenico Losurdo: Ĉu fuĝi el la historio? La rusa kaj la ĉina revolucioj hodiaŭ, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010, 199 p., ISBN 978-2-918300-26-7

34. – Maritza Gutiérrez: José Martí – de kie kreskas la palmo, 2010, ISBN 978-2-918300-28-1

35. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj deka ĝis dektria, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010, 243 p., ISBN 978-2-918300-14-4

36. – Kien la klimato? Post Kopenhago kaj Koĉabambo, Eseo kaj raportoj, Alexis Passadakis kaj Hendrik Sander: Konkurenco en la forcejo Klimatpolitikaj perspektivoj post la fiasko de Kopenhago;

Hans-Jörg Schimmel: La ideologia dimensio de la CO₂-diskuto; Karl Hermann Tjaden: Kapitalmoviĝo kaj klimata okaziĝo; raportoj, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, ISBN

37. – Georgo Pleĥanov: Pri rolo de la persono en historio, El la rusa tradukis Jurij Finkel, 2010, 57 p., ISBN 978-2-918300-36-6 (tiu ĉi libro).

38. – Karlo Markso: Pri la juda demando, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010, 49 p., ISBN 978-2-918300-29-8

39. – Eddy Raats: Post la pluvo, pluvego, Travivaĵoj de junulo, 2010, ISBN 978-2-918300-34-2

40. – Adebayo AFOLARANMI: Ronke, la ĵaluzulino, 2010, 85 p., ISBN 978-2-918300-35-9

41. – Jozefo Ŝlejŝtejno: Enkonduko en la studadon de Markso, Engelso kaj Lenino, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 271 p., ISBN 978-2-918300-27-4 (tiu ĉi libro).

La libroj de MAS akireblas ĉe la kutimaj librovendejoj en Esperantujo, precipe ĉe tiuj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Iliaj tekstoj estas libere elŝuteblaj por membroj de MAS

Jozefo Ŝlejŝtejno:
Enkonduko en la studadon
de Markso, Engelso kaj Lenino
Monda Asembleo Socia (MAS)
2010
ISBN 978-2-918300-27-4

enpaĝigita de MAS
per OpenOffice 3.3.1 sub Mandriva Linukso 2010
kaj DejaVu Serif 10 pt
presita en Germanio en la jaro 2010